

# **BAHÀ'U'LLÀH KAJ LA NOVA EPOKO**

## **ENKONDUKO AL LA BAHAA KREDO**

Verkis: J. E. Esslemont

Tradukis: Lidia Zamenhof

Ĝisdatigis: Roan Orloff Stone

Dua eldono: Bahaa Esperanto-Ligo, 1978  
(Unua eldono, Bahaa Esperanto-Eldonejo "La Nova Tago", 1930)

I.S.B.N: 0-87961-085-9

## ENHAVO

ENKONDUKO AL LA ESPERANTO-TRADUKO .....	7
DANKESPRIMO .....	7
ANTAŬPAROLO AL LA ELDONO DE 1937 .....	8
ANTAŬPAROLO AL LA ELDONO DE 1950 .....	8
ANTAŬPAROLO AL LA ELDONO DE 1970 .....	8
ENKONDUKO .....	9
La Plej Granda Okazintaĵo en la Historio .....	10
Sanĝigado de la Mondo .....	10
La Suno de Justeco .....	11
La Misio de Bahá'u'lláh .....	11
Plenumiĝo de Profetaĵoj .....	11
Pruvo de Profeteco .....	12
Malfacilaĵoj de la Esplorado .....	13
La Celo de la Libro .....	13
ĈAPITRO II: BÁB, LA ANTAŬINTO .....	14
Naskiĝloko de la Nova Revelacio .....	14
Lia Frua Vivo .....	14
La Deklaracio .....	15
Disvastiĝado de la Baba Movado .....	15
La Pretendoj de Báb .....	15
Pligrandiĝo de Persekutoj .....	16
Martiriĝo de Báb .....	16
Tombo sur Monto Karmelo .....	16
Skriboj de Báb .....	17
Tiu, al Kiu Dio Sin Malkaŝos .....	17
Releviĝo, Paradizo kaj Infero .....	17
Sociaj kaj Etikaj Instruoj .....	17
Sufero kaj Triumfo .....	18
ĈAPITRO III: BAHÁ'U'LLÁH, LA GLORO DE DIO .....	19
La Naskiĝo kaj Frua Juneco .....	19
Malliberigita kiel Babano .....	19
Ekzilo en Bagdadon .....	20
Du Jaroj en Sovajejo .....	20
Kontraŭstaro de Mulaoj .....	21
La Deklaracio en Ridván apud Bagdado .....	21
En Konstantinopolo kaj Adrianopolo .....	21
Leteroj al la Reĝoj .....	22
En la Malliberejo en Akreo .....	22
Malseverigo de la Rigoro .....	23
Malfermo de la Mallibereja Pordo .....	23
La Vivo en Bahjí .....	24
La Morto .....	25
La Profeteco de Bahá'u'lláh .....	25
Lia Misio .....	27
Liaj Skribaĵoj .....	28
La Bahaa Spirito .....	28
ĈAPITRO IV: `ABDU'L-BAHÁ: LA SERVANTO DE BAHÁ .....	30
Naskiĝo kaj Infaneco .....	30

La Juneco .....	30
La Edziĝo .....	31
La Centro de la Sankta Interligo .....	31
Ripetigo de la Rigoraĵoj .....	32
Turkaj Esplorkomisionoj .....	33
Vojaĝoj tra la Okcidento .....	33
Reveno en la Sanktan Landon .....	33
La Milittempo en Hajfa .....	34
Sir `Abdu'l-Bahá `Abbás, K.B.E. ....	35
La Lastaj Jaroj .....	35
La Morto de `Abdu'l-Bahá .....	35
Skribaĵoj kaj Paroladoj .....	36
La Posteno de `Abdu'l-Bahá .....	36
Ekzempliganto de Bahaa Vivo .....	37
ĈAPITRO V: KIO ESTAS BAHAAANO? .....	38
Vivi la Bahaan Vivon .....	38
Sindono al Dio .....	38
Serĉado de la Vero .....	38
Amo al Dio .....	39
Sindettenemo .....	40
Obeo .....	40
Servado .....	40
Instruado .....	41
Afableco kaj Respektigo .....	41
La Pekon-Nevidanta Okulo .....	42
Humileco .....	42
Veramo kaj Honesteco .....	43
Sin-Realigo .....	43
ĈAPITRO VI: PREĜO .....	45
Interparolado kun Dio .....	45
La Spirita Sinteno .....	45
Neceso de Peranto .....	46
Preĝado Necesa kaj Deviga .....	46
Komuna Preĝado .....	47
Preĝo estas La Lingvo de Amo .....	47
Liberigo de Sortobatoj .....	47
Preĝo kaj la Leĝoj de la Naturo .....	48
Bahaaj Preĝoj .....	48
ĈAPITRO VII: SANO KAJ KURACADO .....	50
Korpo kaj Animo .....	50
Unueco de Ĉiuj Vivoj .....	50
Simpla Vivado .....	50
Alkoholo kaj Narkotaĵoj .....	50
Vivoĝuado .....	50
Pureco .....	51
Rezulto de la Obeo al Profetordonoj .....	51
La Profeto kiel Kuracisto .....	51
Kuracado per Materialaj Rimedoj .....	52
Kuraco per Nemateriaj Rimedoj .....	52
La Povo de la Sankta Spirito .....	53
Sintenado de la Paciento .....	53
Kuracisto .....	54
Kiel Ĉiu Povas Helpi .....	55
La Ora Epoko .....	55
Ĝusta Uzado de la Sano .....	55

ĈAPITRO VIII: RELIGIA UNUECO .....	56
Sektismo en la Deknaŭa Jarcento .....	56
La Revelacio de Bahá'u'lláh .....	56
Ĉu la Homa Naturo Povas Sin Ŝanĝi? .....	57
La Unuaj Paŝoj al la Unueco .....	57
La Problemo de Aŭtoritato .....	58
Progresiva Revelacio .....	58
Senerareco de la Profetoj .....	59
La Superega Revelacio .....	59
La Nova Situacio .....	60
Pleneco de la Bahaa Revelacio .....	60
La Bahaa Interligo .....	60
Ne Ekzistas Profesia Pastraro .....	61
ĈAPITRO IX: VERA CIVILIZACIO .....	63
Religio estas Fundamento de Civilizacio .....	63
Justeco .....	63
Registaro .....	64
Politika Libereco .....	64
Regantoj kaj Regatoj .....	65
Disdono de Oficoj kaj Avancoj .....	65
Ekonomiaj Problemoj .....	65
Publikaj Financoj .....	66
Propravola Divido .....	66
Universala Labordevo .....	66
Etiko de Riĉeco .....	67
Malpermeso de Industria Sklaveco .....	67
Testamentaj Donacoj kaj Heredaĵoj .....	68
Egaleco de Viroj kaj Virinoj .....	68
Virinoj en la Nova Epoko .....	69
Forlaso de Perfortmetodo .....	69
Edukado .....	69
Naturaj Diferencoj de Karakteroj .....	70
Preparado de Karaktero .....	70
Artoj, Scienco, Metioj .....	70
Traktado de Krimuloj .....	71
Influo de la Gazetaro .....	71
ĈAPITRO X: LA VOJO AL PACO .....	72
Konflikto kontraŭ Konkordo .....	72
La Plej Sankta Paco .....	72
Religiaj Antaŭjuĝoj .....	72
Rasaj kaj Naciaj Antaŭjuĝoj .....	73
Teritoriaj Ambicioj .....	74
Universala Lingvo .....	74
Universala Ligo de Nacioj .....	75
Internacia Arbitracio .....	76
Limigo de Armilaro .....	77
Nerezistado .....	77
Justaj Militoj .....	77
Unueco de Oriento kaj Okcidento .....	78
ĈAPITRO XI: DIVERSAJ ORDONOJ KAJ INSTRUOJ .....	79
Monaĥa Vivo .....	79
Edziĝo .....	79
Eksedziĝo .....	80
Bahaa Kalendaro .....	80
Spiritaj Asembleoj .....	81
Bahaaĵ Festejoj, Datrevenoj kaj Fastotagoj .....	81

Festoj .....	82
Fasto .....	82
Kunvenoj .....	83
La Festo de la Dek-Naŭa Tago .....	83
Mashriq'u'l-Adhkár .....	83
Vivo post Morto .....	84
Ĉielo kaj Infero .....	85
Unueco de la Ambaŭ Mondoĵ .....	86
Neekzisto de Malbono .....	87
ĈAPITRO XII: RELIGIO KAJ SCIENCO .....	88
Eraro kiel Kaŭzo de Konflikto .....	88
Persekutado de Profetoĵ .....	88
Komenco de Interpaciĝo .....	89
Serĉado Por la Vero .....	89
Vera Agnostikismo .....	89
Kono pri Dio .....	90
La Diaĵ Malkaŝantoĵ .....	90
Kreado .....	90
Deveno de Homo .....	91
Korpo kaj Animo .....	92
Unueco de la Homaro .....	92
La Epoko de Unueco .....	93
ĈAPITRO XIII: PROFETAĴOĴ PLENUMITAJ DE LA BAHAA RELIGIO .....	94
Interpretado de Profetaĵoĵ .....	94
La Veno de la Sinjoro .....	94
Profetaĵoĵ pri Kristo .....	94
Profetaĵoĵ pri Báb kaj Bahá'u'lláh .....	95
La Gloro de Dio .....	95
La Branĉo .....	96
La Tago de Dio .....	96
La Tago de Juĝo .....	97
La Granda Reviviĝo .....	97
Reveno de Kristo .....	98
La Tempo de la Fino .....	99
Signoj sur la Ĉielo kaj Tero .....	99
La Maniero de la Alveno .....	100
ĈAPITRO XIV: PROFETAĴOĴ DE BAHÁ'U'LLÁH KAJ 'ABDU'L-BAHÁ .....	102
Krea Povo de la Dia Vorto .....	102
Napoleono III .....	103
Germanujo .....	103
Persujo .....	103
Turkujo .....	104
Ameriko .....	105
La Granda Milito .....	105
Sociaĵ Malfacilaĵoĵ post la Milito .....	106
Veno de la Regno de Dio .....	107
Akreo kaj Hajfa .....	108
ĈAPITRO XV: RERIGARDO KAJ PERSPEKTIVO .....	109
Progreso de la Religio .....	109
Profeteco de Báb kaj Bahá'u'lláh .....	109
Glorplena Perspektivo .....	110
Renovigo de Religio .....	110
Bezono de Nova Revelacio .....	110
Vero Estas por Ĉiuj .....	110
La Lasta Volo kaj Testamento de 'Abdu'l-Bahá .....	111

---

La Gardanto de la Religio de Dio .....	112
Manoj de la Religio de Dio .....	113
La Administra Sistema .....	113
La Mondordo de Bahá'u'lláh .....	116
EPILOGO .....	120
RIMARKOJ PRI LA PERSAJ KAJ ARABAJ VORTOJ EN TIU ĈI LIBRO .....	122
GVIDILO AL ELDIRADO DE LA PERSAJ LITEROJ .....	123
GLOSARO .....	124

## ENKONDUKO AL LA ESPERANTO-TRADUKO

En 1972 la 57a Universala Esperanto-Kongreso okazis en Usono, en la nord-okcidenta urbo Portland, Oregon. Ĉeestis naŭ bahaanoj: du el Alasko kaj sep el Usono mem.

Dum la Kongresa semajno okazis Festo de la Deknaŭa Tago. La bahaaj kalendaro havas 19 monatojn el po 19 tagoj, kun kvin (aŭ ses en superjaro) intermetitaj inter la du lastaj monatoj. La bahaaj monatoj havas nomojn laŭ atribuoj de Dio. En la unua tago de ĉiu monato la bahaanoj kuniĝas por soleni la Feston de la Deknaŭa Tago. La kuniĝo estas vere spirita festo, unue kun preĝoj kaj legadoj el la Sanktaj Skriboj de la Disenditaj Revelaciantoj.

Tiutage la Bahaanoj tra la mondo solenis la Feston Kamál (Perfektecio de Dio). Post preĝoj kaj legadoj, ĉio en Esperanto, sekvis interkonsiliĝo, ankaŭ en Esperanto. Rezulte de la konsiliĝo, la naŭ ĉeestantoj kune verkis leteron al la Universala Domo de Justeco ĉe la bahaaj monsidejo en Hajfa, Israelo, en kiu ili petis permeson organizi la bahaajn Esperantistojn tra la mondo. La leteron ili fine sendis la 6-an de decembro, 1972. La Universala Domo de Justeco respondis favore la 19an de marto, 1973. Ni estis tuj pretaj organizi. Sub la fervora kaj senlaca kaj senĉesa gvidado de Paŭlo Amorim Cardoso en Brazilo, la Bahaaj Esperanto-Ligo (BEL) estis preta ekfunkcii, kun 80 membroj en 17 landoj. Okazis balotado, per poŝto kompreneble, kaj la fidela Paŭlo Amorim Cardoso elektiĝis la unua sekretario de BEL, same senlaca kaj fervora kiel antaŭe.

Post iom da konsiliĝo, la Nacia Spirita Asembleo de la Bahaanoj de Brazilo, sub kies kuratoreco BEL funkciis, aprobis la statuton de BEL, kaj ĉe la 60a Universala Esperanto-Kongreso en Kopenhago en 1975 BEL estis akceptita kiel neneŭtrala faka organizaĵo en la kadro de la Universala Esperanto-Asocio.

Unu el la celoj de BEL estas eldoni literaturon en Esperanto pri la Bahaaj Religio. Ni komencis tre modeste per du broŝuroj: UNUECO KAJ UNIVERSALA LINGVO de Johano Dale, tradukita el la angla lingvo de Roan Orloff Stone; kaj BAHAAJ RESPONDOJ, tradukita el la hispana lingvo de Paŭlo Amorim Cardoso.

La unua ampleksa verko pri la Bahaaj Religio estas tiu ĉi, BAHÁ'U'LLÁH KAJ LA NOVA EPOKO. Ĝi estis unue tradukita el la angle lingvo de Lidia Zamenhof. En 1926, kiam la Esperantistaro de la mondo starigis monumenton en Varsovio al d-ro Zamenhof, f-ino Martha Root, mondkonata bahaanino kaj samideanino, oficiale reprezentis la tutmondan bahaanaron. Tie ŝi konatiĝis kun la Zamenhof-familio, kaj kiel rezulto Lidia, la pli juna filino de la Majstro, aliĝis al la Religio de Bahá'u'lláh, kaj tuj ŝi eklaboris por disvastigi Lian Mesaĝon. Ŝi estis talentoplena tradukistino; kaj pro ŝia sindediĉo BAHÁ'U'LLÁH KAJ LA NOVA EPOKO estis eldonita en 1930 de la tiama Bahaaj Esperanto-Eldonejo "La Nova Tago" en Köln, Germanujo.

Dum la preskaŭ 50 jaroj postaj okazis multaj ŝanĝoj, plejparte pro disvastiĝado kaj progreso de la Bahaaj Religio. Sekve, kiel sia unua granda tasko, BEL decidis ĝisdatigi la verkon laŭ nova eldono en 1978 de la anglalingva originalo.

Antaŭnelonge BEL okazigis sian duan tutmembran balotadon. La nova sekretario estas Johano Dale Jr. en Usono, kaj dum lia deĵoro BEL estos sub la kuratoreco de la Nacia Spirita Asembleo de la Bahaanoj de Usono. Nuntempe BEL kalkulas pli ol 150 membrojn en 20 landoj.

## DANKESPRIMO

Mi ŝuldas senfinan dankon al Elwyn Charles Pollock (Elkopo) pro la multaj longaj, lacigaj, sendormaj horoj kiujn li dediĉis al la redakto de tiu ĉi verko; al Johano Dale Jr., kiu enkorpigas la moton – Al okupito aldoniĝas plia laboro – ĉar meze de siaj plenegaj horoj li tamen trovis tempon por atente tralegi la manuskripton kaj fari multajn valorajn rekomendojn; al Roberto Stockman pro lia malavara preteco kompili la tutan indekson; al la Bahaaj Eldonejo Usona pro la donaco de la manuskripto de la ĝisdatigita verko anglalingva de Esselmont; kaj al la multaj BELanoj tra la mondo, kiuj daŭre fortikigis min per siaj kuraĝigo kaj apogaj preĝoj dum la longaj kaj malfacilaj horoj, kiujn postulis tiu ĉi laboro.

Roan Orloff Stone

## ANTAŬPAROLO AL LA ELDONO DE 1937

Kiam "Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko" eldoniĝis antaŭ pli ol dek jaroj, la Bahaa Kredo ricevis sian unuan bone prezentitan, plene komprenigan klarigon fare de studanto de la instruoj. Taksinte ĝian taŭgecon kiel plej kontentiga enkonduko al la Kredo, bahaanoj en oriento kaj okcidento trovis la libron de d-ro Esslemont tiel valora ke ĝi estas tradukita en proksimume tridek diversajn lingvojn.

Kiel d-ro Esslemont mem vidis, la Kredo eniris novan fazon de sia historio post la forpaso de `Abdu'l-Bahá. La rezulto estas ke la vidpunktoj de la aŭtoro, kelkajn el kiuj li skribis antaŭ 1921, pri iuj aspektoj de la temo, ne estas plu konformaj al la evolua karaktero de la Kredo. Plie, lia traktado de okazintaĵoj kaj socialaj kondiĉoj tiam ekzistantaj ne ŝajnas plu esti plene aplikebla. Neeviteble, kelkaj eraroj pri faktoj trovis sin en lia teksto, kaj lia klarigo de la rangoj de Báb kaj de 'Abdu'l-Bahá estas anstataŭigitaj en la mensoj de bahaanoj per la aŭtoritataj interpretaĵoj kiujn de tiam faris la unua Gardanto de la Kredo, Shoghi Effendi.

La nuna eldono sekve reprezentas revizion de la Usona Nacia Spirita Asembleo, kun la konsilo kaj aprobo de Shoghi Effendi.

Ĉi tiuj revizioj neniel ŝanĝas la originan planon de la libro de d-ro Esslemont, nek ili efikas la pli grandan parton de lia teksto. Ilia celo estis pliampleksigi en kelkaj frazaroj la traktadon de la aŭtoro per aldono de materialo reprezentanta pli plenan scion haveblan de post lia malĝojiga morto, kaj pli novan tradukon de liaj citaĵoj el la Bahaaj Skriboj Sanktaj.

Januaro 1937. Bahaa Eldona Komitato

## ANTAŬPAROLO AL LA ELDONO DE 1950

Samtempe kun tiu ĉi eldono la Usona Bahaa Eldona Komitato transprenis kopirajtajn kaj aliajn koncernajn aferojn pri "Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko" disde Messrs. George Allen & Unwin, Ltd. el Londono, Anglujo, kiuj eldonis la konatan libron de d-ro J. E. Esslemont antaŭ pli ol dudek jaroj. Laŭ aranĝoj kun la britaj eldonistoj la Komitato de post 1928 faris dekunu presojn, krom la unua usona eldono importita de Brentano en Nov-Jorko.

Ĉi tiu eldono ne anstataŭigas la tekston de post gravaj revizioj estis faritaj en la libro sub direkto de la Gardanto de la Kredo en 1937, ĉar ne venis la tempo por plena rearanĝo de la libro por fari ĝiajn aludojn al mondstatoj tute nuntempaj. La verko de d-ro Esslemont daŭras kiel fidinda enkonduko al la historio kaj instruoj de la Bahaa Kredo. Ĝia traduko en ĉirkaŭ tridek lingvojn atestas al ĝia allogo en la Oriento kiel ankaŭ en la Okcidento.

Ni diru ankaŭ ke plua revizio estonta de la teksto okazos laŭ aprobo de Shoghi Effendi. La komitato ne havas aŭtoritaton aprobi reviziojn kiujn allandaj bahaanoj dezirus por sia speciala bezono.

Decembro 1950, Bahaa Eldona Komitato

## ANTAŬPAROLO AL LA ELDONO DE 1970

De post 1937 nenia revizio okazis al la teksto de la libro de d-ro Esslemont, kvankam en 1950 kelkaj malgravaj plibonigoj estis enkondukitaj. Aliflanke, la disvastiĝo kaj evoluo de la Bahaa Kredo de post tiu tempo estis grandegaj, kaj aldoniĝis al bahaa bibliografio riĉa heredaĵo de senkompareblaj klarigoj, tradukoj kaj historiaj priskriboj el la plumo de Shoghi Effendi, Gardanto de la Kredo kaj la difinita interpretanto de la Sanktaj Skriboj.

Sekve estas necese ĝisdatigi la libron por daŭrigi ĝian utilecon al modernaj legantoj. Oni faris tion per minimuma ŝanĝo en la teksto, kaj ĉefe per uzo de piednotoj kaj de epilogo kiu donas la nuntempajn statistikojn kaj novajn evoluigojn en la organika disvolviĝo de la Bahaa Kredo.

La libro de d-ro Esslemont daŭras esti unu el la plej vaste uzitaj enkondukaj libroj pri la Bahaa Kredo, kiel atestas la fakto ke de post 1937 la nombro de ĝiaj tradukoj pliiĝis de tridek ĝis kvindek ok.

Bahaa Eldona Komitato



## ENKONDUKO

En decembro 1914, dank' al interparolo kun amikoj renkontintaj `Abdu'l-Bahá'n, kaj prunto de kelkaj broŝuroj, mi unue konatiĝis kun la bahaaj instruoj. Mi estis tuj frapita de iliaj riĉeco, potenco kaj beleco. Ili imponis min kiel solvantaj la grandajn bezonojn de la moderna mondo en maniero pli perfekta kaj kontentiga ol iu ajn religia ideo kiun mi ekkonis antaŭe. Tia estis la unua impresio kian posta studado ankoraŭ pliprofundigis kaj konfirmis.

Penante pli precize ekkoni la movadon mi trovis gravajn malfacilaĵojn en akiro de dezirata literaturo, kaj baldaŭ naskiĝis en mi la ideo kunigi la ĉefajn, punktojn de tio kion mi lernis en formo de libro, por ke tio ĉi estu pli facile akirebla por aliaj. Kiam la komunikigo kun Palestino rekomenciĝis post la milito, mi skribis al `Abdu'l-Bahá kunsendante kopion de la naŭ unuaj ĉapitroj de la libro, kiuj estis tiam ankoraŭ en preskaŭ malneta formo. Mi ricevis tre afablan kaj kuraĝigan respondon, kaj koran inviton viziti Lin en Hajfa kaj kunporti la tutan manuskripton. Mi ĝoje akceptis la inviton, kaj havis la grandan privilegion pasigi en la vintro 1919-20 du kaj duonon da monatoj kiel gasto de `Abdu'l-Bahá. Dum tiu ĉi vizito `Abdu'l-Bahá ofte diskutis kun mi pri la libro. Li faris kelkajn valorajn sugestojn koncerne ĝian plibonigon kaj proponis ke, kiam mi estos reviziinta la manuskripton, Li dezirus havi la tutaĵon tradukitan en la persan lingvon por povi ĝin tralegi kaj kompletigi aŭ korekti se estos necese. La revizio kaj traduko estis efektivigitaj konforme al Lia sugesto, kaj `Abdu'l-Bahá trovis tempon, meze de la okupoj de Sia laborplena vivo, korekti proksimume tri kaj duonon da ĉapitroj (Ĉapitroj I, II, V kaj parto de la III-a), antaŭ ol Li forlasis la mondon. Mi profunde bedaŭras ke `Abdu'l-Bahá ne povis fini la korektadon de la manuskripto, ĉar la valoro de la libro estus pro tio tre altigita. La manuskripto estis, tamen, zorge reviziita de komitato de la Nacia Bahaa Asembleo de Anglujo, kaj ĝia eldono estas aprobita de tiu Asembleo.

Mi ŝuldas grandan dankon al f-ino E. J. Rosenberg, s-ino Claudia S. Coles, Mirzá Lotfu'lláh S. Hákim, s-roj Roy Wilhelm kaj Mountford Mills kaj al multaj aliaj amikoj por iliaj ŝatindaj helpoj en la preparado de tiu ĉi verko.

Koncerne la transskribadon de la arabaj kaj persaj nomoj kaj vortoj, estas akceptita en tiu ĉi libro la sistemo laste rekomendita de Shoghi Effendi al la tuta bahaa mondo.

J. E. Esslemont, Fairford, Cults, apud Aberdeen

## ĈAPITRO I: LA ĜOJA NOVAĴO

*La Promesito de ĉiuj popoloj de la mondo aperis. Ĉiuj popoloj kaj komunumoj atendis Revelacion, kaj Li, Bahá'u'lláh, estas la plej eminenta instruanto kaj edukanto de la homaro. – `Abdu'l-Bahá*

**La Plej Granda Okazintaĵo en la Historio**

Se oni studas la rakonton de la "progresado de la homaro" kiel ĝin prezentas la paĝoj de la historio, evidentiĝas ke la gvida faktoro en la homa progreso estas la okazanta, de tempo al tempo, apero de homoj kiuj superpaŝas la akceptitajn ideojn de siaj tempoj kaj fariĝas eltrovantoj kaj malkaŝantoj de veroj ĝis nun nekonataj al la homaro. Eltrovanto, pioniro, genio, Profeto - jen estas la homoj de kiuj unuavice dependas la transformiĝo de la mondo. Carlyle diras:

*Simpla vero, la tre simpla, estas, laŭ mia opinio, ke ... Unu homo, kiu havas pli altan Saĝecon, ĝis nun nekonatan spiritan Veron en si, estas pli forta, ne nur ol dek homoj kiuj ĝin ne havas, ne nur ol dekmil, sed el ĉiuj homoj kiuj ĝin ne havas. Li staras inter ili kun tute etera, anĝela potenco, kvazaŭ kun glavo el la Ĉiela armilejo mem, kiun fine neniam ŝildo kaj neniam fortikaĵo povas kontraŭstari. – Signs of the Times*

En la historioj de la scienco, arto kaj muziko, ni vidas abundajn konfirmojn de tiu ĉi vero, sed en neniu fako estas videbla pli klare la superega signifo de granda homo kaj lia misio ol en tio: la religio. En ĉiuj epokoj, kiam ajn degeneriĝas la spirita vivo de la homoj kaj malnobliĝas iliaj moroj, aperas la plej mirinda kaj mistera el homoj - Profeto. Sola kontraŭ la mondo, sen eĉ unu homo kiu kapablas instrui, gvidi, plene kompreni Lin aŭ partopreni Lian respondecon, Li leviĝas, kiel vidanto inter blinduloj, por proklami Sian evangelion de justeco kaj vero.

Inter la Profetoj troviĝas kelkaj ĉef- eminentaj. Ĉiam post kelkaj jarcentoj granda Dia Malkaŝanto - Kriŝno, Zoroastro, Moseo, Jesuo, Mahometo - aperas en la Oriento, kiel spirita Suno, por lumigi la mallumiĝintajn homajn mensojn kaj vekii iliajn dormantajn animojn. Kion ajn ni opinius pri la relativa gloro de tiuj ĉi religio-fondintoj, ni devas konsenti ke Ili estas la plej potencaj faktoroj en la edukado de la homaro. Unuakorde tiuj ĉi Profetoj deklaras ke la vortoj dirataj de Ili ne devenas de Ili mem, sed estas Revelacio farita pere de Ili, Dia Sendaĵo kies perantoj Ili estas. Iliaj paroloj abundas, ankaŭ, je aludoj kaj promesoj pri la apero de glora mond-instrumento kiu aperos "en la pleneco de la tempo" por daŭrigi ilian laboron kaj plenumigi ĝin, kiu fondos regnon de paco kaj justeco sur la tero, kaj kunigos en unu familio ĉiujn rasojn, religiojn, naciojn kaj gentojn, por ke "estu unu ŝafaro kaj unu Ŝafisto" kaj por ke ĉiuj konu kaj amu Dion "el la plej malgrandaj ĝis la plej grandaj".

La alveno de tiu "Edukanto de la Homaro", en la lastaj tagoj, kiam Li aperas, devos esti sendube la plej granda okazintaĵo en la historio de la homaro. Kaj la Bahaa Religio proklamas al la mondo la ĝojan novaĵon ke tiu ĉi Edukanto jam efektive aperis, ke Lia Revelacio jam estas transdonita kaj surpaperigita kaj povas esti studata de ĉiu sincera serĉanto, ke la "Tago de la Eternulo" jam ekmateniĝis kaj la "Suno de Justeco" jam leviĝis. Ĝis nun nur kelkaj starantaj sur montpintoj ekvidis la Gloran Astron, sed ĝiaj radioj jam lumigas la ĉielon kaj la teron, kaj baldaŭ ĝi levos sin super la montojn kaj brilos kun plena forto ankaŭ sur ebenaĵoj kaj valojn, donante vivon kaj gvidon al ĉiuj.

**Sanĝiĝado de la Mondo**

Ke la mondo, dum la dekaŭa kaj la komenco de la dudeka jarcentoj,<sup>1</sup> travivis la agoni-suferojn de la malnova epoko kaj la naskosuferojn de la nova, estas evidenta al ĉiuj. La malnovaj principoj de materialismo kaj egoismo, la malnovaj sektaj kaj naciaj antaŭjuĝoj kaj malamikecoj, pereas kaj senfortiĝas, meze de la ruinoj kaŭzita de si mem, kaj en ĉiuj landoj ni vidas signojn de nova spirito de fido, de frateco, de internacieco, kiu rompas la malnovajn katenojn kaj transpaŝas la malnovajn limojn. Revoluciaj ŝanĝoj de senekzempla grandeco okazis en ĉiu fako de la homa vivo. La malnova epoko ankoraŭ ne mortis. Ĝi baraktas pri vivo kaj morto kun la nova. Estas ankoraŭ multegaj malbonoj, grandegaj kaj teruraj, sed ili jam estas malkovrataj, komprenataj, elvokataj al batalo kaj atakataj kun nova forto kaj espero. Estas ankoraŭ multegaj nuboj, grandaj kaj minacaj, sed tra ili jam ekbrilas la lumo, lumiganta la vojon de progreso kaj malkaŝanta la malhelpaĵojn kaj falgilojn kiuj baras la vojon antaŭen.

Alie estis en la dekoka jarcento. Tiam apenaŭ ia luma radio trapenetris la spiritan kaj moralan krepuskon kiu ĉirkaŭprenis la mondon. Ĝi similis kvazaŭ la plej malluman honon antaŭ tagiĝo, kiam la malmultaj lampoj kaj kandeloj kiuj restis lumantaj, povas apenaŭ fari la mallumon videbla. Carlyle en sia *Frederick the Great* jene skribas pri la dekoka jarcento:

*Ĝi estis jarcento kiu havas nenian historion kaj povas havi malgrandan aŭ nenian. Ĝi estis jarcento tiel riĉa je amasiĝintaj falsaĵoj ... kiel neniu jarcento antaŭe! Ĝi ne havis plu la konscion pri sia falseco, tiel falsa ĝi fariĝis; kaj tiel ĝi estis envadinta en falson, tiel ĝisfunde trapenetrita de ĝi, ke vere la mezuro de la aferoj estis plena, kaj la franca revolucio devis fini ĝin. ... Tre konvena fino ĝi estis, mi dankeme sentas, por tia*

<sup>1</sup> Verkita baldaŭ post la Unua Mondmilito.

*jarcento. ... Ĉar denove estis bezono de Dia Revelacio al la sensentiĝintaj kaj frivolaj idoj de homo, por ke ili ne malaltiĝu entute ĝis la nivelo de simioj. – Frederick the Great, Libro I, ĉap. 1*

Kompare kun la dekoka jarcento la nuna tempo estas kiel tagiĝo post mallumo, aŭ kiel printempo post vintro. Nova vivo movas en la mondo, novaj idealoj kaj espero vibras en ĝi. Aferoj kiuj ankoraŭ antaŭ malmultaj jaroj ŝajnis neplenumebraj revoj estas plenumitaj faktoj. Aliaj kiuj ŝajnis je jarcentoj esti en la estonteco apartenas nun al la "praktika politiko". Ni flugas en la aero kaj vojaĝas sub la maro. Ni dissendas tra la mondo komunikaĵojn fulmorapide. Ni vidis en la daŭro de kelkaj jardekoj miraklojn tro multajn por kalkuli.

### La Suno de Justeco

Kio estas la kaŭzo de tiu ĉi subita vekiĝo tra la tuta mondo? La bahaanoj kredas ke ĝi estas pro granda elfluo de la Sankta Spirito pere de la Profeto Bahá'u'lláh, kiu naskiĝis en Persujo en 1817 kaj mortis en la Sankta Lando en 1892.

Bahá'u'lláh instruis ke Profeto, aŭ "Malkaŝanto de Dio", estas la Lumportanto de la spirita mondo, same kiel la suno estas la lumdonanto de la natura mondo. Same kiel la materia suno brilas super la tero kaj kaŭzas kreskadon kaj evoluadon de materiaj organismoj, tiel ankaŭ, pere de Malkaŝanto de Dio, la Suno de Vero brilas super la mondo de koroj kaj animoj, kaj edukas la pensojn, moralojn kaj karakterojn de la homoj. Kaj kiel la radioj de la natura suno havas influon kiu penetras en plej mallumajn kaj ombrajn angulojn de la mondo, donante varmon kaj vivon eĉ al tiuj kreitoj kiuj neniam vidis la sunon mem, tiel ankaŭ, la elfluo de la Sankta Spirito pere de Malkaŝanto de Dio influas la vivojn de ĉiuj homoj, kaj inspiras impresigemajn mensojn eĉ en tiuj lokoj kaj inter tiuj popoloj kie la nomo de la Profeto estas tute nekonata. La alveno de Malkaŝanto similas la alvenon de la Printempo. Ĝi estas Tago de Releviĝo en kiu la spirite mortaj vekiĝas al nova vivo, en kiu la Realeco de la Diaj Religioj estas renovigita kaj restarigita, en kiu aperas "nova ĉielo kaj nova tero".

Sed, en la mondon de la naturo, la Printempo enportas ne nur kreskon kaj vekiĝon de nova vivo sed ankaŭ detruon kaj forigon de ĉio malnova kaj velkinta. Ĉar tiu sama suno, kiu ĝermigas florojn kaj burĝonigas arbojn, kaŭzas ankaŭ pereon kaj forputron de tio kio estas morta kaj senutila. Ĝi rompas la glaciojn kaj degeligas la vintran neĝon; ĝi liberigas akvojn kaj ŝtormojn kiuj freŝigas kaj purigas la teron. Same estas ankaŭ en la spirita mondo. La spirita sunbrilo kaŭzas similajn tumulton kaj ŝanĝojn. Sekve la Tago de Releviĝo estas ankaŭ la Tago de Juĝo, en kiu falsaj kaj imitaj de la vero, eluzitaj ideoj kaj kutimoj estas forĵetitaj kaj neniigitaj, en kiu la glacio kaj neĝo de antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj, amasiĝintaj dum la longa vintro, estas degeligitaj kaj transformitaj, en kiu la longtempe glaciigitaj kaj malliberaj energioj estas liberigitaj por superverŝi kaj renovigi la mondon.

### La Misio de Bahá'u'lláh

Bahá'u'lláh deklaris klare kaj plurfoje, ke Li estas la delonge atendata edukanto kaj instruanto de ĉiuj popoloj, la fluejo de mirinda Dia favoro superanta ĉiujn antaŭajn elfluojn, kiu unuigas en si ĉiujn antaŭajn formojn de religio, kiel oceano unuigas riverojn. Li metis fundamenton kiu prezentas firman bazon por Unueco tra la tuta mondo kaj por inaŭguro de tiu glora epoko de paco sur la tero, bonvolo inter la homoj, pri kiu parolis profetoj kaj kantis poetoj.

Serĉado de la vero, unueco de la homaro, unuiĝo de religioj, rasoj, nacioj, de la Oriento kaj la Okcidento, reunuiĝo de religio kaj scienco, elradikigo de antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj, egaleco inter viroj kaj virinoj, starigo de justeco, fondo de supera internacia tribunalo, unuiĝo de lingvoj, deviga klerigado - tiuj ĉi instruoj kaj multaj similaj, estis en la dua duono de la deknaŭa jarcento, malkaŝitaj per la plumo de Bahá'u'lláh en multegaj libroj kaj epistoloj el kiuj kelkaj estis direktitaj al la Reĝoj kaj Regantoj de la mondo.

Lia Revelacio, unika pro sia komprenebleco kaj vasteco, mirinde harmonias kun la signoj kaj bezonoj de nia tempo. Neniam aperis antaŭ la homaro novaj problemoj tiel gigantaj kaj komplikitaj kiel nun. Neniam la proponitaj solvoj estis tiel multenombraj kaj kontraŭaj unu al la aliaj. Neniam estis tiel urĝa aŭ tiel sentebla la bezono de granda mondinstruanto. Neniam, eble, tia instruanto estis atendata tiel sopire kaj tiel ĝenerale.

### Plenumiĝo de Profetaĵoj

Abdu'l-Bahá skribas:

*Kiam Kristo aperis, antaŭ dudek jarcentoj, kvankam la judoj senpacience atendis Lian Alvenon, kaj preĝis ĉiutage, vokante kun larmoj: "Ho Dio, rapidigu la Revelacion de la Mesio", tamen kiam la Suno de Vero aperis, ili ekkontraŭstaris Lin, leviĝis kontraŭ Li kun grandega malamikeco, kaj fine krucumis tiun Dian Spiriton, la Vorton de Dio, kaj nomis Lin Baal-Zebub, la spirito de malbono, kiel rakontas la Evangelio. La kaŭzo de tio estis ke ili diris: "La Revelacion de Kristo, konforme al la klara teksto de la Torao, atestos certaj*

*signoj, kaj dum tiuj ĉi signoj ne aperas, tiu kiu proklamas sin la Mesio estas trompanto. Inter tiuj ĉi signoj estas, ke la Mesio devas veni el nekonata loko, tamen ni ĉiuj konas la domon de tiu ĉi homo en Nazaret, kaj ĉu io bona povas veni el Nazaret? La dua signo estas ke li regos per fera vergo, tio estas, Li devas agi per la glavo, sed tiu ĉi Mesio ne havas eĉ lignan bastonon. Alia kondiĉo estas: Li devas sidi sur la trono de David kaj restarigi la potencon de David. Kaj jen, kontraŭe al surtroniĝo, tiu ĉi homo ne posedas eĉ maton por sursidi. Alia kondiĉo estas: devastigo de ĉiuj leĝoj de la Torao; tamen tiu ĉi homo forigis tiujn leĝojn, kaj eĉ profanis la Sabaton, kvankam la teksto de la Torao klare diras ke kiu ajn proklamas sin profeto kaj faras miraklojn kaj profanas la Sabaton, devas esti mortpunita. Alia el la signoj estas, ke en Lia regno tiel floros justeco ke nobleco kaj bonfaremo disvastiĝados el la homa mondo en la bestan; serpento kaj muso loĝos en unu kavo, aglo kaj perdriko en unu nesto, leono kaj gazelo restados sur unu paŝtejo, kaj lupoj kaj ŝafido trinkos el unu fonto. Tamen, la maljusteco kaj tiraneco estis tiel grandaj en Lia tempo ke oni krucumis Lin! Alia el la kondiĉoj estas, ke en la tagoj de la Mesio la judoj prosperos kaj triumfos super ĉiuj popoloj de la mondo, sed jen ili vivas nun en plej granda humiligo sklavigitaj de la Roma Imperio. Kiel do tiu ĉi homo povus esti la Mesio promesita en la Torao? "*

*Tiamaniere ili kontraŭparolis tiun Sunon de Vero, kvankam tiu Spirito de Dio vere estis tiu promesita en la Torao. Sed ĉar ili ne komprenis la signifon de la signoj, ili krucumis la Vorton de Dio. La bahaanoj akceptas ke la priskribitaj signoj ja efektiviĝis en la Malkaŝo de Kristo, kvankam ne en tia senco kiel komprenis la judoj, ĉar la priskriboj de la Torao estas alegoriaj. Ekzemple, inter la signoj estas tiu de suvereneco. La bahaanoj diras ke la suvereneco de Kristo estas ĉiela, dia, eterna regado, ne ia regado napoleona kiu pereas post mallonga tempo. Preskaŭ ĵarojn tiu ĉi suvereneco de Kristo estas starigita, kaj ĝi daŭras ĝis nun, ja por eterne restos tiu Sankta Estaĵo glorkronita sur ĉiamdaŭra trono.*

*En simila maniero plenumiĝis ĉiuj la aliaj signoj, sed la judoj ne komprenis. Kvankam pasis preskaŭ dudek jarcentoj de kiam Kristo aperis kun dia brilego, la judoj tamen ankoraŭ atendas alvenon de la Mesio kaj konsideras sin mem pravaj kaj Kriston falsa. – Verkita de `Abdu'l-Bahá por tiu ĉi ĉapitro*

Se la judoj turnintus sin al Kristo, Li klarigintus al ili la veran signifon de la koncernantaj Lin profetaĵoj. Ni profitu de ilia ekzemplo, kaj antaŭ ol decidi ke la profetaĵoj rilate al la Malkaŝanto de la Lasta Tago ne plenumiĝis, ni vidu kion Bahá'u'lláh Mem skribis koncerne la manieron de ilia klarigado, ĉar multaj el la profetaĵoj kiel oni konsentas estas "sigelitaĵ" diraĵoj, kaj nur la Vera Edukanto Mem povas rompi la sigelojn kaj elmontri la verajn signifojn kaŝitajn en la juvelujo de la vortoj.

Bahá'u'lláh multe skribis por klarigi la malnovajn profetaĵojn, sed ne sur tiuj profetaĵoj Li ĉefbazas la argumentojn por Sia Profeteco. La suno mem pruvas sian propran ekziston, al ĉiuj kiuj havas la kapablon percepti. Kiam ĝi leviĝas ni bezonas neniam pratempan antaŭdirojn por certiĝi pri ĝia brilado. Tiel estas ankaŭ ĉe la apero de la Malkaŝanto de Dio. Eĉ se forgesitaj iĝus ĉiuj antaŭaj profetaĵoj, Li tamen Mem estus Sia propra, abunda kaj sufiĉa pruvo Por ĉiu kies spirita percepto estas malfermita.

### **Pruvo de Profeteco**

Bahá'u'lláh postulis de neniuj blindaj akceptoj de Liaj instruoj kaj pruvoj. Kontraŭe, inter Siaj instruoj Li prezentis unuavice emfazajn avertojn kontraŭ blinda akceptado de aŭtoritato, kaj insistis ke ĉiuj malfermu la okulojn kaj orelojn, kaj juĝu mem, sendepende kaj sentime, por certiĝi pri la vero. Li ordonis plej vastan esploradon kaj neniam kaŝis Sin, prezentante, kiel la plej altajn pruvojn de Sia Profeteco, Siajn vortojn kaj elfarojn kaj ilian efikecon en transformado de homaj vivoj kaj karakteroj. La rimedoj kiujn Li proponis por distingi la veron estas identaj kun tiuj de Liaj grandaj antaŭintoj. Moseo diris:

*Kion la profeto diras en la nomo de la Eternulo kaj la afero ne fariĝos kaj ne plenumiĝos, tio estas la vortoj, kiujn la Eternulo ne diris; pro aroganteco diris tion la profeto; ne timu lin. – Readm. xviii, 22*

Kristo ankaŭ atentigis tiun ĉi provmanieron, kaj prezentis ĝin kiel pruvon de Sia propra pretendo. Li diris:

*Gardu vin kontraŭ la falsaj profetoj, kiuj venas al vi en ŝafaj feloj, sed interne estas rabemaj lupoj. Per iliaj fruktoj vi konos ilin. Ĉu el dornarboj oni kolektas vinberojn, aŭ el kardoj figojn? Tiel ĉiu bona arbo donas bonajn fruktojn, sed putra arbo donas malbonajn fruktojn. ... Tial per iliaj fruktoj vi konos ilin. – Mat. VII, 15-17, 20*

En la sekvantaj ĉapitroj, ni penos trovi ĉu la pretendo al Profeteco de Bahá'u'lláh restas aŭ falas ĉe la apliko de tiuj ĉi provmanieroj: ĉu la aferoj pri kiuj Li parolis efektiviĝis, kaj ĉu Liaj fruktoj estas bonaj aŭ malbonaj. Alivorte - ĉu Liaj profetaĵoj plenumiĝas kaj efektiviĝas Liaj ordonoj, kaj ĉu Lia vivlaboro helpis al la edukado kaj nobligo de la homaro, al plibonigo de moroj, aŭ kontraŭe.

## Malfacilaĵoj de la Esplorado

Serĉanto deziranta ekkoni la veron en tiu ĉi Kredo trovos, kompreneble, malfacilaĵojn sur sia vojo. Kiel ĉiuj grandaj moralaj kaj spiritalaj reformacioj, ankaŭ la Bahaa Religio estas ege mis prezentata. Rilate la terurajn persekutojn kaj suferojn de Bahá'u'lláh kaj Liaj sekvantoj, kaj Liaj amikoj kaj malamikoj tute interkonsentas. Rilate, tamen, la valoron de la Religio, kaj la karakterojn de ĝiaj Fondintoj, la asertoj de la kredantoj kaj tiuj de la neantoj funde diferencas. Okazas same kiel en la epoko de Kristo. Rilate la krucumon de Jesuo kaj la martirigadon de Liaj sekvantoj la kristanaj kaj judaj historiistoj konsentas unuj kun la aliaj, sed dum la kredantoj diras ke Kristo plenumis kaj progresigis la instruojn de Moseo kaj de la profetoj, la neantoj deklaras ke Li rompis la leĝojn kaj ordonojn kaj meritis la morton.

En la religio, same kiel en la scienco, la vero malkaŝas siajn misterojn nur al humila kaj respektema serĉanto, kiu estas preta formeti ĉiujn antaŭjuĝojn kaj superstiĉojn - vendi ĉion kion li posedas, por povi aĉeti la "perlon de grandega valoro". Por ekkompreni la Bahaan Religion en ĝia plena signifo, ni devas studi ĝin en la spirito de sincera kaj senegoista sindonemo al la vero, persistante sur la vojo de serĉado kaj fidante al la dia gvidado. En la Verkoj de ĝiaj Fondintoj ni trovas la ŝlosilon por la misteroj de tiu ĉi granda spirita vekiĝo, kaj la decidan kriterion de ĝia valoro. Bedaŭrinde, jen denove troviĝas malfacilaĵoj sur la vojo de la serĉanto nekonanta la persan kaj araban lingvojn en kiuj estas skribitaj la instruoj. Nur malgranda parto de la Verkoj estas tradukita en la anglan lingvon, kaj en multaj el la aperintaj tradukaĵoj troviĝas granda manko, rilate la fidelecon kaj stilon. Sed malgraŭ la neperfekteco kaj nesufiĉeco de la historiaj rakontoj kaj tradukoj, la grandaj esencaj veroj formantaj masivan kaj firman fundamenton de la Kredo elstaras kvazaŭ montoj el la nebulo de necerteco.<sup>1</sup>

## La Celo de la Libro

En la sekvantaj ĉapitroj ni penos prezenti kiel eble plej bone, honeste kaj senantaŭjuĝe, la ĉefajn trajtojn de la historio kaj speciale de la instruoj de la Bahaa Religio, por ke la legantoj povu formi al si racian juĝon pri ĝia graveco, kaj fine esti instigitaj al pli profunda studado de la temo.

Serĉado por la vero, malgraŭ ĝia tuta graveco, ne estas, tamen, la sola celo kaj senco de la vivo. La vero ne estas senviva objekto, kiun foje trovita oni povas loki en muzeo, por signi, klasifiki, enkatalogigi, ekspozicii kaj tie lasi, sekan kaj senfruktan. Ĝi estas io vivanta kiu devas unue enradikiĝi en homajn korojn kaj fruktigi iliajn vivojn antaŭ ol ili rikoltos plenan rekompencan por sia serĉado.

Tial, la vera senco de la disvastigado de profeta revelacio estas ke tiuj kiuj konvinkiĝis pri ĝia vereco praktiku ĝiajn principojn, vivu laŭ ili kaj dissemu la ĝojan novaĵon, rapidigante tiel la alvenon de la benita tago kiam la Volo de Dio plenumiĝos sur la tero kiel ĝi estas plenumita en la Ĉielo.

---

<sup>1</sup> Ekzistas nun la nekompareblaj tradukoj de Shoghi Effendi de la Verkoj de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá el la persa kaj araba lingvoj. Tiuj, kune kun liaj propraj multaj verkoj rilate al la historio de la Kredo, la deklaroj kaj implikaĵoj de ĝiaj fundamentaj veroj kaj la evoluado de ĝia Administra Ordo, multe pli faciligas la laboron de la serĉanto ol en la tempo de d-ro Esslemont.

## ĈAPITRO II: BÁB, LA ANTAŬINTO

*Vere, la persekutantoj mortigis la Amaton de la mondoj, por tiamaniere estingi la Lumon de Dio inter Liaj Kreaĵoj kaj deteni la homaron for de la torento de la Ciela Vivo en la tagoj de ilia Eternulo, la Bonfarema, la Malavara. – Bahá'u'lláh, Tablet to Ra'ís (Tabuleto al Ra'ís)*

### Naskiĝloko de la Nova Revelacio

Persujo, la naskiĝloko de la Bahaa Revelacio, okupis unikan lokon en la historio de la mondo. En la tagoj de sia frua grandeco ĝi estis vera suvereno inter la nacioj, sen rivaloj en civilizacio, potenco kaj gloro. Ĝi donis al la mondo grandajn reĝojn kaj ŝtatestojn, profetojn kaj poetojn, filizojn kaj artistojn. Zoroastro, Ciro kaj Dario, Hafizo kaj Firdausio, Sadio kaj Omar Kajjam estis nur kelkaj el ĝiaj renomaj filoj. Ĝiaj metiistoj estis nesupereblaj en sia profesio; ĝiaj tapiŝoj estis senkomparaj, ĝiaj ŝtalkingoj senegalaj, ĝiaj fajencaĵoj famaj tra la mondo. En ĉiuj partoj de la Proksima kaj Meza Oriento ĝi lasis postsignojn de sia iama grandeco.

Tamen, en la dekoka kaj dekaŭa jarcentoj ĝi falis en staton de profunda malnobliĝo. Ĝia malnova gloro ŝajnis neretroveble perdita. Ĝia registaro estis koruptema kaj trovis sin en senesperaj financaj embarasoj; kelkaj ĝiaj regantoj estis malfortaj, kaj aliaj - monstroj de krueleco. Ĝiaj pastroj estis bigotaj kaj netoleremaj, ĝia popolo malklera kaj superstiĉa. Plej multaj el ili apartenis al la ŝijaista sekto de Islamo,<sup>1</sup> sed estis ankaŭ konsiderinda nombro da zoroastranoj, judoj kaj kristanoj el diversaj kaj antagonistaj sektoj. Ĉiuj laŭkonfese sekvis la noblajn instruistojn kiuj alvokis ilin al adorado de unu Dio, al vivado en amo kaj unueco, tamen ili evitadis, malestimis kaj malrespektis sin reciproke, kaj ĉiu sekto konsideris la aliajn kiel malpurajn, kiel hundojn aŭ idolanojn. Oni malbenadis kaj anatemadis ekster ĉia mezuro. Estis danĝere al judo aŭ zoroastrano iri sur strato en pluva tago, ĉar se lia malseka vesto tuŝus islamanon, la islamano estus malpurigita, kaj la alia devus pagi la ofendon per sia vivo. Se islamano prenis monon de judo, zoroastrano aŭ kristano li devis lavi ĝin antaŭ ol meti ĝin en la poŝon. Se judo vidus sian infanon donantan glason da akvo al malriĉa islama almozulo li elpuŝus la glason el la mano de la infano, ĉar ne afableco sed malbeno devis esti ricevaĵo de malfideluloj! La islamanoj mem estis dividitaj en multaj sektoj, kaj malpaco inter ili ofte estis forta kaj akra. La zoroastranoj ne multe partopenis en tiuj ĉi reciprokaj atakoj, sed vivis en apartaj komunumoj, ne rilatante kun siaj samlandanoj de aliaj kredoj.

Sociaj same kiel religiaj aferoj estis en stato de senespera dekadenco. Edukado estis malzorgata. La sciencojn kaj artojn de la Okcidento oni rigardis kiel malpurajn kaj kontraŭajn al la religio. Justecon oni parodis. Perforto kaj rabo estis ordinaraj aferoj. Vojoj estis malbonaj kaj danĝeraj por vojaĝantoj. Higienaj aranĝoj estis terure malperfektaj.

Tamen, malgraŭ ĉio ĉi, la lumo de la spirita vivo ne estis estingiĝinta en Persujo. Jen kaj jen, meze de la superreganta mondumeco kaj superstiĉoj, estis ankoraŭ troveblaj sanktaj animoj, kaj en multaj koroj vivis sopiro al Dio, kiel ĝi vivis en la koroj de Anna kaj Simeon antaŭ Kristo. Multaj senpacience atendis alvenon de promesita Disendito, kaj kredis ke la tempo de Lia apero estas proksima. Tia estis la stato de Persujo kiam Báb, la Heroldo de la nova epoko, ekskuis la tutan landon per Sia mesaĝo.

### Lia Frua Vivo

Mírzá `Alí Muḥammad, kiu poste alprenis la titolon Báb (t.e. Pordego), naskiĝis en Ŝirazo, en la sudo de Persujo, la 20an de oktobro, 1819 p. Kr.<sup>2</sup> Li estis Sejjed, t.e., ido de la profeto Mahometo. Lia patro, konata komercisto, mortis baldaŭ post Lia naskiĝo, kaj Li restis en la zorgo de patrin-flanka onklo, komercisto en Ŝirazo, kiu edukis Lin. En la infaneco Li lernis legi, kaj ricevis la elementan edukadon kutiman por infanoj.<sup>3</sup> En la aĝo de dekkvin jaroj Li ekokupis Sin per negocoj, komence kun Sia zorganto, kaj poste kun alia onklo kiu vivis en Buŝihro, ĉe la bordo de la Persa Golfo.

<sup>1</sup> Unu el la du grandaj partioj - ŝijaismo kaj sunaismo - en kiun Islamo subfalas baldaŭ post la morto de Mahometo. Ŝijaistoj asertas ke `Alí, la bofilo de Mahometo, estis la unua laŭleĝa posteulo de la Profeto, kaj ke nur liaj idoj estas laŭleĝaj kalifoj.

<sup>2</sup> La 1-an de Muḥarram, 1235 p. H.

<sup>3</sup> Koncerne tion historiisto rimarkas: "Multaj homoj en la Oriento, precipe la sekvantoj de Báb (nun bahaanoj), kredis, ke Báb ricevis nenian edukadon, sed la Mulaoj, celante malaltigi lin en la okuloj de la popolo, deklaris ke tiaj scio kaj saĝeco kiajn li posedas estas pravigitaj per la edukado kiun li ricevis. Post longa esplorado de la vero en tiu ĉi afero ni trovis pruvojn elmontrantajn ke en la infaneco li vizitis dum mallonga tempo la domon de Ŝejko Muḥammad (konata ankaŭ kiel `Ábid) kie oni instruis lin legi kaj skribi perse. Estas tio pri kio Báb temis kiam li skribis en la Bayán: `Ho Muḥammad, ho mia instruisto!...' "

"Rimarkinda afero estas, tamen, ke tiu ĉi Ŝejko kiu estis lia instruisto, iĝis fervora disĉiplo de sia iama lernanto, kaj ankaŭ la onklo de Báb, Haĝulo Sejjed `Alí, kiu estis por li kiel patro, fariĝis fervora kredanto kaj estis martirigita kiel babano.

Kiel junulo Li estis konata pro granda persona beleco kaj ĉarmo de sinteno, kaj ankaŭ pro neordinara pieco, kaj nobleco de la karaktero. Li estis ĉiam firma en plenumado de preĝoj, fastoj kaj aliaj ordonoj de la islama religio, kaj Li obeis ne nur laŭlitere, sed vivis konforme al la spirito de la instruoj de la Profeto. Li edziĝis en la aĝo de ĉirkaŭ dudek du jaroj. El tiu ĉi edziĝo naskiĝis unu filo, kiu mortis en infaneco, en la unua jaro de la publika servado de Báb.

### La Deklaracio

Atinginte la aĝon de dudek kvin jaroj, obee al la dia ordono, Li deklaris ke "Dio la Superega elektis Lin al la rango de Bábeco." En "A Traveller's Narrative"<sup>1</sup> ni legas ke: "Tio, kion li difinis per la esprimo Báb signifas, ke li estis la fluejo de difavoro devenanta de iu granda Persono kaŝita ankoraŭ malantaŭ vualo de gloro, kiu estis posedanto de sennombraj kaj senlimaj perfektecoj, laŭ kies volo li sin movis, kaj al kies amo li sin ligis." – *A Traveller's Narrative* (Episode of the Báb), p. 3 (Rakonto de Vojaĝanto- Epizodo pri Báb).

En tiuj tagoj la kredo pri baldaŭa apero de Sendito de Dio estis speciale forta en la sekto konata per la nomo Ŝejkanoj, kaj estis al unu el la distingitaj anoj de tiu ĉi sekto, Mulao Husayn Bushrú'í, ke Báb unue konigis Sian mision. La preciza dato de tiu ĉi konigo estas difinita en la Bayán, unu el la Verkoj de Báb, je du horoj kaj kvindek minutoj post la sunsubiro en la antaŭvespero de la kvina tago de la monato Jamádiyu'l-Avval, 1260 p. H.<sup>2</sup> 'Abdu'l-Bahá naskiĝis en tiu sama punkto, sed oni ne certas pri la preciza horo de Lia naskiĝo. Post kelkaj tagoj de zorgema esplorado kaj studado, Mulao Husayn firme konvinkiĝis ke la Disendito delonge atendata de la ŝejkanoj efektive aperis. Lian varmegan entuziasmon pro tiu ĉi malkovro baldaŭ ekpartoprenis multaj liaj amikoj. En mallonga tempo la plimulto de ŝejkanoj akceptis Bábon, kaj iĝis konataj kiel babanoj; baldaŭ la famo de la juna Profeto komencis disvastiĝadi tra la lando kiel fajro.

### Disvastiĝado de la Baba Movado

La unuaj dekok disĉiploj de Báb (kalkulante Lin Mem kiel la deknaŭan) iĝis konataj kiel la "Literoj de Vivo". Tiujn ĉi disĉiplojn Li dissendis en diversajn partojn de Persujo kaj Turkestano por disvastigadi la novaĵon pri Lia apero. Dume Li Mem pilgrimis en Mekkon, kien Li alvenis en decembro 1844, kaj tie Li publike deklaris Sian mision. Post la reveno en Buŝihron la anonco de Lia Bábeco kaŭzis grandegan eksciton. La fajro de Lia elokventeco, la mirindaĵo de Liaj rapidaj kaj inspiritaj verkoj, Liaj eksterordinaraj saĝeco kaj scio, Liaj kuraĝo kaj reformista fervoro, vekis grandegan entuziasmon inter Liaj sekvantoj, sed kaŭzis konformgradajn alarmon kaj malamikecon inter la ortodoksaj islamanoj. La ŝijaistaj doktoroj furioze akatakis Lin, kaj instigis la provincestrojn de Farso, nomatan Husayn Ĥano, fanatikan kaj tiranan reganton, entrepreni subpremon de la nova herezo. Tiam komenciĝis por Báb longa serio de malliberigoj, ekziloj, ekzamenoj antaŭ tribunaloj, skurĝadoj kaj malhonoroj, kiuj finiĝis nur ĉe Lia martiriĝo en 1850.

### La Pretendoj de Báb

La malamikeco ekscitita per la pretendo al Babeco iĝis duobla kiam la juna reformanto deklaris plue ke Li Mem estas la Miĥdí (Mahdi) kies alvenon antaŭdiris Mahometo. Ŝijaistoj identigis tiun Miĥdíon kun la 12a Imamo<sup>3</sup> kiu, laŭ ilia kredo, mistere malaperis for de la homa vido ĉirkaŭ mil jarojn antaŭe. Ili kredis ke li vivas ankoraŭ kaj reaperos en tiu sama korpo kiel antaŭe, kaj ili interpretadis en materiala senco la profetaĵojn rilate al lia regado, lia gloro, lia venko kaj la "signoj" de lia alveno, same kiel la judoj en la tempo de Kristo interpretadis similajn profetaĵojn pri la Mesio. Ili kredis ke li aperus kun tera potenco kaj sennombra armeo kaj deklarus sian revelacion, ke li levdus mortintajn korpojn kaj revivigadus ilin, k.t.p. Ĉar tiuj ĉi signoj ne aperis, la ŝijaistoj malakceptis Bábon kun tia sama pasiega malrespekto kiel la judoj elmontris kontraŭ Jesuo. La babanoj, aliflanke, interpretis simbole multajn el tiuj profetaĵoj. Ili interpretis la regnon de la Promesito kiel regnon mistikan, same kiel tiun de la galilea "Homo de Zorgoj"; Lian gloron kiel la spiritan, ne teran gloron; Liajn konkerojn kiel konkerojn de la urboj de homaj koroj; kaj ili trovis multegajn pruvojn de la pretendoj de Báb en Liaj mirindaj vivo kaj instruado, en Lia

"La ekkompreno de tiuj ĉi misteroj estas donata al serĉantoj de la vero, sed ni scias, ke la edukado kiun Báb ricevis estis nur elementa, kaj ĉiaj elmontritaĵoj de li signoj de superordinara grandeco kaj scio estis denaskaj kaj devenantaj de Dio" – *A Traveller's Narrative* (Episode of the Báb) p. 3 (Rakonto de Vojaĝanto - Epizodo pri Báb).

<sup>1</sup> *A Traveller's Narrative to Illustrate the Episode of the Báb* kun enkonduko de E. G. Browne, kies titolo poste mallongiĝis al *A Traveller's Narrative* (Episode of the Báb) – *Rakonto de Vojaĝanto* (Epizodo pri Báb).

<sup>2</sup> t.e., 23 majo, 1844 p. Kr.

<sup>3</sup> La Imamo de ŝijaistoj estas la destinita de Dio sekvanto de la Profeto Kiun ĉiuj kredantoj devas obei. Dekunu personoj sinsekve okupis la oficon de Imamo; la unua el ili estis 'Alí, la kuzo kaj bofilo de Mahometo. La plimulto el la ŝijaistoj kredas ke la dekdua, nomita de ili "Imamo Miĥdí", malaperis en subterejon en la jaro 329 p. H., kaj ke je la destinita tempo li reaperos, faligos la malfidelulojn kaj komencos epokon de beateco.

nefleksebla kredo, Lia nevenkebla firmeco kaj en la povo per kiu Li vokadis al la noveco de la spirita vivo tiujn kiuj estis en tomboj de eraro kaj nescio.

Sed la misio de Báb ne limiĝis eĉ per Lia pretendo al Miĥdí-eco. Li alprenis la sanktan titolon "Nuqṭiyiúlá" aŭ "Unua Punkto". Tio ĉi estas la titolo donita al Mahometo Mem de Liaj sekvantoj. Eĉ la Imamoj estis duagradaj rilate al la "Punkto", el Kiu ili ĉerpis siajn inspiron kaj aŭtoritaton. Alprenante tiun ĉi titolon, Báb pretendis enviciĝi, kiel Mahometo, en la aron de la Grandfondintoj de Religio, kaj pro tio ĉi, Li estis rigardata de ŝijaistoj kiel ĉarlatano, same kiel Moseo kaj Jesuo antaŭ Li estis konsiderataj ĉarlatanoj. Li eĉ inaŭguris novan kalendaron, restarigante la sunan jaron, kaj datante la komenciĝon de la Nova Epoko de la jaro de Sia propra deklaro.

### Pligrandiĝo de Persekutoj

Sekve de tiuj ĉi deklaroj de Báb kaj de la alarmanta rapideco kun kiu homoj de ĉiuj klasoj, riĉaj kaj malriĉaj, instruitaj kaj neinstruitaj, varmege respondis al Liaj instruoj, pli kaj pli kruelaj kaj atentigitaj iĝis la penoj de subpremo. Oni rabadis kaj ruinigis domojn. Oni kaptis kaj forportis virinojn. En Teherano, Farso, Mazindarano kaj aliaj lokoj oni mortigis grandan nombron da kredantoj. Multajn oni senkapigis, pendigis, eksplodigis el kanonoj, bruligis aŭ masakris en pecojn. Tamen, malgraŭ ĉiuj penoj celantaj pereigon, la religio progresis. Eĉ ĝuste pro tiu ĉi persekutado kreskis la fido de la kredantoj, ĉar per tio plenumiĝis laŭlitere multaj el la profetaĵoj pri la alveno de Miĥdi. Tiel en tradicio priskribita de Jábír, kiun ŝijaistoj konsideras aŭtentika, ni legas:

*En li estos la perfekteco de Moseo, la altanimeco de Jesuo, kaj la pacienco de Ijob; liaj sanktuloj estos en sia tempo malhonorataj, kaj iliaj kapoj estos donace interŝanĝataj, kiel la kapoj de turkoj kaj de deĵlamidoj estas donace interŝanĝataj; ili estos mortigataj kaj bruligataj, kaj ili estos teruritaj, timoplenaj kaj konfuzitaj; la tero estos ruĝigita per ilia sango, kaj laŭtsonos plendokrioj de iliaj virinoj; tiaj estas vere miaj sanktuloj. – New History of the Báb, angligita de prof-o E. G. Browne, p. 132 (Nova Historio de Báb)*

### Martiriĝo de Báb

La 9-an de julio, 1850<sup>1</sup> Báb Mem, Kiu tiam estis en Sia tridek unua jaro, iĝis viktimo de la fanatika furiozo de Siaj persekutantoj. Kune kun sindonema juna sekvanto, Agao Muĥammad 'Alí, kiu pasie petis permeson partopreni Lian martirecon, Li estis kondukita sur eŝafodon sur malnova kazerna placo en Tabrizo. Je ĉirkaŭ du horoj antaŭ la tagmezo ili ambaŭ estis pendigitaj per ŝnuroj sub la brakoj tiamaniere ke la kapo de Muĥammad 'Alí apogis sin sur la brusto de lia amata Majstro. Oni starigis regimenton de armenaj soldatoj kaj komandis pafi. Sen prokraste ektondris la salvo, sed kiam la fumo disiĝis, oni ekvidis ke Báb kaj Lia kunulo estas ankoraŭ vivaj. La kugloj traŝiris nur la ŝnurojn per kiuj ili estis pendigitaj, sekve ili terenfalas nevunditaj. Báb trapaŝis en proksiman ĉambron, kie oni trovis Lin interparolanta kun amiko. Ĉirkaŭ tagmeze ili estis denove pendigitaj. La armenoj, kiuj konsideris la rezulton de sia salvo kiel miraklon, ne volis pafi denove, kaj tial oni venigis alian regimenton, kiu ekpafis je la komando. Ĉi-foje la salvo estis efika. La korpoj de ambaŭ viktimoj estis kribre truitaj per la kugloj kaj terure senformigitaj, kvankam iliaj vizaĝoj restis preskaŭ netuŝataj.

Per tiu ĉi malnobla ago la Kazerna Placo en Tabrizo fariĝis la dua Kalvario. La malamikoj de Báb ĝuis pekan triumfon, pensante, ke la malamegata arbo de la baba kredo estis forhakita ĉe la radikoj, kaj ke ĝia kompleta elradikigo estos nun facila. Sed ilia triumfo mallonge daŭris! Ili ne komprenis ke la Arbon de Vero povas faligi nenia materia hakilo. Ili ne komprenis ke ĝuste tiu ĉi ilia krimo estis la rimedo kiu donis novan vivoforton al la Movado. La martiriĝo de Báb plenumis Lian propran koran deziron kaj inspiris Liajn sekvantojn per kreskanta fervoro. Tia estis la fajro de ilia spirita entuziasmo ke la akraj ventoj de persekutoj nur flagrigis ĝin en pli brulan flamon. Ju pli grandaj estis la penoj celantaj ĝian estingon, des pli alten ŝprucis la flamoj.

### Tombo sur Monto Karmelo

Post la martiriĝo de Báb, Lia restaĵo, kune kun tiu de Lia fidela kunulo, estis ĵetita sur la bordon de fosaĵo ekster la urba murego. En la dua nokto ili estis reakiritaj de kelkaj babanoj, kaj post multjara gardado en sekretaj tenejoj en Persujo, ili estis fine alportitaj, kun grandaj danĝero kaj malfacileco, en la Sanktan Landon. Tie ili estas nun enterigitaj en tombo belege lokita sur la deklivo de la monto Karmelo, nemalproksime de la Kaverno de Elija, kaj nur kelkajn mejlojn for de la loko kie Bahá'u'lláh pasigis Siajn lastajn tagojn kaj kie nun kuŝas Lia restaĵo. El la miloj da pilgrimoj el ĉiuj mondpartoj kiuj venas honori la sanktan tombon de Bahá'u'lláh, neniu forgesas diri preĝon ankaŭ ĉe la sanktejo de Lia sindonema amanto kaj antaŭinto, Báb.

<sup>1</sup> Vendrede, la 28an de Ŝah'bán, 1266 p. H.



## Skriboj de Báb

La Skriboj de Báb estis multampleksaj, kaj la rapideco kun kiu Li, sen studado kaj antaŭa pripensado, verkis ellaboritajn komentariojn, profundajn klarigojn aŭ elokventajn preĝojn estis konsiderata unu el la pruvoj de Lia dia inspiro.

La ĉefideo de Liaj diversaj Skriboj estas jene resumita:

*Kelkaj el ili (la Skriboj de Báb) estas komentarioj kaj interpretoj de la versoj de la Korano; kelkaj estas preĝoj, predikoj, kaj indikoj de (la vera signifo de iuj) tekstopartoj; aliaj estas admonoj, avertoj, traktatoj pri diversaj branĉoj de la doktrino de la Dia Unueco ... kuraĝigoj al plibonigo de karaktero, al apartiĝo de monduma pompo, kaj sinkonfido al la inspiro de Dio. Sed la esenco kaj ĉefideo de liaj skriboj estas glorado kaj priskribado de tiu baldaŭ aperonta Realeco Kiu estis liaj solaj objekto kaj celo, liaj karaĵo kaj deziro. Ĉar li konsideris sian propran aperon kiel tiun de anoncanto de la bona novaĵo, kaj sian propran realan naturon kiel helprimedon por elmontriĝo de pli grandaj perfektecoj de la Venonto. Kaj vere li ne ĉesis eĉ por unu momento gloradi Lin dum tagoj kaj noktoj, sed senĉese atentigadis al ĉiuj siaj sekvantoj ke ili atendu Lian aperon tiamaniere kiel li deklaris en siaj verkoj, "Mi estas litero el tiu plej grandioza libro kaj rosoguto el tiu senlima oceano; kaj kiam Li aperos, mia vera naturo, miaj misteroj, enigmoj kaj mencioj iĝos klaraj, kaj la embrio de tiu ĉi religio evoluos tra la stadioj de sia esteco kaj supreniĝado, atingos la staton de 'la plej bela el formoj', kaj iĝos ornamita per la vesto de 'benata estu Dio, la plej Bona el Kreantoj' ... kaj li estis tiel flamigita per Lia flamo ke rememorado pri Li estis la luma kandelo de liaj mallumaj noktoj en la fortikaĵo de Makuo, kaj meditado pri Li estis lia plej bona kamarado en la malbonkondiĉoj de la malliberejo de Ĉiriko. Per tio ĉi li akiris spiritan pliriĉiĝon; per Lia vino li estis ebriigita; kaj je rememoro pri Li li ĝojis. – A Traveller's Narrative (Episode of the Báb), pp. 54-56 (Rakonto de Vojaĝanto Epizodo pri Báb).*

## Tiu, al Kiu Dio Sin Malkaŝos

Báb estis komparita al Johano la Baptisto, sed la rango de Báb ne estas nur kiel heroldo aŭ antaŭanto. Báb Mem estis Malkaŝanto de Dio, Fondinto de sendependa religio, eĉ se tiu religio estas limigita al nur kelkara periodo. La bahaanoj kredas ke Báb kaj Bahá'u'lláh estas Kunfondintoj de ilia Kredoj; la jenaj vortoj de Bahá'u'lláh atestas al tiu vero: "Ke tiel mallonga daŭro apartigis tiun ĉi plej potencon kaj mirandan Revelacion disde Mia propra antaŭa Malkaŝaĵo, estas sekreto kiun neniu povas solvi kaj mistero kiun nenia menso povas kompreni. Ĝia daŭro estis antaŭdestinita, kaj neniu povos iam ajn trovi ĝian kaŭzon ĝis kiam oni informiĝos pri Mia Kaŝita Libro." En Siaj aludoj al Bahá'u'lláh, tamen, Báb revelaciis plenan sindonon en Sia deklaro ke, en la tagoj de "Tiu, al Kiu Dio Sin malkaŝos": "Se iu aŭdos unu verson de Li kaj ripetos ĝin, tio estos pli bone ol se li recitus la Bayánon (la Revelacion de Báb) milfoje." – A Traveller's Narrative (Episode of the Báb), p. 349 (Rakonto de Vojaĝanto Epizodo pri Báb).

Li konsideris Sin feliĉa suferante ĉiajn malfeliĉojn, se Li povis per tio ebenigi almenaŭ iomete la vojon por "Tiu, al Kiu Dio Sin malkaŝos", Kiu estis, laŭ Lia deklaro, la sola fonto de Lia inspiro kaj la sola objekto de Lia amo.

## Releviĝo, Paradizo kaj Infero

Gravan parton de la instruoj de Báb formas klarigado de la esprimoj: Releviĝo, Tago de Juĝo, Paradizo kaj Infero. La Releviĝo signifas, laŭ Li, aperon de nova Malkaŝanto de la Suno de Vero. La releviĝo de la mortintoj signifas la spiritan vekigon de tiuj kiuj dormas en la tomboj de nescio, senatento kaj volupto. La Tago de Juĝo estas tago de nova Malkaŝanto kies Revelacio - per akcepto aŭ malakcepto - apartigas la ŝafojn de la kaproj, ĉar ŝafoj konas la voĉon de la Bona Paŝtisto kaj sekvas Lin. Paradizo estas la ĝojo ami kaj koni Dion, malkaŝiĝintan per Sia Malkaŝanto, tiamaniere atingi la plej grandan perfektecon kiam oni kapablas, kaj ricevo, post la morto, de la eniro en la Regnon de Dio kaj la eternan vivon. Infero estas simple nehaveco de tiu ĉi kono de Dio kun sekvanta neatingebleco al la dia perfekteco, kaj perdo de la Eterna Favoro. Li definitive deklaris ke tiuj esprimoj ne havas alian realan signifon ol tio ĉi, kaj ke la ĝeneralaj ideoj pri releviĝo de materia korpo, materiaj ĉielo kaj infero, kaj similaj, estas nur produktaj de imagoj. Li instruis ke homo vivas post la morto, kaj ke en la postmorta vivo progresado sur la vojo de perfekteco estas senlima.

## Sociaj kaj Etikaj Instruoj

En Siaj Skriboj Báb diras al Siaj sekvantoj ke ili devas distingi sin per frata amo kaj afableco. Oni devas kulturi utilajn metiojn kaj artojn. Elementa edukado devas esti ĝenerala. En la nova kaj mirinda epoko kiu nun komenciĝas, virinoj devas havi pli grandan liberecon. Malriĉuloj devas ricevadi helpon el la publika konservejo, sed almozpeditado estas severe malpermesita, same kiel trinkado de alkoholaĵoj.

La gvidideco de vera babano devas esti pura amo, sen espero de rekompenco aŭ timo de puno. Li diras jene en la Bayán:

*Tiel adoru Dion ke se eĉ rekompenco de via adorado al Li estu la Fajro, tio ĉi neniel aligu vian adoradon al Li. Se vi adoras Dion pro timo, tio ĉi estas neinda ĉe la sojlo de la sankteco de Dio. ... Tiel same estas, se vi fikse rigardas la Paradizon, kaj adoras esperante por la Paradizo; ĉar tiukaze vi faras la kreaĵon de Dio egala kun Li. – Bábís of Persia, II, de prof-o E. G. Browne, J.R.A.S. Vol. XXI, p. 931 (Babanoj en Persujo)*

### **Sufero kaj Triumfo**

La lasta citaĵo malkaŝas la spiriton kiu inspiris la tutan vivon de Báb. Koni kaj ami Dion, respeguli Liajn Atribuojn kaj prepari la vojon por Lia venonta Malkaŝanto - tio ĉi estis Liaj solaj celo kaj deziro. Por Li vivo havis nenian terurojn kaj morto nenian doloron, ĉar amo disbatis timon, kaj la martiriĝo mem estis ravoplena sinĵeto al la piedoj de la Amato.

Strange! ke tiu pura kaj bela animo, tiu inspirita instruanto de la Dia Vero, tiu sindonema amanto de Dio kaj de Siaj proksimuloj estis tiel ege malamata, kaj kondamnita je morto de siatempaj laŭdiraj religiuloj! Certe nenio krom senpenseco aŭ obstina antaŭjuĝo povus blindigi homojn kontraŭ la fakto ke Li vere estis Profeto, Sankta Parolportanto de Dio. La mondan grandecon kaj gloron Li ne havis, sed kiamaniere spiritaj Potenco kaj Aŭtoritato povas sin pruvi se ne per la povo forlasi ĉian teran helpon, kaj triumfi super ĉiaj teraj kontraŭstaroj, eĉ la plej fortaj kaj malamikaj? Kiel Dia Amo povas elmontriĝi al la nekredema mondo se ne per la kapablo elteni plej ekstremajn sortobatojn kaj sagojn de malfeliĉo, malamon de malamikoj kaj perfidon de ŝajnaj amikoj, levi sin serene super ĉio ĉi kaj, ne perdante kuraĝon, sen dolorsento, ankoraŭ pardoni kaj beni?

Báb eltenis kaj Báb ektriumfis. Miloj da homoj atestis la sincerecon de sia amo al Li oferante siajn vivojn kaj ĉion en Lia servo. Reĝoj povus envii Lian povon super homaj koroj kaj vivoj. Plie, "Tiu al Kiu Dio Sin malkaŝos" aperis, konfirmis la pretendojn, akceptis la grandaniman sindonon de Sia antaŭinto, kaj faris Lin partoprenanto de Sia Gloro.

## ĈAPITRO III: BAHÁ'U'LLÁH<sup>1</sup>, LA GLORO DE DIO

*Ho vi kiu atendas, ne prokrastu plu, ĉar Li estas alveninta. Rigardu Lian Sanktejon kaj la Gloron en ĝi loĝantan. Tio estas la Pratempa Gloro, en nova Malkaŝanto. – Bahá'u'lláh*

### La Naskiĝo kaj Frua Juneco

Mírzá Ĥusayn `Alí, Kiu poste alprenis la titolon Bahá'u'lláh (t.e. Gloro de Dio) estis la plej aĝa filo de Mírzá `Abbás el Nuro, veziro aŭ ŝtatministro. Lia familio estis riĉa kaj distingita; multaj ĝiaj membroj okupis gravajn postenojn en la registaro kaj en la Civila kaj Milita Servoj de Persujo. Li estis naskita en Teherano, la ĉefurbo de Persujo, la 12an de novembro 1817<sup>2</sup> inter la sunsubiro kaj sunleviĝo. Li neniam vizitis lernejon aŭ kolegion, kaj la negranda edukado kiun Li ricevis estis donita hejme. Malgraŭ tio, estante ankoraŭ infano Li elmontradis mirindajn saĝecon kaj scion. Kiam Li estis ankoraŭ junulo Lia patro mortis, lasante al Li la respondecon por Liaj pli junaj gefratoj, kaj por prizorgado de la vastaj familiaj posedaĵoj.

Unufoje `Abdu'l-Bahá, la plej aĝa filo de Bahá'u'lláh, rakontis al la aŭtoro la sekvantajn detalojn pri la frua juneco de Sia Patro:

*De la juneco Li estis rimarkinde afabla kaj grandanima. Li treege amis la eksterdoman vivon, kaj pasigis plej multe da tempo en la ĝardeno aŭ en kampoj. Li havis eksterordinaran allogpovon, kiun ĉiuj sentis. Homoj ĉiam amasiĝadis ĉirkaŭ Li. Li estis ĉirkaŭata de ministroj kaj korteganoj, kaj ankaŭ infanoj havis grandan simpation al Li. Kiam Li havis la aĝon de apenaŭ dektri aŭ dekkvar jaroj, Li iĝis konata pro Sia instruiteco. Li paroladis pri ĉiaj temoj kaj solvadis ĉiajn problemojn prezentitajn al Li. En grandaj kunvenoj Li diskutadis kun ulemoj (elstaraj muloj) kaj eksplikis malfacilajn religiajn demandojn. Ĉiuj ili aŭskultadis Lin kun grandega intereso.*

*Kiam Bahá'u'lláh havis la aĝon de dudek du jaroj, Lia patro mortis, kaj la Registaro deziris ke Li okupu la postenon de la patro, kiel estis kutime en Persujo, sed Bahá'u'lláh ne akceptis la proponon. Tiam la ĉefministro diris: "Lasu lin trankvila. Tia posteno estas malinda je li. Li celas ion pli altan. Mi ne povas ekkompreni lin, sed mi estas konvinkita ke li estas destinita por ia alta sorto. Liaj pensoj ne similas la niajn. Lasu lin sola."*

### Malliberigita kiel Babano

Kiam Báb deklaris Sian mision en 1844, Bahá'u'lláh, estanta tiam en la dudek sepa jaro de la vivo, kuraĝe aliĝis al la nova Kredo, kaj baldaŭ iĝis konata kiel unu el ĝiaj plej potencaj kaj sentimaj disvastigantoj.

Li estis jam dufoje malliberigita pro la Kredo, kaj unu fojon suferis la torturon de bastonado, kiam en aŭgusto 1852, okazis afero kiu rezultigis terurajn sekvojn por la babanoj. Unu el la sekvantoj de Báb, junulo nomita Šádiq, estis tiel kortuŝita pro la martiriĝo de sia amata Majstro, kiun li vidis propraokule, ke tio malordigis lian menson, kaj, venĝe, li ekembuskis kontraŭ la ŝaho kaj ekpafis al li per pistolo. Anstataŭ uzi kuglon, tamen, li ŝarĝis sian armilon per kugletaĵo, kaj kvankam kelkaj plumberoj trafis la ŝahon, ili faris al li nenian seriozan difekton. La junulo detiris la ŝahon de sur la ĉevalo, sed li estis tuj kaptita de akompanantoj de lia moŝto kaj ĉi-loke mortigita. La tuta babanaro estis maljuste tenita priresponda pri tiu ĉi faro, kaj sekvis teruraj masakroj. Okdek el ili estis tuj mortigitaj en Teherano en plej kruelaj torturoj. Multaj aliaj estis malliberigitaj; inter tiuj ankaŭ Bahá'u'lláh. Li poste skribis:

*Je la justeco de Dio! Ni havis nenion komunan kun tiu abomeninda faro, kaj Nia senkulpeco estis nedisputeble pruvita antaŭ la tribunaloj. Malgraŭ tio, oni arestis Nin, kaj el Nijavarano, kiu estis tiam la reĝa restejo, kondukis Nin, katenigita, kun nuda kapo kaj nudaj piedoj en la subteran malliberejon en Teherano. Bruta gardanto, kiu Nin akompanis surĉevalo, ekprenis la ĉapelon de sur Nia kapo, dum multaj ekzekutistoj kaj gardistoj pelis Nin antaŭen kun granda rapideco. Oni fermis Nin dum kvar monatoj en loko abomena preter kompreno. Efektive, malluma kaj malvasta ĉelo estus multe pli preferebla ol la subtereja loko, kie estis enkarcerigitaj tiu ĉi Persekutato kaj Liaj kunsuferantoj. Je Nia alveno, oni kondukis Nin tra malluma koridoro, kaj de tie Ni malsupreniris tri krutajn ŝtuparojn ĝis la subteraĵo destinita por Ni. Tiu ĉi loko estis peĉe malluma, kaj Niaj kunmalliberuloj nombris preskaŭ cent kvindek; ŝtelistoj, murdistoj kaj vojrabistoj. Kvankam tiom*

<sup>1</sup> Akcentu la duan kaj la kvaran silabojn, la unua silabo estu preskaŭ silenta kaj ambaŭ literoj "lo" estu klare elparolitaj.

<sup>2</sup> La 2-an de Muĥarram, 1233 p. H.

*homplena, ĝi tamen havis nenian elirejon krom la koridoro tra kiu Ni eniris. Nenia plumo kapablas priskribi tiun lokon, nek la lango ĝian putran malbonodoron konigi. La plej multaj el la viroj havis nek veston nek kuŝaĵon. Nur Dio scias kio okazis al Ni en tiu odoraĉa kaj fia loko!*

*Tage kaj nokte, en tiu subtera malliberejo, Ni meditis pri la faroj, la stato, kaj la konduto de la babanoj, scivolante kio povintus igi popolon tiel grandanima, tiel nobla, kaj tiel inteligenta, fari tiel malrespektan kaj insultegan atencon kontraŭ la vivo de la reganto. Tiu ĉi Persekutato tuj decidis ke, post Sia liberiĝo, Li eklaboros kun plej granda peno, por regeneradi tiun ĉi popolon.*

*Unu nokton, en sonĝo, la jenaj glorigaj vortoj aŭdiĝis ĉiuflanke: "Vere, Ni igos Vin Triumfa per Vi Mem kaj per Via Plumo. Ne malĝoju pri tio kio okazis al Vi, nek timu, ĉar Vi estas sekura. Baldaŭ Dio aperigos la trezorojn de la tero - homojn kiuj donos al Vi venkon per Vi Mem kaj per Via Nomo, per kiu Dio revivigis la korojn de tiuj kiuj rekonis Lin. – Epistle to the Son of the Wolf, pp. 20-21 (Epistolo al Filo de Lupo)*

## Ekzilo en Bagdadon

Tiu ĉi terura malliberigo daŭris kvar monatojn, sed Bahá'u'lláh kaj Liaj amikoj restis fervoraj kaj plenaj de entuziasmo, en plej granda feliĉeco. Preskaŭ ĉiutage unu aŭ kelkaj el ili estas torturitaj aŭ mortigitaj kaj la aliaj estas rememorigitaj ke ilia vico povus veni la sekvantan fojon. Kiam la ekzekutistoj venis por kunpreni unu el la amikoj, tiu kies nomo estis elvokita simple dancis pro ĝojo, kisis la manojn de Bahá'u'lláh, ĉirkaŭbrakis la aliajn samkredantojn kaj kun ĝoja fervoro rapidis al la martiriĝejo.

Estis nerefuteble pruvite ke Bahá'u'lláh ne partoprenis en la komploto kontraŭ la ŝaho, kaj la rusa ministro atestis la purecon de Lia karaktero. Krome, Li estis tiel malsana, ke oni atendis Lian morton. Tial, anstataŭ kondamni Lin je morto, la ŝaho ordonis ekzili Lin en Irak-Arabujon en Mezopotamio, kaj tien Bahá'u'lláh ekiris, du semajnojn poste, akompanata de Sia familio kaj nombro de aliaj kredantoj. Ili terure suferis pro malvarmo kaj aliaj malfacilaĵoj dum la longa vintra vojaĝo, kaj venis en Bagdadon en stato de preskaŭ kompleta senhaveco.

Tuj kiam Lia sano permesis, Bahá'u'lláh komencis instrui demandantojn, kuraĝigi kaj admoni la kredantojn, kaj baldaŭ paco kaj feliĉeco ekregis inter la babanoj.<sup>1</sup> Tio ĉi, tamen, mallonge daŭris. La duonfrato de Bahá'u'lláh, Mírzá Yahyá, konata ankaŭ kiel Subh-i-Azal, venis Bagdadon, kaj baldaŭ poste komemis okazi malpacoj, sekrete instigitaj de li, simile al la diferencoj kiuj aperis inter la disĉiploj de Kristo. Tiuj ĉi malpacoj (kiuj poste, en Adrianopolo, iĝis malkaŝaj kaj furiozaj) estis tre dolorigaj al Bahá'u'lláh, Kies sola celo en la vivo estis starigi unuecon inter la popoloj de la mondo.

## Du Jaroj en Sovaĝejo

Ĉirkaŭ unu jaro post la alveno en Bagdadon, Li foriris sola en la sovaĝejon de Sulejmanijje, kunprenante nenion krom ŝanĝo de vestaĵo. Tiun ĉi periodon Li priskribas jene en la libro Íqán<sup>2</sup>:

*En la fruaj tagoj de Nia alveno en tiun ĉi landon, kiam Ni konstatis la signojn de minacaj okazontaĵoj, Ni decidis foriri, antaŭ ol ili okazos. Ni foriris en la dezerton, kaj tie, aparta kaj sola, pasigis du jarojn en tuta izoliteco. El Niaj okuloj fluadis larmoj de angoro, kaj en Nia sanganta koro ondadis oceano de dolorego. Dum multaj noktoj mankis al Ni nutraĵo, kaj dum multaj tagoj la korpo trovis nenian ripozon. Je Tiu en Kies Manoj estas Mia esteco! malgraŭ tiuj ĉi abundaj afliktoj kaj sinsekvaj sortobatoj, Nia animo restis en beata ĝojo, kaj Nia tuta esteco evidentigis neesprimeblan feliĉecon. Ĉar en Nia soleco Ni ne konsciis pri la malbono aŭ profito, pri la sano aŭ malsano, de iu ajn persono. Sola, Ni komuniis kun Nia spirito, forgesema pri la mondo kaj ĉio en ĝi. Ni ne sciis, tamen, ke la maŝo de la dia destino superas la plej vastan homan koncepton, kaj ke la sago de Lia dekreto superegas la plej aŭdacajn homajn planojn. Neniu povas eviti Liajn kaptilojn, kaj neniu persono povas trovi feliĉon escepte per submetiĝo al Lia volo. Ni ĵuras je Dio, ke Nia foriro ne antaŭvidis revenon, nek Nia disiĝo esperis reunuiĝon. La sola celo de Nia foriro estis ne iĝi kaŭzo de malharmonio inter la fideluloj, fonto de malkonkordo inter la amikoj, ilo de ofendo kontraŭ iu ajn persono, aŭ kaŭzo de malĝojo por iu ajn koro. Preter tio ĉi, Ni havis nenian alian intencon, nek ian celon. Kaj tamen, ĉiu intrigis laŭdezire, kaj okupis sin per siaj senvaloraj kapricoj, ĝis la horo kiam, el la Mistera Fonto, venis la dekreto reveni. Cedante Nian volon al la Lia, Ni obeis al Lia ordono.*

<sup>1</sup> Tio ĉi estis frue en la jaro 1853, aŭ naŭ jarojn post la Deklaracio de Báb, plenumante tiel difinitajn profetaĵojn de Báb pri la "jaro Naŭa".

<sup>2</sup> Libro Íqán, Íqán, Kitáb-i-Íqán, kaj Book of Certitude (Libro de Certeco) ĉiuj aludas al la sama libro.

*Kia plumo kapablas priskribi kion Ni vidis post la reveno! Dum du jaroj la malamikoj streĉadis ĉiujn siajn fortojn por neniigi Nin, kiel ĉiuj scias. – Kitáb-i-Íqán, pp. 250-252*

### Kontraŭstaro de Mulaoj

Post Lia reveno el tiu rifuĝejo, Lia famo fariĝis pli granda ol antaŭe kaj homoj rapidis en Bagdadon el proksime kaj malproksime por vidi Lin kaj aŭdi Lian instruadon. Judoj, kristanoj kaj zoroastranoj, same kiel islamanoj, interesiĝis pri la nova Revelacio. Tamen, Mulaoj (islamaj doktoroj) alprenis malamikan sintenon kaj persiste konspiris por Lin faligi. Foje ili sendis unu el sia anaro por intervui Lin kaj prezenti al Li difinitajn demandojn. La sendito trovis ke la respondoj de Bahá'u'lláh estas tiel konvinkaj kaj Lia saĝeco tiel miriga, kvankam evidente ne akirita per studado, ke li devis konfesi ke Bahá'u'lláh estas senkompara en scio kaj kompreno. Por certigi, tamen, al la Mulaoj kiuj lin sendis pri la vera profeteco de Bahá'u'lláh, li petis plenumon de la miraklo kiel pruvon. Bahá'u'lláh esprimis pretecon akcepti la proponon sub difinitaj kondiĉoj, deklarante ke se la Mulaoj elektus ian difinitan de si miraklon, kaj subskribus kaj sigelus dokumenton tiel ke post plenumo de tiu ĉi miraklo ili konfesus ia aŭtentikecon de Lia misio kaj ĉesus kontraŭstari Lin, Li aŭ kaŭzus la deziratan miraklon aŭ konfesus Sin esti trompanto. Se la celo de la Mulaoj estus malkaŝi la veron, ili ja havis sian okazon; sed iliaj intencoj estis tute aliaj. Ĉu juste aŭ maljuste, ili intencis certigi al si decidigon profitan al si. Ili timis la veron kaj forkuris de la kuraĝa defio. Tiu ĉi malvenko, tamen, nur instigis ilin al novaj komplotoj por elradikigi la persekutatan sekton. La persa ĉefkonsulo en Bagdado helpis ilin en ilia penado kaj sendis al la ŝaho plurajn sciigojn anoncantajn ke Bahá'u'lláh kelkfoje ofendis la islaman religion, daŭre malboninfluate Persujon, kaj ke oni devas pro tio ekzili Lin en ian pli malproksiman lokon.

Estis karakterize por Bahá'u'lláh ke, dum tiu ĉi krizo, kiam, pro la instigoj de la islamaj Mulaoj la persa kaj turka registaroj unuigadis siajn fortojn por elradikigi la Kredon, Li restis trankvila kaj serena, kuraĝiganta kaj inspiranta Siajn sekvantojn kaj skribanta nepereblajn vortojn de konsolo kaj gvidado. 'Abdu'l-Bahá rakontas ke Li verkis tiutempe la Hidden Words (Kaŝitajn Vortojn). Bahá'u'lláh ofte iris promeni laŭ bordo de Tigro. Li revenus aspektante tre feliĉa, kaj skribus tiujn lirikajn gemojn de saĝa konsolo kiuj alportis helpon kaj kuracon al miloj da suferantaj kaj premitaj koroj. Dum jaroj, ekzistis nur kelkaj manuskriptoj de la Kaŝitaj Vortoj manskribitaj de Li, kaj tiuj ĉi devis esti zorgeme kaŝitaj por ke ili ne enfalu en la manojn de la multegaj malamikoj, sed nun tiu malgranda volumeto estas probable la plej bone konata el ĉiuj verkoj de Bahá'u'lláh, kaj estas legata en ĉiuj partoj de la mondo. La alia bone konata verko de Bahá'u'lláh estas la *Book of Íqán*, verkita en la sama periodo, ĉe la fino de Lia restado en Bagdado (1862-1863 p. Kr.)

### La Deklaracio en Ridván<sup>1</sup> apud Bagdado

Post longa traktado, la turka registaro eldonis, je la postulo de la persa registaro, ordonon alvokantan Bahá'u'lláh'n en Konstantinopolon. Tiu ĉi novaĵo konsternis Liajn sekvantojn. Ili sieĝis tiel amase la domon de sia amata Gvidanto ke la familio entendiĝis en la Ĝardeno de Najib Paŝao ekster la urbo por dekdu tagoj, dum kiuj oni preparis la karavanon por la longa vojaĝo. Estis dum tiuj ĉi dekdu tagoj (22<sup>a</sup> de aprilo - 3-a de majo, 1863, t.e. deknaŭ jarojn post la Deklaracio de Báb), ke Bahá'u'lláh anoncis al kelkaj el siaj sekvantoj la ĝojan novaĵon ke Li estas Tiu Kies alvenon antaŭdiris Báb - la Elektito de Dio, la Promesita de ĉiuj Profetoj. La Ĝardeno en kiu okazis tiu ĉi memorinda deklaracio iĝis konata inter la bahaanoj kiel la "Ĝardeno de Ridván," kaj la tagoj kiujn Bahá'u'lláh pasigis tie estas rememorable en la "Festo de Ridván", solenata ĉiujare je la datreveno de tiuj dekdu tagoj. Dum tiuj tagoj Bahá'u'lláh, anstataŭ esti malgaja kaj depremita, elmontris grandegajn ĝojon, dignon kaj povon. Liaj sekvantoj fariĝis feliĉaj kaj entuziasmaj, kaj grandaj homamasoj venis esprimi sian respekton al Li. Ĉiuj eminentuloj de Bagdado, eĉ la Ĉefreganto mem, venis persone por honori la forveturantan malliberulon.

### En Konstantinopolo kaj Adrianopolo

La vojaĝo al Konstantinopolo daŭris inter tri kaj kvar monatoj, kaj la grupo konsistis el Bahá'u'lláh kaj Liaj familianoj kaj dudek ses disĉiploj. Alveninte en Konstantinopolon ili estis malliberigitaj en malgranda dometo multe tro malvasta por ili. Poste ili ricevis iom pli bonajn loĝejojn, sed post kvar monatoj ili estis denove eksigitaj, tiufoje en Adrianopolon. La vojaĝo al Adrianopolo, kvankam daŭranta nur kelkajn tagojn, estis la plej terura el ĉiuj kiujn ili ĝis nun travivis. Neĝis peze dum granda parto de la tempo, kaj ĉar ili ne havis komfortajn vestojn kaj nutraĵon, iliaj suferoj estis grandegaj. Dum la unua vintro en Adrianopolo, Bahá'u'lláh kaj Lia familio, nombranta dekdu personojn, estis lokitaj en malgranda triĉambra dometo, senkomforta kaj insektoplena. Printempe oni donis al ili pli komfortan loĝejon. Ili restis en Adrianopolo dum pli ol kvar kaj duono da jaroj. Tie ĉi Bahá'u'lláh rekomencis Sian instruadon kaj arigis ĉirkaŭ Si grandan sekvantaron. Li publike anoncis Sian mision kaj estis entuziasme akceptita de plimulto de la babanoj, kiuj post tio iĝis konataj kiel bahaanoj. Tamen, malplimulto sub la gvidado de la duonfrato de Bahá'u'lláh, Mirzá Yahyá, ekkontraŭstari Lin furioze kaj unuigis kun siaj iamaj

<sup>1</sup> Eldiru Rezvan.

malamikoj, la ŝijaistoj, por konspiri por Lia faligo. Sekvis grandaj malfacilaĵoj, kaj fine la turka registaro forigis kaj la babanojn kaj la bahaanojn el Adrianopolo, ekzilante Bahá'u'lláh'n kaj Liajn sekvantojn en Akreon, en Palestino, kie ili alvenis (laŭ Nabil)<sup>1</sup> la 31an de aŭgusto 1868; kaj Mírzá Yahyá kun sia partio estis sendita en Cipron.

### Leteroj al la Reĝoj

En tiu tempo Bahá'u'lláh skribis Siajn konatajn leterojn al la sultano de Turkujo, al multaj el la kronitoj de Eŭropo, al la Papo, kaj al la persa ŝaho. Poste, en Sia Kitáb-i-Aqdas<sup>2</sup>, Li skribis al aliaj suverenoj, al la regantoj kaj Prezidentoj de Ameriko, al la ĉefoj de religioj ĝenerale kaj al la tuta homaro. Al ĉiuj, Li anoncis Sian mision kaj alvokis ke ili streĉu siajn energiojn por starigi veran religion, justan regadon kaj internacian pacon. En Sia letero al la ŝaho Li pledis potence la aferon de la persekutataj babanoj kaj postulis ke oni starigu Lin vizaĝo kontraŭ vizaĝo kun tiuj kiuj instigis ties persekutadon. Ne necesas diri, ke oni ne konsentis plenumi tiun ĉi postulon. Badí, tiu juna kaj sindonema bahaano kiu transdonis la leteron de Bahá'u'lláh, estis kaptita kaj martirigita per teruraj torturoj, brulruĝajn brikojn oni premegis sur lian karnon!

En tiu sama letero Bahá'u'lláh prezentas plej kortuŝan priskribon de Siaj propraj suferoj kaj sopiroj:

*Ho Reĝo, mi vidis sur la vojo de Dio tion kion nenies okulo vidis kaj nenies orelo aŭdis. Amikoj malkonfesis min; malfaciliĝis miaj kondiĉoj; la laĝeto de sekureco sekiĝis; la ebenaĵo de facileco brulflaviĝis. Kiom multaj malfeliĉoj venis, kaj kiom multaj venos ankoraŭ! Mi paŝas antaŭen al la Potenco, al la Fava, dum malantaŭ mi rampas serpento. Miaj okuloj pluvigas larmojn ĝis mia lito malsekiĝas, sed ne pro mi mem estas mia malĝojo. Je Dio, mia kapo sopiras lancojn pro la amo al sia Sinjoro, kaj neniam mi pasas preter arbo sen tio ke la koro vokas al ĝi, "Ho ke vi estu forhakita en mia nomo kaj mia korpo krucumita sur vi en la vojo de mia Eternulo!" Ja, ĉar mi vidas la homojn devojĝantajn en sia ebrieco, kaj ili ne scias tion: ili glorigis siajn voluptodezirojn, kaj flankenigis sian Dion, kvazaŭ konsiderante la Ordonon de Dio mokindaĵo, amuzobjekto, kaj ludilo; kaj ili pensas ke ili agas bone, kaj ke ili estas rifuĝintaj en citadelon de sendanĝereco. La afero ne tiel staras kiel ili supozas; morgaŭ ili ekvidos tion kion ili neas (hodiaŭ).*

*Ni estas translokotaj el tiu ĉi plej malproksima ekzilejo, Adrianopolo, en la malliberejon de Akreo. Kaj, laŭ tio kion oni diras, ĝi estas certe la plej dezerta el la urboj de la mondo, la plej malbela en sia aspekto, la plej malaminda pro sia klimato, kaj la plej malpura pri akvo; ĝi estas kvazaŭ ĉefurbo de strigoj; nenio estas tie aŭdebla krom la sonoj de ilia kriadado. Kaj en tiu loko oni intencas malliberigi la servanton, fermi antaŭ niaj vizaĝoj la pordojn de indulgo kaj forpreni de ni la bonaĵojn de la enmonda vivo por la resto de niaj tagoj. Je Dio, kvankam laciĝo senfortigus min, kaj malsato pereigus min, kvankam mia kuŝejo estus farita el malmola roko kaj bestoj el dezerto estus miaj kunuloj, mi ne ektemos, sed paciencos, kiel paciencas firmuloj kaj konstantuloj, en la potenco de Dio, la Reĝo de Praekzisto, la Kreinto de la nacioj; kaj en ĉiaj kondiĉoj mi diras dankon al Dio. Kaj ni esperas pro Lia Favoreco (glorata estas Li) ... ke Li ŝanĝos la vizaĝojn de (ĉiuj homoj) sinceraj al Si Mem, la Potenco, la Malavara. Vere Li respondas al tiu kiu preĝas al Li, kaj estas proksima al tiuj kiuj vokas al Li. Kaj ni petas Lin ke tiun ĉi senluman malbonsorton Li faru ŝildo por la korpoj de Siaj sanktuloj, kaj defendu ilin tiamaniere de akraj glavoj kaj penetraj klingoj. Tra suferoj lumas Lia lumo kaj senĉese brilas Lia gloro; tio ĉi estis Lia metodo en la estintaj jarcentoj kaj pasintaj tempoj. – A Traveller's Narrative (Episode of the Báb), pp. 145-147 (Rakonto de Vojaĝanto-Epizodo pri Báb)*

### En la Malliberejo en Akreo

En tiu tempo Akreo estis mallibereja urbo en kiun oni sendadis plej malbonajn krimulojn el ĉiuj partoj de la turka imperio. Alveninte tie, post malfeliĉega marvojaĝo, Bahá'u'lláh kaj Liaj sekvantoj, okdek ĝis okdek kvar personoj, viroj, virinoj kaj infanoj, estis malliberigitaj en la soldataj kazernoj. La ejo estis malpura kaj ekstreme malgaja. Estis tie nek litoj nek ia ajn komforto. La provizata nutraĵo estis tiom mizera kaj malsufiĉa, ke post iom da tempo la malliberuloj petis permeson mem aĉeti nutraĵon. Dum la unuaj kelkaj tagoj la infanoj ploris senĉese, kaj estis preskaŭ neeble dormi. Baldaŭ aperis malaro, disenterio kaj aliaj malsanoj, kaj ĉiu el la anaro iĝis malsana, krom du. Tri el ili mortis sekve de la malsano, kaj la suferoj de la postvivantoj estis nepriskribeblaj.<sup>3</sup>

<sup>1</sup> Aŭtoro de frua historio de la Kredo, The Dawn-Breakers (La Herooj de la Nova Tagiĝo en Esperanto-manuskripto), Nabil partoprenis kelkajn el la okazintaĵoj kiujn li priskribis kaj persone konis multajn el la frutempaj kredantoj.

<sup>2</sup> La Aqdas, Kitáb-i-Aqdas, La Libro Aqdas, kaj La Plej Sankta Libro ĉiuj aludas al la sama libro.

<sup>3</sup> Por enterigi du el la mortintoj, Bahá'u'lláh donis Sian propran tapiŝon por ke oni ĝin vendu por la enterigaj elspezoj; sed anstataŭ tiucele uzi la monon la soldatoj alproprigis al si la tapiŝon, kaj la korpojn ĵetis en terkavon.

Tiu ĉi rigora mallibereco daŭris du jarojn, dum kiuj neniun bahaanon oni ellasis ekster la mallibereja pordo, krom kvar homoj, zorge gardataj, kiuj eliris ĉiutage por aĉeti nutraĵon.

En la daŭro de la enkazerna mallibereco, vizitoj estis severe malpermesitaj. Kelkaj bahaanoj piedvenis el Persujo por vidi sian amegatan gvidanton, sed oni malpermesis al ili eniri inter la urbajn muregojn. Ili iradis al loko sur la ebenaĵo ekster la tria ĉirkaŭfosaĵo, de kie ili povis vidi la fenestrojn de la loĝejo de Bahá'u'lláh. Li staris en unu el la fenestroj por ke ili povu vidi Lin kaj rigardinte Lin de malproksime, ili ploris kaj revenis hejmen, flamigitaj per nova fervoro al sinoferado kaj servado.

### Malseverigo de la Rigoro

Fine la mallibereco estis moderigata. Okazis mobilizo de la turkaj rotoj kaj oni ekpostulis la kazernojn por la soldatoj. Bahá'u'lláh kaj Lia familio estis transkondukitaj en apartan domon kaj la ceteraj de la anaro estis lokitaj en karavanejo en la urbo. Bahá'u'lláh estis fermita en tiu ĉi domo dum sep jaroj pli. En malgranda ĉambro apud tiu en kiu Li Mem estis enkarcerigita, dektri personoj el Lia domanaro, inkluzive ambaŭ seksojn, devis kune loĝi kiel eble plej bone! En la komenco de sia restado en tiu ĉi domo li multege suferis pro la malkomforto, malsufiĉa nutraĵo kaj manko de la ordinaraĵoj oportunaĵoj de la vivo. Post iom da tempo, tamen, oni disponigis al ili kelkajn pluajn ĉambrojn kaj ili povis vivi en relativa komforto. De la tempo kiam Bahá'u'lláh kaj Liaj kunuloj forlasis la kazernojn, oni permesadis al vizitantoj viziti kun ili, kaj iom post iom la severa limigo starigita per la Imperiestraj ordonoj estis neplenumita, kvankam restarigita de tempo al tempo.

### Malfermo de la Mallibereja Pordo

Eĉ en la tempo de la plej malbona enkarceriĝo, la bahaanoj ne senkuraĝiĝis, kaj ilia serena fido neniam ŝanceliĝis. Restante en la kazernoj de Akreo, Bahá'u'lláh skribis al kelkaj amikoj: "Ne timu. Tiu ĉi pordo malfermiĝos. Mia tendo estos starigita sur la monto Karmelo, kaj venos tempo de grandega ĝojo." Tiu ĉi deklaro estis granda fonto de konsolo por Liaj sekvantoj, kaj en la ĝusta tempo ĝi laŭlitere plenumiĝis. Kiel malfermiĝis la mallibereja pordo estas rakontite pli bone per la vortoj de `Abdu'l-Bahá, jene tradukitaj de Lia nepo, Shoghi Effendi:

*Bahá'u'lláh amis la belecon kaj verdaĵon de kamparo. Unu tagon Li rimarkis: "Mi ne rigardas verdaĵon de naŭ jaroj. Kamparo estas la mondo de animoj, urbo estas la mondo de korpoj." Kiam mi ekaŭdis nedirekte pri tiu ĉi diro mi ekkomprenis ke Li sopiras je kamparo, kaj mi estis certa ke kion ajn mi farus por plenumi Lian deziron estus sukcesa. En tiu tempo vivis en Akreo homo nomata Muhammad Paŝao Safwat, kiu estis nia granda malamiko. Li havis palacon nomatan Mazra`ih, ĉirkaŭ kvar mejlojn norde de la urbo. Tio estis ĉarma loko, ĉirkaŭita per ĝardeno kaj kun torento de fluanta akvo. Mi iris kaj vizitis la paŝaon en lia domo. Mi diris: "Paŝao, vi lasis la palacon malplena, kaj loĝas en Akreo". Li respondis: "Mi estas malsanulo kaj ne povas forlasi la urbon. Se mi iras tien estas malproksime kaj mi estas apartigita disde miaj amikoj". Mi diris: "Ĉar vi ne loĝas tie kaj la palaco estas malplena, ludonu ĝin al mi". Li estis mirigita per la propono, sed fine li konsentis. Mi luis la domon por tre malalta prezo, ĉirkaŭ kvin pundoj jare, pagis al li por kvin jaroj kaj faris kontrakton. Mi sendis laboristojn por ripari la domon kaj ordigi la ĝardenon kaj konstrui banejon. Mi ankaŭ pretiĝis veturilon por la Benita Belo.<sup>1</sup> Unu tagon mi decidis iri kaj vidi mem la lokon. Malgraŭ la ripetitaj instrukcioj donitaj en kelkaj sinsekvaj ordonoj ke ni neniel trapasu la limojn de la urbaj muregoj, mi eliris tra la Urba Pordego. Ĝendarmoj gardestaris, sed ili ne protestis, do mi ekiris rekte al la palaco. La sekvintan tagon mi denove eliris, kun kelkaj amikoj kaj oficistoj, sen ĝeno kaj kontraŭstaro, kvankam gardistoj kaj soldatoj staris ĉe ambaŭ flankoj de la urba pordego. En alia tago mi aranĝis festeneton, starigis tablon sub la pinoj de Bahjí, kaj kunvenigis ĉirkaŭ ĝi la eminentulojn kaj oficistojn de la urbo. Vespere ni ĉiuj kune revenis en la urbon.*

*Unu tagon mi ekstaris en la Sankta Ĉeesto de la Benita Belo kaj diris: "La palaco en Mazra`ih estas preta por Vi, ankaŭ veturilo por veturigi Vin tien". (En tiu tempo estis neniam veturiloj en Akreo aŭ Hajfa.) Li rifuzis iri, dirante: "Mi estas malliberulo". Poste mi ree petis Lin, sed mi ricevis la saman respondon. Mi fine decidis ke mi petu al Li la trian fojon, sed Li ankoraŭ respondis "Ne!" kaj mi ne kuraĝis plu insisti. En Akreo vivis, tamen, unu islama ŝejko, persono fama kaj havanta konsiderindan influon, kiu amis Bahá'u'lláh'n kaj estis tre favorata de Li. Mi vizitis tiun ĉi ŝejkon kaj klarigis al li la situacion. Mi diris: "Vi estas kuraĝa. Iru ĉi-nokte en Lian Sanktan Ĉeeston, falu sur la genuojn antaŭ Li, ekkaptu Liajn manojn kaj ne cedu ĝis Li promesos forlasi la urbon!" Li estis arabo. ... Li iris rekte al Bahá'u'lláh kaj sidiĝis apud Liaj piedoj. Li prenis la manojn de la Benita Belo, kisis ilin kaj demandis: "Kial vi ne forlasis la urbon?" Li diris: "Mi estas malliberulo". La ŝejko respondis: "Dio gardu! Kiu havas la povon fari vin malliberulo? Vi mem tenas vin en la malliberejo. Estis via*

<sup>1</sup> Jamál-i-Mubarák (lit. Benita Belo) estis titolo kutime donata al Bahá'u'lláh de Liaj sekvantoj kaj amikoj.

*propra volo esti malliberigita, kaj nun mi petegas vin eliri kaj iri en la palacon. Ĝi estas bela kaj verdoriĉa. La arboj estas ĉarmaj; kaj la oranĝoj kiel fajrogloboj!" Ĉiufoje kiam la Benita Belo diris: "Mi estas malliberulo, ne estas eble", la ŝejko prenis Liajn manojn kaj kisis ilin. Dum tuta horo li petadis. Fine Bahá'u'lláh diris, "Ĥejli Ĥub" (tre bone), kaj la pacienco kaj persisto de la ŝejko estis rekompencitaj. Li venis al mi kun granda ĝojo por diri la bonan novaĵon pri la konsento de Lia Sankteco. Malgraŭ la severa ordono de `Abdu'l-`Azíz kiu malpermesis mian intervidiĝon aŭ ian interparolon kun la Benita Perfekteco, mi prenis la veturilon en la sekvanta tago kaj veturis kune kun Li al la palaco. Neniu protestis. Mi lasis Lin tie kaj revenis sola en la urbon.*

*Du jarojn Li restis en tiu ĉarma kaj bela loko. Poste estis decidite translokiĝi en alian lokon, ĉe Bahjí. Okazis ke epidemio estis eksplodinta en Bahjí, kaj la posedanto de la domo forkuris en aflikto, kun sia tuta familio, preta transdoni la domon senpage al iu ajn petanto. Ni luis la domon por tre malalta prezo, kaj tie la pordo de majesteco kaj vera reĝeco estis larĝe malfermita. Bahá'u'lláh estis laŭnome malliberulo (ĉar la severaj ordonoj de la sultano `Abdu'l-`Azíz neniam estis revokitaj), tamen efektive Li elmontradis tiajn noblecon kaj dignon en Sia vivo kaj sintenado ke Li estis respektata de ĉiuj, kaj la Regantoj de Palestino enviis Liajn influon kaj povon. Estroj kaj Mutaŝarifoj, generaloj kaj lokaj oficistoj, humile petadis ia honoron atingi Lian ĉeeston - peto, al kiu Li malofte konsentis.*

*Foje ĉefreganto de la urbo petegis tiun ĉi honoron pretendante ke li ricevis de pli altaj aŭtoritatoj la ordonon viziti, kune kun iu generalo, la Benitan Perfektecon. Kiam tiu ĉi peto estis plenumita, la generalo, kiu estis tre dika persono, eŭropano, estis tiel impresita per la majesteco de Bahá'u'lláh ke li restis surgenue sur la tero apud la pordo. Tia estis la senmemfido de ambaŭ vizitantoj ke nur la ripetitaj invitoj de Bahá'u'lláh inklinigis ilin ekfumi la proponitan nargileon. Eĉ tiam ĝin apenaŭ tuŝis ili per la lipoj, kaj metinte ĝin flanken, faldumis la brakojn kaj sidis en la sinteno de tiaj humileco kaj respekto ke miris ĉiuj ĉeestantoj.*

*La plena estimo de la amikoj, la konsidero kaj respekto montrataj de ĉiuj oficistoj kaj eminentuloj, la alfluado de pilgrimuloj kaj verserĉantoj, la spirito de sindonemo kaj servemo kiu elmontriĝadis ĉie, la majesta kaj reĝa aspekto de la Benita Perfekteco, la efikeco de Liaj ordonoj, la nombro de Liaj fervoraj adeptoj - ĉio ĉi atestis ke Bahá'u'lláh estis efektive ne malliberulo, sed Reĝo de Reĝoj. Du despotaj registaroj estis kontraŭ Li, du potencaj aŭtokrataj regantoj, tamen, eĉ limigita en iliaj propraj malliberejoj, Li Sin turnis al ili per severegaj esprimoj, kiel reĝo al siaj subuloj. Poste, malgraŭ la severaj ordonoj, Li vivis en Bahjí kiel princo. Ofte Li diris: "Vere, vere, la plej mizera malliberejo aliformiĝis en Edena Paradizo".*

*Certe, tian aferon oni ne vidis de post la kreo de la mondo.*

## La Vivo en Bahjí

Montrinte en la fruaj jaroj de la malfacilaĵoj kiel glori Dion en la stato de malriĉeco kaj malrespekto, Bahá'u'lláh montris en la postaj jaroj en Bahjí kiel glori Dion en honoro kaj bonstato. Oferaĵoj de centmiloj da sindonemaj sekvantoj disponigis al Li grandajn monsumojn kiujn Li estis petita administri. Kvankam Lia vivo en Bahjí estas priskribita kiel vere reĝa, en la plej alta senco de la vorto, oni tamen ne imagu ke ĝi karakterizis sin per materiala brilego aŭ elspezemo. La Benita Perfekteco kaj Lia familio vivis tre simple kaj modeste, kaj elspezoj je egoista lukso estis tute nekonataj en tiu domo. Proksime de Lia domo la kredantoj aranĝis belegan ĝardenon nomitan Ridván, kie Li ofte pasigis multajn sinsekvajn tagojn aŭ eĉ semajnojn, dormante nokte en kabano en la ĝardeno. De tempo al tempo Li iris pli malproksimen. Li vizitis kelkfoje Akreon kaj Hajfan, kaj pli ol unu fojon starigis Sian tendon sur la monto Karmelo, kiel Li antaŭdiris dum Li estis malliberigata en la kazerno en Akreo. Bahá'u'lláh pasigis la tempon plejparte en preĝado kaj meditado, en skribado de la Sanktaj Libro, malkaŝado de Tabuletoj, kaj spirita edukado de la amikoj. Por certigi al Li plenan liberecon en tiu ĉi granda laboro, `Abdu'l-Bahá prenis sur Sin la prizorgadon de ĉiuj aliaj aferoj, eĉ akceptadon de la Mulaoj, poetoj, kaj registaranoj. Ĉiuj estis ravitaj kaj feliĉigitaj per la renkontiĝo kun `Abdu'l-Bahá, kaj plene kontentigitaj per Liaj klarigoj kaj paroloj; kvankam ne vidinte Bahá'u'lláh'n Mem, ili estis inspiritaj per amikaj sentoj al Li, pro la renkontiĝo kun Lia filo, ĉar la spiritstato de `Abdu'l-Bahá ebligis ilin ekkompreni la rangon de Bahá'u'lláh.

La eminenta orientalista, la mortinta prof-o Edward G. Browne, de la Universitato en Kembriĝo, vizitis Bahá'u'lláh'n en Bahjí en 1890, kaj priskribis siajn impresojn jene:

*...mia gvidanto haltis por momento dum mi deprenis miajn ŝuojn. Poste, per rapida manmovo, li sin retiris, kaj, post kiam mi trairis, retiris la kurtenon. Mi troviĝis en granda ĉambro, kie en fora angulo staris malalta sofo, dum ĉe la kontraŭporda flanko estis du aŭ tri seĝoj. Kvankam mi malklare divenis, kien mi iris kaj kiun mi estis vidonta (ĉar oni donis al mi neniam klarajn informojn), unu aŭ du momentoj pasis antaŭ ol, kun korbato de miro kaj timo, mi definitive ekkonsciis ke la ĉambro ne estas senhoma. En la angulo kie la sofo*



*tuŝis la muron sidis mirinda kaj respektinda persono, kronita per pelta kapvesto kian derviŝoj nomas taj (sed de neordinaraj alteco kaj ellaboriteco), ĉirkaŭ kies malsupra parto estis volvita malgranda blanka turbano. La vizaĝon de tiu kiun mi rigardis mi neniam forgesos, kvankam mi ne povas priskribi ĝin. Tiuj penetremaj okuloj ŝajnis legi la animon mem; povo kaj potenco ripozis sur tiu larĝa frunto; dum la profundaj linioj super la brovoj kaj sur la vizaĝo indikis aĝon kiun ŝajnis nei la densenigraj haroj kaj la barbo malsuprenfalanta en neesprimebla riĉeco preskaŭ ĝis la zono. Ne estis necese demandi en kies ĉeesto mi staras, kiam mi klinis min antaŭ tiu kiu estas la objekto de sindonemo kaj amo kiajn reĝoj povus envii kaj imperiestroj sopirus vane!*

*Milda kaj digna voĉo petis min sidiĝi, kaj tiam diris: "Gloro estu al Dio ke vi alvenis! ... Vi venis por vidi malliberulon kaj ekziliton. ... Ni deziras nur bonon de la mondo kaj feliĉon de la nacioj; tamen oni konsideras Nin instiganto de malpaco kaj ribelo inda je mallibereco kaj ekzilo. ... Ke ĉiuj nacioj unuiĝu en kredo kaj ĉiuj homoj fariĝu kiel fratoj; ke plifortiĝu la ligoj de amikeco kaj unueco inter la filoj de la homaro; ke ĉesu la diverseco de la religioj, kaj estu neniigitaj la rasaj diferencoj kia malbono estas en tio ĉi? ... Tamen tiel estos: tiuj senfruktaj konfliktoj, tiuj detruaj militoj pasos for, kaj la 'Plej Sankta Paco' venos. ... Ĉu en Eŭropo vi ne bezonas la samon? Ĉu ĝi ne estas tio kion Kristo antaŭdiris? ... Tamen ni vidas ke viaj reĝoj kaj regantoj preferas malŝpari siajn trezorojn por la rimedoj de detruo de la homa gento ol por tio kio kondukas al la feliĉo de la homaro. ... Tiuj konfliktoj kaj sangoverŝado kaj malpaco devas ĉesi, kaj ĉiuj homoj devas iĝi unu parenco kaj unu familio. ... Homo ne fieru pro tio, ke li amas sian patrujon; li fieru prefere pro tio, ke li amas la homaron."*

*Tiaj, kiom mi rememoras, estas la vortoj kiujn, krom multaj aliaj, mi aŭdis de Behá. La leganto mem bone konsideru ĉu tiaj doktrinoj meritas morton kaj katenojn, kaj ĉu la mondo povas profiti aŭ malprofiti de ilia disvastiĝado". Antaŭparolo al A Traveller's Narrative (Episode of the Báb), p. XXXIX-XL (Rakonto de Vojaĝanto – Epizodo pri Báb)*

## La Morto

Tiele simple kaj serene Bahá'u'lláh pasigadis la vesperon de Sia vivo sur la tero ĝis kiam, post atako de febro, li forlasis la mondon la 29an de majo 1892, je la aĝo de sepdek kvin jaroj. Inter la laste malkaŝitaj de Li Tabuletoj estis Lia Volo kaj Testamento, kiun Li skribis propramane kaj konvene subskribis kaj sigelis. Naŭ tagojn post Lia morto la plej aĝa filo rompita la sigelojn, en la ĉeesto de la familianoj kaj kelkaj amikoj, kaj la enhavo de la mallonga sed multsignifa dokumento iĝis konata. Per tiu ĉi testamento `Abdu'l-Bahá estis difinita reprezentanto de Sia patro kaj klariganto de Liaj instruoj, kaj al la familio kaj parencoj de Bahá'u'lláh kaj al ĉiuj kredantoj estis ordonite turni sin al Li kaj obei Lin. Per tiu ĉi plano sektiĝo kaj divido estis malebligita kaj sekurita estis la unueco de la Kredo.

## La Profeteco de Bahá'u'lláh

Estas grave havi klaran ideon pri la profeteco de Bahá'u'lláh. Liajn vortojn, simile al tiuj de aliaj "Malkaŝantoj", oni povas dividi en du klasoj: en unu Li skribas kaj parolas simple kiel homo ŝarĝita de Dio per misio al Siaj kunhomoj, kaj en la alia Liaj paroloj prezentas sin kiel senperaj vortoj de Dio Mem.

Li skribas en la *Libro Iqán*:

*Ni jam en la antaŭaj paĝoj difinis du rangojn al ĉiuj la Lumoj leviĝantaj el la Tagiĝo de eterna sankteco. Unu estas la rango de esenca unueco, kiun Ni jam klarigis. "Ni faras nenian diferencon inter ili." [Korano 2:137] La alia rango estas tiu de diferenceco, kaj rilatas al la mondo de kreiteco kaj ties limigoj. Tiurilate, ĉiu Malkaŝanto de Dio havas apartan individuecon, definitive indikitan mision, antaŭdestinitan Revelacion, kaj speciale difinitajn limigojn. Ĉiu el ili estas nomita per malsama nomo, karakterizita per speciala kvalito, plenumas difinitivan Mision, kaj estas komisiita per nova Revelacio. Kiel Li ja diras: "Tiujn senditojn Ni plialtigis, kelkajn el ili super aliaj, al iuj el ili Alláh parolis kaj iujn Li plialtigis je l'rango. Kaj Ni donis al Jesuo, filo de Maria, signojn evidentajn kaj plifortigis lin per la spirito de sankteco." [Korano 2: 254] ...*

*Sekve, de la vidpunkto de ilia unueco kaj pura apartiĝeco, la atribuoj de pura Alteco, Dieco, Supera Sincereco, kaj Plej Interna Esenco, estis kaj estas aplikeblaj al tiuj Esencoj de esteco, ĉar ĉiuj el ili okupas la tronon de dia Revelacio kaj dia Kaŝiteco. La Revelacio de Dio estas evidentiga per ilia apero, kaj la Perfekteco de Dio estas malkovrita per ilia belo. Tiel estas ke la vortojn de Dio Mem eldiras tiuj ĉi Malkaŝantoj de la dia Esto.*

*En la dua rango, kiu estas tiu de eminenteco, diferencigo, aparteco, limigadoj kaj de la ĉi-mondaj kondiĉoj kaj ecoj, ili elmontras absolutan servemon, tutan senhavecon kaj plenan humilecon. Kiel Li ja diras: "Mi estas servanto de Dio. Mi estas nur homo kiel vi." ...*

*Se iu el la perfektaj Diosenditoj deklaras: "Mi estas Dio!" tiu ĉi estas vera kaj senduba. Ĉar ripete evidentiĝis ke per ilia Revelacio, iliaj atribuoj kaj nomoj, la Revelacio de Dio, Lia nomo kaj Liaj atribuoj, malkaŝas sin sur la tero. Tiele, Li revelaciis: "Ne vi, sed Allāh mortigis ilin." [Korano 8:18] Kaj ankaŭ Li diris: "Vere tiuj, kiuj juris fidon al vi, nur al Allāh ĵuris fidon." [Korano 48:11] Kaj se iuj el ili dirus: "Mi estas la Diosendito", Li ankaŭ parolas la veron, la senduban veron. Kiel Li diras, "Mahometo ne estas patro al iu ajn el viaj viroj, sed la Sendito de Allāh". Do ĉiuj el ili ja estas Senditoj de tiu ideala Reĝo, tiu neŝanĝebla Esenco. Kaj se ĉiuj el ili proklamas: "Mi estas la Sigelo de la Profetoj", ili ja dirus la veron, preter ia ajn dubo. Ĉar ili estas nur unu persono, unu animo, unu spirito, unu esteco, unu revelacio. Ili ĉiuj estas malkaŝantoj de la "Komenco" kaj de la "Fino", la "Unua" kaj la "Lasta", la "Videbla" kaj la "Kaŝita" – ĉio kio rilatas al Tiu Kiu estas la Plej Interna Spirito de Spiritoj kaj eterna Esenco de Esencoj. Simile se ili dirus: "Ni estas la servantoj de Dio" [Korano 33:41], tio ĉi ankaŭ estas akceptinda kaj evidenta, ĉar ili estas aperintaj kun plej altgrada servemeco, tia servemeco kian neniu kapablas atingi. Do en momentoj kiam tiuj Esencoj de Esto profundigis en la marojn de pratempa kaj eterna sankteco, kaj ŝvebis sur la montpintoj de diaj misteroj, ili pretendis ke ilia deklaro estas la Voĉo de dieco, la Voko de Dio Mem. Se la okuloj de interna sagaco malfermiĝus, evidentiĝus ke en tiu ĉi stato ja ili konsideras sin tute forviŝigintaj kaj neekzistantaj antaŭ Tiu Kiu estas la Ĉionpenetranto, la Nekoruptebla. Estas kvazaŭ ili konsideras sin kiel tutan neniecon, kaj opinias mension pri si en tiu Kortego kiel blasfemon. Ĉar la plej eta flustro pri la memo, en tia Kortego, estas evidentiĝo de sintrudo kaj sendependa ekzisto. Al tiuj kiuj atingis tiun Kortegon, tia sugesto estas mem doloriga peko. Kiom multe pli dolorige estus, se io alia estu menciita en ties Ĉeesto, se la koro de homo, ties lango, ties menso, aŭ ties animo, okupiĝus pri iu krom la Amegato, se ties okuloj rigardus alian vizaĝon krom Lia beleco, se ties orelo aŭskultus al alia melodio krom Lia voĉo, kaj se ties piedoj irus alian vojon krom Lia vojo.*

*Nuntempe la venteto de Dio blovetas, kaj Lia Spirito ĉion penetras. Tia estas la elverŝado de Lia graco ke la plumo silentas kaj la lango mutas.*

*Per tiu rango, ili pretendas al si la Voĉon de Dieco kaj tiel plu, kaj per sia rango de Senditeco, ili deklaris sin Diosenditoj. Ĉiam ili eldiris tion kio konformus al la bezonoj de la tempo, kaj atribuis ĉiujn tiujn deklarojn al Si, deklaroj kiuj viciĝas de la regno de dia Revelacio ĝis la regno de Kreiteco, kaj de la kampo de Dieco ĝis la kampo de surtera ekzistado. Tial kion ajn ili diras kaj atribuas al si, ne esceptante Diecon, Eternecon, Profetecon, Senditecon, Gardantecon, Apostolecon aŭ Servemecon, estas vera kaj senduba. Sekve, tiuj paroloj kiujn Ni citis por subteni Nian diskuton devas esti atente konsiderataj, por ke la diversaj eldiroj de la Malkaŝantoj de la Nevidato kaj de la Lumoj de Sankteco ĉesu maltrankviliĝi la animojn kaj perpleksi la mensojn. – Kitāb-i-Īqān, p. 176-181*

Kiam Bahā'u'llāh parolas kiel homo, la rango kiun Li atribuas al Si estas tiu de absoluta humileco, de "neniigo en Dio". Tio kio distingas Diosenditon, en Sia homa personeco, disde aliaj homoj estas la pleneco de Sia sindonemo kiel ankaŭ la perfekteco de Siaj povoj. En ĉiuj kondiĉoj Li povas diri, kiel Jesuo en la Getsemana Ĝardeno: "tamen ne la mia, sed via volo fariĝu". Tiel en Sia epistolo al la ŝaho, Bahā'u'llāh diras:

*Ho reĝo! Mi estis homo simila al aliaj, dormanta sur mia kuŝloko, kiam jen, la ventetoj de la Plej Glora pasis super Mi, kaj instruis al Mi la scion pri ĉio kio estas. Tio ĉi ne estas de Mi, sed de Tiu Kiu estas Potenca kaj Ĉionscia. Kaj Li ordonis al Mi proklamadi inter la tero kaj la ĉielo, kaj pro tio ĉi okazis al Mi tio kio plenigas per larmoj la okulojn de ĉiuj prudentuloj. La sciencojn kiujn homoj posedas mi ne studis, nek Mi eniris iliajn lernejojn. ... Mi estas nur folio kiun ekmovis la ventetoj de la Volo de via Eternulo, la Ĉionpotenca, la Laŭdegata. Ĉu Mi povas resti senmova kiam ŝtormaj ventegoj blivas? Ne, je la Eternulo de ĉiuj Nomoj kaj Atribuoj! Ili puŝas Min laŭinkline. La forpasema similas al nenio antaŭ la Eternulo. Lia decidiga ordono venis, igis Min paroli je Lia Gloro meze de ĉiuj popoloj. Vere Mi estis nur kiel senvivulo kiam venis Lia ordono. La mano de via Eternulo, la Favana, la Kompatema, alligis Min. Ĉu iu povas paroli propranome tion por kio ĉiuj homoj, kaj altaj kaj malaltaj, persekutos lin? Ne, per Tiu Kiu instruis al la plumo la eternajn misterojn, krom tiu kiu estas fortigita de la Ĉiopova kaj Potenca. – Lawh-i-Sultān (Tablet to the King of Persia), as quoted in The Promised Day is Come, pp. 40-41. (Tabuleto al la Reĝo de Persujo, citita en La Promesita Tago Jam Venis).*

Kiel Jesuo lavis la piedojn de Siaj disĉiploj, ankaŭ Bahā'u'llāh kelkfoje kuiris manĝaĵon kaj plenumis aliajn humilajn servojn por Siaj sekvantoj. Li estis servanto de la servantoj, kaj fieris nur per servemeco, kontenta dormante sur nuda planko se estis necese, kaj nutrante Sin per pano kaj akvo, aŭ eĉ, kelkfoje, per tio kion Li nomis "la dia nutraĵo, t.e., malsato!" Lia perfekta humileco estis videbla en Lia profunda respekto al naturo, al homa karaktero, kaj speciale al sanktuloj, profetoj kaj martiroj. Laŭ Li, ĉiuj aferoj, de la plej malgrandaj ĝis la plej grandaj, parolis al Li pri Dio.

Lia homa personeco estis elektita de Dio por iĝi la Diaj Buŝo kaj Plumo. Ne pro Sia propra volo Li akceptis tiun rolon senkompare malfacilan kaj zorgoplenan. Kiel Jesuo diris: "Patro, se povas esti, tiu ĉi pokalo pasu for de mi", ankaŭ Bahá'u'lhih diris: "Se troviĝus alia instruanto aŭ parolanto, Mi ne farus Min celo de mallaŭdoj, moko kaj kalumnioj flanke de la homoj". (*Tabuleto Ishráqát*). Sed la Dia voko estis klara kaj deviga kaj Li obeis. La volo de Dio iĝis Lia volo, kaj la deziro de Dio Lia deziro; kaj kun "radianta akceptemo" Li deklaris: "Vere Mi diras: Kio okazas sur la vojo de Dio estas amata de la animo kaj kordeziro. Mortiga veneno sur Lia vojo estas pura mielo, kaj ĉiu turmento malvarmeta kaj refreŝiga akvo". – Epistle to the Son of the Wolf, p. 17. (Epistolo al Filo de Lupo).

En aliaj okazoj, kiel ni menciis, Bahá'u'lláh parolas "el la rango de Dieco". En tiuj ĉi vortoj Lia homa personeco estas tiel komplete subigita ke ĝi tute perdiĝas de la vido. Per Li Dio parolas al Sijaj kreaĵoj, proklamante Sian amon al ili, instruante al ili Sijajn atribuojn, konigante Sian volon, anoncante Sijajn leĝojn por ilia gvidado kaj petante iliajn amon, fidelecon kaj servadon.

En la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh, la vortoj ofte ŝanĝas sian karakteron de unu al la alia. Kelkfoje estas evidente homo kiu parolas, kaj tuj poste sen ia rompo la skribaĵo daŭrigas kvazaŭ Dio parolas en la unua persono. Eĉ parolante kiel homo, Bahá'u'lláh parolas tamen kiel sendito de Dio, kiel vivanta ekzemplo de plena sindonemo al la volo de Dio. Lia tuta vivo estas instigita de la Sankta Spirito. Pro tio nenia nefleksebla linio povas esti distingita inter la homa kaj dia elementoj en Liaj vivo kaj instruado. Dio diras al Li:

*Diru: "Nenio estas videbla en mia templo krom la Templo de Dio, kaj en mia belo krom Lia Belo, kaj en mia esteco krom Lia Esteco, kaj en mi mem krom Li Mem, kaj en miaj movoj krom Liaj Movoj, kaj en mia akceptemo krom Lia Akceptemo, kaj en mia plumo krom la Plumo de Li, la Karega, la Laŭdegata."*

*Diru: "Nenio estis en mia animo krom la Vero, kaj en mi mem nenio estis videbla krom Dio." – Súratu'l-Haykal.*

## Lia Misio

La misio de Bahá'u'lláh en la mondo estas estigi Unuecon la Unuecon de la tuta homaro en Dio kaj per Dio. Li diras: "La Plej Glora frukto de la Arbo de Scio estas la jena glorinda vorto: De unu Arbo vi ĉiuj estas fruktoj kaj folioj de unu Branĉo. Homo ne fieru pro tio ke li amas sian patrolandon, sed li fieru pro tio ke li amas la homaron."

La antaŭaj Profetoj heroldis epokon de paco sur la tero, bonvolo inter la homoj, kaj fordonis siajn vivojn por akceli ĝian venon, sed ĉiu el Ili klare deklaris ke tiu benita tempo estos atingita nur post la "Veno de la Sinjoro" en la lastaj tagoj, kiam la maljustuloj estos juĝitaj kaj la justuloj rekompencitaj.

Zoroastro antaŭdiris tri mil jarojn de malpacoj antaŭ la alveno de Ŝaho Bahrám, la mondsavonto, Kiu venkos Arimanon la spiriton de malbono, kaj fondos la regnon de justeco kaj paco.

Moseo antaŭdiris longan periodon de ekzilo, persekutado kaj premado por la Izraelidoj, antaŭ ol aperos la Sinjoro de Homamasoj por kunigi ilin el ĉiuj nacioj, neniigi la persekutantojn kaj fondi Sian Regnon sur la tero.

Kristo diris: "Ne supozu, ke mi venis, por enkonduki pacon sur la teron; mi venis, por enkonduki ne pacon, sed glavon." (Mat. X, 34). Kaj Li antaŭdiris periodon de militoj kaj famoj pri militoj, de suferegoj kaj malĝojoj kiuj daŭros ĝis la Filo de Homo venos "en la gloro de la Patro".

Mahometo deklaris ke, pro iliaj malbonfaroj, Alláh starigis malamikecon kaj malamon inter kaj la judoj kaj la kristanoj kiuj daŭros ĝis la Tago de Reviviĝo, kiam Li aperos por juĝi ĉiujn.

Bahá'u'lláh, aliflanke, anoncas ke Li estas Tiu Kiun promesis ĉiuj Profetoj - la Malkaŝanto de Dio en Kies epoko estos efektive fondita la regno de paco. Tiu ĉi deklaro estas senprecedenta kaj unika, tamen ĝi mirinde harmonias kun la signoj de la tempo, kaj kun la profetaĵoj de ĉiuj grandaj Profetoj. Bahá'u'lláh malkaŝis kun senkompara klareco kaj komprenebleco la rimedojn por starigi pacon kaj unuecon inter la homaro.

Vere estas ke, post la apero de Bahá'u'lláh, ĝis nun okazis milito kaj detruo de senekzempla grandeco, sed ĝi estas ĝuste tio kio laŭ ĉiuj profetoj devos okazi je la tagiĝo de la "granda kaj terura Tago de la Sinjoro", kaj, tiel, ĝi estas nur konfirmo de la certeco ke la "Veno de la Sinjoro" estas ne nur proksima, sed jam plenumita fakto. Laŭ la parabolo de Kristo, la Sinjoro de la Vinberejo devas senkomplete ekstermi la malnoblajn vinberistojn antaŭ ol doni la Vinberejon al aliaj kiuj havigus al Li la fruktojn en la ĝusta tempo. Ĉu tio ne signifas ke je la alveno de la Sinjoro terura detruo atendas tiujn despotajn registarojn, avarajn kaj netoleremajn pastrojn, mulaojn aŭ tiranajn gvidantojn kiuj dum jarcentoj, simile al la malhonestaj vinberistoj, malbonregis la teron kaj malrajte prenadis ĝiajn fruktojn?

Teruraj aferoj kaj senkomparaj sortobatoj povas okazi sur la tero dum kelka tempo, sed Bahá'u'lláh certigas nin ke baldaŭ, "tiuj ĉi senfruktaj konfliktoj, tiuj ĉi detruaj militoj pasos for, kaj la 'Plej Sankta Paco' venos". Milito kaj malpaco fariĝis tiel neelporteblaj en siaj detruaj rezultoj ke la homaro devas trovi savrimedon kontraŭ ili aŭ pereji.

"La pleneco de la tempo" venis kaj kun ĝi la Promesita Savanto!

### Liaj Skribaĵoj

La Skribaĵoj de Bahá'u'lláh estas treege ampleksaj en sia multobjektecio; ili pritraktas ĉian fazon de homa vivo, individua kaj socia, aferojn materialajn kaj aferojn spiritajn, interpretadon de antikvaj kaj modernaj sanktaj skribaĵoj, kaj entenas profetajn antaŭdirojn pri estonteco proksima kaj malproksima.

La amplekso kaj ĝusteco de Lia scio estas mirinda. Li kapablis citi kaj klarigi Sanktajn Skribaĵojn de diversaj religioj konatajn de Liaj korespondantoj kaj demandantoj, en konvinka kaj aŭtoritata maniero, kvankam laŭscie Li neniam havis eblon konatiĝi kun multaj el la koncernaj libroj. Li deklaras, en la Epistolo al Filo de Lupo, ke Li neniam legis la Bayánon, kvankam en Siaj propraj Skribaĵoj Li elmontris plej perfektajn konon kaj komprenon de la Baba Revelacio. (Báb, kiel ni vidis, deklaris, ke Lia Revelacio, la Bayán, estas inspirita kaj devenis de "Tiu, Kiun Dio malkaŝos!") Esceptante sole la vizitojn de profesoro Edward Granville Browne, kun kiu Li havis en 1890 kvar intervjuojn, ĉiun daŭrantan de dudek ĝis tridek minutoj, Li neniam havis okazon interparoli kun kleraj Okcidentaj pensuloj, tamen Liaj Verkoj elmontras mirindan komprenon de la sociaj, politikaj kaj religiaj problemoj de la Okcidento, kaj eĉ Liaj malamikoj devis konfesi ke Liaj saĝo kaj scio estis senkomparaj. La konataj kondiĉoj de Lia longa mallibereco esceptas ĉian dubon ke multa scio elmontrita en Liaj Verkoj devis esti akirita el ia spirita fonto, tute sendependa de la ordinara maniero de studado kaj lernado kaj de libroj aŭ instruistoj.<sup>1</sup>

Kelkfoje Li skribis en la moderna persa lingvo, la ĉiutaga lingvo de Siaj samlandanoj, kiu estas grandparte miksitaj kun la araba. Aliffoje, turnante Sin al kleraj zoroastranoj, Li skribis en la plej klasika persa lingvo. Li ankaŭ skribis kun sama flueco arabe, foje en la plej simpla lingvo, foje per klasika stilo iom simila al tiu de la Korano. Lia perfekta kono de tiuj diversaj lingvoj kaj stiloj estis rimarkinda pro kompleta manko de literatura edukado.

En kelkaj el Liaj Verkoj la vojo de sankteco estus difinita per tiel simplaj esprimoj ke "irante sur tiu vojo, eĉ malsaĝuloj ne eraros" (Jesaja XXXV, 8). En la aliaj estas multe da poezia figuro, profunda filozofio kaj aludoj al la islamaj, zoroastranaj kaj aliaj sanktaj libroj, aŭ al la persaj kaj arabaj literaturo kaj legendoj, kiajn ĝuste taksas nur poeto, filozofo aŭ klerulo. Ankoraŭ aliaj koncernas la progresintajn stadiojn de la spirita vivo kaj povas esti komprenitaj nur de tiuj kiuj jam trapasis la komencajn stadiojn. Lia Verkaro similas malavaran tablon provizitan per manĝaĵoj kaj bongustaĵoj kiuj konvenas al la bezonoj kaj gustoj de ĉiuj, kiuj estas sinceraj verserĉantoj.

Tio estas la kialo ke Lia Kredo havis efikon inter kleruloj kaj edukituloj, spiritaj poetoj kaj famaj verkistoj. Eĉ kelkaj inter la gvidantoj de la sufanoj kaj de la aliaj sektoj, kaj kelkaj ministroj kiuj mem estis verkistoj, estis ĉarmitaj per Liaj vortoj, ĉar ili superis kreaĵojn de ĉiuj aliaj verkistoj per la dolĉeco kaj per la profundeco de spirita signifo.

### La Bahaa Spirito

El Sia malliberejo en la malproksima Akreo, Bahá'u'lláh ĝisfunde stimulis Sian patrolandon Persujon; kaj ne nur Persujon; Li stimulis kaj daŭre stimulas la tutan mondon. La spirito kiu inspiris Lin kaj Liajn sekvantojn estis senŝanĝe milda, afabla kaj pacienca, tamen ĝi estis potenco de mirinda vivoforto kaj superhoma povo. Ĝi elfaris ŝajnajn neblaĵojn. Ĝi ŝanĝis homajn karakterojn. Homoj kiuj subiĝis al ĝia influo iĝis novaj kreaĵoj. Ili pleniĝis per amo, kredo, entuziasmo, kompare kun kiuj teraj ĝojoj kaj malĝojoj estis kvazaŭ polvo. Ili estis pretaj akcepti tutvivan suferadon aŭ subitan morton kun perfekta egalanimeco, eĉ kun radiantaj ĝojoj, fortaj per la sentima sinkonfido al Dio.

Plej mirinde el ĉio estas, ke iliaj koroj tiom superpleniĝis per la ĝojo de la nova vivo ke restis en ili nenia loko por pensoj de malbonsento aŭ venĝemo kontraŭ la persekutantoj. Ili tute forlasis la uzadon de forto en la sindefendo, kaj anstataŭ priplori sian sorton, ili konsideris sin la plej feliĉaj el homoj pro la privilegio ricevi tiun novan kaj grandiozan Revelacion kaj fordoni siajn vivojn aŭ verŝi sian sangon ateste al ĝia vero. Iliaj koroj ja kantis pro ĝojo, ĉar ili kredis ke Dio, la Plejalta, la Eterna, la Amegata, parolis al ili per la homa buŝo, alvokis ilin por esti Liaj servantoj kaj amikoj, venis fondi Sian Regnon sur la tero, kaj alporti la netakseblan benon de Paco al la mondo, laca de militoj, elĉerpita de malpaco.

Tia estis la kredo inspirita de Bahá'u'lláh. Li proklamis Sian propran mision, kiel tion antaŭdiris Báb, kaj, dank'al la sindonema laborado de Lia granda Antaŭinto, miloj jam estis pretaj akلامي Lian Alvenon miloj kiuj forĵetis superstiĉojn kaj antaŭjuĝojn,

<sup>1</sup> Al la demando ĉu Bahá'u'lláh studis speciale la Okcidentajn verkojn kaj konforme al ili bazis Siajn instruojn 'Abdu'l-Bahá diris ke la libroj de Bahá'u'lláh skribitaj kaj presigitaj jam en la 1870<sup>a</sup> jardeko, enhavas la idealojn nun tiel bone konatajn en la Okcidento, kvankam tiutempe oni neniam presis nek pensis pri tiuj ĉi ideoj en la Okcidento.

kaj atendis kun puraj koroj kaj malfermitaj mensoj la Revelacion de la Promesita Gloro de Dio. Malriĉeco kaj katenoj, malbonegaj kondiĉoj kaj eksteraj malhonoroj ne povis kaŝi de ili la Spiritan Gloron de la Eternulo ja, tiuj ĉi mallumaj teraj cirkonstancoj servis nur por pliglorigi la radilumon de Lia efektiva Brilego.

## ĈAPITRO IV: `ABDU'L-BAHÁ: LA SERVANTO DE BAHÁ

*Kiam la oceano de Mia ĉeesto estos forfluinta kaj la Libro de Mia Revelacio finita, turnu tian vizaĝon al Tiu Kiun Dio destinis, Kiu elkreskis el tiu ĉi Pratempa Radiko. – Bahá'u'lláh, Kitáb-i-Aqdas*

### Naskiĝo kaj Infaneco

`Abbás Effendi, Kiu poste alprenis la titolon `Abdu'l-Bahá (t.e. Servanto de Bahá), estis la plej aĝa filo de Bahá'u'lláh. Li naskiĝis en Teherano mallonge antaŭ la noktomezo la 23an de majo 1844,<sup>1</sup> en tiu sama nokto en kiu Báb deklaris Sian mision.

Li estis naŭjara kiam Lia patro, Kiun Li jam tiam fervore amis, estis lokita en malliberejo en Teherano. Popolaĉo rabis ilian domon, kaj la familio estis senigita de siaj posedaĵoj kaj lasita en mizero. 'Abdu'l-Bahá rakontas kiel Li unufoje ricevis permeson eniri la malliberejan korton por vidi Sian amatan patron dum Lia ĉiutaga promeno. Bahá'u'lláh estis terure ŝanĝita, tiel malsana ke Li apenaŭ povis ekpaŝi; Liaj haroj kaj barbo estis nekombitaj, Lia kolo frotvundita kaj ŝvelinta pro la premo de peza ŝtala kolumo. Lia korpo estis klinita pro ŝarĝo de la katenoj, kaj tiu ĉi vidaĵo faris neforgeseblan impreson je la menso de la sentema knabo.

Dum la unua jaro de ilia restado en Bagdado, dek jarojn antaŭ kiam Bahá'u'lláh publike deklaris Sian Mision, la penetrema intuicio de `Abdu'l-Bahá, kiu tiam havis nur naŭ jarojn, ebligis al li fari la grandegan malkovron ke Lia patro estas vere la Promesito Kies Aperon atendis ĉiuj babanoj. Pli malpli sesdek jarojn poste Li tiel priskribis la momenton en kiu tiu ĉi konvinko ekposedis Lian tutan estaĵon:

*Mi estas servanto de la Benita Perfekteco. En Bagdado mi estis infano. Tie Li anoncis al mi la Vorton, kaj mi ekkredis al Li. En la momento kiam Li anoncis al mi la Vorton, mi ĵetis min al Liaj Sanktaj Piedoj kaj petis kaj petegis ke Li akceptu mian sangon kiel oferon sur Lia Vojo. Ofero! Kiel dolĉa estas al mi tiu ĉi vorto! Ne ekzistas por mi pli granda Favoro ol tio ĉi! Kian pli grandan gloron povas mi imagi ol vidi mian kolon katenitan por Li, miajn piedojn ĉenligitajn pro amo al Li, mian korpon kripligitan aŭ ĵetitajn en maran profundajon pro Lia Kredo! Se ni efektive estas Liaj sinceraj amantoj - se efektive mi estas Lia sincera servanto, mi devas ja oferdoni mian vivon, kaj ĉion ĉe Lia Benita Sojlo. – Diary of Mírzá Aḥmad Sohrab, januaro 1914. (Taglibro de Mírzá Aḥmad Sohrab)*

En tiu ĉi tempo Liaj amikoj komencis nomi Lin "La Mistero de Dio". Sub tiu ĉi titolo donita al Li de Bahá'u'lláh, Li estis ĝenerale konata dum la periodo de la restado en Bagdado.

Kiam Lia patro foriris en la sovaĝejon dum du jaroj, la koro de `Abbás estis preskaŭ rompita. Lia ĉefa konsolo estis transskribado kaj parkera lernado de la Tabuletoj de Báb, kaj multe da tempo Li pasigis en soleca meditado. Kiam la patro fine revenis, la ĝojo de la knabo estis ekstermezura.

### La Juneco

De tiu ĉi tempo, Li fariĝis plej intima kunulo de Sia patro, kaj eĉ Lia defendanto. Kvankam Li estis nur junulo, Li jam montris mirindajn saĝecon kaj juĝokapablon, kaj prenis sur Sin la taskon intervui ĉiujn multnombrajn vizitantojn kiuj venis por vidi Lian patron. Se Li trovis ke ili estas sinceraj verserĉantoj, Li lasis ilin ĉeesti ĉe Sia patro, sed alie Li ne permesis al ili ĝeni Bahá'u'lláh'n. En multaj okazoj Li helpis al Sia patro respondi demandojn aŭ solvi malfacilaĵojn de tiuj ĉi vizitantoj. Ekzemple, kiam unu el la sufan-gvidantoj, nomata `Alí Shawkat Paŝao, demandis pri klarigo de la frazo: "Mi estis Kaŝita Mistero", kiu troviĝas en bone konata islama tradicio,<sup>2</sup> Bahá'u'lláh turnis Sin al la "Mistero de Dio", `Abbás, petanta Lin skribi la klarigon. La knabo, kiu havis tiam la aĝon de dekkvin aŭ dek ses jaroj, tuj skribis gravan epistolon prezentanta klarigon tiel brilan ke Li mirigis la paŝaon. Tiu ĉi epistolo estas nun vaste diskonigita inter la bahaanoj, kaj estas bone konata al multaj ekster la bahaa kredo.

En tiu ĉi tempo `Abbás ofte vizitis moskeojn, kie Li diskutis teologiajn temojn kun doktoroj kaj kleruloj. Li neniam vizitis ian lernejon aŭ kolecion - Lia sola instruisto estis la patro. Lia plej ŝatata distraĵo estis rajdado, en kiu Li trovis multe da plezuro.

<sup>1</sup> Jaŭde, la 5-an de Jamádi I, 1260 p. H.

<sup>2</sup> La tradicio estas citita en Tabuleto de Bahá'u'lláh; vidu ĉapitron V en tiu ĉi libro.

Post la Deklaracio de Bahá'u'lláh en la Ĝardeno ekster Bagdado, la sindonemo de `Abdu'l-Bahá al la patro fariĝis pli granda ol antaŭe. Dum la longa vojaĝo al Konstantinopolo Li gardis Bahá'u'lláh'n tage kaj nokte, rajdante apud Lia veturilo kaj viglante apud Lia tendo. Kiom eble plej multe Li liberigis Sian patron de ĉiuj domaj zorgoj kaj respondecoj, fariĝante subtenanto kaj esperdonanto de la tuta familio.

Dum la jaroj pasigitaj en Adrianopolo, `Abdu'l-Bahá gajnis amon de ĉiuj. Li multe instruis, kaj fariĝis ĝenerale konata kiel la "Majstro". En Akreo, kiam preskaŭ la tuta anaro estis malsana je tifo, malario, kaj disenterio, Li lavis la pacientojn, flegis ilin, nutris ilin, maldormis apud ili, sen ripozo, ĝis fine, ekstreme elĉerpita, malsaniĝis Mem je disenterio, kaj dum preskaŭ monato estis danĝere malsana. En Akreo, same kiel en Adrianopolo, Li estis amata kaj respektata de ĉiuj klasoj, de la ĉefreganto ĝis plej mizeraj almozuloj.

## La Edziĝo

La sekvantajn detalojn rilate la edziĝon de `Abdu'l-Bahá afable donis al la aŭtoro persa historiisto de la Bahaa Kredo:

*Dum la juneco de `Abdu'l-Bahá la problemo de Lia taŭga edziĝo estis kompreneble treege interesa demando por la kredantoj, kaj venis multaj personoj, kiuj deziris ricevi por sia familio tiun ĉi kronon de gloro. Tamen, dum longa tempo `Abdu'l-Bahá elmontris nenian inklinon al edziĝo, kaj neniu komprenis la saĝon de tio ĉi. Poste oni eksciis ke estas knabino destinita iĝi edzino de `Abdu'l-Bahá, knabino kiu naskiĝis dank'al la Beno kiun Báb donis al ŝiaj gepatroj en Isfahano. Sia patro estis Mirzá Muhammad `Alí, onklo de la "Reĝo de Martiroj" kaj la "Amato de Martiroj", kaj ŝi apartenis al unu el la grandaj kaj altaj familioj en Isfahano. Kiam Báb estis en Isfahano, Mirzá Muhammad `Alí estis seninfana, sed lia edzino sopiris havi infanon. Aŭdinte tion ĉi, Báb donis al li porcion de Sia manĝaĵo dirante ke li dividu ĝin kun sia edzino. Post kiam ili manĝis tiun manĝon, baldaŭ evidentiĝis ke iliaj delongaj deziroj de gepatreco plenumiĝos, kaj en la ĝusta tempo naskiĝis al ili filino, al kiu estis donita la nomo "Munírih Khánum."<sup>1</sup> Pli poste naskiĝis al ili filo, al kiu ili donis la nomon Sejjed Yahyá, kaj poste ankoraŭ ili havis kelkajn aliajn infanojn. Post iom da tempo la patro de Munírih mortis, ŝiaj kuzoj estis martirigitaj de Zillu's-Sultán kaj mulaoj, kaj la tuta familio troviĝis en grandaj zorgoj kaj estis severe persekutita pro sia aparteno al la Bahaa Kredo. Bahá'u'lláh tiam permesis al Munírih kaj al ŝia frato veni en Akreon por tie serĉi defendon. Bahá'u'lláh kaj Lia edzino, Navváb, la patrino de `Abdu'l-Bahá, elmontris al Munírih tiom da afableco kaj favoro ke aliaj komprenis, ke ili deziras al ŝi edziĝi kun `Abdu'l-Bahá. La deziro de la gepatroj fariĝis ankaŭ la deziro de `Abdu'l-Bahá. Li sentis al Munírih varman amon kaj simpatian kiuj estis plene reciprokaj, kaj baldaŭ ili unuiĝis per edziĝo.*

Tiu ĉi edziĝo montriĝis eksterordinare feliĉa kaj harmonia. El la infanoj naskiĝintaj al ili kvar filinoj postvivis la rigoron de la longa mallibereco, kaj, per siaj belegaj, servoplenaj vivoj, gajnis amon de ĉiuj kiuj havis la privilegion koni ilin.

## La Centro de la Sankta Interligo

Bahá'u'lláh multmaniere indikis ke `Abdu'l-Bahá estu Lia sekvanto. Multajn jarojn antaŭ Sia morto Li deklaris tion ĉi en vualita maniero en la Kitáb-i-Aqdas. Multfoje Li parolis pri `Abdu'l-Bahá kiel "La Centro de Mia Interligo", "La Plej Sankta Branĉo", "La Branĉo el la Pratempa Radiko". Li kutime parolis pri Li kiel "La Majstro" kaj postulis de la tuta familio trakti Lin kun speciala distingo. En Sia Volo kaj Testamento Li lasis klarajn instrukciojn ke ĉiuj devas turni sin al Li kaj obei Lin.

Post la morto de la "Benita Belo" (kiel Bahá'u'lláh estis nomata de Siaj familio kaj amikoj), `Abdu'l-Bahá ekokupis la postenon kiun la patro klare destinis por Li, la postenon de la estro de la Kredo kaj aŭtoritata Klariganto de la instruoj, sed tio ĉi malplaĉis al kelkaj el Liaj parencoj kaj aliaj, kiuj ekkontraŭstaris Lin tiel malamike kiel Subh-i-Azal kontraŭstaris al Bahá'u'lláh. Ili penis semi malkonkordon inter la kredantoj, kaj, malsukcesinte pri tio, komencis fari kontraŭ `Abdu'l-Bahá diversajn falsajn akuzojn antaŭ la turka registaro.

Konforme al la instrukcioj ricevita de la patro, `Abdu'l-Bahá estis konstruanta sur la deklivo de la Monto Karmelo, apud Hajfa, konstruaĵon, kun la celo esti konstanta ripozejo por la kadavro de Báb, kaj enhavi plurajn ĉambrojn por kunvenoj kaj diservoj. Oni kredigis al la registaro ke tiu ĉi konstruaĵo estis celita kiel fortikaĵo, kaj ke `Abdu'l-Bahá kun Siaj sekvantoj intencis enranĉeigi tie, por kontraŭstari la registaron, kaj peni ekposedi la najbaran regionon de Sirio.

<sup>1</sup> Interese estas kompari tiun ĉi historion kun tiu pri la naskiĝo de Johano la Baptisto; vidu la Evangelion de Sankta Luko, ĉapitro I.

## Ripetigo de la Rigoraĵoj

Sekve de tiu ĉi kaj aliaj same senbazaj akuzoj, en la jaro 1901, `Abdu'l-Bahá kaj Lia familio, kiuj dum pli ol dudek jaroj havis liberan movrajton en la distanco de kelkaj mejloj ĉirkaŭ Akreo, estis denove, por pli ol sep jaroj, rigore enfermigitaj inter la muroj de la mallibereja urbo. Tio ĉi, tamen, ne malhelpis al Li efike disvastigadi la bahaan revelacion tra Azio, Eŭropo kaj Ameriko. S-ro Horace Holley skribas pri tiu periodo jene:

*Al `Abdu'l-Bahá, kiel al instruisto kaj amiko, venis viroj kaj virinoj de ĉiuj rasoj, religioj kaj nacioj, por sidi ĉe lia tablo kiel bonvenaj gastoj, ĉiu demandanta lin pri la sociala, spirita aŭ morala programo kiun ĉiu plej multe tenis ĉe la koro. Post resto kiu daŭris de kelkaj horoj ĝis kelkaj monatoj, ĉiu revenis hejmen inspirita, refreŝigita kaj lumigita. Certe neniam la mondo posedis tian gastodomon kiel tiu ĉi.*

*Inter ĝiaj muroj foriĝis la rigidaj kasto de Hindujo, la rasaj antaŭjuĝoj de judoj, kristanoj kaj islamanoj malaperis el la memoro, kaj ĉiaj konven-reguloj krom la esenca leĝo de varmaj koroj kaj aspirantaj mensoj rompiĝis, forpelataj kaj neniigataj per la unuiganta simpatio de la dommastro. Estis simile al reĝo Arturo kaj lia Ronda Tablo ... sed Arturo kiu kavaliro same virinojn kiel virojn, kaj sendis ilin for en la mondon ne kun la glavo sed kun la Vorto." – The Modern Social Religion, Horace Holley, p. 171 . (La Moderna Socia Religio)*

Dum tiuj ĉi jaroj `Abdu'l-Bahá faris grandegan korespondlaboron al demandantoj kaj kredantoj el ĉiuj partoj de la mondo. En tiu ĉi laboro multe helpis Lin Liaj filinoj kaj kelkaj interpretistoj kaj sekretarioj.

Multe da tempo Li oferis por viziti malsanulojn kaj malfeliĉulojn en iliaj hejmoj, kaj en la plej malriĉaj kvartaloj de Akreo neniu gasto estis pli bonvenigita ol la "Majstro". Pilgrimulo kiu tiutempe vizitis Akreon skribas:

*Estas la kutimo de `Abdu'l-Bahá ĉiusemajne, vendredon matene, disdoni almozon al malriĉuloj. El sia propra nesufiĉa havaĵo Li donas iomete al ĉiu bezonanto kiu venas por peti helpon. Hodiaŭ matene atendis en vico ĉirkaŭ cent homoj, sidantaj kaj kaŭrantaj sur la tero en la korta strato kie staras la domo de `Abdu'l-Bahá. Kia nepriskribebbla kolekto da homoj ili estis. Ĉiuj specoj de viroj, virinoj kaj infanoj - malriĉaj, mizeraj, kun senesperaj vizaĝoj, duonvestitaj, inter ili multaj kripluloj kaj blinduloj, veraj almozuloj, neesprimeble kompatindaj - sopire atentantaj, ĝis aperis el la pordo `Abdu'l-Bahá ... Li rapide paŝas de unu al la alia, haltas kelkafoje por flustri vorton de simpatio kaj kuraĝigo, por lasi malgrandan moneron en ĉiu avide atendita mano, por tuŝeti vizaĝon de infano, por premi manon de maljuna virino kiu ekkaptis la borderon de Lia vesto dum Li preterpaŝas, por diri lumajn vortojn al blindaj maljunuloj, por demandi pri tiuj kiuj estas tro malfortaj kaj tro premitaj por veni por sia modesta helpodono, kaj por sendi al ili ilian porcion kun vortoj de amo kaj inspiro. – Glimpses of `Abdu'l-Bahá, M.J.M., p. 13. (Ekvidoj de `Abdu'l-Bahá)*

La personaj bezonoj de `Abdu'l-Bahá estis malgrandaj. Li laboradis frue kaj malfrue. Du simplaj manĝoj tage sufiĉis al Li. Lia vestaro konsistis el kelkaj vestoj el malmultkosta ŝtofo. Li ne povus vivi en lukso dum aliaj suferis malriĉecon.

Li treege amis infanojn, florojn, kaj belaĵojn de la naturo. Ĉiumatene ĉirkaŭ la sesa aŭ sepa, la familio kunvenis por kune matenmanĝi, kaj dum la Majstro trinketis Sian teon, junaj infanoj el la domanaro kantis preĝojn. S-ro Thornton Chase skribas pri tiuj infanoj: "Neniam mi vidis tiajn infanojn tiel afablajn, neegoistajn, konsideremajn por aliaj, nesintrudemajn, inteligentajn kaj rapide sindetenajn de la malgrandaj aferoj kiujn infanoj amas." – *In Galilee*, p. 51. (En Galileo)

La "flora regno" estis trajto de la vivo en Akreo, el kiu ĉiu pilgrimo forportis kun si aromajn memoraĵojn. S-ino Lucas skribas: "Kiam la Majstro enspiras la aromon de floroj, mirinde estas lin rigardi. Ŝajnas ke la bonodoro de hiacintoj rakontas al li ion, kiam li kaŝas la vizaĝon en la floroj. Estas koncentrita atento, simile al la peno de orelo por ekaŭdi belan harmonion!" – *A Brief Account of My Visit to `Akká*, pp. 25-2.6. (Mallonga Historio pri Mia Vizito en Akreo)

Li ŝategis donaci belajn kaj dolĉaromajn florojn al Siaj multaj vizitantoj.

S-ro Thornton Chase resumas siajn impresojn pri la mallibereja vivo en Akreo jene:

*Dum kvin tagoj ni restis inter tiuj muroj, malliberuloj kune kun Tiu, Kiu loĝas en la "Plej Sankta Malliberejo". Ĝi estas malliberejo de paco, de amo kaj de servado. Tie estas nenia volo, nenia deziro krom la deziro de bono de la homaro, de paco de la mondo, de konfeso de patreco de Dio kaj reciprokaj rajtoj de homoj kiel Liaj kreaĵoj, Liaj infanoj. Vere, la efektiva malliberejo, la sufokanta atmosfero, la apartigo de ĉiuj sinceraj kordeziroj, la ligoj de la mondumaj kondiĉoj, estas ekster tiuj ŝtonaj muregoj, dum interne de ili estas la libereco kaj la pura atmosfero de la Spirito de Dio. Ĉiuj zorgoj, tumultoj, ĉagrenoj aŭ mondaj deziroj estas forigitaj de tie." – En Gallileo, p. 24*

Al plejmulto da homoj la malfacilaĵoj de mallibereja vivo kaŭzus terurajn suferojn, sed por `Abdu'l-Bahá ili enhavis nenion teruran. Estante en la malliberejo Li skribis:



*Ne malĝoju pro mia mallibereco kaj malbonsorto; ĉar tiu ĉi malliberejo estas mia belega ĝardeno, mia palaca paradizo kaj trono de regado inter la homaro. Mia malbonsorto en la malliberejo estas krono kiu glorigas min inter justuloj.*

*Ĉiu povas esti feliĉa en la kondiĉoj de komforto, bonstato, sukceso, plezuro kaj ĝojo. Sed se oni estas feliĉa kaj kontenta en tempo de zorgoj, malfacilaĵoj kaj ĝenerala malsano, tio ĉi estas pruvo de nobleco.*

### **Turkaj Esplorkomisionoj**

En la jaroj 1904 kaj 1907 la turka registaro starigis komisionojn por esplori la akuzojn kontraŭ `Abdu'l-Bahá. Mensogaj atestantoj havigis al si pruvojn kontraŭ Li. `Abdu'l-Bahá, refutante la akuzojn, esprimis samtempe plenan pretecon subiĝi al ĉia verdikto kiun la tribunalo decidus. Li deklaris ke se oni ĵetus Lin en malliberejon, trenus Lin tra stratoj, malbenus, kraĉus sur Lin, ŝtonbatus Lin, amasigus kontraŭ Li ĉiaspecajn malhonorajn, pendigus aŭ mortpafus Lin, Li estus ankoraŭ tre feliĉa.

Inter kunvenoj de la Esploraj Komisionoj Li daŭrigis Sian ordinaran vivmanieron kun plej granda sereneco, plantante fruktarojn en ĝardeno kaj prezidante en edziĝofesto kun la digno kaj radieco de spirita libereco. La hispana konsulo proponis al `Abdu'l-Bahá ke li transveturigu Lin sendanĝere en iun ajn fremdan havenon kiun Li elektus, sed tiun ĉi proponon Li danke sed decide malakceptis, dirante ke kiaj ajn estus la rezultoj, Li devas sekvi la paŝojn de Báb kaj la Benita Belo, Kiuj neniam penis savi Sin aŭ forkuri de Siaj malamikoj. Li urĝis, tamen, plejparton de la bahaanoj forlasi la ĉirkaŭaĵojn de Akreo, kiuj fariĝis tre danĝeraj por ili, kaj restis sola, kun kelkaj fideluloj, por atendi Sian destinton.

La kvar koruptemaj oficistoj kiuj formis la lastan esplorkomisionon venis en Akreon en la komenco de la vintro 1907, restis tie dum unu monato, kaj reveturis en Konstantinopolon, fininte sian tiel nomatan "esploradon", pretaj raporti ke la akuzoj kontraŭ `Abdu'l-Bahá estas pravigitaj kaj konsili Lian ekzilon aŭ ekzekuton. Tamen, apenaŭ ili atingis Turkujon, eksplodis tie la Revolucio, kaj la kvar komisionanoj, kiuj apartenis al la malnova reĝimo, devis forkuri por savi siajn vivojn. La Junaj Turkoj starigis sian regadon, kaj liberigis ĉiujn politikajn kaj religiajn malliberulojn de la Otomana imperio. En septembro 1908 `Abdu'l-Bahá estis liberigita el la malliberejo, kaj en la sekvanta jaro `Abdu'l-Hamid, la sultano, mem fariĝis malliberigito.

### **Vojaĝoj tra la Okcidento**

Post la liberiĝo, `Abdu'l-Bahá daŭrigis la saman sanktan vivon de senĉesa aktiveco, instruante, korespondante, prizorgante malriĉulojn kaj malsanulojn, translokiĝinte nur de Akreo en Hajfan kaj de Hajfa en Aleksandrijo, kie Li restis ĝis aŭgusto 1911, kiam Li ekiris por Sia unua vizito en la okcidenta mondo. Dum Siaj vojaĝoj en la Okcidento, `Abdu'l-Bahá renkontis homojn de ĉiuj nuancoj kaj opinioj kaj ekzemplige plenumis la ordonon de Bahá'u'lláh: "Interrilatu kun ĉiuj homoj en ĝojo kaj aromo". Li atingis Londonon frue en septembro 1911, kaj pasigis tie unu monaton, dum kiu, krom la ĉiutagaj interparoloj kun demandantoj kaj multaj aliaj okupoj, Li faris paroladon antaŭ la kongregacio de lia pastra moŝto R. J. Campbell en City Temple (Urbo-Templo), kaj antaŭ tiu de la ĉefdiakono Wilberforce ĉe S-ta Johano, Westminster, kaj matenmanĝis kun la Lordo Urbestro. Poste Li veturis Parizon, kie Lia tempo estis absorbita per ĉiutagaj paroladoj kaj interparoloj kun avidaj aŭskultantoj de diversaj nacioj kaj tipoj. En decembro Li revenis Egiptujon, kaj la sekvintan printempon, sekve de fervoraj invitoj de la amerikaj amikoj, vojaĝis al Usono, alvenante Nov-Jorkon en aprilo 1912. Dum la sekvintaj naŭ monatoj Li vojaĝis tra Ameriko, de unu marbordo al la alia, alparolante homojn de ĉiaj specoj kaj de ĉiaj statoj - universitatajn studentojn, socialistojn, mormonojn, judojn, kristanojn, agnostikulojn, esperantistojn, pacajn societojn, novpensajn klubojn, virinbalotrajtajn societojn, kaj parolis en preĝejoj de preskaŭ ĉiuj sektoj, farante en ĉiu okazo paroladon konforman al la aŭskultantaro kaj al la cirkonstancoj. La 5-an de decembro Li forvojaĝis al Britujo, kie Li pasigis ses monatojn, vizitante Liverpolon, Londonon, Bristolon kaj Edinburgon. En Edinburgo Li faris la faman paroladon en la Esperanto-societo, en Kiu Li sciigis ke Li urĝis orientajn bahaanojn lerni Esperanton por atingi pli bonan interkompreniĝon inter la Oriento kaj la Okcidento. Post du monatoj en Parizo, pasigitaj kiel antaŭe en ĉiutagaj intervjuoj kaj konferencoj, Li veturis Stutgarton, kie Li havis serion de tre sukcesaj kunvenoj kun germanaj bahaanoj. De tie Li iris en Budapeŝton kaj en Vienon, fondinte en tiuj ĉi lokoj novajn grupojn. En majo 1913, Li revenis Egiptujon, kaj la 5-an de decembro 1913 al Hajfa.

### **Reveno en la Sanktan Landon**

Li havis tiam sepdek jarojn, kaj la longa kaj malfacila laborado, kulminanta en tiuj lacigaj okcidentaj vojaĝoj, eluzis Liajn korpajn fortojn. Post la reveno Li skribis la sekvantan kortuŝan Tabuleton al la kredantoj en la Oriento kaj Okcidento:

*Amikoj, venas la tempo kiam mi ne estos plu kun vi. Mi faris ĉion kio estis farebla. Mi servis al la Kredo de Bahá'u'lláh ĝis la ekstremo de mia povo. Mi laboris nokte kaj tage dum ĉiuj jaroj de mia vivo.*

*Ho, kiel mi sopiras ke la kredantoj prenu sur siajn ŝultrojn la respondecon por la Kredo! Nun estas la tempo proklami la Regnon de la Abhá (t.e., de la Plejglora)! Nun estas la horo de unueco kaj konkordo! Nun estas la tago de spirita harmonio inter la amikoj de Dio! ...*

*Mi streĉas miajn orelojn al la Oriento kaj al la Okcidento, al la Nordo kaj al la Sudo, esperante ekaŭdi la kantojn de amo kaj amikeco sonigitajn en kunvenoj de la kredantoj. Miaj tagoj estas malmultaj, kaj restas al mi nenia alia ĝojo ekster tio ĉi.*

*Ho, kiel mi deziras vidi la amikojn unuigitaj kiel brilanta kunŝnuro de perloj, kiel la lumantaj plejadoj, kiel radioj de la suno, kiel gazeloj de unu paŝtejo!*

*La mistika najtingalo kantas al ili; ĉu ili ne aŭskultas? La Paradiza birdo ĉirpas; ĉu ili ne ekaŭdas? La Anĝelo de la Regno de Abhá vokas al ili; ĉu ili ne atentos? La Portanto de la Sankta Interligo pledas; ĉu ili ne obeos?*

*Ho! Mi atendas, mi atendas la ĝojan novaĵon, ke la kredantoj estas la personiĝo de sincereco kaj lojaleco, enkorpiĝo de amo kaj amikeco, elmontriĝo de unueco kaj konkordo!*

*Ĉu ili ne ĝojigos mian koron? Ĉu ili ne kontentigos miajn sopirojn? Ĉu ili ne obeos miajn petegojn? Ĉu ili ne plenumos miajn esperojn? Ĉu ili ne respondos al mia voko?*

*Mi atendas, pacience mi atendas!*

La malamikoj de la Bahaa Kredo, kies esperoj alten leviĝis kiam Báb iĝis viktimo de ilia furiozo, kiam Bahá'u'lláh estis forpelita el Sia patrolando kaj igita dumviva malliberulo, kaj refoje kiam Bahá'u'lláh mortis - tiuj ĉi malamikoj denove kuraĝiĝis vidante la korpan malfortecon kaj eluziĝon de `Abdu'l-Bahá post Lia reveno el la Okcidentaj vojaĝoj. Sed denove iliaj esperoj estis kondamnitaj je neplenumo. Post mallonga tempo `Abdu'l-Bahá povis skribi:

*Sendube tiu ĉi korpo kaj la homa energio ne kapablas elteni la senĉesan penadon kaj fortostreĉadon ... sed la helpo kaj subteno de la Dezirato estis la Gardanto kaj Defendanto de la malforta kaj humila `Abdu'l-Bahá. ... Kelkaj asertis ke `Abdu'l-Bahá estas jam dironta Sian lastan adiaŭon al la mondo, ke Lia korpa energio estas elĉerpita kaj foruzita kaj ke baldaŭ tiuj ĉi komplikaj finigos Lian vivon. Tio ĉi estas for de la vero. Kvankam laŭ la evidenta opinio de la rompantoj de la Sankta Interligo kaj neperfektaj mensuloj la korpo estas malforta pro la suferoj sur la Benita Vojo, tamen, Gloro al Dio! per la gardo de la Benita Perfekteco la spiritaj povoj estas plej altgrade rejuniĝintaj kaj fortaj. Danko estu al Dio ke nun, per la beno kaj favoro de Bahá'u'lláh, eĉ la korpa energio estas plene refortigita, ricevita estas dia ĝojo, la plej altaj bon-novaĵoj brilegas kaj ideala feliĉo abundegas.*

Kaj dum la Eŭropa Milito kaj poste `Abdu'l-Bahá, inter sennombraj aliaj agadoj, povis skribi serion de grandanimaj kaj inspiraj leteroj kiuj, kiam venis informoj pri ili, vekis la kredantojn tra la mondo al novaj entuziasmo kaj servofervoro. Per la inspiro de tiuj ĉi leteroj la Kredo antaŭeniris rapidege kaj ĉie la Religio montris novajn signojn de vivoforto kaj energio.

### **La Milittempo en Hajfa**

Rimarkinda ekzemplo de la antaŭvidemo de `Abdu'l-Bahá montriĝis dum la monatoj tuj antaŭ la milito. En tempo de paco en Hajfa estis ordinare granda nombro da pilgrimoj, de Persujo kaj la aliaj regionoj de la tergloblo. Ĉirkaŭ ses monatojn antaŭ la eksplodo de la milito unu el la maljunaj bahaanoj vivantaj en Hajfa prezentis la deziron de pluraj persaj kredantoj por permeso viziti la Majstron. `Abdu'l-Bahá ne donis la permeson, kaj de tiu tempo iom post iom forsendis la pilgrimojn kiuj estis en Hajfa, tiel ke en la fino de julio 1914 restis neniu. Kiam, en la unuaj tagoj de aŭgusto, la subita eksplodo de la Granda Milito tremigis la mondon, la saĝeco de Liaj antaŭzorgoj fariĝis klara.

Kiam la milito eksplodis, `Abdu'l-Bahá, kiu jam kvindek kvin jarojn de Sia vivo pasigis en ekzilo kaj malliberejo, denove iĝis fakte malliberulo de la turka registaro. Komunikado kun amikoj kaj kredantoj ekster Sirio estis preskaŭ tute interrompita, kaj Li kun Sia malgranda sekvantaro estis denove subigita al malfacilaj cirkonstancoj, nesufiĉo de nutraĵo, granda persona danĝero kaj maloportuneco.

Dum la milito `Abdu'l-Bahá estis tre okupata per prizorgado de la esencaj kaj spiritaj bezonoj de homoj ĉirkaŭ Li. Li persone organizis vastajn agrikulturajn laborojn apud Tiberiado, tiamaniere sekurigante grandan provizon da tritiko, danke al tio ke la malsato estis forturnita, ne nur de la bahaanoj sed de centoj de ĉiureligiaj malriĉuloj en Hajfa kaj Akreo, kies bezonojn Li grandanime kontentigis. Li zorgis pri ĉiuj, kaj laŭ Sia eblo moderigis iliajn suferojn. Al centoj da malriĉuloj Li donis ĉiutage malgrandajn monsumetojn. Aldone al la mono Li donis panon. Se Li ne havis panon Li donis daktilojn aŭ ion alian. Ofte Li vizitis Akreon por konsoli kaj helpi la tieajn kredantojn kaj malriĉulojn. Dum la milittempo Li aranĝis ĉiutage kunvenojn de la kredantoj, kaj per Lia helpo la amikoj restis feliĉaj kaj trankvilaj dum tiuj zorgabundaj jaroj.

### Sir `Abdu'l-Bahá `Abbás, K.B.E.

Granda estis la ĝojo en Hajfa kiam, la 23an de septembro, 1918, je la 3-a ptm., post ĉirkaŭ du dekkvarhora batalado, la urbo estis kaptita de la brita kaj hinda kavalerio, kaj la teruraj militkondiĉoj travivataj sub la turka regado finiĝis.

Ekde la komenco de la brita okupacio, grandaj amasoj da soldatoj kaj registaraj oficistoj de ĉiuj rangoj, eĉ de la plej altaj, celis intervjuon kun `Abdu'l-Bahá, ĝuante kun granda plezuro Liajn lumdonajn paroladojn, la vastecon de Liaj vidpunktoj kaj profundecon de Lia intuicio, Lian dignoplenan ĝentilecon kaj ĉarman gastamon. La registaraj reprezentantoj estis tiel profunde impresitaj per Lia nobla karaktero kaj Lia granda laboro por paco kaj vera prospero de la homaro, ke al `Abdu'l-Bahá estis donita kavalireco de la Brita Imperio. Tiu ĉi ceremonio okazis en la ĝardeno de la milita registarĉefo de Hajfa la 27an de aprilo, 1920.

### La Lastaj Jaroj

Dum la vintro de 1919-20 la aŭtoro havis la grandan privilegion pasigi du kaj duonon da monatoj kiel gasto de `Abdu'l-Bahá en Hajfa kaj intime observadi Lian ĉiutagan vivon. Tiutempe, kvankam havante la aĝon de preskaŭ sepdek ses jaroj, Li estis ankoraŭ rimarkinde vivoplena, kaj plenumis tage preskaŭ nekredoblan amason da laboro. Kvankam Li ofte estis tre laca Li elmontradis tamen mirindan kapablon de revigliĝo, kaj ĉiam Liaj servoj estis pretaj al dispono de tiuj kiuj plej multe bezonis ilin. Liaj senlaca pacienco, ĝentileco, afableco kaj takto faris Lian ĉeeston kiel benon. Estis Lia kutimo pasigi grandan parton de ĉiu nokto en preĝado kaj meditado. De frua mateno ĝis vespero, krom mallonga posttagmanĝa ripozo, Li estis intense okupata per legado kaj respondado al leteroj el multaj landoj, per prizorgado de multegaj aferoj de la domo kaj de la Kredo. Posttagmeze Li kutime faris al Si malgrandan ripozon en formo de promeno aŭ veturo, sed eĉ tiam ordinare akompanis Lin unu, du aŭ areto da pilgrimoj, kun kiuj Li parolis pri spiritalaj aferoj, aŭ Li profitis la okazon laŭvoje por viziti kaj helpi iajn malriĉulojn. Post reveno Li invitis la amikojn al la kutima vespera kunveno en Sia akceptejo. Kaj ĉe tagmanĝo kaj ĉe vespermanĝo Li gastigis nombron da pilgrimuloj kaj amikoj, kaj ĉarmis Siajn gastojn per gajaj kaj humoraj rakontoj kaj ŝatindaj interparoloj pri diversaj aferoj. "Mia hejmo estas la hejmo de rido kaj ĝojo", Li deklaris, kaj ja estis tiel. Li ŝatis kunveni homojn de diversaj rasoj, koloroj, nacioj kaj religioj en unueco kaj kora amikeco ĉirkaŭ Sia gastema tablo. Li estis vere amanta patro ne nur por la malgranda anaro en Hajfa, sed por la bahaanaro tra la tuta mondo.

### La Morto de `Abdu'l-Bahá

`Abdu'l-Bahá daŭrigis Siajn multspecajn okupojn kun apenaŭa malpliigo malgraŭ la kreskanta korpa fortoperdo kaj laciĝo ĝis la lastaj tagoj de Sia vivo. Vendrede, la 25an de novembro, 1921, Li ĉeestis la tagmezan preĝon en la moskeo en Hajfa, kaj poste laŭ Sia kutimo, disdonis propramane almozon al malriĉuloj. Post la tagmanĝo Li diktis kelkajn leterojn. Ripozinte Li promenis en la ĝardeno kaj parolis kun la ĝardenisto. Vespere Li donis Siajn benon kaj konsilon al amata kaj fidela domservanto kiu edziĝis en tiu sama tago, kaj poste ĉeestis la kutiman kunvenon de la amikoj en Sia propra akceptejo. Malpli ol tri tagojn poste, ĉirkaŭ la 1:30<sup>a</sup> atm. lundon, la 28an de novembro, Li mortis tiel kviete ke, laŭ Liaj du filinoj kiuj maldormis apud Lia lito, ŝajnis ke Li trankvile endormiĝis.

La malĝoja novaĵo baldaŭ disvastiĝis tra la urbo kaj estis tuj telegrafita tra ĉiuj partoj de la mondo. La sekvantan matenon (mardon, la 29an de novembro) okazis la enterigo:

*... enterigo al kiu similan Hajfa, ja la tuta Palestino, certe estis neniam vidinta ... tiel profunda estis la sento kiu kunvenigis tiel multajn milojn da funebrantoj, reprezentantoj de tiom da religioj, rasoj kaj lingvoj.*

*La Ĉefa Komisiito, Sir Herbert Samuel, la Ĉefreganto de Jerusalemo, la Ĉefreganto de Fenicujo, la Ĉefaj Oficistoj de la Registaro, Konsuloj de diversaj landoj, rezidentaj en Hajfa, estroj de diversaj religiaj anaroj, eminentuloj de Palestino, judoj, kristanoj, islamanoj, drusoj, egiptoj, grekoj, turkoj, kurdoj, kaj amaso de liaj amerikaj, eŭropaj kaj enlandaj amikoj, viroj, virinoj kaj infanoj, kaj de altaj kaj de malaltaj pozicioj ... ĉiuj, en la nombro de pli ol dek miloj, funebrantaj la perdon de sia Amato. ...*

*"Ho Dio, mia Dio!" unuvoĉe ili lamentis, "nia patro forlasis nin, nia patro forlasis nin!" ... malrapide ili supreniris la monton Karmelo, la Vinberejo de Dio. ... Post duhora irado, ili atingis la tomboĝardenon de Báb. ... Dum la granda amaso premis sin de ĉiuj flankoj ... reprezentantoj de diversaj sektoj, islamanoj, kristanoj kaj judoj, ĉiuj kore flamantaj per varmega amo al `Abdu'l-Bahá, kelkaj pro impulso de la momento, aliaj antaŭpreparitaj, levis la voĉojn en laŭdo kaj bedaŭro, donante la lastan adiaŭan omaĝon al la amato. Tiel unuvoĉe ili aklamis Lin, kiel saĝan edukiston kaj paciganton de la homa gento en tiu ĉi malfacila kaj malgaja tempo, ke nenio ŝajnis resti direbla por bahaanoj. – The Passing of `Abdu'l-Bahá, de Lordino Blomfield kaj Shoghi Effendi, pp. 11, 12. (La Forpaso de `Abdu'l-Bahá)*

Naŭ parolantoj, ĉiuj el ili eminentaj reprezentantoj de la islama, kristana kaj juda anaroj, en elokventa kaj kortuŝa maniero atestis siajn amon kaj admiron al la pura kaj nobla vivo kiu ĵus finiĝis. Tiam la ĉerkon oni malrapide enmetis en sian simplan kaj sanktan ripozejon.

Sendube tio estis konvena tributo al la memoro de Tiu Kiu dum Sia tuta vivo laboradis por unueco de religioj, rasoj kaj lingvoj-tributo, kaj ankaŭ pruvo, ke la laboro de Lia vivo ne estis vana, ke la idealoj de Bahá'u'llah, kiuj estis Lia inspiro, plie, la esenco de Lia vivo, komencis jam penetri la mondon kaj rompi la barilojn de sektoj kaj kasto kiuj dum jarcento apartigadis islamanojn, kristanojn, judojn kaj aliajn diversajn partiojn kiuj dividis la homan familion.

### **Skribaĵoj kaj Paroladoj**

La skribaĵoj de `Abdu'l-Bahá estas tre multaj kaj estas plejparte en la formo de leteroj al kredantoj kaj demandantoj. Multaj el Liaj paroloj kaj prelegoj estas ankaŭ surpaperigitaj kaj multaj el ili estas eldonitaj. El la miloj da pilgrimoj kiuj vizitis Lin en Akreo kaj Hajfa granda nombro skribe rakontis siajn impresojn, kaj multaj el tiuj priskriboj estas nun haveblaj en presa eldono.

Tiamaniere Liaj instruoj estas tre komplete konservitaj, kaj ili inkluzivas vastan amason da temoj. Multajn el la problemoj kaj de la Oriento kaj de la Okcidento Li pritraktis pli plene ol Lia Patro, prezentante pli detalajn aplikmanierojn de la ĝeneralaj principoj starigitaj de Bahá'u'lláh. Granda nombro de Liaj Skribaĵoj estas ne ankoraŭ tradukita en okcidentan lingvon, sed sufiĉe da ili jam estas haveblaj por prezenti profundan kaj plenan scion pri la pli gravaj principoj de Liaj instruoj.

Li parolis perse, arabe kaj turke. En la Okcidentaj vojaĝoj Liaj paroloj kaj paroladoj ĉiam estis tradukataj, perdante kompreneble multe de la beleco, elokventeco kaj forto en la procedo, tamen tia estis la potenco de la Spirito kiu akompanis Liajn vortojn ke ĉiuj kiuj Lin aŭdis estis impresitaj.

### **La Posteno de 'Abdu'l-Bahá**

La unika posteno destinita al `Abdu'l-Bahá de la Benita Perfekteco estas indikita en la sekvanta peco skribita de Tiu Ĉi: "Kiam la oceano de Mia ĉeesto forfluos kaj la Libro de Mia Revelacio finiĝos, turnu viajn vizaĝojn al Tiu Kiun Dio elektis, Kiu branĉiĝis el ĉi tiu Pratempa Radiko." Kaj denove: "... tion kion vi ne komprenas en la Libro demandu al Tiu Kiu branĉiĝis el tiu ĉi potenca Arbo."

`Abdu'l-Bahá Mem skribis la jenon: "Laŭ la klara teksto de la Kitáb-i-Aqdas Bahá'u'lláh difinis la Centron de la Sankta Interligo Klariganto de Liaj Vortoj - Interligo tiel firma kaj potenca, ke de la tempokomenco ĝis nun neniu Religiosistemo havigis al si ion similan."

La pleneco de la servemeco per kiu `Abdu'l-Bahá disvastigis la Kredon de Bahá'u'llah Oriente kaj Okcidente rezultis kelkafoje en konfuzo de penso parte de la kredantoj rilate al Lia rango. Konstatinte la purecon spiritan kiu vivigis Liajn vortojn kaj farojn, ĉirkaŭitaj de religiaj influoj kiuj signis la detruon de la tradiciaj doktrinoj, pluraj bahaanoj sentis ke ili faras honoron al `Abdu'l-Bahá per tio ke ili komparas Lin al Malkaŝanto, aŭ aklamas Lin esti la "reveno de Kristo". Nenio faris Lin tiel ege malĝoja kiel la nepovo por vidi ke Lia kapableco servadi al Bahá'u'lláh venas el la pureco de la spegulo turnita al la Suno de Vero, kaj ne de la Suno mem.

Plie, malsimile al antaŭaj Religiosistemoj, la Kredo de Bahá'u'lláh havas en si potencon de universala homsocio. Dum la misio de `Abdu'l-Bahá inter 1892 kaj 1921, la Kredo kreskis per sinsekvaj niveloj de evoluo al vera mondordo. Ĝia evoluiĝado postulis la daŭran direkton kaj specialan instruadon de `Abdu'l-Bahá, Kiu sola sciis la plenecon de tiu nova potenca inspiro surterigita en tiu ĉi epoko. Ĝis kiam Lia propra Testamento estis malkaŝita post la morto de `Abdu'l-Bahá, kaj ĝia signifo klarigita de Shoghi Effendi, la Gardanto de la Kredo, ĝis tiam la bahaanoj preskaŭ ĉiam atribuis al la gvidado de la amata Majstro gradon de spirita aŭtoritateco egalan al tiu de la Malkaŝanto Mem.

La efikoj de tiel naiva entuziasmo ne ekzistas plu en la bahaa komunumo, sed kun pli racia kompreno de la mistero de tiuj senkompareblaj sindono kaj servado, la bahaanoj povas nuntempe des pli konscie estimi la unikan karakteron de la misio kiun `Abdu'l-Bahá plenumis. La Kredo kiu en 1892 ŝajnis esti tiel malforta kaj senhelpa dum la ekzilo kaj enkarceriĝo de ĝia Ekzempliganto kaj Klariganto, de post tiu tempo starigas, per nerezistebla potenco, komunumojn en multaj landoj<sup>1</sup>, kaj ĝi kontraŭas la malfortecon de putriĝanta civilizacio per tiu instruajo kiu sola malkaŝas la estontecon de malespera homaro.

La Volo kaj Testamento de `Abdu'l-Bahá Mem difinas kun plena klareco la misteron de la rangoj de Báb kaj de Bahá'u'lláh, kiel ankaŭ Lian propran mision:

<sup>1</sup> En 1969, 139 sendependaj ŝtatoj kaj 173 signifaj teritorioj kaj insuloj. (Vidu la Epilogon).

*Jen estas la bazo de la kredo de la anoj de Bahá (mia vivo estu oferita pro ili): "Lia Sankteco, la Ekzaltito (Báb), estas la Malkaŝanto de la Unueco de Dio kaj la Antaŭulo de la Pratempa Belo. Lia Sankteco la Abhá Belo (mia vivo estu oferado pri Liaj konstantaj amikoj) estas la Supera Malkaŝanto de Dio kaj la Suno de Lia Plej Dia Esenco. Ĉiuj aliaj estas servantoj al Li kaj sekvas Liajn ordonojn."*

Per tiu deklaro, kaj per multaj aliaj en kiuj `Abdu'l-Bahá emfazis la gravecon por bazigi la scion pri la Kredo sur Liaj ĝeneralaj Tabuletoj, fundamento por unueco de kredo estis starigita, kun la rezulto ke la diversaj supozoj kaŭzitaj de aludoj al Liaj Tabuletoj al individuoj, en kiuj la Majstro respondis al personaj demandoj, rapide malaperis. Super ĉio, la starigo de definitiva administra sistemo, kun la Gardanto kiel ĝia ĉefo, transdonis al fakoj ĉiun aŭtoritatecon antaŭe uzita en la formo de prestiĝo kaj influo de individuaj bahaanoj en la diversaj lokaj grupoj.

### **Ekzempliganto de Bahaa Vivo**

Bahá'u'lláh estis super ĉio la Malkaŝanto de la Vorto. Lia kvardekjara mallibereco donis al Li nur limigitajn okazojn interparoli kun Siaj samtempuloj. Al `Abdu'l-Bahá estis, sekve, destinita la grava tasko por esti klariganto de la Revelacio, Plenumanto de la Vorto, Granda Ekzempliganto de la bahaa vivo en reala kontakto kun la hodiaŭa mondo, en plej diversaj formoj de ĝiaj sennombraj agadoj. Li montris ke estas ankoraŭ eble, meze de la vivokirlo kaj antaŭenpremo de la moderna tempo, meze de la ĉieregantaj egoismo kaj batalado por materiala prospero, plenigi la vivon de tuta sindonemo al Dio kaj servado al siaj najbaroj, kion de homoj postulis Kristo, Bahá'u'lláh kaj ĉiuj Profetoj. Meze de provoj, sortoŝanĝoj, kalumnioj kaj perfidoj unuflanke, kaj amo, glorado, sindonemo kaj respekto aliflanke, Li staris kiel lumturo konstruita sur roko, ĉirkaŭ kiu furiozas vintraj uraganoj kaj ludas somera oceano. Lia ekvilibro kaj sereneco estis ĉiam firmaj kaj neŝanceblaj. Li plenumis la vivon de kredo, kaj alvokas Siajn sekvantojn por fari la samon. Meze de la militanta mondo Li levis la Standardon de Unueco kaj Paco, la standardon de la Nova Epoko, kaj inspiras tiujn kiuj leviĝas helpe al ĝi per la Spirito de la Nova Tago. Ĝi estas la sama Sankta Spirito kiu inspiradis la antaŭajn Profetojn kaj Sanktulojn, sed ĝi estas nova elŝpruco de tiu ĉi Spirito, konvena al la bezonoj de la nova tempo.

## ĈAPITRO V: KIO ESTAS BAHAAÑO?

*Homo devas doni fruktojn. Senfrukta homo, laŭ la vortoj de Lia Sankteco la Spirito (t.e. Kristo), estas kiel senfrukta arbo, kaj senfrukta arbo taŭgas por fajro. – Bahá'u'lláh, Words of Paradise (Vortoj el Paradizo)*

Herbert Spencer foje diris ke per nenia politika alĥemio oni povas ricevi oran konduton el plumbaj instinktoj; tiel same vere estas ke per nenia politika alĥemio oni povas fari oran socion el plumbaj individuoj. Bahá'u'lláh, kiel ĉiuj antaŭaj Profetoj, proklamis tiun ĉi veron kaj instruis ke por fondi la Regnon de Dio en la mondo, oni devas fondi ĝin antaŭe en la homaj koroj. Tial studante la bahaajn instruojn, ni komencos de la instruoj de Bahá'u'lláh pri konduto de individuoj, kaj penos prezenti klaran bildon pri tio kion signifas esti bahaano.

### Vivi la Bahaan Vivon

Demandite iufoje: "Kio estas bahaano?" `Abdu'l-Bahá respondis: "*Esti bahaano signifas simple ami la mondon; ami la homaron kaj peni servi al ĝi; labori por universala paco kaj universala frateco.*" Alifoje Li difinis bahaanon kiel "*personon posedantan ĉiujn perfektecojn de homo en aktiveco.*" En unu el Siaj londonaj paroloj Li diris ke homo povas esti bahaano se li eĉ neniam aŭdis la nomon de Bahá'u'lláh. Li aldonis:

*Homo kiu vivas laŭ la instruoj de Bahá'u'lláh estas jam bahaano. Aliflanke, homo povas dum kvindek jaroj nomi sin bahaano, sed se li ne vivas la vivon li ne estas bahaano. Malbela homo povas nomi sin bela, tamen li trompos neniun, kaj homo nigra povas nomi sin blanka, sed li trompos neniun, nek eĉ sin mem.*

Tamen, tiu kiu ne konas la Disenditojn, similas al floro kreskanta en ombro. Kvankam ĝi ne konas la sunon, ĝi, tamen, estas absolute dependa de ĝi. La grandaj Profetoj estas spiritaj sunoj, kaj Bahá'u'lláh estas la suno de la hodiaŭa "tago" en kiu ni vivas. La sunoj de la antaŭaj tagoj varmigus la mondon kaj donis al ĝi la vivon. Se tiuj sunoj ne estus brilintaj, la tero nun estus malvarma kaj malviva, sed nur la ĉi-taga sunlumo povas maturigi la fruktojn al kiuj la sunoj de antaŭaj tagoj donacis la vivon.

### Sindono al Dio

Por atingi la bahaan vivon en ĝia plena perfekteco, konscia kaj direkta sinturno al Bahá'u'lláh estas necesa kiel la brilo de la suno necesa estas por florigi lilion aŭ rozon. Bahaano adoras ne la personecon de Bahá'u'lláh, sed la Gloron de Dio malkaŝitan en tiu ĉi personeco. Li respektas Kriston, Mahometon kaj ĉiujn antaŭajn Disenditojn, sed Bahá'u'lláh'n li konsideras Portanto de la Dia Revelacio por la nova epoko en kiu ni vivas, kaj Granda Mondinstruisto Kiu venis por kontinui kaj plenumi la laboron de Siaj antaŭuloj.

Por ke homo fariĝu bahaano ne sufiĉas intelekta konsento al la kredo, nek ekstera korekteco de lia konduto. Bahá'u'lláh postulas de Siaj sekvantoj tutkoran kaj plenan sindonon. Nur Dio rajtas fari tian postulon, sed Bahá'u'lláh parolas kiel Sendito de Dio, kaj Klariganto de Lia Volo. La antaŭaj Disenditoj estis tiel same kategoriaj. Kristo diris: "Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin, kaj levu sian krucon, kaj sekvu min, ĉar kiu volas savi sian animon, tiu ĝin perdos; sed kiu perdos sian animon pro mi, tiu ĝin trovos." Diversesprime, ĉiuj Malkaŝantoj de Dio postulis la samon de Siaj sekvantoj, kaj la historio de la religio montras klare ke tiel longe kiel tiu ĉi postulo estis sincere plenumita kaj obeata, la religio floris, malgraŭ ĉia tera kontraŭbatalado, malgraŭ turmentoj, persekutado kaj martirigado de la kredantoj. Aliflanke, kiam ajn enŝtelis sin kompromiso, kaj "respektindeco" okupis la lokon de la absoluta sinofero, la religio komencis kaduki. Ĝi fariĝis moda, sed ĝi perdis la povon savi kaj transformi, la povon fari miraklojn. Vera religio neniam ĝis nun estis moda. Dio permesu ke iam ĝi fariĝu tia; sed nun estas ankoraŭ vere, kiel en la tagoj de Kristo, ke "malvasta estas la pordo kaj mallarĝa estas la vojo, kiu kondukas nin al la vivo, kaj malmultaj trovis ĝin." La pordo de la spirita naskiĝo, kiel la pordo de la natura naskiĝo, enlasas homojn nur unuope, kaj sen ŝarĝaĵoj. Se, estonte, pli multe da homoj sukcesos suriri tiun ĉi vojon ol en la pasintaj tempoj, tio estos ne pro la plilarĝigo de la pordo, sed pro tio ke la homoj pli inklinos al la "granda subiĝo" kiun Dio postulas; ĉar longa kaj maldolĉa sperto estos fine konvinkinta ilin kiel malsaĝe ili agis elektante sian vojon anstataŭ la vojo de Dio.

### Serĉado de la Vero

Bahá'u'lláh ordonas justecon al ĉiuj el Siaj sekvantoj kaj difinas ĝin kiel: "Libereco de superstiĉoj kaj imitado, ke homo povu ekkoni la Revelaciantojn de Dio per la okuloj de la Unueco, kaj konsideri ĉiujn aferojn per penetra rigardo." – *Words of Wisdom* (Vortoj de Saĝeco).

Estas necese ke ĉiu individuo vidu kaj komprenu mem la Gloron de Dio malkaŝitan en la homa sanktejo de Bahá'u'lláh, alie la baha kredo estus por li nur senenhava nomo. La Profetoj ĉiam alvokadis la homojn ke ili malfermu siajn okulojn, ne fermu ilin, uzu sian intelekton, ne subpremu ĝin. Ne sklava kredemo, sed klara vidado kaj libera pensado, ebligos al ili penetri la nubojn de antaŭjuĝoj, forskui la katenojn de blinda imitado, kaj atingi plenkomprenon de la vero de la nova Revelacio.

Kiu deziras esti bahaano devas esti sentima serĉanto de la vero, sed li ne devas limigadi sian serĉadon ĝis la materiaj aferoj. Liaj spiritalaj perceptpovoj devas esti tiel viglaj kiel la korpaj. Li devas uzi ĉiujn kapablojn donitajn al li de Dio por atingi la veron, kredante al nenio sen valora aŭ sufiĉa racio. Se lia koro estas pura, kaj la menso libera de antaŭjuĝoj, la fervora serĉanto ne malsukcesos ekkoni la Dian Gloron en kia ajn sanktejo ĝi manifestiĝus. Bahá'u'lláh plue deklaras:

*Oni devas koni sin mem, kaj tion kio kondukas al nobleco aŭ al malnobleco, al malhonoro aŭ al honoro, al riĉeco aŭ al malriĉeco. – Tablet of Tarázát (Tabuleto Tarázát)*

*La radiko de ĉiuj scioj estas la kono de Dio, Gloro estu al Li! kaj tiu ĉi kono estas neatingebla alie ol per Liaj Manifestiĝoj. – Words of Wisdom (Vortoj de Saĝeco)*

Malkaŝanto estas Homo Perfekta, granda Ekzempliganto por la Homaro, la Unua Frukto sur la arbo de la homaro. Antaŭ ol Lin koni ne eblas al ni koni la kapablojn dormantajn en ni mem. Kristo instruas ke ni konsideru liliojn kiel ili kreskas, kaj diras ke Salomono ne estis por sia tuta gloro tiel ornamita kiel lilio. Lilio elkreskas el tute senĉarma bulbo. Se ni neniam vidis florantan lilion, neniam rigardis la senkomparan graciecon de ĝiaj petaloj kaj folioj, kiel ni povas koni la realecon kaŝitan en la bulbo? Ni povas disseki ĝin plej precize kaj esplori plej atente, sed ni neniam povus eltrovi la dormantan belon kiun ĝardenisto scias vekti. Tiel same antaŭ ol ekkoni la Gloron de Dio aperigitan en la Malkaŝanto, ni povas havi nenian ideon pri la spirita belo kaŝita en nia propra naturo kaj en tiu de niaj proksimumoj. Konante kaj amante la Malkaŝanton de Dio kaj sekvante Liajn instruojn ni akiras la eblon, iom post iom, realigi la potencialajn perfektecojn interne de ni; tiam, kaj ne antaŭe, fariĝas klara al ni la signifo kaj celo de la vivo kaj de la universo.

## Amo al Dio

Koni la Manifestiĝon de Dio signifas ankaŭ ami Lin. Unu estas neebla sen la alia. Laŭ Bahá'u'lláh, la celo de la kreo de la homo estis ke li konu Dion kaj adoru Lin. Li diras en unu el Siaj Tabuletoj:

*La kaŭzo de la kreo de ĉiuj enmondaj estaĵoj estis amo, kiel oni diras en la bone konata tradicio, "Mi estis kaŝita trezoro kaj Mi volis esti konata. Mi do faris kreaĵojn por esti konata."*

Kaj en la *Hidden Words* (Kaŝitaj Vortoj) Li diras:

*Ho Filo de Ekzisto! Amu Min, por ke Mi amu vin. Se vi Min ne amas, Mia amo neniam povos vin atingi. Sciu tion ĉi, ho servanto.*

*Ho Filo de la Plej Mirinda Vizio! Mi enblovis en vin spiron de Mia propra Spirito, por ke vi estu Mia amanto. Kial vi forlasis Min kaj ekserĉis alian amaton?*

Esti amanto de Dio! Tio estas la sola vivocelo de bahaano. Havigi al si Dion kiel sian plej proksiman kunulon kaj plej intiman amikon, kiel sian Senkomparan Amaton, Kies Apudesto estas la pleneco de ĝojo! Kaj ami Dion signifas ami ĉion kaj ĉiun, ĉar ĉio kaj ĉiu estas de Dio. Vera bahaano estas perfekta amanto. Li amas ĉiun, fervore, per pura koro. Li malamas neniun. Li malestimas neniun, ĉar li scias distingi la Vizaĝon de la Amato en ĉiu vizaĝo, kaj ĉie trovi Liajn signojn. Nek sekto aŭ nacio, nek klaso aŭ raso prezentas limon de lia amo. Bahá'u'lláh diras: "En la malnovaj tempoj estis dirite: 'Amo al sia patrujo estas elemento de la Kredo de Dio.' La Lango de la Majesto diris ... en la tagoj de tiu ĉi Revelacio: 'Gloro estas ne al tiu kiu amas sian patrujon, sed gloro estas al tiu kiu amas la homaron.'" – *Tablet of the World* (Tabuleto de la Mondo). Kaj denove: "Benita estas tiu kiu preferas sian fraton ol sin mem. Tia homo estas el la anaro de Bahá." – *Words of Paradise* (Vortoj el Paradizo).

ĤAbdu'l-Bahá diras ke ni devas esti "kiel unu animo en multaj korpoj, ĉar ju pli ni amas unu la alian, des pli ni alproksimiĝas al Dio." Li diris al usona aŭdantaro:

*Same la diaj religioj de la Sanktaj Manifestiĝoj de Dio estas ja unu kvankam laŭ nomo kaj nomenklaturado ili diferencas. Oni devas ami lumon neatentante el kie ĝi aperas. Oni devas ami rozon neatentante la teron en kiu ĝi kreskas. Oni devas ami la veron el kiu ajn fonto ĝi venas. Ami lanternon ne estas amo al la lumo. Ami la teron ne decas; inde estas ĝui rozon kiu kreskas el la tero. Sindono al arbo estas vana sed manĝi la frukton estas benefika. Oni devas ĝui bongustajn fruktojn neatentante la arbon sur kiu ili kreskas aŭ la lokon kie ili troviĝas. Vorto de vero estu sankciita neatentante kiu lango ĝin eldiras. Absolutaj veroj devas esti akceptitaj neatentante la librojn en kiuj ili estas. Antaŭjuĝo estas la kaŭzo de seniĝo kaj nescio. Luktoj inter religioj, nacioj kaj gentoj estas rezulto de miskompreno. Se oni esploras religiojn por trovi iliajn principojn oni*

*trovos ke ili akordiĝas, ĉar ilia fundamenta realeco estas unu kaj ne multobla. Tiel la religianoj de la mondo atingos punkton de unueco kaj akordiĝo.*

Kaj alifoje Li diras:

*Ĉiu el la amatoj devas ami la aliajn kaj avari por ili nek sian havaĵon nek la vivon, kaj en ĉiaj manieroj li devas peni fari ke la aliaj estu ĝojaj kaj feliĉaj. Sed tiuj aliaj ankaŭ devas esti neprofitemaj kaj sinoferemaj. Tiamaniere tiu ĉi Sunleviĝo surverŝu per lumo la horizontojn, tiu ĉi Melodio ĝojigu kaj feliĉigu la homojn, tiu ĉi dia Kuracilo fariĝu panaceo kontraŭ ĉia malsano, tiu ĉi Spirito de Vero fariĝu kaŭzo de la vivo por ĉiu.*

### Sindettenemo

Sindono al Dio signifas ankaŭ sindetenemon de ĉio kio ne estas de Dio, t.e., sindetenemo de ĉiuj egoistaj ĉi-mondaj, kaj eĉ transmondaj, deziroj. La vojo de Dio povas etendi sin tra riĉeco aŭ malriĉeco, bonfarto aŭ malsano, palaco aŭ malliberejo, rozĝardeno aŭ tortur-kamero. Kia ajn ĝi estu, bahaano devas akcepti sian sorton kun "radianta akceptemo". Sindetenemo ne signifas flegman indiferecon de homo al tio kio lin ĉirkaŭas, nek pasivan rezignemon je malbonaj kondiĉoj; ĝi ankaŭ ne signifas malŝatadon de la bonaj aferoj kiujn Dio kreis. Vera bahaano estas nek senkompata, nek apatia nek asketa. Li trovas multegon da intereso, multegon da okupo kaj ĝojo en la Vojo de Dio, sed li ne flankeniĝos de tiu ĉi vojo eĉ je unu haro por sekvi plezurojn aŭ postkuri ion kion Dio rifuzis al li. Kiam homo fariĝas bahaano, la Volo de Dio fariĝas lia volo, ĉar malkonsenti kun Dio estas la sola afero kiun li ne povas suferi. En la Vojo de Dio nenia teruro povas timigi lin, nenia zorgo povas senkuraĝigi lin. La lumo de amo radiigas liajn plej mallumajn tagojn, transformas suferon en ĝojon, kaj eĉ martirecon mem en ekstazon de feliĉego. La vivo estas altigita al heroa nivelo kaj la morto aperas kiel feliĉa epizodo. Bahá'u'lláh diras:

*Kiu havas en la koro eĉ malpli ol sinapan semon de amo al io ajn ekster Mi, tiu ne povas eniri Mian Regnon.*  
– Súratu'l-Hajkal

*Ho Filo de la Homaro! Se vi amas Min, forturnu vin de vi mem; kaj se Mian volon vi serĉas, ne atentu la propran; por ke vi mortu en mi kaj Mi eterne vivu en vi.*  
*Ho Mia Servanto! Liberigu vin de la katenoj de tiu ĉi mondo, kaj eligu vian animon el la malliberejo de la memo. Kaptu la okazon, ĉar ĝi neniam revenos al vi.* – The Hidden Words (La Kaŝitaj Vortoj)

### Obeo

Sindono al Dio ligas sin kun senkondiĉa obeo al Liaj malkaŝitaj Ordonoj eĉ kiam la kialoj de tiuj ĉi Ordonoj ne estas komprenataj. Maristo senkondiĉe obeas ordonojn de sia kapitano, eĉ kiam li ne komprenas ilian kialon, sed lia subiĝo al la kapitano aŭtoritato ne estas blinda. Li scias tre bone ke la kapitano traservis provservadon, kaj donis sufiĉajn pruvojn de sia marista kompetenteco. Se ne estus tiel, li estus vere malsaĝulo konsentante servi sub lia komando. Tiel ankaŭ bahaano devas senkondiĉe obei la Kapitanon de sia Savo, sed vere li estus malsaĝa se li ne certiĝus antaŭe ke tiu ĉi Kapitano donis sufiĉajn pruvojn de fidindeco. Rifuzi, tamen, la obeon post la ricevo de tiuj ĉi pruvoj estus ankoraŭ pli malsaĝe, ĉar nur per inteligenta kaj koscia obeado al saĝa majstro ni povas plene profiti lian saĝecon, kaj akiri tiun ĉi saĝecon por ni mem. Estu la kapitano kiom ajn saĝa, se neniu el la ŝipanaro obeas lin kiamaniere la ŝipo povas atingi la havenon aŭ la maristoj lerni la maristarton? Kristo klare akcentis la neceson de tiu obeemo en la vojo de scio. Li diris: "Mia instruo ne estas mia, sed Ties, kiu min sendis. Se iu volas plenumi Lian volon, tiu scios pri la instruado, ĉu ĝi estas de Dio, ĉu mi parolis nur el mi mem." - S-ta Johano VII, 16-17. Simile Bahá'u'lláh diras: "Kredo je Dio, kaj kompreno pri Li, ne povas esti plene atingita alie ol ... per praktikado de ĉio kion Li ordonis kaj de ĉio kio estas malkaŝita en la Libro per la Plumo de la Gloro." – *Tablet of Tajalliyát*

Senkondiĉa obeemo ne estas virto populara en niaj demokrataj periodoj, kaj vere absoluta subiĝo al la volo de iu ajn homo estus katastrofa. Sed la Unueco de la Homaro povas esti atingita nur per plena harmonio de ĉiu kaj de ĉiuj kun la Dia Volo. Krom se tiu Volo estas konigita, kaj homoj forlasas ĉiujn aliajn gvidantojn kaj obeas la Disenditon, konfliktoj kaj malpacoj daŭras, kaj homoj plue kontraŭas unu la alian, forzante grandan parton de sia energio por nuligi penojn de siaj gefratoj, anstataŭ harmonie labori unu kun la alia por la Gloro de Dio kaj por la komuna bono.

### Servado

Sindono al Dio signifas ankaŭ vivon de servado al niaj kunhomoj. Ni povas servi Dion en nenia alia maniero. Se ni turnas la dorson al niaj kunuloj, ni turnas la dorson al Dio.

Kristo diris: "Kiom vi ne faris al ĉi tiuj la plej malgrandaj, tiom vi ne faris al mi." Simile Bahá'u'lláh diras: "Ho filo de homo! Se vi priatentas favoron, ne konsideru tion kio utilas al vi mem, sed alroĉu vin al tio kio utilas al la homaro. Se vi priatentas justecon, elektu por aliaj tion kion vi elektas por vi mem." – *Words of Paradise* (Vortoj el Paradizo).



Abdu'l-Bahá diras:

*En la Bahaa Kredo arto, sciencoj kaj ĉiaj metioj estas konsiderataj kiel preĝo. Homo kiu faras peceton de notpapero streĉante ĉiujn siajn kapablojn, konsciencie, koncentrante ĉiujn fortojn por ĝin perfektigi, estas gloranta Dion. Mallonge, ĉia peno kaj fortostreĉo de homo el la fundo de lia koro estas adoro, se ĝi estas diktitata de la plej altaj motivoj kaj de la deziro fari servon al la homaro. Tio ĉi estas preĝo: servi al la homaro kaj prizorgi bezonojn de la homoj. Servado estas preĝo. Kuracisto fleganta malsanulon, afable, kunsente, sen antaŭjuĝoj, kaj kredante la fratecon de la homa raso, plenumas glorakton.*

### Instruado

Vera bahaano ne nur kredas la instruojn de Bahá'u'lláh, sed ankaŭ trovas en ili gvidon kaj inspiron por la tuta vivo kaj ĝoje transdonas al aliaj la scion kiu estas la fonto de lia propra esto. Nur tiamaniere li povas ricevi plenmezure "la povon kaj konfirmon de la Spirito". Ne ĉiuj povas esti elokventaj oratoroj aŭ talentaj verkistoj, sed ĉiuj povas instrui "vivante laŭ la vivprincipoj". Bahá'u'lláh diras:

*La anaro de Bahá devas servi al la Eternulo kun saĝo, instrui aliajn per siaj vivoj, kaj elmontradi la lumon de Dio en siaj agoj. La efiko de agoj estas vere pli potenca ol tiu de vortoj. – Words of Paradise (Vortoj el Paradizo)*

La bahaanoj, tamen, en nenia okazo devas trudi siajn ideojn al tiuj kiuj ne volas aŭdi pri ili. Ili devas allogi homojn en la regnon de Dio, ne peni alpeli ilin tien. Ili devas esti kiel bona paŝtisto kiu kondukas siajn ŝafojn, kaj ĉarmas ilin per muziko, ne kiel alia kiu, de malantaŭe, pelas ilin per bastono kaj hundo.

Bahá'u'lláh diras en la Hidden Words (Kaŝitaj Vortoj):

*Ho Filo de Polvo! Saĝaj estas tiuj kiuj ne malfermas la buŝojn antaŭ ol trovi aŭskaltantojn, kiel verŝisto neniam proponas pokalon antaŭ ol trovi soifanton, kaj la amanto kiu ne elkrias el la profundo de la koro ĝis li rigardas la belecon de sia amatino. Do semu la semojn de saĝeco kaj scio en la puran grundon de la koro, kaj kaŝu ilin, ĝis la hiacintoj de la dia saĝeco kreskos el la koro kaj ne el koto kaj argilo.*

Denove Li diras en la Tablet of Ishráqát (La Tabuleto Ishráqát):

*Ho anaro de Bahá! Vi estas tagiĝlokoj de Amo kaj matenuĝoj de la Favoro de Dio. Ne malpurigu viajn langojn per abomeno kaj malbeno al iu ajn, kaj gardu viajn okulojn de tio kio ne estas inda. Elmontru tion kion vi posedas (t.e. la Veron). Se ĝi estos akceptita, la celo estos atingita. Se ne, vane estas riproĉi kaj diskuti kun tiu kiu malakceptas. Lasu lin al li mem, kaj iru pluen vian vojon al Dio, la Defendanto, la Mem-Subtena. Ne estu kaŭzo de ĉagreno, nek ja de konflikto kaj malpaco! Estas atendate ke vi ricevos nutron en la ombro de la arbo de la Dia Favoro kaj agos kiel Dio volas por vi. Vi ĉiuj estas folioj de unu arbo kaj gutoj de unu maro.*

### Afableco kaj Respektego

Bahá'u'lláh diras:

*Ho anaro de Dio! Mi alvokas vin al afableco. Afableco estas vere ... reĝo de ĉiuj virtoj. Benita estas tiu, kiu estas ornamita per mantelo de Nobleco kaj iluminita per lumo de Afableco. Al kiu estas donacita Afableco (aŭ Respektego) al tiu estas donacita granda rango. Estas esperate ke tiu ĉi Persekutato, kaj ĉiuj, atingos ĝin, al kroĉos sin kaj konformos al ĝi. Tio ĉi estas la Nerefutebla Ordonon kiu fluis el la plumo de la Plejsankta Nomo. – Tablet of the World (Tabuleto de la Mondo).*

Refoje Li denove ripetas: "Ĉiuj nacioj de la mondo interrilatu unu kun la alia en ĝojo kaj aromo. Interrilatu, ho homoj, kun anoj de ĉiuj religioj en ĝojo kaj aromo."

Abdu'l-Bahá diras en letero al amerikaj bahaanoj:

*Gardu vin! Gardu vin! Ke vi ne ofendu iun ajn koron! Gardu vin! Gardu vin! Ke vi ne vundu iun ajn animon! Gardu vin! Gardu vin! Ke vi ne estu malafablaj al iu ajn persono! Gardu vin! Gardu vin! Ke vi ne estu kaŭzo de malespero al iu ajn kreaĵo!*

*Se iu fariĝus kaŭzo de ĉagreno por iu ajn koro, aŭ de depremiteco por iu ajn animo, estus por li pli bone kaŝi sin en plej suban profundaĵon de la tero ol marŝi sur la tero.*

Li instruas ke kiel floro estas kaŝita en burĝono, tiel spirito de Dio loĝas en la koro de ĉiu homo, kiel ajn kruda kaj malagrabla estus lia eksteraĵo. Tial, vera bahaano devas rilati al ĉiu homo kiel ĝardenisto prizorganta maloftan kaj belan kreskaĵon. Li scias ke nenia malpacienca interveno de lia flanko povas florigi burĝonon; nur la sunbrilo de Dio povas fari tion, tial lia tuta celo estas transporti tiujn vivodonajn radiojn en ĉiujn senlumajn korojn kaj domojn.

Abdu'l-Bahá diras ankaŭ:

*Inter la instruoj de Bahá'u'lláh estas tiu kiu postulas de homo, en ĉiaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj, esti pardonema, ami sian malamikon kaj konsideri malbondeziranton kiel bondeziranton. Ne ke oni konsideru la alian kiel malamikon kaj tiam toleru lin ... kaj estu al li indulgema. Tio estas hipokriteco, ne vera amo. Ja, kontraŭe, vi devas vidi en viaj malamikoj amikojn, en viaj malbondezirantoj bondezirantojn kaj konforme trakti ilin. Viaj amo kaj afableco devas esti efektivaj ... ne nur toleremo, ĉar toleremo, kiu ne venas el la koro, estas hipokriteco.*

Tia konsilo ŝajnas nekomprenebla kaj kontraŭdirema ĝis ni ekkomprenas ke kvankam ekstera karnulo povas esti malamanto kaj malbondeziranto, ekzistas en ĉiuj interna, spirita naturo kiu estas vera homo, de kiu nur amo kaj bonvolo povas deveni. Al tiu ĉi efektiva, interna homo kaŝita en ĉiu el niaj najbaroj ni devas direkti niajn pensojn kaj amon. Kiam li vekiĝos al aktiveco, la ekstera homo estos ŝanĝita kaj refortigita.

### La Pekon-Nevidanta Okulo

En neniu rilato la bahaaj instruoj estas pli kategoriaj kaj senkompromisaj ol en la postulo ordonanta deteni sin de kritikado. Kristo parolis tre firme pri tiu sama temo, sed oni al kutimiĝis nun konsideri la Predikon sur la Monto kiel prezentantan "Konsilojn pri Perfekteco" neatingeblajn por ordinara kristano.

Kaj Bahá'u'lláh kaj Abdu'l-Bahá multe klopodas por klarigi ke pri tiu ĉi afero Ili signifas ĝuste kion Ili diras. Ni legas en la *Hidden Words* (Kaŝitaj Vortoj):

*Ho Filo de Homo! Ne flustro pekojn de aliaj dum vi mem estas pekanto. Se vi agas kontraŭe al tiu ĉi ordono, malbenita estos vi, kaj tion ĉi Mi atestas.*

*Ho Filo de Esto! Ne atribuu al iu ajn animo tion kion vi ne dezirus ke oni atribuu al vi mem, kaj ne diru tion kion vi ne plenumas. Tio ĉi estas Mia ordono al vi, obeu ĝin.*

Abdu'l-Bahá diras al ni:

*Silentu pri kulpoj de aliaj homoj, preĝu por ili; kaj per afableco helpu al ili korekti siajn kulpojn.*

*Rigardu ĉiam bonon ne malbonon. Se iu havas dek bonajn kvalitojn kaj unu malbonan, rigardu la dek kaj forgesu la unu; se iu havas dek malbonajn kvalitojn kaj unu bonan, rigardu la unu kaj forgesu la dek.*

*Neniam permesu al ni diri eĉ unu malafablan vorton pri alia homo, eĉ se tiu alia estus nia malamiko.*

Al amerika amiko Li skribas:

*La plej malbona kvalito de homo kaj la plej granda peko estas klaĉado, speciale kiam ĝi elfluas el la buŝoj de la kredantoj. Se povus esti elpensitaj iaj rimedoj por fermi eterne la pordon de klaĉado, kaj se ĉiu el la kredantoj je Dio sensigeligus sian buŝon nur por laŭdi aliajn, tiam la instruoj de Lia Sankteco Bahá'u'lláh estus disvastigitaj, la koroj estus iluminitaj, la spiritoj glorornamitaj, kaj la homa mondo atingus ĉiamdaŭran feliĉon.*

### Humileco

Dum Bahá'u'lláh ordonis al ni pardoni la kulpojn de aliaj, kaj vidi iliajn virtojn, Li ordonas al ni, aliflanke, elserĉi niajn proprajn kulpojn kaj turni nenan atenton al niaj virtoj. En la *Hidden Words* (Kaŝitaj Vortoj) Li diras:

*Ho Filo de Esto! Kial vi forgesis viajn proprajn kulpojn kaj ekokupis vin per kulpoj de la aliaj? Kiu faras tion estas kondamnita de Mi.*

*Ho Enmigrantoj! La lango ekzistas speciale por mencii Min, ne makulu ĝin per kalumnio. Se la fajro de via memo ekregas vin, memoru viajn proprajn kulpojn kaj ne la kulpojn de Miaj kreitaĵoj, ĉar ĉiu el vi estas pli konscia pri vi mem ol pri aliaj.*

Abdu'l-Bahá diras:

*Via vivo estu emanaĵo de la Regno de Kristo. Li ne venis por ricevi servojn, sed por esti servanto. ... En la religio de Bahá'u'lláh ĉiuj estas servantoj kaj servantinoj, fratoj kaj fratinoj. Kiam nur unu homo sentas sin iomete pli bona, iomete pli inda, ol la aliaj, li estas en danĝera stato, kaj se li ne forĵetos la semojn de tiu ĉi malbona penso, li ne estos taŭga ilo por la servado al la Regno.*

*Malkontenteco pri si mem estas signo de progreso. Homo kontenta pri si mem estas atestaĵo de Satano, kaj tiu kiu ne estas pri si kontenta estas atestaĵo de la Favra. Se iu havas mil bonajn kvalitojn li ne atentu ilin; ja kontraŭe, li penu eltrovi siajn mankojn kaj malperfektecojn. ... Kiom ajn homo povas progresi, li tamen restas neperfekta, ĉar ĉiam estas celo antaŭ li. Kiam li ekrigardas al tiu celo li eksentas malkontentecon pro siaj propraj kondiĉoj, kaj ekdeziras atingi la celon. Memlaŭdo estas signo de egoismo. – Diary of Mirzá Ahmad Sohrab, 1914 (Taglibro de Mirzá Ahmad Sohrab)*

Kvankam Bahá'u'lláh ordonas ke ni rekonu al ni niajn pekojn kaj pentu pro ili, la konfesado al pastroj aŭ aliaj estas definitive malpermesita. Li diras en la Glad Tidings (Gojaj Sciigoj):

*Kiam la koro de pekulo estas libera de ĉio krom Dio, li devas serĉi pardonon sole ĉe Dio. Konfeso antaŭ servantoj (t.e. antaŭ homoj) ne estas permesita, ĉar ĝi ne estas rimedo nek kaŭzo de la Dia Pardon. Tia konfeso antaŭ la kreitaĵoj kondukas al humiligo kaj malaltigo de la homo, kaj Dio - laŭdata estu Lia Gloro - ne deziras humiligon de Siaj servantoj. Vere Li estas Kompatema kaj Bonfarema. La pekulo devas, inter si mem kaj Dio, petegi kompaton el la Maro de Kompato kaj preĝi pardonon el la Ĉielo de Korfavoro.*

### Veramo kaj Honesteco

Bahá'u'lláh diras en la *Tablet of Tarázát* (Tabuleto Tarázát):

*Vere, Honesteco estas pordo de trankvileco por ĉiu en la mondo, kaj signo de gloro el la ĉeesto de la Kompatema. Kiu atingis ĝin atingis la trezorojn de bonstato kaj prospero. Honesteco estas la plej granda pordo al sendanĝereco kaj trankvilo de la homaro. La firmeco de ĉiu afero ĉiam dependas de ĝi, kaj la mondoj de honoro, gloro kaj prospero estas iluminataj per ĝia lumo ...*

*Ho anaro de Bahá! Honesteco estas la plej bona vesto por viaj tempoj kaj plej grandioza krono por viaj kapoj. Alprenu ĝin per la Ordon de la Ĉionpova Ordonanto.*

Aliloke Li diras: "La principo de la kredo estas malmultigi vortojn kaj multigi agojn. Tiu kies vortoj superas liajn agojn, sciu vere, ke lia neekzisto estus pli bona ol lia ekzisto, lia morto pli bona ol la vivo. – *Words of Wisdom* (Vortoj de Saĝeco).

Abdu'l-Bahá diras:

*Veramo estas la fundamento de ĉiuj homaj virtoj. Sen veramo, progreso kaj sukceso en ĉiuj el la mondoj estas eblaj al neniu. Kiam tiu ĉi sankta atribuo evidentiĝas en homo, realiĝos ankaŭ ĉiuj la aliaj diaj kvalitoj.*

*La lumo de veramo kaj honesteco brilu el viaj vizaĝoj por ke ĉiuj sciu ke via promeso, ĉu en la laboro aŭ en plezuro, estas promeso fidinda kaj certa. Forgesu la memon kaj penu por la homaro. (mesaĝo al la londonaj bahaanoj, oktobro 1911)*

### Sin-Realigo

*Bahá'u'lláh insistas senĉese ke homoj realigu kaj donu plenan esprimon al la perfektecoj kaŝitaj en ili ke ili realigu la veran internan memon tiel diferencon de la limigita ekstera memo, kiu estas en plej bona okazo nur sanktejo, kaj tro ofte malliberejo de la vera homo. En la Hidden Words (Kaŝitaj Vortoj) Li diras:*

*Ho Filo de Esto! Per la mano de povo Mi faris vin kaj per la fingroj de potenco Mi kreis vin. En vin Mi lokis la esencon de Mia lumo; tial konfidu al ĝi kaj ne serĉu ion alian; ĉar Mia verko estas perfekta kaj Mia ordono estas deviga. Ne dubu pri tio, nek estu necerta.*

*Ho Filo de Spirito! Mi kreis vin riĉa, kial vi faras vin malriĉa? Mi kreis vin nobla, kial vi malnobligas vin? El la esenco de scio Mi donis al vi estecon, kial vi serĉas komprenon de alia ol Mi? El la argilo de amo Mi formis vin, kial vi okupas vin pri alia? Turnu vian rigardon al vi mem, por ke vi ekvidu Min starantan en vi, fortan, potencan kaj memekzistantan.*

*Ho Mia Servanto! Vi estas kiel glavo de mirindaj hardeco kaj brilo kaŝita en malluma glavingo kaj pro tio ĝia valoro restas kaŝita de la metiistoj. Eliĝu do el la ingo de memo kaj deziro por ke via hardeco ekfulmu brilege al la tuta mondo.*

---

*Ho Mia Amiko! Vi estas la tagstelo sur la ĉielo de Mia sankteco; gardu ke malpuraĵoj de la mondo ne mallumigu vian brilegon. Disŝiru la vualon de senzorgeco, por ke vi sen vualoj kaj kovraĵoj eliĝu plenlume kaj ornamu ĉiujn estaĵojn per la robo de la vivo.*

La vivo al kiu Bahá'u'lláh alvokas Siajn sekvantojn estas sendube vivo tiel nobla ke en la tuta sfero de homaj ebloj estas nenio pli altideala kaj bela ol kion oni povus celi. Realigo pri la spirita esenco interne de ni signifas realiĝon pri la alta vero ke ni devenas de Dio kaj al Li ni revenos. Tiu reveno al Dio estas glorinda celo por bahaano; sed la sola vojo por atingi tiun ĉi celon estas oboe al Liaj elektitaj Senditoj, kaj speciale al Lia Sendito por la tempo en kiu ni vivas, Bahá'u'lláh, la Profeto de la Nova Epoko.

## ĈAPITRO VI: PREĜO

*Preĝo estas ŝtuparo per kiu ĉiu povas levi sin al la Ĉielo. – Mahometo*

### Interparolado kun Dio

"Preĝo", diras `Abdu'l-Bahá, "estas konversacio kun Dio". Por ke Dio povu konigi al homoj Siajn Penson kaj Volon, Li devas paroli al ili en lingvo kiun ili povas kompreni, kaj Li faras tion per la buŝoj de Siaj Sanktaj Profetoj. Kiam tiuj Profetoj estas korpe vivantaj ili parolas al homoj vizaĝo kontraŭ vizaĝo kaj transdonas al ili la revelacion de Dio: post lia morto la revelacio plue efikas homajn mensojn per liaj kronikaj diraĵoj kaj skribaĵoj. Sed tio ĉi ne estas la sola maniero, per kiu Dio povas paroli al homoj. Ekzistas "lingvo de la Spirito", sendependa de parolo aŭ skribo, per kiu Dio povas interparoli kaj inspiri tiujn kies koroj serĉas la veron, kie ajn ili estas, kaj kia ajn estas ilia nacio aŭ lingvo. En tiu ĉi lingvo la Malkaŝanto daŭrigas Sian interparoladon kun la kredantoj post Sia foriro el la materiala mondo. Kristo interparoladis plue kaj inspiradis Siajn disĉiplojn post Sia krucumo. Fakte Li influadis ilin eĉ pli potence ol antaŭe; tiel same okazadis kun aliaj Profetoj. `Abdu'l-Bahá multe parolas pri tiu ĉi spirita lingvo. Li diras, ekzemple:

*Ni devas paroli en la lingvo de la ĉielo en la lingvo de la spirito - ĉar ekzistas lingvo de la spirito kaj koro. Ĝi tiel diferencas de nia lingvo kiel nia propra lingvo diferencas de tiu ĉe bestoj, kiuj esprimas sin nur per krioj kaj sonoj.*

*La lingvo en kiu ni parolas al Dio estas la lingvo de la spirito. Kiam, preĝante, ni estas apartigitaj de ĉiuj eksteraj aferoj kaj turnas nin al Dio, tiam en niaj koroj ni kvazaŭ aŭdas la voĉon de Dio. Sen vortoj ni parolas, vokas, komuniĝas kun Dio kaj aŭdas la respondon. ... Ĉiu el ni, atinginte la ĝustan spiritan staton, povas aŭdi la Voĉon de Dio. (el prelego priskribita de f-ino Ethel J. Rosenberg)*

Bahá'u'lláh deklaras ke la pli altaj spiritaĵoj povas esti komunikitaj nur danke al tiu ĉi spirita lingvo. Vortoj parolataj aŭ skribitaj estas tute sentaŭgaj. En libreto nomita *The Seven Valleys* (La Sep Valoj), en kiu Li priskribas vojiradon de vojaĝanto de la surtera loĝejo ĝis la Dia Hejmo, Li diras, parolante pri la pli antaŭenigitaj gradoj de la vojaĝo:

*La lango ne kapablas rakonti pri tio, kaj vortoj parolataj estas nesufiĉegaj. La plumo estas neutila en tiu ĉi afero, kaj la inko postlasas nenion krom nigreco. ... Nur koro povas komuniki al koro la staton de la komprenanto: tio ne estas tasko de sendito, ĝi ankaŭ ne povas esti ampleksita en leteroj.*

### La Spirita Sinteno

Por ke ni povu atingi la spiritan staton en kiu la komuniĝado kun Dio fariĝas ebla, kiel diras `Abdu'l-Bahá:

*Ni devas peni atingi tiun staton per apartiĝo de ĉiuj aferoj kaj personoj de la mondo kaj per sinturno ekskluzive al Dio. La atingo de tiu ĉi stato kostos al homo iom da peno, sed li devas strebi, li devas klopodi por tio. Ni povas ĝin atingi se ni pensos kaj zorgos malpli pri la materialaj kaj pli multe pri la spiritaĵoj. Ju pli ni foriras de la unua, des pli ni proksimiĝas al la alia. La elekto apartenas al ni.*

*Nia spirita perceptemo, niaj internaj okuloj devas esti malfermitaj, por ke ni povu vidi en ĉio signojn kaj pruvojn de la Dia Spirito. Ĉio povas reflekti al ni la lumon de la Spirito. (el parolado priskribita de f-ino Ethel J. Rosenberg)*

Bahá'u'lláh skribis: "Tiu strebanto ... je ĉiu mateniĝo ... komuniĝu kun Dio, kaj, per la tuta animo, persistu celi al sia Amato. Li forigu ĉiun kaprican penson per la flamo de Lia aminda nomo. ..." – *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh*, p. 265 (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh).

Simile, `Abdu'l-Bahá deklaras:

*Kiam homo permesas al la spirito, pere de la animo, lumini lian komprenadon, tiam li enhavas la tutan kreitaĵaron. ... Sed aliflanke, kiam homo ne malfermas la menson kaj koron al la benoj de la spirito, sed turnas la animon al materialaĵoj, al la korpa parto de sia naturo, tiam li estas falinta de sur la altaĵo kaj li subiĝas al la membroj de la malsupera bestoregno.*

Kaj Bahá'u'lláh skribis:

*Liberigu viajn animojn, ho homoj, el la katenoj de memo, kaj purigu ilin de ĉiu aliĝo al ĉio krom Mi. Memorado pri Mi forigas ĉiun malpuraĵon, se vi nur povus kompreni tion. ...*

*Kantu, ho Mia servanto, la versojn de Dio donitaj al vi, ... por ke la dolĉeco de via melodio flamigu vian propran animon, kaj allogu la korojn de ĉiuj homoj. Kiu ajn ripetas, en la privateco de sia ĉambro, la versojn malkaŝitajn de Dio, la dissemantaj anĝeloj de la Ĉionpova disvastigos la aromon de la vortoj de ties buŝo ... – Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh, pp. 294-295 (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh)*

### Neceso de Peranto

Koncerne tion ĉi 'Abdu'l-Bahá diras:

*Estas necesa peranto inter homo kaj la Kreinto - iu kiu ricevas la plenan lumon de la Dia Brilego kaj disradias ĝin tra la homa mondo, kiel la tera atmosfero ricevas kaj disvastigas la varmon de la sunradioj.*

*Kiam ni deziras preĝi, ni devas havi ian objekton pri kiu ni povas koncentriĝi. Se ni turnas nin al Dio, ni devas direkti la korojn al definitiva centro. Se lumo adoras Dion alie ol per Lia Manifestanto, li devas unue formi al si koncepton pri Dio, kaj tiu ĉi koncepto estas kreita de lia propra menso. Ĉar la limhava ne povas kompreni la Senfinan, Dio ne povas esti komprenita tiamaniere. Tion kion homo elpensas el sia propra menso li komprenas. Tio kion li povas kompreni ne estas Dio. Tiu koncepto pri Dio kiun homo formas al si estas nur vantaĝo, imagaĵo, fantaziaĵo, iluzio. Nenio komuna ekzistas inter tia koncepto kaj la Plejsupra Estaĵo.*

*Se homo deziras ekkoni Dion, li devas serĉi Lin en la perfekta spegulo, Kristo aŭ Bahá'u'lláh. En ambaŭ tiuj ĉi speguloj li vidos la reflektitan Sunon de Dieco.*

*Kiel la fizikan sunon ni konas laŭ ĝiaj brilego, lumo kaj varmo, tiel ankaŭ Dion, la Spiritan Sunon, brilantan el la sankteco de Malkaŝanto, ni ekkonas laŭ Liaj atribuoj de perfekteco, laŭ la beleco de Liaj kvalitoj kaj laŭ la brilego de Lia lumo. (el interparolo kun s-ro Percy Woodcock, en Akreo, 1909)*

Aliloke Li diras:

*Sen la perado de la Sankta Spirito, oni ne povas atingi rekte la malavaraĵojn de Dio. Ne ignoru la evidentan veron, ĉar estas memkompreneble ke infano ne povas esti edukita sen instruisto, kaj sciado estas unu el la malavaraĵoj de Dio. Grundo ne estus kovrita per herboj kaj vegetaĵoj sen pluvo el nubo, tial la nubo estas perilo inter la Diaj malavaraĵoj kaj la grundo. ... Lumo havas sian centron kaj se iu deziras serĉi ĝin alie ol el ĝia centro, li neniam atingos ĝin. ... Turnu la atenton al la tagoj de Kristo; kelkaj imagis ke estas eble atingi la veron sen la Mesiaj eldiraĵoj, sed ĝuste tiu ĉi imaga kaŭzis al ili la seniĝon de la vero.*

Homo kiu penas adori Dion alimaniere sen turni sin al Lia Manifestanto estas kvazaŭ homo en malliberejo penanta per sia imaga ĝui la ĉarmon de la sunbrilo.

### Preĝado Necesa kaj Deviga

La preĝado estas ordonita al bahaanoj per esprimoj tute eksterdubaj. Bahá'u'lláh diras en Kitáb-i-Aqdas:

*Kantu (aŭ ripetu) la Vortojn de Dio ĉiumatene kaj ĉiuvespere. Kiu malatentas tion tiu malfideliĝis al la Interligo de Dio kaj al Lia interkonsento, kaj kiu fortunias sin de ĝi estas el tiuj kiuj fortunias sin de Dio. Timu Dion, ho mia popolo! Ne fieru pro superkvanta legado (de la Sanktaj Vortoj) kaj pro agoj en tago kaj nokto. Kanti nur unu verson kun ĝojo kaj kontenteco estas por vi pli bone ol tralegi ĉiujn Revelaciojn de la Ĉionpova Dio senatente. Kantu la Tabuletojn de Dio tiagrade ke ne ekregu vin laceco kaj depremiĝo. Ne ŝarĝadu la animon ĝis plena senfortiĝo kaj elĉerpiĝo, sed kontraŭe refreŝigu ĝin por ke ĝi povu flugi per la flugiloj de la Revelacio ĝis la Tagiĝloko de pruvoj. Tio proksimigos vin al Dio, se vi estus ja el tiuj, kiuj komprenas. – Kitáb-i-Aqdas.*

Abdu'l-Bahá diras al korespondanto: "Ho vi spirita amiko! Sci ke preĝado estas necesa kaj deviga, kaj nenia preteksto kia ajn ĝi estus liberigas homon de ĝi esceptante nur se li estas mense malsana aŭ nevenkebla baro malpermesas ĝin al li."

Alia korespondanto demandis: "Kial preĝi? Kia estas La senco de tio ĉi, konsiderante ke Dio starigis ĉion kaj aranĝas ĉiujn aferojn laŭ la plej bona ordo; kia, do, estas la senco se oni petegas kaj preĝas, prezentas siajn bezonojn kaj serĉas helpon?"

Abdu'l-Bahá respondis:

*Sciu, vere, ke taŭgas al malfortulo preĝoturni sin al la Fortulo, kaj necesas al tiu kiu serĉas favoron petegi helpon de la Glora Favoranto. Kiam homo preĝas al la Eternulo, turnas sin al Li kaj serĉas favoron en Lia Oceano, tiu preĝo donas lumon al lia koro, klerecon al lia vido, vivon al lia animo kaj ekstazon al lia estaĵo.*

*Kiam vi preĝas al Dio kaj ripetas, "Via Nomo estas mia kuraco," konsideru kiom via koro estas ĝojigita, via animo ravita per la spirito de amo al Dio, kaj via menso allogita al la Regno de Dio! Per tia alĉarmado pligrandiĝas la homaj povo kaj kapablo. Kiam la ujo estas pligrandigita la akvo plimultiĝas, kaj kiam kreskas*

*soifo la donaco de nuboj fariĝas agrabla al la homa gusto. Tio ĉi estas la mistero de preĝado kaj la esenco de prezentado de siaj bezonoj.* (el tabuleto al amerika kredanto, tradukita de `Alí Kulí Khán, oktobro 1908)

Bahá'u'lláh revelaciis tri ĉiutagajn preĝojn devigajn. La kredantoj rajtas elekti unu el tiuj ĉi tri preĝoj, sed ili devas ripeti unu el ili, kaj laŭ la maniero difinita de Bahá'u'lláh.

### Komuna Preĝado

La preĝoj ordonitaj de Bahá'u'lláh kiel ĉiutaga devo al bahaanoj estas privataj. Nur okaze de la Preĝo por Mortintoj ordonis Bahá'u'lláh komunan preĝon, kaj la sola postulo estas ke tiu kiu laŭtlegas ĝin, kaj ĉiuj ĉeestantoj, staru. Tio malsimilas al la islama kutimo de komuna preĝo dum kiu la kredantoj viciĝas malantaŭ imamo, kiu kondukas la preĝon. Tio estas malpermesita en la Bahaa Kredo.

Tiuj ordonoj, kiujn Bahá'u'lláh faris rilate al forigo de profesia pastraro, tute ne signifas ke Li senvalorigas Diservojn. Koncerne la valoron de unuigitaj kaj komunaj preĝoj, `Abdu'l-Bahá diris jene:

*Oni povas diri: "Mi povas preĝi al Dio kiam ajn mi volas, kiam la sentoj de mia koro estas turnitaj al Dio; kiam mi estas en sovaĝejo, kiam mi estas en urbo, aŭ kie ajn mi estas. Kial mi devas iri kie aliaj kunvenas en speciala tago, je difinita horo, por unuigi miajn preĝojn kun la iliaj, se mi eble ne havas tiam la inklinon al preĝo?"*

*Tia penso estas vana imagaĵo, ĉar kiam multaj personoj estas kuniĝintaj ilia forto estas pli granda. Unuopaj soldatoj batalantaj aparte kaj individue ne havas la forton de unuigita armeo. Se ĉiuj soldatoj en tiu ĉi spirita milito kuniĝas, iliaj unuigitaj spiritaĵoj sentoj helpas unu la alian, kaj iliaj preĝoj fariĝas akceptindaj.* (el notoj de f-ino Ethel J. Rosenberg)

### Preĝo estas La Lingvo de Amo

Al iu kiu demandis ĉu preĝo estas necesa, ĉar supozeble Dio konas la dezirojn de ĉiuj koroj, `Abdu'l-Bahá respondis:

*Se unu amiko amas alian, ĉu ne estas nature ke li deziras diri tion? Kvankam li scias, ke la amiko komprenas ke li amas lin, ĉu li tamen ne deziras diri tion al li? ... Estas vere ke Dio konas la dezirojn de ĉiuj koroj; sed la impulso al preĝo estas natura, fluanta el la amo de homo al Dio.*

*... Nenecesas ke preĝo troviĝu en vortoj, sed en pensoj kaj en agoj. Sed se tiuj amo kaj deziro forestas, vane estas la penado altrudi al ili. Vortoj sen amo signifas nenion. Se iu parolas al vi kvazaŭ pro malagrabla devo, sen amo aŭ plezuro en la renkontiĝo kun vi - ĉu vi deziras interparoli kun li? (artikolo en Fortnightly Review, julio-decembro 1911, p. 184, de f-ino E. S. Stevens)*

En alia parolo Li diris:

*En la plej alta preĝo, oni preĝas nur pro la amo al Dio, ne pro tio ke oni timas Lin aŭ inferon, aŭ esperas favoron aŭ ĉielon. ... Kiam homo ekamas alian homon, li ne povas sin deteni de ne mencii la nomon de la amato. Kiom multe pli malfacile estas sin deteni de ne mencii la Nomon de Dio kiam oni Lin ekamis. ... Spirita homo trovas plezuron en nenio krom la rememorado pri Dio.* (el notoj de f-ino Alma Robertson kaj aliaj pilgrimantoj, novembro kaj decembro 1900)

### Liberiĝo de Sortobatoj

Laŭ la instruoj de la Profetoj, malsanoj kaj aliaj formoj de sortobatoj estas ŝuldataj al malobeo al la Diaj Ordonoj. Eĉ malfeliĉojn devenantajn de inundegoj, uraganoj, kaj tertremoj `Abdu'l-Bahá atribuas nerekte al tiu ĉi kaŭzo.

La sufero kiu sekvas la kulpon ne havas la karakteron de venĝo, sed estas instruiga kaj kuraciga. Ĝi estas la Voĉo de Dio avertanta la homon ke li flankeniĝis de la ĝusta vojo. Se la sufero estas terura, ĝi estas pro tio ke la danĝero de la malbonfarado estas pli terura, ĉar "la repago por peko estas morto".

Kiel malfeliĉo estas kaŭzita de la malobeo, tiel ankaŭ liberiĝo de la malfeliĉo povas esti atingita nur per la obo. En tiu ĉi afero estas neniam hazardoj nek malfaciĝoj. Turniĝo for de Dio neeviteble sekvigas sortobatojn, kaj sinturno al Dio tiel same neeviteble sekvigas benon.

Ĉar, tamen, la tuta homaro estas unu organismo, la bonstato de ĉiu individuo dependas ne nur de lia persona konduto, sed ankaŭ de tiu ĉi de liaj najbaroj. Se unu agas malbone, ĉiuj suferas en pli aŭ malpli granda grado; same se unu agas bone, ĉiuj profitas. Ĉiu devas, iaparte, porti la ŝarĝojn de siaj najbaroj, kaj la plej bonaj el la homaro estas tiuj kiuj portas la plej

grandajn ŝarĝojn. Sanktuloj ĉiam suferis multege; Profetoj suferis ekstermezure. Bahá'u'lláh diras en la Book of Íqán (Libro Íqán): "Sendube oni informis vin pri la malfacilaĵoj, la malriĉeco, la malsanoj, kaj la malrespekto kiuj trafis ĉiun Dian Profeton kaj Liajn kunulojn. Sendube vi aŭdis kiel la kapoj de iliaj sekvantoj estis donace sendataj en diversajn urbojn. ..." – *Kitáb-i-Íqán*, p. 73

Ne estas pro tio ke la sanktuloj kaj Profetoj meritas la punon super aliaj homoj. Ja, ili ofte suferas pro la pekoj de la aliaj, kaj ili suferas propravole, por la aliaj. Ili celas la bonstaton de la mondo, ne la propran. Vera amanto de la homaro preĝas ne ke li, kiel individuo, evitu malriĉecon, malsanon aŭ sortobaton, sed ke la homaro estu savita de nescio kaj pekado kaj de la malbonoj kiuj nepre rezultas el ili. Se li deziras sanon aŭ riĉecon por si mem, ĝi estas por tio ke li povu servi la Regnon, kaj se la korpa sano aŭ riĉeco estas al li rifuzita, li akceptas sian sorton kun "radianta akceptemo", bone sciante ke ekzistas justa saĝeco en ĉio kiu okazis al li sur la vojo de Dio.

Abdu'l-Bahá diras:

*Ĉagrenoj kaj malĝojoj ne venas al ni hazarde; ili estas senditaj de la Dia Favoro por nia perfektigo. Kiam venas ĉagreno kaj malĝojoj, tiam la homo rememoras sian Patron Kiu estas en la Ĉielo, kaj Kiu havas la povon savi lin el liaj malfacilaĵoj. Ju pli granda estas lia punsufero, des pli granda estos la rikolto de la spiritaĵo virtoj elmontritaj de li.*

Unuavide povas ŝajni tre maljusta afero, ke senkulpulo suferu pro kulpulo, sed `Abdu'l-Bahá certigas ke tiu maljustaĵo estas nur laŭŝajna kaj ke, finfine, superos perfekta justeco. Li skribas:

*Koncerne etulojn, infanojn kaj malfortulojn kiuj estas afliktataj per la manoj de premantoj ... por tiuj animoj estas rekompenco en la alia mondo ... tiu suferado estas la plej granda favoro de Dio. Vere tiu favoro de la Eternulo estas multe pli bona ol la bonstato de tiu ĉi mondo kaj la kreskado kaj evoluado apartenantaj al tiu ĉi loko de mortemeco.*

### Preĝo kaj la Leĝoj de la Naturo

Multaj trovas malfacilaĵojn en la ekkredo je la efikeco de preĝoj ĉar ili opinias ke respondo al la preĝo prezentus arbitran konflikton kun la leĝoj de la naturo. Analogio povas helpi nin klarigi tiun malfacilaĵon. Kiam oni tenas magneton super feraj fajlaĵoj ĉi tiuj estas altirataj supren kaj kroĉas sin al ĝi; sed ĉi tio prezentas nenian konflikton kun la leĝo de gravito. La forto de la gravito influas la fajlaĵojn kiel antaŭe. Tio kio okazis estas tiel ke oni intervenigis superan forton, alian forton kies agado estas tiel same regula kaj kalkulebla kiel tiu de la gravito. La bahaa vidpunkto estas ke preĝo intervenigas agadon de pli altaj fortoj, ĝis nun relative malmulte konataj; sed ŝajnas tute senracie kredi ke tiuj ĉi fortoj estas pli arbitraj en sia agado ol la korpaj fortoj. La diferenco konsistas en tio ke ili ne estas ankoraŭ plenstuditaj kaj eksperimente esploritaj, kaj ilia agado ŝajnas al ni mistera kaj nekalkulebla pro nia nescio.

Alia malfacilaĵo kiun kelkaj opinias konfuza estas ke preĝo ŝajnas esti forto tro malgranda por kaŭzi la grandegajn rezultatojn pretendatajn por ĝi. Analogio povas servi por klarigi ankaŭ tiun ĉi malfacilaĵon. Malgranda forto, aplikata al kluzpordo de akvujo, povas liberigi kaj reguligi fortegan fluon de akvopovo, aŭ, aplikita al direktilo de oceana ŝipo, povas direkti la iradon de tiu grandega ŝipo. Laŭ la bahaa vidpunkto, la povo kiu venigas la respondojn al preĝoj estas la neelĉerpebla Povo de Dio. La tasko de la preĝanto estas nur uzi la negrandan forton necesan por liberigi la fluon aŭ difini la direkton de la Dia Malavareco, kiu estas ĉiam preta servi al tiuj kiuj ellernis ĝin uzi.

### Bahaaj Preĝoj

Bahá'u'lláh kaj `Abdu'l-Bahá malkaŝis sennombrajn preĝojn por la uzo de Siaj sekvantoj en diversaj tempoj kaj en diversaj okazoj. La grandeco de la koncepto kaj la profunda spiriteco malkaŝitaj en tiuj vortoj devas imponi ĉiun penseman studenton, sed nur farante ilin regula kaj grava parto de sia vivo oni povas plene kompreni ilian signifon kaj vere realigi ilian forton. Malfeliĉe, la konsidero je la spaco malpermesas al ni doni pli ol kelkajn mallongajn specimenojn de tiuj ĉi preĝoj. Por pluaj ekzemploj la legantoj devas sin turni al aliaj libroj.

*Ho mia Dio! Faru, ke Via belo estu mia nutraĵo, Via kunesto mia trinkaĵo, kaj Via deziro mia espero, kaj laŭdoj al Vi mia agado, kaj memorado pri Vi mia akompananto, kaj la potenco de Via suvereneco mia helpanto, kaj Via loĝejo mia hejmo, kaj mia restadejo la loko kiun Vi sanktigis de la limoj altruditaj sur tiuj kiuj estas kvazaŭ vualitaj de Vi. Vi estas, vere, la Ĉionpova, la Ĉielglora, la Plej Potenca. – Bahá'u'lláh*

*Mi atestas, ho mia Dio, ke Vi kreis min por ke mi konu kaj adoru Vin. Mi atestas, ĉi-momente, pri mia senforteco kaj pri Via potenco, pri mia malriĉeco kaj pri Via riĉeco. Ne ekzistas alia Dio krom Vi, la Defendanto, la Mem-Ekzistanto. – Bahá'u'lláh*



*Ho mia Dio! Ho mia Dio! Unuigu la korojn de Viaj servantoj, kaj malkaŝu al ili Vian grandan celon. Ili sekvu Viajn ordonojn kaj estu fidelaj al Via leĝo. Helpu ilin, ho Dio, en ilia penado, kaj donu al ili forton por servi al Vi. Ho Dio! ne forlasu ilin al ili mem, sed gvidu iliajn paŝojn per la lumo de scio, kaj ĝojigu iliajn korojn per Via amo. Vere, Vi estas ilia helpanto kaj ilia Eternulo. – Bahá'u'lláh*

*Ho Vi bona Dio! Vi kreis ĉiujn homojn el la samaj prapatroj. Vi dekretis ke ĉiuj apartenu al la sama rondo familia. En Via Sankta Apudesto ili ĉiuj estas Viaj servantoj, kaj al la tuta homaro Vi donis rifuĝon en Via Sanktejo. Ĉiuj kunvenis ĉe la Tablo de Via Malavareco; ĉiuj estas iluminitaj per la lumo de Via Providenco.*

*Ho Dio! Vi estas bona al ĉiuj, Vi pretigas provizon por ĉiuj, donas rifuĝon al ĉiuj, donacis vivon al ĉiuj; ĉiun kaj ĉiujn Vi favoris per talentoj kaj kapabloj, kaj ĉiuj estas banitaj en la Oceano de Via favoro.*

*Ho Vi bonkora Eternulo! Unuigu ĉiujn. Permesu ke la religioj interakordiĝu kaj faru ĉiujn unu nacio, por ke ĉiu konsideru la alian kiel membron de tiu sama familio kaj la tutan teron kiel unu hejmon, kaj ke ĉiuj kunvivu en perfekta harmonio.*

*Ho Dio! Levu alten la standardon de la unueco de la homaro.*

*Ho Dio! Starigu la Plej Sanktan Pacon. Cementu la korojn unu kun la alia, ho Dio.*

*Ho vi bona Patro, Dio! Ĝojigu niajn korojn per la aromo de Via amo. Lumigu niajn okulojn per la Lumo de Via Gvidado. Feliĉigu niajn orelojn per la melodio de Via vorto, kaj enfermu ĉiujn en la Rifuĝejo de Via Providenco.*

*Vi estas la Potenca kaj Povanta, Vi estas la Pardonanta kaj Vi estas Tiu Kiu indulgas la erarojn de ĉiuj homoj! – `Abdu'l-Bahá*

*Ho Vi Ĉionpova! Mi estas pekulo, sed Vi estas la Pardonanto! Mi estas plena de mankoj, sed Vi estas la Kompatema! Mi estas en la mallumo de eraroj, sed Vi estas la Lumo de Pardon!*

*Tial, ho Bona Dio, pardonu miajn pekojn, favordonu Viajn Donacojn, indulgu miajn kulpojn, pretigu por mi rifuĝon, profundigu min en la Fonto de Via Pacienco kaj resanigu nin el ĉiuj malsanoj kaj malfortecoj.*

*Purigu kaj sanktigu min. Permesu al mi partopreni en la elfluo de sankteco, por ke ĉagrenoj kaj malĝojoj malaperu, por ke ĝojo kaj feliĉo venu sur min, malgajeco kaj senespereco ŝanĝu sin en ĝojon kaj fidon, kaj kuraĝo okupu la lokon de timo.*

*Vere Vi estas la Pardonanto, la Kompatema, kaj Vi estas la Malavara, la Amata! – `Abdu'l-Bahá*

*Ho Vi kompatema Dio! Dankoj estu al Vi pro tio ke Vi vekis kaj konsciigis min. Vi donis al mi vidantajn okulojn kaj donacis al mi aŭdantajn orelojn. Vi kondukis min al Via Regno kaj gvidis min sur Vian Vojon. Vi montris al mi la ĝustan direkton kaj igis min eniri la Arkeon de Saviĝo. Ho Dio! Igu min esti konstanta, firma kaj fidela.*

*Protektu min de teruraj provoj kaj gardu kaj ŝirmu min en la fortikaĵo de Viaj Sankta Interligo kaj Testamento.*

*Vi estas la Potenca! Vi estas la Vidanta! Vi estas la Aŭdanta! Ho Vi Kompatema Dio! Donacu al mi koron, kapablan por esti iluminita, kiel spegulo, per la Lumo de Via amo; inspiru min per pensoj kapablaj por ŝanĝi la mondon en rozĝardenon per Via Spirita Malavareco. Vi estas la Kompatema, la Malavara! Vi estas la Granda, Bonfara Dio! – `Abdu'l-Bahá*

Bahaa preĝo ne estas, tamen, limigita al la uzado de la difinitaj formoj, kiel ajn gravaj ili estu. Bahá'u'lláh instruas ke la tuta vivo de homo devas esti preĝo, ke laboro plenumita en la ĝusta animstato estas ador-akto, ke ĉiu penso, vorto kaj faro dediĉita al la Gloro de Dio kaj al la bono de proksimumo estas preĝo, en la plej vera senco de la vorto.<sup>1</sup>

<sup>1</sup> Koncerne la propertajn preĝojn, rigardu ĉap. XI.

## ĈAPITRO VII: SANO KAJ KURACADO

*Turni la vizaĝon al Dio donas sanon al la korpo, menso kaj animo.* - `Abdu'l-Bahá

### Korpo kaj Animo.

Laŭ la bahaaj instruoj homa korpo servas kiel dumtempa ilo por la evoluigo de la animo, kaj, kiam tiu celo estas atingita, ĝi estas demetita. Tiel same ovo-ŝelo servas kiel dumtempa ilo por la maturiĝo de birdido, kaj, kiam tiu celo estas atingita, ĝi estas rompita kaj forĵetita. `Abdu'l-Bahá diras ke la korpo estas nekapabla al senmorteco, ĉar ĝi estas aĵo kombinita, konstruita el atomoj kaj molekuloj, kaj, kiel ĉiu objekto kombinita, ĝi devas siatempe esti malkombinita.

La korpo devas esti servanto de la animo, neniel ĝia mastro, sed ĝi devas esti volonta, obeema kaj kapabla servanto, kaj devas ricevi la konsideradon kiun meritas bona servanto. Se ĝi ne estas ĝuste konsiderata, sekvas malsanoj kaj malfeliĉoj, kun rezultoj plorindaj por la mastro kiel ankaŭ por la servanto.

### Unueco de Ĉiuj Vivoj.

La esenca unueco de vivo en ĉiuj ĝiaj miriadaj formoj kaj gradoj estas unu el la fundamentaj instruoj de Bahá'u'lláh. Nia korpa sano estas tiel ligita kun la sano mensa, morala kaj spirita, kaj ankaŭ kun individua kaj sociala farto de aliaj homoj, plie, eĉ kun la vivo de bestoj kaj kreskaĵoj, ke ĉiu estas influata de la aliaj en multe pli alta grado, ol oni ordinare pensas.

Ekzistas sekve nenia ordono de Profeto, al kiu ajn fako de la vivo ĝi principe rilatas, kiu ne concernus korpan sanon. Kelkaj el tiuj instruoj, tamen, pli senpere rilatas la korpan farton ol la aliaj, kaj tiujn ĉi ni nun studos.

### Simpla Vivado.

`Abdu'l-Bahá diras:

*Ŝparemo estas la fundamento de homa prospero. Malŝparulo ĉiam havas maltrankvilaĵojn. Malŝparemo flanke de iu ajn persono estas nepardonebla peko. Oni ne faru ruzon al aliaj kiel faras parazita planto. Ĉiu persono havu profesion, ĉu tio estu literatura aŭ mana, kaj vivu ĉastan, kuragan, honestan vivon, ekzemplo de ĉasteco imitinda de aliaj. Estas pli reĝe kontentiĝi per nefreŝa panpeco ol ĝui luksan manĝon, pagita per mono kiu venas el la poŝo de aliaj. La menso de kontenta persono estas ĉiam paca kaj lia koro serena.* (Bahá'í Scriptures, p.453 (Bahaaj Skriboj))

Oni ne malpermesas bestodevenan nutraĵon sed `Abdu'l-Bahá diras: "*Fruktoj kaj grenoj (estos la nutraĵo de la estonteco). Venos tempo kiam oni ne mangos plu viandon. La medicina scienco estas nur en sia infanaĝo, tamen ĝi montris ke nia natura nutrado estas tio kio elkreskas el la tero.*" (Ten days in the Light of `Akká, de Julia M. Grundy (Dek Tagoj en la Lumo de Akreo)

### Alkoholo kaj Narkotaĵoj.

La uzado de narkotaĵoj kaj alkoholaĵoj, escepte de kuraciloj en malsano, estas severo malpermesita de Bahá'u'lláh.

### Vivoĝuado

La bahaaj instruoj estas bazitaj sur moderneco, ne sur asketismo. Ĝuado de la bonaj kaj belaj aferoj de la vivo, kaj materialaj kaj spiritaĵoj, estas ne nur permesita sed ankaŭ ordonita. Bahá'u'lláh diras: "Ne senigu vin de tio, kio estas kreita por vi." Refoje Li diras: "Estas ordonite al vi ke ĝojekstazo kaj la glora sciigo estu videblaj en viaj vizaĝoj."

`Abdu'l-Bahá diras:

*Ĉio kio estas kreita por homo, kiu estas ĉe la plejsupro de la kreaĵo, kaj li estu dankema por la Diaj donacoj. Ĉiuj materialaj aferoj estas por ni, por ke ni per dankemo lernu kompreni la vivon kiel Dian favoraĵon. Se ni estas malkontentaj pro la vivo ni estas sendankuloj, ĉar nia materiala kaj spirita ekzistado estas ekstera*

*atesto de la dia favoro. Tiaj ni devas esti feliĉaj kaj utiligi la vivotempon en gloriĉoj, rekonante la valoron de ĉiuj aferoj.*

Demandite ĉu la bahaa malpermeso kontraŭ vetludoj koncernas ludojn de ĉiuj specoj, 'Abdu'l-Bahá respondis:

*Ne, kelkaj ludoj estas sendanĝeraj kaj ne estas malbono se oni sekvas ilin kiel distraĵon. Sed minacas ke la distraĵo povas degeneri en temporabo. La malŝparo de tempo estas malakceptinda en la Kredo de Dio. Sed distriĝo por plibonigi la korpajn povojn, kiel ekzercoj, estas dezirinde. – A Heavebly Vista, p.9 (Ĉiela Perspektivo)*

### **Pureco**

Bahá'u'lláh diras, en la Book of Aqdas (Libro Aqdas):

*Estu la esenco de pureco inter la homoj ... en ĉiaj cirkonstancoj konduku en delikata maniero ... lasu aperi sur viaj vestoj nenian signon de malpureco. ... Banu vin en pura akvo; akvo unufoje uzita ne estas uzebla. ... Vere ni deziris vidi en vi elmontrantojn de la Paradizo sur la tero, por ke vi disradiu tion kio ĝojigos la korojn de la favoratoj. – Kitáb-i-Aqdas*

Mírzá Abu'l-Faḍl, en sia libro, *Bahá'í Proofs* (p. 89, Bahaaj Pruvoj) akcentas la grandegan signifon de tiuj ĉi ordonoj, speciale en kelkaj partoj de la Oriento, kie akvo de plej malbona kvalito estas ofte uzata por la celoj de mastrumado, por banado kaj eĉ por trinkado, kaj kie ĝeneralaj estas terure nehigienaj kondiĉoj, kiuj kaŭzas multegan eviteblan malsanon kaj mizeron. Tiuj ĉi kondiĉoj, kiuj laŭsupoze estas sankciitaj de la reganta religio, povas ŝanĝiĝi, inter la Orientanoj, nur per ordono de iu kiu kredeble havas dian aŭtoritaton. Ankaŭ, en multaj partoj de la Okcidenta Duonglobo, sekvus mirinda transformiĝo se pureco estus akceptita ne nur kiel plej proksima al dieco sed ankaŭ kiel esenca parto de la dieco.

### **Rezulto de la Obeo al Profetordonoj.**

La efiko kiun havos je sano la ordonoj koncernantaj la simplan vivadon, higienon, sindetenadon de alkoholo kaj opio, k.t.p., estas tro evidenta por bezoni multajn komentariojn, kvankam dia vivsignifa valoro estas ordinare nesufice taksata. Se ili estus ĝenerale plenumataj, plej multe da infektaj malsanoj kaj granda nombro da aliaj baldaŭ malaperus el inter la homoj. La amaso da malsanoj kiuj estas kaŭzigitaj per malzorgado de simplaj higienaj antaŭgardoj kaj per inklino al alkoholo kaj opio estas giganta. Plie, obeado al tiuj ĉi ordonoj ne nur efikus la sanon, sed ankaŭ potence boninfluas kaj la karakteron kaj la konduton. Alkoholo kaj opio influas konsciencan de homo longe antaŭ ol influi lian irmanieron aŭ kaŭzi evidentan korpan malsanon, tiel ke la morala kaj spirita profito de abstinenco estas eĉ pli granda ol la korpa. Koncerne purecon, 'Abdu'l-Bahá diras: "Ekstera pureco, kvankam ĝi estas nur korpa afero, multe influas la spiritstaton. ... La fakto ke la korpo estas pura kaj senmakula influas la spiriton de homo."

Se estus ĝenerale plenumataj la ordonoj de Profetoj koncernantaj ĉastecon en la seksaj rilatoj, nuligita estus abunda kaŭzo de malsanoj. La abomenaj veneraj infektoj, kiuj ruinigas hodiaŭ la sanon de multaj miloj, senkulpaj kiel ankaŭ la kulpaj, suĉinfanoj kiel ankaŭ la gepatroj, tre baldaŭ estus entute afero de pasinteco.

Se estus ĝenerale plenumataj la ordonoj de Profetoj koncerne justecon, reciprokan helpon, ami proksimulon kiel sin mem - kiamaniere la homamasaj ŝvit-laborado kaj malpura mizero unuflanke, kune kun la egoista ĝuado, nenionfarado kaj malnobla lukso aliflanke, povus daŭre kaŭzi mensajn, moralajn kaj korpajn ruinojn?

Simpla obeo al la higienaj kaj moralaj ordonoj de Moseo, Budho, Kristo, Mahometo aŭ Bahá'u'lláh farus pli multe por eviti malsanojn ol ĉiuj kuracisto kaj ĉiuj regularoj pri publika sano en la mondo kapablu atingi. Efektive, ŝajnas esti certa afero ke se tia obeo estus ĝenerala, bonfarto ankaŭ farigus ĝenerala. Anstataŭ la nuna stato en kiu vivantoj velkas pro malsanoj aŭ estas detruataj en la infanaĝo, juneco aŭ plenkajaro, kio tiel ofte hodiaŭ okazas, la homoj vivus ĝis granda maturaĝo, kiel sendifektaj fruktoj kiuj maturiĝas kaj moliĝas antaŭ ol fali de la branĉo.

### **La Profeto kiel Kuracisto.**

Ni tamen loĝas en la mondo, kie de tempo nememorebla obeo al la ordonoj de la Profetoj estas la escepto pli ĝuste ol regulo; en kiu memamo estis pli ĝenerala motivo ol amo al Dio; en kiu personaj kaj partiaj profitoj ricevadis la unuan konsideron antaŭ la profito de la tuta homaro; en kiu materialaj havaĵoj kaj korpaj plezuroj estis pli ŝatataj ol la socia kaj spirita bonstato de la homaro. El tio sekvis akraj konkuradoj kaj konfliktoj, premegoj kaj tiraneco, ekstremoj de riĉeco kaj mizero - ĉiuj tiuj kondiĉoj kiuj naskas malsanon mensan kaj korpan. Rezulte de tio, la tuta arbo de la homaro malsanas, kaj ĉiu folieto de la arbo partoprenas en la ĝenerala malsaneco. Eĉ la plej puraj kaj plej sanktaj devas suferi pro la pekoj de aliaj.

Kuraco estas necesa - kuraco de la tuta homaro, de nacioj kaj de individuoj. Tiel Bahá'u'lláh kiel Liaj inspiritaj Antaŭuloj, ne nur montras kiel oni devas gardi la sanon, sed ankaŭ kiel ĝin reakiri se ĝi perdiĝus. Li venas kiel Granda Kuracisto, kiu resanigas la mondon, kaj korpe kaj anime.

### **Kuracado per Materialaj Rimedoj.**

En la hodiaŭa Okcidenta mondo videble estas rimarkinda reviviĝo de kredo en la efikeco de kuracado per rimedoj mensaj kaj spiritaj. Efektive multaj, ribelantaj kontraŭ la materialaj ideoj pri malsanoj kaj pri kuracado kiuj regis en la deknaŭa jarcento, trairis al la kontraŭa ekstremo kaj neas entute ĉian valoron de materialaj rimedoj kaj higienaj metodoj. Bahá'u'lláh agnoskas la valoron de kaj materialaj kaj spiritaj rimedoj. Li instruas ke oni devas evolui, stimuli kaj perfektigi la sciencan kaj arton de kuracado, por ke ĉiuj kuracmanieroj estu aplikataj plej sukcese, ĉiu en sia propra sfero. Kiam membroj de la familio de Bahá'u'lláh mem estis malsanaj, oni venigis profesion kuraciston, kaj la samo estas rekomendita al Liaj sekvantoj. Li diras: "Se vin atakos malsano, konsultu spertan kuraciston." - Kitáb-i-Aqdas

Tio ĉi tute harmonias kun la ĝenerala baha rilato al sciencoj kaj artoj. Ĉiuj sciencoj kaj artoj kiuj servas por la bono de la homaro, eĉ en materiala maniero, devas esti respektataj kaj akcelataj. Per scienco homo fariĝas mastro de materialaj aferoj; per nescio li restas ilia sklavo.

Bahá'u'lláh skribas:

*Ne malzorgu kuracadon kiam ĝi estas necesa, sed forlasu ĝin kiam la sano estas rebonigita. Kuracu malsanon prefere per dieto, detenante vin de uzado de kuraciloj; kaj se vi trovos tion kion vi bezonas en unu simpla herbo, ne turnu vin al kunmiksitaĵ medikamentoj. ... Detenu vin de kuraciloj kiam la sano estas bona, sed uzu ilin kiam estas necese. – Tablet to a Physician (Tabuleto al Kuracisto)*

En unu el Siaj Tabuletoj Abdu'l-Bahá diras:

*Ho serĉanto de vero! Estas du manieroj por kuraci malsanon: materialaj rimedoj kaj spiritaj rimedoj. La unua maniero estas uzado de materialaj kuraciloj. La dua konsistas el preĝado al Dio kaj sinturno al Li. Ambaŭ rimedoj devas esti uzataj kaj aplikataj. ... Plue, ili ne estas nekunigeblaj, kaj vi devas akcepti la korpajn medikamentojn rezulte de la kompatemo kaj favoro de Dio Kiu malkaŝis kaj konigis la medicinan sciencan, por ke Liaj servantoj profitu ankaŭ tion ĉi kuracmanieron.*

Li instruas ke, se niaj naturaj gustosentoj kaj instinktoj ne estus difektitaj per la sensencaj kaj nenaturaj vivmanieroj, ili povus esti fidindaj gvidantoj en la elekto tiel de ĝusta dieto kaj sanigaj fruktoj, herbo kaj aliaj kuraciloj, kiel okazas kun sovaĝaj bestoj. En interesa interparolo pri kuracado priskribita en *Some Answered Questions* (Respondoj al Demandoj) (p. 298), Li diras fine:

*Estas do evidente ke estas eble kuraci per manĝoj, nutraĵoj kaj fruktoj sed ĉar hodiaŭ la medicina scienco estas neperfekte, tiu ĉi fakto ne estas ankoraŭ plene komprenata. Kiam la medicino atingos perfektecon, oni kurakados per manĝoj, nutraĵoj, aromaj fruktoj kaj legomoj, kaj per diversaj akvoj, varma ka malvarmaj.*

Eĉ kiam la rimedoj de la kuracado estas materiaj, la povo kiu efektive sanigas estas Dia, ĉar la atribuoj de herboj kaj mineraloj devenas de la Dia Donacemo. "Ĉio dependas de Dio. Medicino estas nur ekstera formo aŭ rimedo per kiu oni ricevas la ĉielan sanigon."

### **Kuraco per Nemateriaj Rimedoj.**

Li instruas ke estas ankaŭ metodoj de kuracado sen la materiaj rimedoj. Eksistas "infekto de sano", kiel ankaŭ infekto de malsano, kvankam la unua estas tre malrapida kaj malfortefika, dum la dua ofte estas fortega kaj rapida en sia agado.

Multe pli potencaj rezultoj sekvas el animaj statoj de malsanuloj mem, kaj "sugestio" povas ludi gravan rolon en la formado de tiuj statoj. Timo, kolero, ĉagreno, k.t.p., estas tre malfavoraj por la sano, dum espero, amo, ĝojo estas tiel same favoraj.

Tiel do Bahá'u'lláh diras:

*Vere la plej necesa afero estas kontenteco en ĉiaj cirkonstancoj; tiel la homo estas gardata kontraŭ malgajeco kaj laceco. Ne subigu al malĝojo kaj malfeliĉo, ili kaŭzas la plej grandan mizeron. Ĵaluzo konsumas la korpon kaj kolero bruligas la hepaton; evitu ilin ambaŭ kiel vi evitus leonon. – Tablet to a Physician (Tabuleto al Kuracisto)*

Kaj 'Abdu'l-Bahá diras: "Ĝojo donas al ni flugilojn. En ĝojo niaj fortoj estas pli vivopovaj, nia intelekto pli vigla. ... Sed kiam malĝojo nin ekregas, la forto forlasas nin."

'Abdu'l-Bahá skribas pri alia formo de mensa kuracado ke ĝi rezultas el:

*Kompleta mensa koncentriĝo de forta persono je malsanulo, dum la lasta esperas per la tuta koncentrita kredo ke la resaniĝo efektiviĝos per la spirita povo de la fortulo - ĝis tia grado ke estiĝas interna kontakto inter la forta persono kaj la malsanulo. La fortulo streĉas ĉiujn fortojn por resanigi la pacienton, kaj la malsanulo plenfidas la ricevon de la resaniĝo. La efekto de tiuj ĉi mensaj impresoj kaŭzas ekscitecon de la nervoj, kaj tiuj ĉi impresoj kaj nervekscito kaŭzos resaniĝon de la malsanulo. – Some Answered Questions, p. 294 (Respondoj al Demandoj)*

Ĉiuj ĉi kuracmetodoj, tamen, estas limigitaj en siaj efikoj, kaj povus malsukcesi resanigi en teruraj malsanoj.

### **La Povo de la Sankta Spirito.**

La plej potenca kurac-rimedo estas la Povo de la Sankta Spirito.

*... Tio ĉi ne dependas de kontakto, nek de ĉevido, nek de apudesto. ... Ĉu la malsano estas negrava ĉu grava, ĉu ekzistas kontakto de la korpoj aŭ ne, ĉu aŭ ne estas starigita persona interligo inter la malsanulo kaj la kuracisto – tiu ĉi kuraco efektiviĝas per la povo de la Sankta Spirito. – Some Answered Questions, p. 295 (Respondoj al Demandoj)*

En interparolo kun f-ino Ethel Rosenberg, en oktobro 1904, 'Abdu'l-Bahá diris:

*La kuracado kiu okazas per la povo de la Sankta Spirito ne bezonas ian specialan koncentriĝon aŭ kontakton. Ĝi okazas per la volo aŭ deziro kaj la preĝo de sankta persono. La malsanulo povas esti en la Oriento kaj la kuracisto en la Okcidento, kaj ili eble ne konis unu la alian; sed tuj kiam tiu sankta persono turmas sian koron al Dio kaj komencas preĝi, la malsanulo resaniĝas. Tio ĉi estas kapablo apartenanta al la Sanktaj Manifestantoj kaj al tiuj kiuj atingis la plej altan rangon.*

Tiun ĉi karakteron, verŝajne, havis la kuracado plenumita de Kristo kaj de Liaj apostoloj, kaj similaj kuracadoj estis atribuitaj al sanktuloj en ĉiuj tempoj. Kaj Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá posedis tiun ĉi povon, kaj simila povo estas promesita al iliaj fidela sekvantoj.

### **Sintenado de la Paciento.**

Por ke la forto de la spirita kuracado povu plene efektiviĝi en sia agado definitivaj kondiĉoj devas esti plenumitaj flanke de la paciento, de la kuracisto, de amikoj de la paciento kaj de la tuta socio.

Koncerne la pacienton la unua kondiĉo estas, ke li tumu sin al Dio per la tuta koro, kun absoluta konfido en Lia Povo kaj en Lia Volo por fari tion kio estas plej bona. En aŭgusto 1912, 'Abdu'l-Bahá diris al unu amerikanino:

*Ĉiuj tiuj suferoj pasos for kaj vi akiros perfektan korpan kaj spiritan sanon. ... Via koro estu fidoplena kaj certa ke per la Bonfaremo de Bahá'u'lláh, per la Favoro de Bahá'u'lláh, ĉio fariĝos agrabla por vi ... Sed vi devas plene turni la vizaĝon al la Abhá (Plejglora) Regno, kun perfekta atento, kun tia sama atento kiun Maria Magdalena elmontris al Lia Sankteco Kristo, kaj mi certigas vin ke vi ricevos korpan sanon kaj spiritan sanon. Vi indas. Mi anoncas al vi la ĝojan novaĵon ke vi estas inda ĉar via koro estas pura. ... Estu memfida! Estu feliĉa! Estu ĝojigita! Estu esperplena!*

Kvankam speciale en tiu ĉi okazo 'Abdu'l-Bahá garantiis akiron de perfekta sano, Li ne faras tiel en ĉiu okazo, eĉ se estas forta kredo flanke de la individuo. Al iu pilgrimulo en Akreo, Li diris:

*La preĝoj verkitaĵ por resaniĝo estas kaj por kuraco spirita kaj por la materia. ... Se saniĝo estas pli bona por la paciento, certe ĝi estos donacita. Por kelkaj kiuj estas malsanaj, saniĝo por ili estos kaŭzo de aliaj malsanoj. Pro tio okazas ke la Saĝeco ne dekretas la respondon al ĉiuj preĝoj. Ho servantino de Dio. La Povo de la Sankta Spirito kuracas kaj materiajn kaj spiritaĵajn malsanojn – Daily Lessons Received at 'Akká, p. 95 (Ĉiutagaj Lecionoj Lernitaj en Akreo).*

Alifoje Li skribis al iu malsanulo:

*Vere la Volo de Dio agas kelkfoje en maniero por kiu la homoj ne kapablas trovi kialon. La kaŭzoj vidiĝos. Fidu je Dio, konfidencu al Li kaj rezignu vin al la Volo de Dio. Vere via Dio estas amplena, kompatema kaj favora ... kaj Li malsuprenigos Sian Favoron sur vin.*

Li instruas ke spirita sano helpas korpan sanon, sed la korpa sano dependas de multaj faktoroj, el kiuj kelkaj estas ekster povo de la homo. Eĉ plej imitinda spirita sintenado de individuo ne povas, do, certigi la korpan sanon en ĉiuj okazoj. Plej sanktaj viroj kaj virinoj suferadas kelkfoje malsanojn.

Malgraŭ tio, la bonfara influo je korpa sano kiu rezultas el la ĝusta spirita sintenado estas multe pli potenca ol oni ĝenerale imagas, kaj ĝi sufiĉas por forigi malsanon en granda nombro da okazoj. 'Abdu'l-Bahá skribis al iu angliano: "Vi skribis pri malforteco de via korpo. Mi preĝas al la Favoremo de Bahá'u'lláh ke via spirito fortiĝu, por ke per la forto de la spirito ankaŭ la korpo estu resanigita."

Alifoj Li diras:

*Dio donacis al homo tiun mirindan povon, por ke li ĉiam rigardu supren, kaj ricevu inter la aliaj donacoj, ankaŭ resanigon per Lia dia Malavareco. Sed ve! homo ne estas dankema por tiu ĉi plej granda bono, sed dormas la dormon de malzorgeco, kaj restas senatenta al la granda favoro kiun Dio elmontris al li, turnante la vizaĝon for de la lumo kaj kontinuante sian vcrkon en mallumo.*

### Kuracisto

La provo de la spirita kuracado estas sendube komuna al ĉiuj homoj en pli aŭ malpli alta grado, sed, dum kelkaj estas favoritaj per speciala talento por matematiko aŭ muziko, aliaj elmontras sin favoritaj per speciala kapablo al kuracado. Tiuj ĉi estas la homoj kiuj devus elekti kuracadon kiel sian vivotaskon. Malfeliĉe, la mondo fariĝis en la lasta jarcentoj tiel materiista ne la eblo mem de la spirita kuracado grandparte malaperis de la vido. Simile al ĉiuj aliaj talentoj la kapablon de kuracado oni devas rekoni, instrui kaj eduki por ke ĝi atingu la plej altajn evoluon kaj povon. En la hodiaŭa mondo estas probable milo da homoj, plene favoritaj per la natura kapablo al kuracado, en kiu tiu ĉi altvalora talento restas dormanta kaj neaktiva. Kiam la potenco de mensa kaj spirita kuracado estos pli bone komprenitaj, la kuracarto transformiĝos, nobliĝos, kaj ĝia efikeco nemezureble kreskos. Kaj kiam tiuj novaj scio kaj povo de la kuracisto ligos sin kun vigla kredo kaj espero flanke de la paciento, oni povas atendi mirindajn rezultojn.

*Nia fido devas esti en Dio. Ne ekzistas Dio krom Li, la Kuracisto, la Scianto, la Helpanto. ... Nenio sur la tero nek en la ĉielo estas ekster la potenco de Dio.*

*Ho kuracisto! Kuracante malsanulon, unue alvoku la nomon de Via Dio, la Reganto de la tago de la Juĝo, kaj tiam apliku tion kion Dio destinis por resanigi Siajn kreitaĵojn. Je Mia Vivo! Tiu kuracisto kiu trinkis el la Vino de Mia Amo, ties vizito estas resanigo, kaj ties spiro estas favoro kaj espero. Konfidu al Li por la bono de via farto. Li estas konfirmita de Dio en sia kuracado.*

*Tiu ĉi scio (la kuracarto) estas la plej grava el ĉiuj sciencoj, ĉar ĝi estas la plej granda rimedo de Dio, la Vivdonanto al polvo, por savi la korpojn de ĉiuj popoloj, kaj Li destinis por ĝi la unuan lokon inter ĉiuj sciencoj kaj saĝecoj. Ĉar nun estas la tago en kiu vi devas leviĝi por Mia Venko.*

*Via Nomo estas mia saniĝo, ho mia Dio, kaj memoro pri Vi estas mia medikamento. Proksimeco al Vi estas mia espero, kaj amo al Vi estas mia kompano. Via kompato al mi estas mia resaniĝo kaj helpo en tin ĉi mondo kaj en la mondo kiu venos. Vere, Vi estas la Ĉio-Donanto, la Ĉio-Scianto, la Ĉio-Saĝa. (Bahá'u'lláh, Tablet to a Physician (Tabuleto al Kuracisto))*

'Abdu'l-Bahá skribas:

*Kiu estas plena de amo al Bahá, kaj forgesas ĉion, el ties lipoj estos aŭdata la Sankta Spirito kaj ties koron plenigos la spirito de la vivo. ... Vortoj fluos el lia buŝo kiel ŝnuro de perltoj, kaj ĉia malsano estos kuracita per surmeto de liaj manoj.*

*Ho vi pura kaj spirita! Turnu vin al Dio kun la koro batanta per amo al Li, sindonita al Lia glorado, rigardanta al Lia Regno kaj serĉanta helpon de Lia Sankta Spirito en stato de ekstazo, ravo, amo. sopiro, ĝojo kaj aromo. Per la Spirito de Sia Apudesto, Dio kunhelpos al vi kuraci malsanojn.*

*Daŭrigu la resanigon de koroj kaj korpoj kaj penu resanigi malsanulojn turnante vin al la Plejalta Regno kaj koncentrate la koron por akiri la resaniĝon por la povo de la Plejsankta Nomo kaj per la spirito de Amo de Dio.*

## Kiel Ĉiu Povas Helpi

Resanigi malsanulon estas, tamen, afero koncernante ne nur la kuraciston kaj la pacienton, sed ĉiuj. Ĉiu devas helpi, per simpatio kaj servemo, per ĝustaj konduto kaj penado, kaj speciale per preĝoj, ĉar el ĉiuj kuraciloj preĝo estas la plej Potenca. "Propetado kaj preĝado por aliaj", diras 'Abdu'l-Bahá, "certe estos fruktodona". Amikoj de la malsanulo estas speciale respondecaj, ĉar ilia influo, aŭ por la bono aŭ por la malbono, estas plej senpera kaj grava. En kiel multaj okazoj de malsano la rezulto dependas ĉefe de la prizorgado flanke de la gepatroj, amikoj kaj najbaroj de la senhelpa suferanto!

Eĉ anoj de la tuta socio havas influon je ĉiu okaze de malsano. En individuaj okazoj tiu influo eble ne ŝajnas esti grava, sed amase ĝia efiko estas potenca. Ĉiu estas influata de la socia "atmosfero" en kiu li vivas, de la ĝenerala supereco de fido aŭ materialismo, de virto aŭ malvirto, de gajeco aŭ depremiteco, kaj ĉiu individuo ludas certan rolon en la decido pri la stato de tiu sociala atmosfero. En la nunaj kondiĉoj de la mondo, ne estas eble por ĉiu atingi perfektan sanon, sed por ĉiu estas eble fariĝi volonta vojo por la sandonanta povo de la Sankta Spirito kaj tiamaniere uzi sanigan, helpeman influon sur sia propra korpo kaj sur ĉiuj kun kiuj li kontaktiĝas.

Malmultaj devoj estas ordenitaj al bahaanoj pli insiste kaj fortakcente ol resanigi malsanulojn kaj multaj belaj prosanaj preĝoj estis malkaŝitaj de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá.

## La Ora Epoko

Bahá'u'lláh certigas ke pere de harmonia kunagado de pacientoj, kuracistoj kaj de la tuta socio ĝenerale kaj per ĝusta uzado de diversaj kurac-rimedo, materialaj, mensaj kaj spiritaj, efektiviĝos la Ora Epoko kiam, per la Povo de Dio, "ĉiu malĝojo transformos sin en ĝojon, kaj ĉiu malsano en sanon. "

'Abdu'l-Bahá diras ke "kiam la Dia Revelacio estos komprenita ĉiuj zorgoj malaperos."

Refoje Li diras:

*Kiam la materia mondo kaj la Dia mondo bone kunrilatos unu kun la alia, kiam la koroj fariĝos ĉielaj kaj la celadoj puraj, ekekestos perfekta interrilato. Tiam tiu ĉi povo estos kaŭzo de perfekta manifestaĵo. Korpaj kaj spiritaj malsanoj tiam ricevos absolutan resaniĝon.*

## Ĝusta Uzado de la Sano

En la konkludo de tiu ĉi ĉapitro bone estos memori la instruojn de 'Abdu'l-Bahá, koncerne la ĝustan uzadon de la korpa sano. En unu el Siaj Tabuletoj al la bahaanoj en Vaŝingtono Li diras:

*Se la sano kaj bonstato de la korpo estas foruzitaj en la vojo de la Regno, tio estas tre akceptinda kaj laŭdinda; se ĝi estas uzata per la bono de la homaro ĝenerale – eĉ se tio estas por ĝia materiala (aŭ korpa) bono – kaj se ĝi estas rimedo de bonfarado, tio ankaŭ estas akceptebla. Sed se la sano kaj bonstato de homo estas uzataj per kontentigi korpajn dezirojn, en bestosimila nivelo, kaj per diablaj okupoj – tiam malsano estos pli bona ol tia sano; ja, eĉ morte estus preferinda ol tia vivo. Se vi deziras sanon, deziru ĝin por servi la Regnon. Mi esperas ke vi akiros perfektan internan vidon, neflekseblan firmecon, plenplenan sanon, kaj spiritan kaj korpan forton per ke vi trinku el la fonto de la eterna vivo kaj por ke vin helpu la spirito de la Dia konfirmo.*

## ĈAPITRO VIII: RELIGIA UNUECO

*Ho vi surteranoj! La distinga trajto kiu signas la superan karakteron de tiu ĉi Superega Revelacio konsistas en tio ke Ni, unuflanke, forviŝis el la paĝoj de la sankta Libro de Dio ĉion kio ajn estis kaŭzo de malpaco, de malico kaj malbono inter la homaro, kaj aliflanke, Ni difinis la esencajn kondiĉojn por konkordo, por komprenemo, por plena kaj daŭra unuiĝo. Bone estas al tiuj, kiuj obeas Miajn leĝojn. – Bahá'u'lláh, Tablet of the World (Tabuleto al la Mondo)*

### Sektismo en la Deknaŭa Jarcento.

Eble neniam la mondo ŝajnis pli malproksima de religia unueco ol en la deknaŭa jarcento. De multaj jarcentoj la grandaj religiaj komunumoj zoroastra, mosea, budhana, kristana, mahometana kaj aliaj - ekzistis unu apud la alia, sed anstataŭ kunfandi sin en unu harmonian tuton ili senĉese malamikis kaj malpacis, unu kun la alia. Krom tio, ĉiu el ili, per divido post divido, disfalis en ĉiam kreskantan nombron da sektoj kiuj ofte akre kontraŭstaris unu la alian. Tamen Kristo diris: "Per tio ĉiuj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia." Kaj Mahometo diris: "Li dekretis por vi pri la religio, kion Li jam ordonis al Noa, kaj kion Ni revelaciis al vi, kaj kion Ni konfidis al Abraham kaj al Moseo kaj al Jesuo; ke vi estu persistaj pri la religio, kaj ne disiĝu pri ĝi." La Fondinto de ĉiu el la grandaj religioj alvokis Siajn sekvantojn al amo kaj unueco, sed en ĉiuj okazoj la idealo de la Fondinto altgrade perdiĝis de la vido en la koto de netoleremo kaj bigoteco, formalaĵoj kaj hipokriteco, degenero kaj misprezentado, skismoj kaj malpacoj. La ĝenerala nombro de pli aŭ malpli malamikaj sektoj en la mondo estis probable pli granda en la komenco de la baha epoko ol en iu ajn antaŭa periodo de la historio de la homaro. Ŝajnis ke la homaro tiutempe eksperimentis ĉiun eblan specon de religia kredo, ĉiun eblan specon de ritaj observoj kaj ceremonioj, ĉiun eblan nuancon de morala kodo.

En tiu sama tempo ĉiarn pli granda nombro da homoj dediĉis sian energion al sentima esplorado kaj kritika ekzamenado de la leĝoj de la naturo kaj de la fundamentoj de kredo. Oni akiris rapide novan sciencan scion de la aferoj kaj trovis novajn solvojn de multaj problemoj de la vivo. Progreso de tiaj eltrovaĵoj kiel vaporŝipo kaj fervojo, poŝto kaj gazetsistemo, multe helpis la disvastigon de ideoj kaj plifortigon de kontakto inter tre diversaj tipoj de pensmaniero kaj vivo.

La tiel nomata "konflikto inter religio kaj scienco" fariĝis akra batalo. En la kristana mondo Biblia kritikismo kombinis kun fizika scienco por disputi, kaj iagrade refuti, la aŭtoritaton de la Biblio, aŭtoritaton kiu de jarcentoj estis la ĝenerale akceptita bazo de kredo. Rapide kreskis amasoj da popolo kiuj fariĝis skeptikaj pri la instruoj de eklezioj. Eĉ multaj pastroj kaŝe aŭ malkaŝe malfidis la kredojn konfesatajn de la koncernaj sektoj.

Tiu ĉi fermentado kaj daŭra fluo de opinioj, kune kun kreskanta rekono de nesufiĉeco de la malnovaj ortodoksoj kaj dogmoj, kune kun palpserĉado kaj strebado por pli plenaj scio kaj kompreno, ne estis limigita al la kristanaj landoj, sed estis evidentaj, pli aŭ malpli, kaj en diferencaj formoj, inter la popoloj de ĉiuj landoj kaj religioj.

### La Revelacio de Bahá'u'lláh

Ĝuste en la tempo kiam tiu stado de konflikto kaj ĥaoso estis ĉe la zenito, Bahá'u'lláh sonigis Sian grandan trumpet-vokon al la homaro:

*Ke ĉiuj nacioj unuiĝu en kredo kaj ĉiuj homoj estu kiel fratoj, ke la ligoj de amo kaj unueco inter la filoj de la homaro estu fortigitaj; ke la diverseco de la religioj malaperu, kaj la diferenco de la rasoj estu neniigitaj. ... Tiuj ĉi bataloj, tiu ĉi sangoverŝado kaj malharmonio devas ĉesi, kaj ĉiuj homoj devas esti kiel unu parenco kaj unu familio ... – (vortoj dicitaj al prof-o Browne)*

Ĝi estas grandioza revelacio, sed kiel efektiviĝi ĝiajn promesojn? Profetoj predikis, poetoj kantis kaj sanktuloj preĝis pri tio dum miljaroj, sed la diverseco de religioj ne ĉesis, la malpacoj kaj sangoverŝado ne neniigis. Kio do pruvas ke nun la miraklo plenumiĝos? Ĉu estas iaj novaj faktoroj en la situacio? Ĉu la homa naturo ne estas tia sama kia ĝi ĉiarn estis, kaj ĉu ĝi ne daŭros tiel same kiel longe la mondo ekzistos? Se du homoj aŭ du nacioj avidos la samon, ĉu ili ne batalos pro tio sammaniere kiel en la pasintaj tempoj? Se Moseo, Budho, Kristo kaj Mahometo malsukcesis krei la unuecon de la mondo ĉu Bahá'u'lláh sukcesos tion? Se ĉiuj antaŭaj kredoj degeneris aŭ disfalis en sektojn ĉu ne la sama estos la sorto de la baha kredo? Ni vidu kian respondon donas la bahaaj instruoj al tiuj kaj similaj demandoj.



## Ĉu la Homa Naturo Povas Sin Ŝanĝi?

Tiel edukado kiel religio estas same bazitaj sur la supozo ke estas eble ŝanĝi la homan naturon. Fakte, oni ne bezonas multe esploradi por montri ke la sola certaĵo kiun oni povas diri pri iu ajn vivestaĵo estas ke ĝi ne povas ne ŝanĝadi sin. Sen ŝanĝoj povas esti nenia vivo. Eĉ mineraloj ne povas kontraŭstari ŝanĝojn, kaj ju pli alten ni iros en la skalo de estaĵoj, des pli diversaj, komplikitaj kaj mirindaj estos la ŝanĝoj. Plie, en la progreso kaj evoluado de ĉiugradaj kreaĵoj ni trovas du specojn de ŝanĝoj - unu estas malrapida, grada, ofte preskaŭ neperceptebla; la dua estas rapida, subita kaj frapanta. Ĉi tiuj okazas en la tiel nomataj "krizaj momentoj" de la evoluo. Koncerne mineralojn, ekzemple, ni trovas tiujn krizajn momentojn ĉe la punktoj de fandiĝado kaj vaporiĝado, kiam solidaĵo subite fluidiĝas aŭ kiam fluidaĵo fariĝas gaso. Koncerne vegetaĵojn ni vidas tiajn krizajn momentojn kiam semo komencas germi, aŭ burĝono transformas sin en folion. En la mondo de bestoj ni vidas la samon la samon ĉiufanke, ekzemple kiam larvo ŝanĝas sin en papilion, kiam birdido eliĝas el la ovo, aŭ kiam ido naskiĝas el la utero de la patrino. En la pli alta vivo de la animo ni ofte vidas similan transformiĝon, kiam homo estas "ree naskita" kaj lia tuta estaĵo radikale ŝanĝas sin laŭ siaj celado, karaktero kaj agado. Tiaj krizaj momentoj ofte koncernas tutan specon aŭ amason da specoj samtempe, ekzemple kiam ĉiusecaj vegetaĵoj ekvekiĝas printempe al la nova vivo.

Bahá'u'lláh deklaras ke kiel la malpli grandaj vivestaĵoj havas periodon de subita transpaso al nova kaj pli plena vivo, ankaŭ por la homaro proksimiĝas la "kriza momento", la "renaskiĝo". Tiam la kutimoj de vivo kiuj daŭris de la materiigo de la historio ĝis hodiaŭ ŝanĝos sin nepre rapide, kaj la homaro eniros novan fazon de la vivo, fazon kiu tiel diferencas de la malnova kiel papilio diferencas de raŭpo, aŭ birdo el la ovo. La tuta homaro, en la lumo de la nova Revelacio, akiros novan vidon de la vero; precize kiel la tuta lando estas lumigita kiam la suno leviĝas, por ke ĉiu povas klare vidi, kvankam antaŭ unu horo ĉio estis en mallumo. "Tio ĉi estas nova ciklo de homa povo", diras 'Abdu'l-Bahá "Ĉiuj horizontoj de la mondo lumradias, kaj vere la mondo fariĝos kvazaŭ rozĝardeno kaj paradizo". La analogioj de la naturo konfirmas tiun ĉi opinion; la Profetoj de la malnovaj tempoj unuakorde antaŭdiris la alvenon de tiu ĉi glora tago; la signoj de la tempo klare montras la nuntempan progreson de profundaj kaj radikalaj ŝanĝoj en homaj ideoj kaj aranĝoj. Kio, do, povus esti pli vana kaj senbaza ol la pesimista argumento ke, kvankam ĉio alia ŝanĝiĝas, la homa naturo ne povas sin ŝanĝi?

## La Unuaj Paŝoj al la Unueco

Kiel rimedon por starigi la religian unuecon Bahá'u'lláh rekomendas plej grandan homamon kaj toleremon, kaj vokas al Siaj sekvantoj "interrilati kun anoj de ĉiuj religioj kun ĝojo kaj plezuro". En Sia lasta Volo kaj Testamento Li diras:

*Kverelojn kaj konflikton Li severe malpermesis en Sia libro (Kitáb-i-Aqdas); tio ĉi estas la ordono de la Eternulo en tiu ĉi super-alta Revelacio – la ordono kiun Li esceptis de ĉia nuligo kaj vestis per la ornamento de Sia konfirmo.*

*Ho vi homoj de la mondo! La Dia Religio estas por amo kaj unueco; ne faru ĝin kaŭzo de malamikeco kaj konfliktoj. ... Mi esperas, ke la anaro de Bahá ĉiam turnos sin al la Sankta Vorto: "Jen ĉiuj aferoj estas de Dio!" – al tiu Plejglora Vorto kiu, kvazaŭ akvo, estingas fajron de malamo kaj furiozo ardantan en la koroj kaj brustoj. Per tiu ĉi sola Vorto la diversaj sektoj de la mondo atingos la lumon de efektiva unueco; vere Li diras Veron, Li kondukas sur la Vojon, kaj Li estas la Potenco, la Favora, la Belega.*

'Abdu'l-Bahá diras:

*Ĉiu homo devas forlasi antaŭjuĝon kaj viziti eĉ preĝejojn de la aliaj, ĉar, en ĉiuj ĉi adorlokoj, oni mencias la Nomon de Dio. Pro tio ke ĉiuj kunvenas por adori Dion, kio estas la diferencoj? Neniu el ili adoras Satanon. Islamanoj devas viziti Preĝejojn de Kristanoj kaj Sinagogojn de Hebreoj, kaj kontraŭe la aliaj devas viziti Islamajn Moskeojn. Ili tenas sin aparte unuj de la aliaj nur pro senbazaj antaŭjuĝoj kaj dogmoj. En Ameriko mi vizitis Hebreajn Sinagogojn, kiuj similas al Kristanaj Preĝejoj, kaj mi vidis ke ĉie oni adoras Dion.*

*En multaj el tiuj lokoj mi parolis al ili pri la origina fundamento de la diaj religioj, mi klarigis al ili la pruvojn de la valideco de la diaj profetoj kaj de la Sanktaj Revelacioj, kaj persvadis, ke ili ĉesu blindan imitadon. Ĉiu el gvidantoj devas, tiel same, viziti Preĝejojn de la aliaj kaj paroli pri la fundamento kaj ĉefaj principoj de la diaj religioj. En plej granda unueco kaj harmonio ili devas adori Dion, en la adoroj de la aliaj, kaj forlasi fanatikecon.*

Se nur tiuj unuaj paŝoj estus faritaj kaj estus starigita amika reciproka toleremo inter diversaj religiaj sektoj, kia mirinda ŝanĝo okazus en la mondo! Tamen, por atingi la veran unuecon, oni bezonas ion pli ol tio ĉi. Toleremo estas konsiderinda paliativo kontraŭ la malsano de sektodivido, sed ĝi ne estas radikala kuracilo. Ĝi ne forigas la kaŭzon de la doloro.

## La Problemo de Aŭtoritato

La diversaj religiaj komunumoj malsukcesis unuiĝi en la pasintaj tempoj, ĉar la konfesantoj de ĉiu religio konsideris la Fondinton de la propra kiel la solan plejsuperan aŭtoritaton, kaj Lian legaron kiel la dian leĝaron. Ĉiu Profeto Kiu proklamis alian revelacion estis, sekve, rigardata kiel malamiko de la vero. Pro similaj kaŭzoj apartiĝis ankaŭ diversaj sektoj. La konfesantoj de ĉiu el ili akceptis ian duavican aŭtoritaton kaj konsideris ian specialan interpretmanieron de la Revelacio de la Fondinto kiel la Unu Solan Kredon, kaj ĉiujn aliajn kiel erarajn. Kompreneble tiel longe kiel daŭras tiu ĉi stato ne estas eble vera unueco. Bahá'u'lláh, aliflanke, instruas ke ĉiuj Profetoj estas esprimantoj de la aŭtentikaj revelacioj de Dio; ke ĉiu prezentis en Sia tempo la plej altan instruon kiun la homoj tiam kapablis akcepti, kaj edukis ilin por ke ili kapablu akcepti pluajn instruojn de Liaj posteuloj. Li alvokas la anojn de ĉiuj religioj, ne ke ili neu la Dian Inspiritecon de sia propra Profeto, sed ke ili konfesu la Dian inspiritecon de ĉiu alia Profeto, por ke ili komprenu ke la instruoj de ĉiu el ili esence harmonias, kaj estas parto de la granda plano pri eduko kaj unuiĝo de la homaro. Li alvokas la anojn de ĉiuj sektoj ke ili elmontru respekton al siaj Profetoj dediĉante siajn vivojn al efektiviĝo de tiu unueco por kiu ĉiuj Profetoj laboris kaj suferis. En Sia letero al Reĝino Viktoria Li komparas la mondon kun malsanulo kies malsano pligraviĝas ĉar li falis en manojn de malkapabla kuracisto; kaj Li diras kion kuracilon apliki:

*Tio kion la Eternulo faris kiel la sanondona medikamento kaj la plej perfekta kuracilo por la resaniĝo de la mondo estas la unuiĝo de ĉiuj ĝiaj popoloj en unu Religio kaj sub unu Leĝo. Tio ĉi ne povas esti efektivigita alie ol per lerta, perfekta kaj inspirita Kuracisto. Tio ĉi estas la vero mem, kaj ĉio alia estas nur evidenta eraro. – Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh, p. 255 (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh)*

## Progresiva Revelacio

Granda obstaklo, sur la vojo de la religia unueco, estas por multaj la diferencoj inter la revelacioj donitaj de diversaj Profetoj. Kion unu ordonis tion alia malpermesas; kiel do ili ambaŭ povas esti pravaj, kiel ambaŭ povas esti proklamantoj de la Volo de Dio? Sendube la vero estas Unuaĵo, kaj ne povas sin ŝanĝi. Jes, la Absoluta Vero estas Unuaĵo kaj ne povas sin ŝanĝi, sed la Absoluta Vero estas senlima ekster la nuna homa kompreneblo, kaj niaj ideoj pri ĝi devas sin senĉese ŝanĝi. Niaj fruaj, malperfektaj ideoj, per la Favoro de Dio, estos anstataŭigitaj, tempon post tempo, per pli kaj pli perfektaj konceptoj. En Tabuleto al kelkaj persaj bahaanoj, Bahá'u'lláh diras:

*Ho homoj! La vortoj estas aperigitaj laŭ la kapableco por ke la komencantoj progresu. La lakto devas esti donata laŭmezure por ke la infaneto de la mondo eniru la Regnon de Grandiozo kaj estu loĝigita en la Kortego de Unueco.*

Lakto estas la nutraĵo kiu fortigas la infanon tiel ke ĝi povas poste digestadi pli solidajn manĝaĵojn. Se oni diras ke ĉar unu Profeto estis prava donante difinitajn instruojn en difinita tempo, tial alia Profeto Kiu instruas alimaniere en alia tempo malpravas, estas kvazaŭ oni diras ke ĉar lakto estas la plej bona nutraĵo por novnaskita infano, tial, nur lakto kaj nenio alia devus esti nutraĵo de plenkreskinto, kaj ĉia alia manĝosistemo estus malbona!

'Abdu'l-Bahá diras:

*Ĉiu dia Revelacio estas dividita en du partoj. La unua estas esenca kaj apartenas al la mondo de la eterneco. Ĝi estas la konigo de la Dia vero kaj la esencaj principoj. Ĝi estas la esprimo de la Amo de Dio. Tiu ĉi daŭras en ĉiuj el la religioj, absolute neŝanĝebla. La dua parto ne estas eterna; ĝi rilatas al la praktika vivo, aranĝoj kaj negocoj, kaj ŝanĝas sin laŭ la evoluo de homo kaj la tempbezonoj de ĉiu Profeto. Ekzemple. ... Dum la Mosea periodo oni forhakis manon de homo pune por malgranda ŝtelo; estis la leĝo de okulo por okulo, dento por dento. Sed ĉar tiuj ĉi leĝoj ne estis oportunaj en la tempo de Kristo, ili estis nuligitaj. Simile ankaŭ eksedziĝado fariĝis tiel ĝenerala ke restis neniam firmaj leĝoj pri edziĝo, kaj tial Lia Sankteco Kristo malpermesis eksedziĝon.*

*Konforme al la urĝeco de la tempo, Lia Sankteco Moseo proklamis dek leĝojn pri mortpuno. Estis en tiu tempo neeble defendi la socion kaj certigi la socian sekurecon sen tiuj ĉi severaj leĝoj, ĉar la idoj de Izraelo loĝis en la regiono de Tah, kie estis fonditaj neniam juĝejoj kaj neniam pundoj. Sed tiun ĉi leĝaron oni ne bezonis en la tempo de Kristo. La historio de la dua parto de religio ne estas grava, ĉar ĝi rilatas al la moroj de nur tiu ĉi vivo; sed la fundamento de la religio de Dio estas la unua parto, kaj Lia Sankteco Bahá'u'lláh renovigis tiun fundamenton.*

La Religio de Dio estas Unu Religio, kaj ĉiuj Profetoj instruis ĝin, sed ĝi estas io vivanta kaj kreskanta, ne senviva kaj senŝanĝa. En la instruoj de Moseo oni vidas la Burĝonon; en tiuj de Kristo la Floron; kaj en tiuj de Bahá'u'lláh la Frukton. Floro ne detruas la burĝonon, nek frukto la floron. Ĝi ne detruas, sed plenumas. La kalikoj de burĝono devas forfali por ke gi ekfluu, kaj la petaloj devas forfali por ke la frukto kresku kaj maturiĝu. Ĉu, do, la kalikoj aŭ petaloj estis eraraj aŭ senutilaj

tiel, ke ili devas esti forigitaj? Ne, en sia tempo ili estis taŭgaj kaj necesaj; sen ili ne povus esti la frukto. Tiel same okazas kun diversaj profetaj instruoj; ilia eksteraĵo ŝanĝas sin de epoko al epoko, sed ĉiu revelacio estas plenumiĝo de la antaŭaj. Ili ne estas netaŭgaj nek nekonvenaj unu de la aliaj, nur prezentas diversajn gradojn en la viva historio de la Unusola Religio, kiu estas malkaŝita alterne kiel semo, kiel burĝono, kiel floro, kaj nun eniras la staton de realiĝo.

### Senerareco de la Profetoj.

Bahá'u'lláh instruas, ke al ĉiu favorita per Profeteco estas donitaj sufiĉaj pruvoj de Lia Misio. Li rajtas postuli obeon de ĉiuj homoj kaj havas la povon nuligi, ŝanĝi aŭ kompletigi la instruojn de Siaj antaŭintoj. En la Libro Iqán ni legas:

*Estus malkonforme al la malavareco de la amoplena providenco kaj ne verŝajne al la supermezura kompatemo elekti unu el ĉiuj servantoj por la gvidado de Siaj kreitaĵoj, detenante de Li sufiĉajn kaj perfektajn pruvojn, kaj samtempe punante la homojn ĉar ili ne kredas je Li! Ja, la Grandfavoreco de la Sinjoro de Ekzisto ĉiam ĉirkaŭbrakis ĉiujn enmondajn kreitaĵojn, per la aperigo de Sia Malkaŝanto. ...*

*Kaj tamen, ĉu ne la celo de ĉiu Malkaŝanto estas efektiviĝi transformiĝon en la tuta karaktero de la homaro, transformiĝo kiu evidentiĝos kaj ekstere kaj interne, kiu efikos kaj la internan vivon kaj eksterajn kondiĉojn? Ĉar se la rolo de la homaro ne ŝanĝus sin, la vana apero de Universalaj Malkaŝantoj de Dio estus evidenta. – Kitáb-i-Iqán, pp. 14, 240*

Dio estas la Sola senerara Aŭtoritato, kaj la Profetoj estas seneraraj ĉar Ilia Revelacio estas la Revelacio de Dio donita al la mondo pere de Ili. Tiu Revelacio plervalidas ĝis kiam ĝi estos anstataŭita per alia Revelacio de tiu sama aŭ alia Profeto.

Dio estas la granda Kuracisto kaj nur Li povas ĝuste diagnozi la malsanon de la mondo kaj recepti taŭgan kuracilon. La kuracilo receptita en unu epoko ne estas plu uzinda en alia epoko, kiam la kondiĉoj de la paciento estas aliaj. Obstini por la malnova kuracilo kiam la kuracisto ordonis novan kurac-manieron ne signifas elmontri al la kuracisto fidon, sed malfidon. Judoj povas sin senti ofenditaj per la aserto ke kelkaj kuraciloj kontraŭ la mondmalsano kiujn Moseo ordonis antaŭ pli ol tri mil jaroj estas nun malnovtempaj kaj netaŭgaj; ankaŭ kristanoj povas konsideri kiel ofendon se oni diras al ili ke Mahometo laŭbezone aldonis kelkajn aferojn necesajn kaj valorajn al la ordonoj de Kristo. Tiel same povas esti kun islamanoj, kiam oni postulas ke ili konfesu ke Báb kaj Bahá'u'lláh havas la aŭtoritaton ŝanĝi la ordonojn de Mahometo. Sed konforme al la bahaa vidpunkto, sindonemo al Dio memsignifas respekton al ĉiuj Liaj Profetoj, kaj senkondiĉan obeon al Liaj plej novaj Ordonoj, donitaj de la Profeto por nia epoko mem. Nur per tia sindonemo povas esti atingita la vera Unueco.

### La Superega Revelacio.

Kiel ĉiuj aliaj Profetoj, Bahá'u'lláh deklaras Sian propran Mision en plej eksterdubaj esprimoj.

En la *Lawh-i-Aqdas*, Tabuleto dediĉita speciale al kristanoj, Li diras:

*Vere la Patro venis kaj plenumis tion kio estis al vi promesita en la Regno de Dio. Tio ĉi estas la Vorto kiun la Filo vualesprimis dirante al Siaj ĉirkaŭantoj ke en tiu ĉi tempo ili ne povus ĝin elporti. Sed kiam la difinita tempo pasis, kaj la Horo alvenis, la Vorto elbrilis el la Horizonto de la Volo. Gardu vin, ho Anaro de la Filo (t.e. kristanoj)! Ne forĵetu ĝin malantaŭen, sed alkroĉu vin al ĝi. Ĝi estas por vi pli bona el ĉio, kio estis antaŭ vi! ... Vere, la Spirito de la Vero alvenis, por gvidi vin al la Vero. Vere, Li ne parolas el Si mem, sed ĉi Tiu Kiu estas Ĉionscianta kaj Saĝa. Li estas Tiu Kiun gloris la Filo. ... Forlasu tion kio estis antaŭ vi, ho homoj de la tero, kaj alprenu tion kio estas al vi ordonita de Tiu Kiu estas Potenco, Fidela.*

Kaj en letero al la Papo, skribita el Adrianopolo en la jaro 1867, Li diras:

*Gardu vin ke la glorado ne apartigu vin de la Glorato kaj ke la adorado ne apartigu vin de la Adorato! Rigardu la Sinjoron, la Ĉionpovan, la Ĉionscian! Li venis por prizorgi la vivadon de la mondo, kaj por unuigi ĉion kio loĝas en ĝi. Venu, ho homoj, al la Tagiĝ-loko de Revelacio! Ne prokrastu eĉ je unu horo! Ĉu vi estas kleraj en la Evangelio, kaj tamen ne scipovas ekvidi la Eternulon de la Gloro?*

*Tio ĉi ne estas inda je vi, ho anaro de kleruloj! Diru do, se vi neas ĉi tion, kiaprove vi kredas je Dio? Prezentu viajn pruvojn. ...*

Kiel en tiuj ĉi leteroj al kristanoj Li anoncas la plenumon de la evangeliaj promesoj, tiel Li ankaŭ proklamas al islamanoj, judoj, zoroastranoj kaj konfesantoj de aliaj kredoj plenumon de la promesoj de iliaj Sanktaj Libroj. Li alparolas ĉiujn homojn kiel ŝafojn de Dio, kiuj ĝis nun estis dividitaj en diversajn arojn kaj ŝirmitaj en diversaj ŝafejoj. Lia revelacio estas, kiel Li diras, la Voĉo de Dio, de la Bona Paŝtisto, kiu venis en la pleneco de la tempo por rekunigi ĉiujn Siajn disigitajn ŝafojn en unu ŝafaron, forigi barilojn inter ili, por ke "estu unu ŝafejo kaj unu paŝtisto".

## La Nova Situacio

La pozicio de Bahá'u'lláh inter la Profetoj estas senprecedenta kaj unika, ĉar la kondiĉoj de la mondo en la tempo de Lia alveno estis senekzemplaj kaj unikaj. Dank'al la longa kaj ŝanĝoriĉa evoluado de religio, scienco, arto kaj civilizacio la mondo fariĝis matura por instruo pri Unueco. La bariloj kiuj en la pasintaj jarcentoj malebligis la unuecon de la mondo estis pretaj fali en rubojn kiam Bahá'u'lláh aperis, kaj depost Lia naskiĝo, en 1817, kaj speciale de kiam Liaj instruoj estis anoncitaj, tiuj bariloj rompiĝadis en plej mirindaj manieroj. Kiel ajn oni tion ĉi klarigus, la fakto restas eksterduba.

En la tagoj de la antaŭaj Profetoj la geografiaj bariloj mem estis sufiĉaj por malebligi la mondunuecon. Nun tiuj malfacilaĵoj estas venkitaj. La unuan fojon en la historio de la homaro homoj ĉirkaŭ la mondo povas interkomunikiĝi rapide kaj facile. Kio estis farita en Eŭropo hodiaŭ tion oni scias hodiaŭ en ĉiuj mondpartoj, kaj paroladon diritan en Ameriko hodiaŭ oni povas morgaŭlegi en Eŭropo, Azio kaj Afriko.

Alia granda obstaklo estis la lingva malfacilaĵo. Dank'al la lernado kaj instruado de fremdaj lingvoj, tiu malfacilaĵo jam estis altgrade venkita, kaj estas plena kaŭzo por supozi ke antaŭ ol multaj jaroj lingvo internacia estos akceptita kaj instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo. Tiam ankaŭ tiu ĉi malfacilaĵo estos entute forigita.

La tria granda obstaklo estis religiaj antaŭjuĝoj kaj netoleremo. Ankaŭ tio ĉi estas nun malaperinta. La mensoj de homoj fariĝas pli liberaj. La edukado de la homoj eliĝas pli kaj pli el la kontrolo de sektaj pastroj; novaj kaj pli liberalaj ideoj ne estas plu detenataj de penetro en eĉ plej ekskluzivajn kaj konservativajn rondojn.

Tiamaniere Bahá'u'lláh estas la unua el la grandaj Profetoj Kies revelacio en daŭro de relative malmultaj jaroj fariĝis konata en ĉiu regiono de la mondo. En daŭro de mallonga tempo la esencaj instruoj de Bahá'u'lláh tradukitaj laŭ Liaj propraj aŭtentikaj Verkoj, estos senpere atingeblaj por ĉiu virino, virino kaj infano en la mondo kiuj scias legi.

## Pleneco de la Bahaa Revelacio

La Bahaa Revelacio estas senekzempla kaj unika inter la kredoj de la mondo pro la pleneco kaj kompleteco de Siaj aŭtentikaj skribaĵoj. La enskribitaj vortoj kiujn oni povas kun plena certeco atribui al Kristo, Moseo, Zoroastro, Budho, aŭ Kriŝno, estas tre malmultaj, kaj lasas sensolve multajn modernajn demandojn de grandega praktika valoro. Multaj el la instruoj ĝenerale atribuitaj al tiuj religi-Fondintoj estas dubindaj koncerne ilian aŭtentikecon, kaj kelkaj estas evidente alkreskaĵo de pli malfrua dato. Islamanoj posedas en la Korano, kaj en granda amaso da tradicioj, multe pli plenan historion de la vivo kaj instruoj de sia Profeto, sed Mahometo Mem, kvankam inspirita, ne posedis la skribarton, same kiel plej multaj el Liaj fruaj sekvantoj. La metodoj kiujn oni uzis por kroniki kaj disvastigi Liajn instruojn lasis diversrilate multon por deziri, kaj la aŭtentikeco de multaj tradicioj estas tre dubinda. Rezulte de tio, diferencoj de interpretado kaj malakordaj opinioj kaŭzis dividojn kaj skismojn en Islamo, kiel en ĉiuj antaŭaj religiaj socioj.

Aliflanke, kaj Báb kaj Bahá'u'lláh verkis multe kaj kun grandaj elokventeco kaj forto. Ĉar publikaj paroladoj estis al Ili malebligataj kaj ambaŭ pasigis plimulton de Siaj vivoj (post la deklaro de Siaj misioj) en malliberejoj, Ili dediĉis grandan parton de Sia tempo al verkado, el kio rezultas ke pro la riĉeco de aŭtentikaj skribaĵoj la Bahaa Revelacio estas nekomparebla kun iu ajn el la antaŭaj. Estas donitaj klaraj kaj plenaj klarigoj pri multaj veroj kiuj estis malklare antaŭmontritaj en la antaŭaj revelacioj, kaj la eternaj principoj de la vero, kiun instruis ĉiuj Profetoj, oni nun aplikas al problemoj kiuj prezentas sin al la hodiaŭa mondo - al problemoj ekstreme komplikataj kaj malfacilaj, el kiuj multaj ne aperis ankoraŭ en la tagoj de la antaŭaj Profetoj. Estas do evidente ke tiu plena registro de aŭtentika revelacio devas potence efiki por malebligi miskomprenojn en la estonteco kaj por klarigi la fals-komprenojn de la pasinteco, kiuj tenis unu sekton disde la aliaj.

## La Bahaa Interligo

La Bahaa Revelacio estas senekzempla kaj unika en ankoraŭ alia rilato. Antaŭ Sia morto Bahá'u'lláh kelkfoje skribis Interligon destinante Sian plej aĝan filon 'Abdu'l-Bahá, Kiun Li ofte mencias kiel "La Branĉon" aŭ "La Plej Sanktan Branĉon", kiel aŭtoritatan interpretiston de la instruoj, kaj deklarante ke ĉiu klarigo aŭ interpreto farita de Li devas esti konsiderata tiel same aŭtoritata kiel la vortoj de Bahá'u'lláh Mem. En Sia Testamento Li diras:

*Konsideru tion kion Ni malkaŝis en Nia Plej Sankta Libro: "Kiam la Oceano de Mia ĉeesto forfluos kaj la Libro de Mia Revelacio estos finita, turnu viajn vizagojn al Tiu Kiun Dio elektis, Kiu elkreskis el tiu el Pratempe Radiko". La celo de tiu ĉi sankta verso estas neniu alia ol la Plej Granda Branĉo ('Abdu'l-Bahá).*

Kaj en la *Tablet of the Branch* (Tabuleto de la Branĉo) en kiu Li klarigas la rolon de 'Abdu'l-Bahá, Li diras:

*Ho homoj, gloru Dion por Lia aperigo; ĉar vere Li estas la plej granda Favoro kaj la plej granda beno donitaj al vi; kaj per Li ĉiu putranta osto estos revokita al la vivo. Kiu turnas Sin al Li tiu turnas sin al Dio, kaj kiu forturnis sin de Li forturnis sin de Mia Belo, malakceptis Miajn Pruvojn, kaj pekis kontraŭ Mi.*

Post la morto de Bahá'u'lláh, 'Abdu'l-Bahá, kaj en la propra domo kaj en Siaj vastaj vojaĝoj, havis multnombrajn okazojn renkonti homojn el ĉiuj partoj de la mondo kaj de ĉiuj nuancoj de opinioj. Li aŭskultis ĉiujn el iliaj demandoj, iliaj malfacilaĵoj kaj kontraŭdiroj, kaj donis plenajn klarigojn kiujn oni skribe kronikis. Dum longaj jaroj 'Abdu'l-Bahá daŭrigis Sian taskon klarigante la instruojn kaj indikante ilan adapton al la plej diversaj problemoj de la nuntempa vivo. Diferencoj en opinioj kiuj aperis inter la kredantoj estis prezentitaj al Li kaj aŭtoritate solvitaj, kaj dank'al tio la danĝero de estontaj miskomprenoj estis plue malpliigita.

Plue Bahá'u'lláh decidis ke devas esti elektita Internacia Domo de Justeco, reprezentanta la tutmondan bahaanaron, por prizorgi la aferojn de la Kredo, estri kaj unuigi ĉiujn ĝiajn klopodadojn, malebligi dividojn kaj skismojn, klarigi obskurajn aferojn, kaj antaŭgardi la instruojn de degenero kaj misprezento. La fakto ke tiu supera administrantaro rajtas ne nur enkonduki leĝojn pri ĉiuj aferoj ne difinitaj en la Skriboj, sed ankaŭ nenigi siajn proprajn leĝojn kiam novaj kondiĉoj postulas aliajn rimedojn, ebligas al la Kredo sin plivastigi kaj alĝustigi, kiel vivanta organismo, al la bezonoj kaj postuloj de ŝanĝiĝanta socio.

Krom tio, Bahá'u'lláh firme malpermesis interpretadon de la instruoj al iu ajn ekster la nomita interpretisto. En Sia Lasta Volo kaj Testamento 'Abdu'l-Bahá difinis ke Shoghi Effendi estu la Gardanto de la Kredo post Li kun la rajto interpreti la Skribojn.

Post milo aŭ pli da jaroj aperos alia Malkaŝanto, en la ombro de Bahá'u'lláh, kun klaraj pruvoj de Sia misio, sed ĝis tiam la vortoj de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá kaj la Gardanto kaj la decidoj de la Universala Domo de Justeco prezentas la aŭtoritatojn al kiuj ĉiuj kredantoj devas sin turni. Neniu bahaano rajtas fondi skolon aŭ sekton bazitan sur la speciala interpreto de la instruoj aŭ sur la supozita dia revelacio. Kiu malrespektas tiun ĉi malpermeson estas konsiderata kiel "rompanto de la Sankta Interligo."<sup>1</sup>

'Abdu'l-Bahá diras:

*Malamiko de la Kredo estas tiu kiu penas interpreti la vortojn de Bahá'u'lláh kaj tiamaniere nuancigas ilian signifon konforme al sia percepto-povo, arigas ĉirkaŭ si sekvantaron, formante apartan sekton, superigante sian propran signifon, kaj kaŭzante dividon en la Kredo.*

En alia Tabuleto Li skribas:

*Tiuj ĉi personoj (iniciatoroj de skismo) estas kiel ŝaŭmo sur la mar-supraĵo; ondo venos el la Oceano de la Interligo kaj per la potenco de la Abhá Regno tiu ŝaŭmo estos ĵetita surteren. ... Tiuj ĉi koruptaj pensoj kiuj naskiĝas pro personaj kaj malbonaj celoj ĉiuj malaperos, kaj la Interligo de Dio restos firma kaj sekura.*

*Estas nenio kio malhelpas la homojn forlasi religion se ili tion deziras. 'Abdu'l-Bahá diras: "Dio Mem ne devigas al la animo farigi spirita. La agigo de la homa volo libera estos necesa." La spirita Interligo, tamen, klare malebligas la sektismon interne de la bahaa komunumo.*

## Ne Ekzistas Profesia Pastraro

Ni devas mencii ankoraŭ unu trajton de la bahaa organizaĵo: tio estas la neekzisto de oficiala pastraro. Memvolaj kontribuajoj por elspezoj de instruistoj estas permesitaj kaj multaj dediĉas sian tutan tempon al laborado por la Kredo, sed oni esperas ke ĉiu bahaano partoprenos en la tasko de instruado, k.t.p., konforme al siaj eblo kaj kapablo, kaj ekzistas neniu speciala klaso de homoj distingitaj de siaj samkredanoj per ekskluziva plenumado de pastraj funkcioj kaj per pastraj prerogativoj.

En la malnovaj tempoj pastraro estis necesa, ĉar homoj estis malkleraj kaj neinstruitaj kaj dependis de la pastroj por sia religia edukado, por plenumado de religiaj ritoj kaj ceremonioj, por administrado de justeco, k.t.p. Nun, tamen, la aferoj ŝanĝas. Edukado rapide ĝeneraliĝas, kaj kiam la principoj de Bahá'u'lláh estos realigitaj, ĉiu knabo kaj knabino en la mondo ricevos plenan edukon. Ĉiu povos tiam mem studi la Sanktajn Verkojn, kaj elĉerpi al si la Akvon de Vivo, rekte el la ĉef-fonto. Komplikitaj ritoj kaj ceremonioj, postulantaj servojn de speciala profesio aŭ kasto, ne ekzistas en la bahaa sistemo, kaj administrado de justeco estas konfidita al la tiucele elektitaj kompetentuloj.

Instruisto estas necesa por infano, sed la celo de vera instruisto estas pretigi sian instruaton lerni sen instruisto - vidi aferojn per la propraj okuloj, aŭdi per la propraj oreloj, kaj kompreni per la propra menso. Tiel same, en la infanaĝo de la homa gento, pastro estas necesa, sed lia vera tasko estas ebligi al la homo sin helpi sen li; vidi la diajn aferojn per la propraj okuloj, aŭdi ilin per la propraj oreloj, kaj kompreni ilin per la propraj mensoj. Nun la laboro de pastroj estas preskaŭ finita, kaj la celo

<sup>1</sup> Vidu paĝojn 252-254 kaj 262-263 por pliaj klarigoj pri la Gardanteco kaj la Universala Domo de Justeco.

de la bahaaj instruoj estas kompletigi tiun laboron, fari homojn sendependaj de ĉio krom Dio, por ke ili povu turni sin rekte al Li, t.e., al Lia Malkaŝanto. Kiam ĉiuj turnos sin al unu Centro, povas esti nenia malakordo aŭ konfuzo kaj ju pli ĉiuj alproksimiĝas al la Centro, des pli ili alproksimiĝos unu al la alia.

## ĈAPITRO IX: VERA CIVILIZACIO

*Ho popolo de Dio! Ne okupiĝu kun vi mem. Klopodu pri plibonigo de la mondo kaj eduko de la nacioj. – Bahá'u'lláh*

### Religio estas Fundamento de Civilizacio

Laŭ la bahaa vidpunkto, la problemoj de la homa vivo, individua kaj socia, estas tiel neimageble komplikitaj ke ordinara homa intelekto ne kapablas ĝuste solvi ilin per si mem. Nur la Ĉionscianta plene konas la celon de la kreado kaj scias kiel efektiviĝi tiun celon. Pere de Profetoj Li montras al la homaro la veran intencon de homa vivo kaj la ĝustan vojon de progreso; kaj starigo de vera civilizacio dependas de fidela sinturno al la gvidado de profeta Revelacio. Bahá'u'lláh diras:

*Religio estas la plej granda instrumento por atingi ordon en la mondo kaj trankvilon de ĉiuj ekzistantaj estaĵoj. La malfortiĝo de la pilastroj de religio kuraĝigis ignorantojn kaj faris ilin memfidaj kaj arogantaj. Vere Mi diras: kio ajn malaltigos la noblan staton de religio tio pligrandigas senzorgecon de malbonuloj, kaj finrezultigas anarkion. ...*

*Konsideru la civilizacion de la Okcidentaj popoloj - kian maltrankvilon kaj ekscitegon ĝi kaŭzis al la popoloj de la mondo. Oni elpensis inferajn instrumentojn, kaj elmontris tian kruuelecon en la detruado de vivo kia estis neniam vidita en la mondo nek aŭdita de nacioj. Estos neeble reformi tiujn fortegajn, ĉionregantajn malbonojn, escepte se la popoloj de la mondo unuiĝos pri difinita principaro aŭ en la ombro de Unu Religio.*

...

*Ho anaro de Bahá! Ĉiu el la malkaŝitaj Ordonoj estas potenca fortikaĵo por la defendo de la mondo. – Words of Paradise (Vortoj de Paradizo)*

La nuna stato de Eŭropo kaj ĝenerale de la tuta mondo elokvente konfirmas la verecon de tiuj ĉi vortoj skribitaj antaŭ tiom da jaroj. Malatenton al profetordonoj kaj superregadon de malpieco akompanis malordo kaj plej terura detruaĵo, kaj, se ne ŝanĝis sin koroj kaj idealoj kio estas plej esenca trajto de vera religio, la reformo de la socio ŝajnas esti afero tute neebla.

### Justeco

En la libreto Hidden Words (Kaŝitaj Vortoj), en kiu Bahá'u'lláh mallonge prezentas la esencon de la profetaj instruoj, Lia unua konsilo rilatas al individua vivo: "Havu bonan, puran ka lumradian koron." La sekvanta montras la ĉefprincipon de vera socia vivo:

*Ho Filo de Spirito! Super ĉio plej amata de Mi estas Justeco. Ne deturnu vin de ĝi se vi Min deziras, kaj ne malatentu ĝin por ke Mi konfidu je vi. Per ĝi vi ricevos la forton por vidi per la propraj okuloj kaj ne per okuloj de aliaj homoj, por kompreni per la propra kompreno kaj ne per kompreno de via najbaro. Pripensu tion en via koro, kiel decas al vi esti. Vere justeco estas Mia donaco al vi kaj la signo de Mia korfavoro. Tenu ĝin antaŭ viaj okuloj.*

La granda bezono de socia vivo estas ke individuoj iĝu kapablaj distingi veron de malvero kaj bonon de malbono kaj vidi ĉiujn aferojn en ĝusta lumo. la plej grava kaŭzo de spirita kaj socia blindeco, kaj la plej granda malamiko de socia progreso, estas egoismo. Bahá'u'lláh diras:

*Ho filoj de intelekto! Estas ja nur malforta palpebro kiu malhelpas al okulo vidi la mondon kaj ĉion kio estas en ĝi. Pensu do kio sekvas se la kurteno de avido kovras la vidon de la koro!*

*Ho homoj! La mallumo de avido kaj envio malheligas la lumon de la animo kiel nubo malhelpas trapenetron de la sunaj radioj. (Tabuleto al kelkaj persaj kaj zoroastraj bahaanoj)*

Longdaŭra sperto fine konvinkas homojn pri la vereco de la profetaj instruoj ke egoistaj konsideroj kaj egoistaj agoj alportas neeviteblan socialan malfeliĉon, kaj por ke la homaro ne pereu malglore, ĉiu devas konsideri aferojn de sia najbaro egale gravaj kiel siaj propraj, kaj subordigi siajn proprajn profitojn al tiuj de la tuta homaro. Tiamaniere bezonoj de ĉiu kaj ĉiuj estos fine plej bone kontentigitaj. Bahá'u'lláh diras: "Ho filo de homo! Se vi serĉas korfavoron, ne konsideru tion kio utilas nur al vi, sed alkoĉu vin al tio kio utilas al la homaro. Kaj se vi priatentas justecon, elektu por aliaj tion kion vi elektas pou vi mem." – Words of Paradise (Vortoj de Paradizo).

## Registaro

La instruoj de Bahá'u'lláh enhavas du diversajn tipojn de aludoj al la problemoj de vera socia ordo. Unu tipo troviĝas en la tabuletoj revelaciitaj al la Regantoj, kaj ili traktas pri la problemoj de registaroj ekzistantaj en la mondo dum la surtera vivo de Bahá'u'lláh, la aliaj aludas al la nova mondordo evoluiĝonta en la bahaa komunumo mem.

Sekve estas granda kontrasto inter tiaj frazaroj kiaj: "La unu vera Dio, ekzaltita estu Lia gloro, ĉiam konsideris, kaj daŭros konsideri, la korojn de la homaro kiel la Siajn, Siajn ekskluzivajn posedaĵojn. Ĉion alian, ĉu rilate al tero aŭ maro, al riĉaĵoj aŭ rangoj, Li donacis al la Reĝoj kaj regantoj de la tero"; kaj "Decas al ĉiuj homoj, en ĉi tiu tago al kroĉiĝi al la Plej Sankta Nomo, kaj starigi unuecon de la tuta homaro. Estas nenia forkurejo, nenia rifuĝejo, krom Li." – *Gleaning from the Writings of Bahá'u'lláh*, pp. 206, 203 (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh)".

La ŝajna malakordiĝo inter tiuj du vidpunktoj estas forigita kiam oni vidas la diferencon kiun Bahá'u'lláh faras inter la "Malplia Paco" kaj la "Plej Granda Paco". En Siaj tabuletoj al la Reĝoj Bahá'u'lláh vokas al ili kunveni kaj klopodi por daŭra politika paco, malpliigo de armiloj, kaj senĉarĝigi kaj kuraĝigi malriĉulojn. Sed Liaj vortoj plene klarigas ke ilia malsukceso respondecas pri la bezonoj nuntempaj rezultas en milito kaj revolucioj kaj kondukas al la renverso de la malnova sistemo. Sekve, Li diris unuflanke: "Tio kion la homaro bezonas en la nuna epoko estas obeado al la aŭritatuloj", kaj aliflanke "Tiuj, kiuj amasigas la vantaĵojn kaj ornamaĵojn de la tero, malestime deturnas sin de Dio - ili jam perdis kaj ĉi tiun mondon kaj la proksiman. Baldaŭ, Dio, per la Mano de Potenco, senigos ilin je iliaj posedaĵoj kaj senvestigos ilin je la robo de Sia donacemo." "Ni havas difinitan tempon por vi, ho popoloj. Se ĉe la difinita horo vi ne turnos vin al Dio, vere, Li furioze kaptos vin, kaj igos ke malĝojigaj afliktoj ataku vin el cuiu direkto." "La signoj de okazantaj konvulsioj kaj ĥaoso estas nun distingeblaj, ĉar la ĝenerala ordo ŝajnas esti lamentinde neperfekta." "Ni promesis al Ni certigi Vian triumfon sur la tero kaj altigi Nian Kredon super ĉiuj homoj, kvankam ne troviĝas reĝo kiu turnos la vizaĝon al Vi." – *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh*, pp. 207, 209, 214, 216, 248-249 (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh).

*La Granda Estaĵo, dezirante malkasi la postulojn por paco kaj trankvileco de la mondo kaj la antaŭenigo de la popoloj, skribis: Nepre venos tempo kiam deviga neceso okazigi vastan, ĉiun-entenan kunvenon de homoj estos universale realigita. La regantoj kaj reĝoj de la tero devos ĉeesti, kaj, partoprenante en ĝiaj konsiliĝoj, devos konsideri tiujn rimedojn por meti la fundamentojn de la Sankta Paco tutmonda inter la homaro. Tia paco postulas ke la Grandaj Potencoj decidu, pro la trankvileco de la popoloj sur la tero, ke ili estu plene akordiĝintaj inter si. Okaze se iu reĝo militus kontraŭ alian, ĉiuj kune leviĝu kaj malebligu lin.* – *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh*, p. 249 (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh)

Per tiaj konsiloj, Bahá'u'lláh malkasis la kondiĉojn, laŭ kiuj la publika respondeco devos esti plenumita en tiu ĉi Tago de Dio. Alvokante por internacia solidareco unuflanke, Li tamen tute klare avertis la regantojn ke daŭraj bataloj detruos ilian potencon. Nun la moderna historio konfirmas tiun averton, meze de tiuj devigaj movadoj kiuj atingis tiel detruigan energion en ĉiuj civilizitaj nacioj, kaj en la evoluo de militado tigrade ke triumfo ne estas plu atingebla de iu partio. "Nun pro tio ke vi rifuzis la Plej Sanktan Pacon, al kroĉiĝu al tiu ĉi Malplia Paco, por ke eble vi povu iagrade plibonigi vian propran staton kaj tiun de viaj familianoj." "Tio kion la Eternulo ordonis kiel suverenan kuracilon kaj plej fortan rimedon por resanigi la tutan mondon estas unuiĝo de ĉiuj popoloj en unu universala Religio, unu komuna Kredo. Tio tute ne estas atingebla krom per la potenco de lerta, ĉionpova kaj inspirita Kuracisto." – *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh*, pp. 245, 255 (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh).

La Malplia Paco signifas politikan unuiĝon de ŝtatoj, dum la Plej Sankta Paco estas unuiĝo kiu enhavas spiritajn kiel ankaŭ politikajn kaj ekonomiajn faktorojn. "Baldaŭ la nuntempa ordo estos kunvolvita, kaj nova etendita en ties loko." – *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh*, p. 7 (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh).

En antaŭaj epokoj, registaroj rajtis okupiĝi pri eksteraj kaj materiaj aferoj, sed nuntempe la funkciado de registaroj postulas kvalitojn de ĉefeco, de sindediĉo kaj de spirita scio neeblaj krom al tiuj, kiuj turnas sin al Dio.

## Politika Libereco

Kvankam Bahá'u'lláh prezentas kiel idealon reprezentantan formon de registaroj, lokaj, naciaj kaj internaciaj, Li instruas tamen ke tiu ĉi formo estas ebla nur kiam homoj estas atingintaj sufiĉe altan gradon de individua kaj socia evoluo. Donaci subite plenan memregadon al homoj needukitaj, direktataj de egoistaj deziroj kaj nespertaj en la gvidado de publikaj aferoj - estus katastrofa. Nenio estas pli danĝera ol doni liberecon al tiuj kiuj ne estas preparitaj uzi ĝin en saĝa maniero. Bahá'u'lláh skribas en la Libro *Aqdas*:

*Konsideru la malgrandecon de la homaj mensoj. Oni petas tion kio malutilas, kaj forĵetas tion kio utilas. Ili estas, ja, el tiuj kiuj eraregas. Ni rimarkas ke kelkaj popoloj klopodas por akiri liberecon, kaj fieras pri ĝi, sed ili vivas en evidenta malklereco.*



*Por tiaj popoloj libereco estas kaŭzo de ĥaoso kaj malordo, kies fajro estas neestingebla. Tiel avertas vin la Kalkulanto, la Ĉionscianto. Sciu ke ekzemplo de absoluta libereco estas bestoj. Koncerne homon estas lia devo restadi sub leĝo kiu ŝirmas lin kontraŭ lia propra neklereco, kaj kontraŭ malbonagoj de perfiduloj. Libereco igas homon forgesi la postulon de afableco, kaj lasas lin fariĝi maldigna. Ĝi malaltigas lin ĝis plena malvirteco.*

*Konsideru homojn kiel ŝafojn. Ŝafisto necesas por dia protekto. Vere, tio ĉi estas senduba certaĵo. Ni aprobas liberecon sub kelkaj kondiĉoj, ne sub aliaj. Ni estas, vere, la Ĉionscianto.*

*Diru: Vera libereco signifas submeti vin al ordonoj, se vi nur estas el tiuj kiuj scias. Se homoj sekvus tion kion Ni malkaŝis el la Ĉielo de Inspiro, ili certe trovus, ke ili atingus plenan liberecon. Feliĉa estas tiu kiu komprenas la Celon de Dio en kio ajn Li malkaŝis el la Ĉielo de Sia Volo, kiu trapenetras ĉiujn kreitaĵojn. Diru: La libereco kiu kaŭzos bonon al vi troviĝas nenie krom en plena servo al Dio, la Eterna Vere. Kiu ajn gustumis ĝian dolĉecon tiu neniam interŝanĝos ĝin por la tuta regno surtera kaj ĉiela. – Kitáb-i-Aqdas*

Por plibonigo de la kondiĉoj de neprogresintaj rasoj kaj nacioj, la Diaj instruoj estas la ĉefa kuracilo. Kiam kaj popolo kaj politikistoj studos kaj akceptos tiujn instruojn la nacioj estos liberaj de ĉiuj siaj katenoj.

### Regantoj kaj Regatoj

Bahá'u'lláh malpermesas tiranecon kaj subpremadon per plej emfazaj esprimoj. En Hidden Words (Kaŝitaj Vortoj) Li skribas:

*Ho vi subpremantoj sur la Tero! Retiru vin mem for de tiraneco, car Mi ĵuris ke nenia maljusteco pasos senpune. Tio ĉi estas Mia interligo kiun Mi nerevoke dekretis en la konservita Tabuleto kaj sigelis ĝin per Mia sigelo de gloro.*

Tiuj kiuj difinas kaj administras la leĝojn kaj regularojn devas "forte teni la gvidŝnuron de Konsiliĝo, kaj decidi kaj plenumi tion kio akcelas sendanĝerecon, bonstaton, sukceson kaj trankvilecon de la popolo; ĉar se estos aranĝite alie, tio kondukos al malpaco kaj malordo." – *Tablet of the World* (Tabuleto de la Mondo).

Aliflanke, la civitanoj devas esti leĝobeaj kaj lojalaj al justa registaro. Ili devas elekti edukajn metodojn kaj forton de bona ekzemplo, ne perforton, por plibonigi la kondiĉojn de la nacio. Bahá'u'lláh diras:

*En ĉiu lando kie vivas kelkaj el tiu ĉi komunumo, ili devas konduki rilate al la ŝtata registaro kun fideleco, sincereco kaj obeemo. – The Glad Tidings (La Ĝoja Novaĵo).*

*Ho popolo de Dio! Ornamu viajn tempiojn per mantelo de fideleco kaj honesteco; tiam akompanu vian Eternulon kun armeo de bonaj agoj kaj bonaj moroj. Vere Ni malpermesis al vi ribelojn kaj malpacojn, en Miaj Libroj kaj Epistoloj, en Miaj Skribaĵoj kaj Tabuletoj; kaj per tio ĉi Ni deziris nur vian noblecon kaj altigon. – Tablet of Ishráqát (Tabuleto Ishráqát)*

### Disdono de Oficoj kaj Avancoj.

En disdono de oficoj, la sola kriterio devas esti taŭgeco de kandidato por la koncerna ofico. Al tiu ĉi ĉefkonsidero devas cedi ĉiuj aliaj, kiel supereco de aĝo, socia aŭ financa stato, familiaj rilatoj aŭ persona amikeco. Bahá'u'lláh diras en la *Tablet of Ishráqát* (Tabuleto Ishráqát):

*La kvina Ishráqát (Brilego) estas ke registaro devas scii la kondiĉojn de la regatoj, kaj disdoni oficojn konforme al indo kaj merito. Estas severe ordonite al ĉiu estro kaj reganto respekti tiun ĉi konsideron, por ke perfiduloj ne uzurpu postenon de homoj fidindaj kaj por ke rabemuloj ne okupu lokon de gardistoj.*

Oni ne bezonas multe argumenti por montri ke kiam tiu ĉi principo estos ĝenerale akceptita kaj sekvata, la aliformiĝo de nia socia vivo estos miriga. Kiam ĉiu ricevos postenon kiu speciale taŭgas laŭ ties talentoj kaj kapabloj li povos dedici sian koron al la laboro kaj fariĝi artisto en sia profesio, kun nekalkulebla profito por si mem kaj por la cetero de la mondo.

### Ekonomiaj Problemoj

En plej fortaj esprimoj la bahaaj instruoj insistas pri neceso de reformo en la ekonomiaj rilatoj inter riĉuloj kaj malriĉuloj. 'Abdu'l-Bahá diras:

*Oni devas tiel aranĝi la kondiĉojn de popolo ke malriĉeco malaperu, ke ĉiu, konforme al siaj rango kaj pozicio, partoprenu kiom eblas en ĝenerala bonhavo kaj bonstato. Ni vidas inter ni unuflanke homojn*

*superŝarĝitajn per ricaĵoj, kaj alkflanke malriĉulojn mortantajn pro mizero; kelkajn kiuj posedas po kelke de luksaj palacoj, kaj aliajn kiuj ne havas kie kuŝigi la kapon. ... Tiu ĉi stato de la aferoj estas malbona, kaj devas esti rebonigita. Sed oni devas tre zorgeme apliki kuracilon. Oni ne povas tion fari okaziginte absolutan egalecon inter homoj. Egaleco estas ĥimero! Ĝi estas tute neefektivebla. Se eĉ egaleco estus atingita ĝi ne povus daŭri; kaj se ĝia ekzisto estus ebla, la tuta ordo de la mondo estus detruita. La Leĝo de Ordo devas ĉiam regi en la mondo de la homaro. La Ĉielo tion ĉi dekretis kreante la homon. ... La homaro, kiel granda armeo, bezonas ĝeneralojn, kapitanojn, diversrangajn suboficiojn, kaj soldatojn, el kiuj ĉiu havas difinitajn devojn. Multrangeco estas absolute necesa por certigi bonordan organizon. Armeo ne povas konsisti ekskluzive el ĝeneraloj, aŭ nur el kapitanoj, aŭ sole el soldatoj kun neniuj komandanto.*

*Certe konsiderante, ke kelkaj estas ekstermezure riĉaj kaj aliaj plorinde malriĉaj, necesa estas organizaĵo por kontroli kaj plibonigi tiun ĉi staton. Estas grava afero limigi riĉecon, kaj tiel same grave estas limigi malriĉecon. Neniu ekstremo estas bona. Kiam ni vidas ke oni lasas malriĉecon atingi la limojn de mortmizero, ĝi estas certa signo ke ni trovos ie tiranecon. Oni devas klopodi pri tio ĉi, kaj ne prokrasti ŝanĝon de la stato kiu kaŭzas mizeron de premeganta malriĉeco al granda amaso da popolo.*

*Riĉuloj devas partodoni el sia superfluo; ili devas moligi siajn korojn kaj kreskigi en si kompateman komprenon pensante pri tiuj malfeliĉuloj kiuj suferas pro manko de plej necesaj vivrimedoj.*

*Devas esti kreitaj specialaj leĝoj, koncernantaj ekstremojn de riĉeco kaj mizero. ... Ŝtataj registaroj devas konformiĝi al la Dia Leĝo kiu donas egalan justecon al ĉiuj. ... - La Leĝo de Dio estos obeata nur kiam tio ĉi estos farita.*

## Publikaj Financoj

'Abdu'l-Bahá sugestas ke oni konfidu kiom eble al ĉiu urbo, vilaĝo aŭ distrikto la administradon de fiskaj aferoj inter la limoj de sia propra teritorio kaj ke ili kontribuu justan proporcion por elspezoj de la ĝenerala registaro. Unu el la ĉefaj fontoj de enspezoj devus esti progrese laŭenspeza imposto. Se ies enspezo ne superas liajn necesajn elspezojn oni ne devus postuli de li impostpagon, sed en ĉiuj okazoj kiam enspezoj superas la necesajn elspezojn devus esti pagata imposto, kies proporcio konformus al la superfluo de la enspezoj kompare kun la necesaj elspezoj.

Aliflanke, se iu, pro malsano, malbonrikolto, aŭ alia kaŭzo por kiu li ne estas respondeca, ne povas gajni sufiĉe por kovri siajn necesajn elspezojn por kuranta jaro - tiam kio mankas por lia vivtenado kaj tiu de lia familio devus esti havigita el publikaj kapitaloj.

Estos ankaŭ aliaj fontoj de publikaj enspezoj, ekzemple el sentestamentaj heredaĵoj, minejoj, trezor-trovoj kaj memvolaj kontribuajoj; dum inter la elspezoj estas sumoj asignitaj por subteno de kripluloj, orfoj, lernejoj, de blinduloj kaj surduloj, kaj por subteno de publika sano. Tiel estos certigita ĝenerala bonhavo kaj bonstato.<sup>1</sup>

## Propravola Divido

En Sia letero al la Centra Organizaĵo por Konstanta Paco skribita en 1919, 'Abdu'l-Bahá diras:

*Inter la instruoj de Bahá'u'lláh estas tiu pri propravola dividado de sia havaĵo kun aliaj homoj. Tiu ĉi propravola dividado estas pli granda ol (leĝefarita) egaleco, kaj konsistas el tio, ke oni ne preferu sin mem ol aliajn homojn, sed pli ĝuste oferu siajn vivon kaj havaĵon por la bono de la aliaj. Sed tio ĉi ne estu aranĝita devige kaj fariĝu leĝo kiun ĉiu devas obei. Kontraŭe, ĉiu bonvole kaj laŭ propra instigo oferu siajn havaĵojn kaj vivon por la aliaj, kaj elspezu propravole por la malriĉuloj, kiel okazas inter la bahaanoj en Persujo.*

## Universala Labordevo

Unu el la plej gravaj instruoj de Bahá'u'lláh rilate al ekonomiaj problemoj estas ke ĉiu devas okupi sin per utila laboro. En la socia abelejo devas esti neniam mallaboremuloj, neniam laborkapablaj individuoj parazite vivantaj en la socio. Li diras:

*Estas ordonite al ĉiu el vi okupi sin per ja laboro – arto, metio aŭ io simila. Tion ĉi – vian laboron – Ni identigas kun adorado de Dio, la Vera. Pensu, ho homoj, pri la Kompatemo de Dio kaj pri Liaj Favoroj, kaj danku Lin matene kaj vespere.*

<sup>1</sup> Pri pluaj detaloj rigardu publikigitajn paroladojn de 'Abdu'l-Bahá, speciale tiuj kiujn Li faris en Usono.

*Ne malŝparu vane vian tempon en senfareco kaj maldiligenteco, sed okupu vin per tio kio utilos al vi mem kaj al aliaj. Tiel estas dekretite en tiu ĉi Tabuleto, el kies Horizonto lumbrilas la Suno de Saĝeco kaj Diaj Vortoj! Plej malŝatinda antaŭ Dio estas homo kiu sidas kaj petas almozon. Alkroĉu al la ŝnuro de vivrimedoj, fidante al Dio, la Kaŭzinto de Kaŭzoj. – Glad Tidings (Ĝoja Novaĵo)*

Kiom multe de la energio uzita en la hodiaŭa komerco-mondo estas foruzata simple por nuligi kaj neŭtraligi klopodojn de aliaj homoj – por senfrukta batalado kaj konkurado! Kaj kiom estas uzata en aliaj ankoraŭ pli malutilaj manieroj! Se ĉiuj laborus, kaj se ĉiuj laborus, per la cerbo aŭ per la manoj, en maniero profitdona al la homaro, kiel ordonas Bahá'u'lláh, tiam por ĉiuj plene sufiĉus la provizoj kiuj necesas por sana, bonstata kaj nobla vivo. Tiam oni vidus nenian mizer-kvartalojn, nenian malsatigon, nenian malriĉecon, nenian industriian sklavecon, nenian sanpereigan laboron.

### Etiko de Riĉeco

Laŭ la bahaaj instruoj, riĉaĵo juste akirita kaj juste uzita estas respektinda kaj laŭdinda. Faritaj servoj estu ĝuste rekompencitaj. Bahá'u'lláh diras en la Tabuleto *Tarázát*: La homoj de Bahá devas al neniu rifuzi rekompenci per repago tion kion oni meritas, kaj devas respekti talentulojn. ... Oni parolu juste kaj rekonadu la valoron de bonfaroj."

Koncerne procenton, Bahá'u'lláh skribas en la Tabuleto *Ishráqát* sekvante:

*Estas multaj homoj kiuj bezonas tion ĉi, ĉar se neniu procento estus permesita, negocoj estus haltigitaj kaj sufokitaj. ... Malofte oni povas trovi homon kiu pruntedonus monon al alia laŭ la principo "Qard-i-hasan" (laŭvorte "bona prunto", t.e. ke la mono estas pruntedonita sen profito kaj redonota laŭ oportuno de la prunteprenanto). Tial, pro favoro al la servantoj, Ni decidis, ke profit-mono estu allasita, inter aliaj negocagoj laŭleĝe plenumataj. Tio estas ... estas permesite, laŭleĝe kaj neriproĉinde postuli interezon pro sia mono ... sed oni devas konduti en tiu ĉi afero kun modereco kaj justeco. La Plumo de Gloro detenis sin de difino de ties limoj, kiel Saĝeco el Sia Ĉeesto kaj kiel oportuno por Siaj servantoj. Ni admonas la amikojn de Dio ke ili agadu kun justeco kaj pravenco, kaj tiamaniere ke kompatemo kaj kunsentemo de Liaj amatoj vidĵu en rilato de unu al la alia. ...*

*La plenumo de tiuj ĉi aferoj estas komisiita al la membroj de la Domo de Justeco, ke ili agu konforme al la urĝejoj de la tempo kaj kun saĝeco.*

### Malpermeso de Industria Sklaveco

En la Libro Aqdas Bahá'u'lláh malpermesas sklavecon, kaj 'Abdu'l-Bahá klarigis ke ne nur persona, sed ankaŭ industria sklaveco, kontraŭas la leĝon de Dio. En Usono en 1912, Li diris al amerikanoj:

*Inter la jaroj 1860 kaj 1865 vi plenumis admirindan agon; vi forigis personan sklavecon; sed nun vi devas fari multe pli grandan admirindaĵon; vi devas forigi industriian sklavecon. ...*

*La solvo de la ekonomiaj problemoj ne elektiviĝos per armigo de kapitalo kontraŭ laboro, kaj de laboro kontraŭ kapitalo, per interbatalado kaj konfliktoj, sed per sintenado de bonvolo ambaŭflanke. Tiam estos atingita vera kaj daŭra stato de justeco. ...*

*Inter bahaanoj estas neniam trouzoj, neniam koruptaĵoj kaj maljustaĵoj, neniam ribelaj postuloj, neniam revoluciaj ribeloj kontraŭ la ekzistantaj registaroj. ...*

*Estante ne estos eble por homoj amasigi grandegajn riĉaĵojn per laboro de aliaj. Riĉuloj volonte dividados siajn riĉaĵojn. Ili inkliniĝos al tio ĉi iom post iom, en natura maniero, pro sia propra volado. Ĝi neniel estos efektiva per militoj kaj sangoverŝado.*

Tiel la aferojn de kapitalo kiel de laboro servos plej bone amikaj interkonsento kaj kunagado, justa kompanianeco kaj profitkvoto. La akraj armiloj de strikoj kaj lokaŭtoj malutilas, ne nur al la rekte koncernataj fakoj, sed al la tuta socio. Estas, do, la tasko de registaroj elpensi rimedojn kiuj malebligos en estonteco uzadi tiajn barbarajn metodojn por solvi malkonsentojn. Abdu'l-Bahá' diris en Dublin, New Hampshire, en 1912:

*Nun mi deziras paroli al vi pri la leĝo de Dio. Laŭ la dia leĝo, rekompenco de laboristoj ne devas konsisti nur el salajro. Ili devas esti ja firmanoj en ĉiu laboro. La problemo de sociigado estas tre malfacila. Strikoj pro salajroj ne solvos ĝin. Ĉiuj registaroj de la mondo devas unuiĝi, kaj organizi asocion, kies membroj devas esti elektataj el parlamentoj kaj el inter la plej noblaj civitanoj. Tiuj ĉi devas ellabori planon kun saĝeco kaj povo, por ke nek kapitalistoj suferu tro grandajn perdojn, nek laboristoj sin trovu en malriĉeco. En pleja modereco ili devas krei leĝon, kaj proklami al la publiko ke la rajtoj de laboristoj estos efike defendataj; ankaŭ, ke la rajtoj*

*de la kapitalistoj estos protektataj. Kiam estos ĝenerale akceptita tia leĝo, per konsento de ambaŭ flankoj, tiam, se okazus striko, ĉiuj registaroj de la mondo devas kolektive kontraŭstari ĝin. Alie la laboro kondukos al granda ruino, speciale en Eŭropo. Okazos teruraj aferoj. Inter kelkaj kaŭzoj de tuteŭropa milito estos ankaŭ tiu ĉi problemo. Posedantoj de bienoj, minejoj kaj fabrikejoj, devas dividi siajn profitojn kun siaj laboristoj, kaj donadi difinitan, juste fiksitajn procenton de la gajnoj al siaj laboristoj, por ke la oficistoj ricevu, krom la salajro, certan parton de la ĝenerala profito de la fabrikejo, kaj pro tio dediĉu al la laboro sian tutan fervoron.*

### Testamentaj Donacoj kaj Heredaĵoj

Bahá'u'lláh diras ke ĉiu devas rajti libere disponi en laŭvola maniero sian posedaĵon dum la vivo, kaj ke ĉiu devas skribi sian lastan testamenton difinante kiel lia posedaĵo estu disponita post lia morto. Se iu mortas sentestamente, oni devas taksi la valoron de lia propraĵo kaj dividi ĝin laŭ difinitaj fiksitaj proporcioj inter sep klasojn de heredantoj, kiuj estas: infanoj, edzo aŭ edzino, patro, patrino, fratoj, fratinoj kaj instruistoj; la parto de ĉiu el ili malkreskas de la unuaj ĝis la lastaj. Se mankas unu aŭ kelkaj el tiuj ĉi klasoj, la parto kiu apartenas al ili estas transdonita en la publikan kason, por elspezi ĝin por malriĉuloj, orfoj, vidvinoj, aŭ por publikutilaj entreprenoj. Se mortinto ne postlasis heredantojn, lia tuta propraĵo pasas en la publikan kason.

En la leĝo de Bahá'u'lláh nenio malpermesas al homo testamenti sian tutan propraĵon al unu persono se li tiel deziras, sed nature bahaanoj, skribante sian lastan testamenton, restos sub la influo de la modelo donita de Bahá'u'lláh por okazoj de sentestamentaj heredaĵoj, kio certigos dividon de la havaĵo inter sufiĉe grandan nombron da heredantoj.

### Egaleco de Viroj kaj Virinoj

Unu el la sociaj principoj al kio Bahá'u'lláh atribuas grandan signifon estas ke virinoj devas esti konsiderataj kiel egalaj kun viroj kaj devas posedi egalajn rajtojn kaj privilegiojn, egalan edukon, kaj egalajn oportunojn.

Potenca rimedo al kiu Li konfidas efektivigon de la virina emancipiĝo estas universala edukado. Knabinoj devas ricevi edukadon tiel bonan kiel knaboj. Fakte, la edukado de knabinoj estas eĉ pli grava ol tio de knaboj, ĉar siatempe la knabinoj fariĝos patrinoj, kaj, kiel patrinoj, ili estos la unuaj edukantinoj de la nova generacio. Infanoj estas kvazaŭ verdaj kaj delikataj branĉetoj; se la komenca prizorgado estas bona ili kreskas rekte, kaj se ĝi estas malbona ili kreskas kurbe; kaj ĝis la fino de la vivo ili estas sub la influo de la frujara edukado. Kiel grave do estas, ke knabinoj estu bone kaj saĝe edukitaj!

Dum Siaj okcidentaj vojaĝoj, 'Abdu'l-Bahá en multaj okazoj klarigadis la bahaajn instruojn pri tiu ĉi temo. Dum la kunveno de la Ligo por Libereco de Virinoj en Londono en 1913, Li diris:

*La homaro estas kvazaŭ birdo kun du flugiloj - unu estas viro, la dua virino. Se ne estas fortikaj ambaŭ flugiloj, se ilin ne instigas iu komuna forto, birdo ne povas flugi al la ĉielo. Konforme al la spirito de tiu ĉi epoko, virinoj devas iri antaŭen kaj plenumi sian mision en ĉiuj fakoj de la vivo, fariĝante egalaj al viroj. Ili devas esti sur la sama nivelo kiel viroj kaj havi egalajn rajtojn. Tio ĉi estas mia fervora preĝo kaj ĝi estas unu el la fundamentaj principoj de Bahá'u'lláh.*

*Kelkaj sciencistoj konstatis ke vira cerbo pezas pli multe ol la virina, kaj prezentas tion kiel provon de supereco de viro. Tamen rigardanta ĉirkaŭen ni vidas homojn kun malgrandaj kapoj, kies cerboj certe malmulte pezas, kaj kiuj tamen elmontras grandegan inteligentecon kaj grandan kapablon de kompreno. Aliflanke ni vidas personojn kun grandaj kapoj, kies cerboj certe estaspezaj, kaj kiuj tamen estas malspiritaj. Sekve pezo de cerbo ne estas fidinda mezurilo de inteligenteco kaj supereco.*

*Kiam viroj prezentas kiel duan pruvon de sia supereco la aserton ke virinoj ne sukcesis tiel multe kiel viroj, ili uzas mizeran argumenton sen konsideri la historion. Se illa kono de la historio estus pli granda, ili scios ke en la pasintaj tempoj vivis grandaj virinoj kiuj plenumis grandajn farojn, kaj ke ankaŭ hodiaŭ multaj vivas kaj plenumas grandajn farojn.*

Tiam 'Abdu'l-Bahá priskribis la elfarojn de Zenobia kaj aliaj grandaj virinoj el la pasintaj tempoj, kaj finis per elokventa tributo al la sentima Maria Magdalena, kies kredo restis firma dum la kredo de la apostoloj ŝanceliĝis. Li daŭrigis:

*Inter la virinoj de nia tempo estas Qurratu'l-'Ayn, filino de islama pastro. En la tempo de la apero de Báb ŝi montris tiel eksterordinarajn kuragon kaj povon ke ĉiuj kiuj ŝin aŭdis estis mirigitaj. Ŝi forĵetis la vualon malgraŭ la pretermemora persa kutimo, kaj kvankam interparoladon kun viroj oni konsideris malgentilaĵo, tio ĉi heroo virino diskutis kun plej instruitaj viroj, kaj venkis ilin en ĉiuj okazoj. La persa registaro malliberigis ŝin; oni ŝtonbatis ŝin sur stratoj, oni anatemis ŝin, ekzilis de urbo al urbo, minacis al ŝi morton, sed ŝi neniam malfortiĝis en la decido labori por libereco de siaj fratinoj. Ŝi eltenis persekutojn kaj suferojn kun plej granda heroeco; eĉ en malliberejo ŝi sukcesis en la konvertado. Al persa ministro, en kies domo ŝi estis malliberigita,*

*ŝi diris: "Vi povas mortigi min tuj kiam vi volas sed vi ne povas malakceli emancipiĝon de virinoj". Fine venis la fino de ŝia tragika vivo; oni alportis ŝin en ĝardenon kaj sufokis ŝin. Ŝi tamen vestis sin per siaj plej belaj roboj kvazaŭ ŝi irus al edziĝo-festo. Kun tiaj grandanimeco kaj kuraĝo ŝi fordonis sian vivon, timigante kaj ekscitante ĉiujn kiuj ŝin vidis. Ŝi estis vere granda heroino. Nuntempe en Persujo, inter bahaaninoj, ankaŭ estas virinoj elmontrantaj neŝanceliĝan kuraĝon, kaj posedantaj poetan intuicion. Ili estas treege elokventaj, kaj paroladas antaŭ grandaj kunvenoj de homoj.*

*Virinoj devas daŭrigi antaŭen. Ili devas pligrandigi sian konon de scienco, literaturo kaj historio - por la perfekteco de la homaro. Post mallonga tempo ili ricevos siajn rajtojn. Viroj vidos virinojn seriozajn, digne sin tenantajn, plibonigantajn civilan kaj politikan vivon, kontraŭajn al militoj, postulantajn voĉrajtojn kaj egalrajtecon. Mi atendas vidi vin progresi en ĉiuj stadioj de la vivo; tiam viaj fruntoj estos kronitaj per la diademo de eterna gloro.*

### Virinoj en la Nova Epoko

Kiam la virinaj idealoj estos ĝuste konsideritaj, kiam la volo de virinoj akiros taŭgan esprimon en la kondukado de la sociaj aferoj, oni povas esperi grandajn progresojn en la aferoj kiujn ofte la malnova vira reĝimo plorinde malzorgadis - en tiaj aferoj kiel sano, abstinenco, paco, kaj respektado por valoro de la vivo. La plibonigoj en tiuj ĉi rilatoj havos tre vastajn kaj bonfarajn rezultatojn. 'Abdu'l-Bahá diras:

*En la pasinteco la mondo estis regata per forto, kaj viro superregadis virinon ĉar kvalitoj de liaj korpo kaj menso estis pli fortaj kaj atakemaj. Sed la ekvilibro jam sin ŝanĝas - forto perdas sian influon, kaj mensa vigleco, intuicio, kaj la spirita kvalitoj de amo kaj servono, kiuj estas la potenco de virinoj, akiras superecon. Tial la nova epoko estos epoko malpli vira, kaj pli multe penetrata de la virinaj idealoj - aŭ dirante pli precize, ĝi estos epoko en kiu la viraj kaj virinaj elementoj de civilizacio estos en pli granda egalpovo. - Star of the West, vol. iii, n-ro 3 (Stelo de la Okcidento) (el raporto pri rimarkoj sur la ŝipo S.S. Cedric, kiam ĝi alvenis al Nov-Jorko)*

### Forlaso de Perfortmetodo

Bahá'u'lláh konsilas al Siaj sekvantoj evitadi metodojn de perforto en la emancipado de virinoj same kiel en aliaj aferoj. Brilan ekzemplon de la bahaaj metodoj de socia reformado donis bahaaninoj en Persujo, Egiptujo kaj Sirio. En tiuj ĉi landoj estas kutimo ke islamaj virinoj ekster la hejmoj portas vualojn kovrantajn iliajn vizaĝojn. Báb indikis ke en la tempo de la Nova Revelacio virinoj estus liberigitaj de tiu ĉi malagrabra ĝenaĵo, sed Bahá'u'lláh konsilas al Siaj sekvantoj, ke kiam ne estas koncernata la grava problemo de moraleco, ili prefere konformu al la malnova kutimo ĝis kiam la homoj estos pli kleraj, kaj ne skandalu tiujn inter kiuj ili vivas, kaj ne kaŭzu nenecesajn antagonismojn. Tial, do, la bahaaj virinoj, kvankam bone konsciante ke la antikva kutimo de vual-portado estas, por homoj kleraj, nenecesa kaj nekonvena, trankvile toleras tamen la ĝenaĵon, por ne stimuli uraganon de fanatika malamego kaj furioza malamikeco per publika malkovro de siaj vizaĝoj. Tiu ĉi konformeco al la kutimo ne estas diktita de timo, sed de fidoplena certeco pri la potenco de edukado kaj pri transformaj kaj vivodonaj rezultoj de vera religio. La bahaanoj en tiuj ĉi regionoj dediĉas la energiojn al edukado de la infanoj, speciale de knabinoj, kaj al dissemado kaj progresigado de la bahaaj idealoj, plene komprenante ke kiam la nova spirita vivo kreskos kaj disvastiĝos inter la popolo, la malnovaj kutimoj kaj antaŭjuĝoj estos iom post iom forĵetitaj, tiel neeviteble kaj nature kiel ŝeĵetoj de burĝonoj estas forĵetitaj printempe, kiam la folioj kaj floroj etendiĝas al la suno.

### Edukado

Edukado - la instruado kaj gvidado de homoj, la evoluo kaj ekzercado de iliaj naturaj kapabloj - estis de la komenco de la mondo la plej alta celo de ĉiuj Sanktaj Profetoj. Ankaŭ en la bahaaj instruoj la fundamenta valoro kaj senlimaj perspektivoj de edukado estas proklamitaj en plej klaraj esprimoj. Instruisto estas la plej potenca faktoro de civilizacio kaj lia laboro estas la plej alta kiam homo povas aspiri. Edukado komenciĝas jam en la patrino sino kaj daŭras senfine dum la tuta homa vivo. Ĝi estas nepra kondiĉo por ĝusta vivado kaj la fundamento de individua kaj socia bonstato. Kiam la ĝusta metodo de edukado fariĝos universala, la homaro estos aliformita kaj la mondo fariĝos paradizo.

En la nuna tempo homo vere bone edukita estas la plej malofta el ĉiuj fenomenoj, ĉar preskaŭ ĉiu havas falsajn antaŭjuĝojn, malĝustajn idealojn, erarajn ideojn kaj malbonajn kutimojn inspiritajn jam en la infaneco. Kiom malmultaj estas instruitaj de la plej fruaj jaroj por ami Dion per la tuta koro kaj dediĉi sian vivon al Li; por konsideri servadon al la homaro kiel plej altan celon de la vivo; perfektigi siajn kapablojn por la komuna bono! Kaj tamen tiuj ĉiuj estas la esencaj elementoj de bona

eduko. Ekskluziva ŝarĝado de la memoro per scioj koncernantaj aritmetikon, gramatikon, geografion, lingvojn, k.t.p., ludas kompare malgrandan rolon en la formado de noblaj kaj utilaj vivoj.

Bahá'u'lláh diras ke edukado devas esti universala:

*Estas dekretite ke ĉiu patro devas instrui al siaj gefiloj legadon kaj skribadon kaj tion kio estas ordonita en la tabuleto. Se iu malzorgas la plenumon de tiu ordono (tiurilate), tiam, se li estas riĉa, la membroj de la Domo de Justeco devas havigi de li sumon necesan por la edukado de liaj infanoj; alie (t.e., se li estas malriĉa) la afero devas esti transdonita al la Domo de Justeco. Vere Ni faris el ĝi (la Domo de Justeco) azilon por malriĉuloj kaj por tiuj, kiuj bezonas helpon.*

*Kiu edukas sian filon, aŭ iun ajn alian infanon, tiu kvazaŭ edukas unu el Miaj infanoj. – Tablet of Ishráqát (Tabuleto Ishráqát)*

*Viroj kaj virinoj devas deponi parton de siaj gajnoj akiritaj per metio, agrikulturo aŭ aliaj negocoj, al dispono de fidinda persono, por ke ĝi estu elspezita por edukado kaj instruado de infanoj. Tiu ĉi deponaĵo devas esti uzita por edukado de infanoj, laŭkonsiloj de la membroj de la Domo de Justeco. – Tablet of the World (Tabuleto de la Mondo)*

### Naturaj Diferencoj de Karakteroj

Laŭ la bahaa vidpunkto infana naturo ne estas tigrade simila al vakso kiun oni povas muldi mezkvalite laŭ iu ajn formo konforme al la volo de la instruisto. Ĉiu de la komenco ja havas siajn difinitajn de Dio karakteron kaj individuecon kiuj povas evolui plej bone nur en speciala maniero; kaj tiu maniero estas unika en ĉiu aparta okazo. Ne ekzistas du homoj kun identaj kapabloj kaj talentoj, kaj vera edukisto neniam penas trudi al du homaj naturoj tiun saman modelon. Efektive, li neniam penas trudi ian modelon al iu homo. Prefere li respektu kulturu la disvolviĝantajn kapablojn de la juna homo, kuraĝigu kaj subtenu ilin, kaj havigu al ili bezonajn nutraĵojn kaj helpon. Lia laboro similas laboron de ĝardenisto kiu kulturas diversajn plantojn. Unu planto ŝatas la brilan sunon, alia malvarmetan ombbron; unu ŝatas akvobordojn kaj alia sekajn montetojn; unu prosperas plej bone sur sabla grundo kaj alia en riĉa humo. Oni devas konforme kontentigi la bezonojn de ĉiu planto, ĉar alie ĝia perfekteco neniam plene sinmontros. 'Abdu'l-Bahá diras:

*La Profetoj rekonas ke edukado havas grandegan influon je la homa gento, sed ili deklaras ke mensoj kaj intelektoj denature diferencas. Oni vidas ke infanoj samaĝaj, samlandaj kaj samgentaj, ja samfamiliaj, edukataj de la sama instruisto, diferencas laŭ iliaj mensoj kaj komprenoj. Kiel ajn oni prizorgus (polurus) konkon ĝi neniam fariĝos brilanta perlo. Nigra ŝtono neniam fariĝos gemo kies brilo lumigas la mondon. La dormoplena kanto per aranĝado kaj disvolviĝo neniam fariĝos benita arbo. Tio signifas, ke edukado ne ŝanĝas la esencan karakteron de la homa gemo, sed ĝi kaŭzas mirindajn rezultojn. Per tiu ĉi efika forto estas aperigitaj ĉiuj bonkvalitoj kaj kapabloj, dormantaj en la realeco de homo.*

### Preparado de Karaktero

Speciale atentinda afero en edukado estas la preparado de karaktero. Koncerne tion, ekzemplo estas pli efika ol instruo, kaj la vivmaniero kaj karaktero de la gepatroj, instruistoj kaj kutimaj kunestantoj estas faktoro de senkompara signifo.

La Profetoj de Dio estas la grandaj edukantoj de la homaro, kaj liliaj konsiloj kaj la historioj de liliaj vivoj devas esti semataj en infanaj mensoj tuj kiam ili kapablas ilin kompreni. Speciale gravaj estas la vortoj de la Superega Instruisto, Bahá'u'lláh, Kiu malkaŝis la ĉefprincipojn sur kiuj devas esti konstruita la civilizacio de la estonteco. Li diras:

*Instruu al viaj infanoj tion kio estis malkaŝita per la Plumo de Gloro. Instruu al ili tion kio malsuprenvenis el la ĉielo de grandeco kaj potenco. Igu ilin enmemorigi al si la Tabuletojn de la Kompatema kaj kanti ilin per plej melodiaj voĉoj en la kunvenoj de Mashriqu'l-Adhkár.*

### Artoj, Scienco, Metioj

Edukado en la artoj, scienco, metioj kaj utilaj profesioj estas konsiderata grava kaj necesa. Bahá'u'lláh diras:

*Scio estas kvazaŭ flugiloj por la esteco (homa) kaj kvazaŭ ŝtuparo por supreniri. Akiri scion estas deviga al ĉiuj, sed tian scion kia povas utili al la popoloj de la tero, kaj ne tian kia komenciĝas nur per vortoj kaj finiĝas per vortoj. Tiuj kiuj posedas sciojn kaj artojn havas grandajn rajtojn inter la homaro. Efektive, scio de homo estas trezorejo. Scio estas rimedo de honoro, prospero, ĝojo, plezuro, kontenteco kaj plej granda feliĉo. – Tablet of Tajalliyát (Tabuleto Tajalliyát)*

## Traktado de Krimuloj

En interparolo pri ĝusta metodo de traktado de krimuloj, 'Abdu'l-Bahá diris la jenan:

*... la plej esenca afero estas ke ĉiuj homoj devas esti edukitaj tiamaniere ... ke ili evitadu kaj abomena krimadon, por ke krimo mem prezentu sin al ili kiel plej granda puno, plej terura kondamno kaj turmento. Tiel estos plenumataj neniaj krimoj postulantaj punon. ...*

*... se iu premas, ofendas alian aŭ maljuste traktas kontraŭ li, kaj la ofendito repagas la malbonfaron, tio estas venĝo, kaj tio estas riproĉinda. ... Se 'Amru malhonoris Zaidon, tiu ĉi ne rajtas malhonoru 'Amru'n; se li faras tiel tio estas venĝo, kaj tio estas tre mallaŭdinda. Prefere, li devas returni bonon por malbono, kaj ne nur pardoni, sed eĉ, se eble, servi al sia preminto. Tia konduto estas inda je homo, ĉar kion li profitas per venĝo? La du agoj egalvaloras; se unu estas mallaŭdinda, ambaŭ estas mallaŭdindaj. La sola diferenco estas tio ke unu el ili estis plenumita antaŭe, kaj la dua poste.*

*Sed la socio havas la rajton de defendo kaj de singardo. Krom tio, socio ne havas malamon nek malamikecon kontraŭ mortiginto; ĝi malliberigas kaj punas lin nur por defendo kaj sendanĝerigo de aliaj. ...*

*Tiel la vortoj de Kristo: "Al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭla alian", celis instrui homojn ke ili ne serĉu personan venĝon. Li ne intencis diri ke se lupu atakus ŝafaron kaj volus ĝin ekstermi, oni lasu la lupon fari tion. Ne, se Kristo sciis ke lupu penetris en ŝafaron kaj intencas ekstermi la ŝafojn, li tute certe malhelpus ĝin. ...*

*... la bonstato de socio dependas de justeco. ... Sekve la instruoj de Kristo pri indulgo kaj pardono ne signifas, ke se iu nacio invadus vian landon, bruligus viajn domojn, rabus viajn havaĵojn, atakus viajn edzinojn, infanojn, kaj parencojn kaj perfortus vian honoron, vi devus esti cedemaj al la tiranaj malamikoj, kaj lasi ilin fari ĉiujn tiujn malbonagojn. Ne, la vortoj de Kristo koncernas konduton de individuo rilate al al la individuo. Se unu homo atakas alian, la atakito devas pardoni lin. Sed la socio devas defendi la rajtojn de homo. ...*

*Oni devas diri ankoraŭ unu aferon: nome ke la socioj tage kaj nokte okupas sin per kreado de punleĝoj, kaj per preparado kaj organizado de instrumentoj kaj rimedoj de puno. Oni konstruas malliberejojn, faras ĉenojn kaj katenojn, aranĝas ekzilejojn, kaj divers-specajn punlaborojn kaj torturojn, kaj oni esperas per tiuj ĉi rimedoj disciplini krimulojn; dum efektive, ĉio ĉi kaŭzas nur pereigon de moraleco kaj malbonigon de karakteroj. Kontraŭe, la socio devas kun plej granda fervoro kaj energio zorgi kaj klopodi pri edukado de homoj, igi ilin tagon post tago progresadi kaj altiĝi en instruiteco kaj scio, propriigi al si virtojn, akiri bonajn morojn kaj eviti malvirtojn, tiel ke krimoj ne okazu. – Some Answered Questions, pp. 307-311 (Demandoj kaj Respondoj)*

## Influo de la Gazetaro

Bahá'u'lláh plene rekonas la gravecon de gazetaro kiel rimedo por dissemi scion kaj edukadi la homojn, kaj ĝian potencon kiel forto de civilizacio, se ĝi estas bone direktata. Li skribas:

*En la nunaj tagoj la misteroj de tiu ĉi tero estas malkaŝitaj kaj videblaj al okuloj, kaj la paĝoj de rapide eldonataj ĵurnaloj estas vere speguloj de la mondo. Ili reprezentas farojn kaj agojn de diversaj nacioj; ili samtempe vidigas kaj aŭdigas ilin. Ĵurnalo estas kvazaŭ spegulo posedanta la kapablon de aŭdo, vido kaj parolo. Ĝi estas mirinda fenomeno kaj granda afero.*

*Sed necesas ke ĵurnalistoj kaj eldonistoj estu liberaj de la antaŭjuĝoj de egoismo kaj avido, kaj ornamitaj per la belvesto de senpartieco kaj justeco. Ili devas esplori aferojn tiel funde kiel eble por informiĝi pri la veraj faktoj, kaj tiam skribi ilin. Koncerne tiun ĉi persekutaton, tio kion publikigis gazetoj estis plejparte senigita de la vero. Bonaj paroloj kaj honesteco estas, en la alteco de stato kaj grado, kvazaŭ suno leviganta el la horizonto de la ĉielo de scio. – Tablet of Tarázát (Tabuleto Tarázát)*

## ĈAPITRO X: LA VOJO AL PACO

*Hodiaŭ, tiu ĉi Servanto tute certe venis por revivigi la mondon kaj unuigi ĉiujn kiuj trovas sin sur la supraĵo de la tero. Tio kion Dio volas efektiviĝos kaj vi vidos la teron kiel la Abhá (Plej Gloran) Paradizo – Bahá'u'lláh, Tablet to Ra'ís (Tabuleto al Ra'ís).*

### Konflikto kontraŭ Konkordo

Dum la pasinta jarcento scienculoj dediĉis multe da studoj al la batalado por ekzisto en la regnoj de vegetaĵoj kaj bestoj, kaj, inter la malfacilaĵoj de la socia vivo, multaj ekserĉis gvidon ĉe la principoj kiuj troviĝas en la malpli alta mondo de la naturo. Tiamaniere ili venis al la konkludo ke rivalado kaj konfliktoj estas necesaj de la vivo, kaj ke senkompata ekstermado de malpli fortaj membroj de la socio estas laŭleĝa kaj eĉ necesa rimedo por plibonigo de la raso. Bahá'u'lláh, kontraŭe, diras ke, se ni volas leviĝi sur la ŝtuparo de progreso, ni devas, anstataŭ turni la rigardon malantaŭen al la besta mondo, direkti ĝin antaŭen kaj supren, kaj ne bestojn, sed Profetojn elekti kiel gvidantojn. La principoj de unueco, harmonio kaj kompatemo instruataj de la profetoj estas rektaj mnoj de tiuj kiuj instigas bestojn al batalado por memkonserviĝo, kaj ni devas elekti inter ili, ĉar la unuaj ne povas esti kunigitaj kun la dua. 'Abdul-Bahá diras:

*En la mondo de la naturo la ĉefa motivo estas batalado por ekzisto, kies rezulto estas postvivo de plej vivtaŭgaj individuoj. La leĝo de la supervivo de la plej taŭgaj estas la fonto de ĉiaj malfacilaĵoj. Ĝi estas la kaŭzo de milito kaj malpaco, malamo kaj malamikeco, inter homoj. En la mondo de la naturo ekzistas tiraneco, egoismo, atakemo, premegado, uzurpado de rajtoj de la aliaj kaj aliaj malaprobindaj ecoj kiuj prezentas la malperfektecojn de la bestmondo. Tiel longe kiel la idoj de la homaro dediĉados ĉefan konsideron al la postuloj de la naturmondo, sukceso kaj prospero ne estus eblaj. La naturo estas militema, la naturo estas sangsoifa, la naturo estas tiraneca, ĉar la naturo ne havas konscion pri Dio, la Ĉionpova. Tio ĉi estas la kaŭzo, ke tiuj kruelaj ecoj estas naturaj en la bestmondo.*

*Tial la Eternulo de la humaro, havante grandan amon kaj kompaton, aperigis Siajn profetojn kaj revelaciojn de la Sanktaj Libroj, por ke per la dia edukado la homaro estu liberigita de la malvirtoj de la naturo kaj de la mallumo de senco, ke ĝi estu benita per ideala virto kaj per spiritaĵoj, kaj fariĝu tagiĝ-loko de kompatentoj. ...*

*Cent mil fojojn, ve! ke malsaĝaj antaŭjuĝoj, malnaturaj diferencoj kaj antagonistaj principoj montriĝas ankoraŭ en rilatoj inter la nacioj de la mondo, tiamaniere malakcelante la ĝeneralan progreson. Tiu ĉi malprogreso devenas de la fakto, ke la principoj de la dia civilizacio estas komplete forlasitaj, kaj la instruoj de la profetoj estas forgesitaj.*

### La Plej Sankta Paco

En ĉiuj tempoj la Profeto de Dio antaŭdiris alvenon de epoko de "paco sur la tero, bonvolo inter la homoj." Kiel ni jam vidis Bahá'u'lláh, en plej flamaj kaj certaj esprimoj, konfirmas tiujn ĉi profetaĵojn kaj deklaras ke ilia plenumiĝo estas proksima. 'Abdu'l-Bahá diras:

*... en tiu ĉi mirinda ciklo, la tero estus aliformita, kaj la homaro estos ornamita per paco kaj belo. Malkonsentoj, malpacoj, kaj mortigoj estos anstataŭigitaj per harmonio, vero, kaj konkordo; amo kaj amikeco estiĝos inter nacioj, popoloj, gentoj kaj landoj. Starigitaj estos kunagado kaj unueco, kaj militoj estos fine tute neniigitaj. ... Universala paco starigos sian tendon en la mezo de la mondo, kaj la Benita Arbo de Vivo diskreskos tiagrade ke ĝi superombros la Orienton kaj la Okcidenton. Fortuloj kaj malfortuloj, riĉuloj kaj malriĉuloj, antagonistaj sektoj kaj malamikaj nacioj - kiuj estas similaj al lupoj kaj ŝafido, leopardo kaj kaprido, leono kaj bovido - kondutos reciproke kun perfekta amo, amikeco, justeco, kaj praveco. La mondo estos plenigita per scienco, per la kono de la realo de la misteroj de estaĵoj, kaj per la kono de Dio. – Some Answered Questions, pp. 74-75 (Demandoj kaj Respondoj)*

### Religiaj Antaŭjuĝoj

Por klare vidi kiel povos esti atingita la Plej Granda Paco, ni unue esploru la ĉefajn kaŭzojn kiuj kondukis al milito en pasintaj tempoj kaj vidu kiel Bahá'u'lláh proponas rilati al ĉiu el ili.



Unu el la plej produktivaj kaŭzoj de milito estis religiaj antaŭjuĝoj. Koncerne tiun ĉi la bahaj instruoj klare montras ke malamikecoj kaj konfliktoj inter popoloj de diversaj religioj kaj sektoj ĉiam estis ŝuldataj, ne al vera religio sed al manko de ĝi, kaj al ĝia anstataŭigo per malpravaj antaŭjuĝoj, imitaĵoj kaj misprezentado.

En unu el Siaj paroloj en Parizo 'Abdu'l-Bahá diris:

*Religio devas unuigi ĉiujn korojn kaj malaperigi de la supraĵo de la tero militojn kaj malpacojn. Ĝi devas naski spiritecon, kaj alporti lumon kaj vivon al ĉiu. Se religio fariĝas kaŭzo de malsimpatio, malamo kaj divido estus pli bone resti sen ĝi, kaj sindeteno de tiu religio estus vere religia ago. Ĉar estas klare ke la celo de kuracilo estas kuraco, kaj se la kuracilo nur pligravigas malsanon, estas pli bone ĝin forlasi. Religio kiu ne estas kaŭzo de amo ka unueco ne estas religio.*

Alifoje Li diras:

*De la komenco de la historio de la homaro ĝis la nunaj tempoj diversaj religioj de la mondo malbenadis sin reciproke kaj akuzadis unu la aliajn pri falseco. ... Ili gardis sin unu kontraŭ la aliaj en plej severa maniero, subtenante reciproke malamikecon kaj malamon. Konsideru la historion de la religiaj militoj. ... Unu el la plej grandaj religiaj militoj, la krucmilito, daŭris pli ol 200 jarojn. ... Kelkfoje la sukceso apartenis al la krucistoj, kiuj mortigadis, rabadis kaj malliberigis la islamanojn, kaj kelkfoje la islamanoj estis venkintoj, siavice repagante al la invadantoj per sangverŝado kaj ekstermo.*

*Kaj tiel ili militis dum du jarcentoj, alterne furioze batalante kaj interrompante pro senfortiĝo ĝis fine la eŭropaj fanatikuloj forlasis la Orienton, postlasante cindrojn kaj ruinojn kaj trovante siajn proprajn naciojn en stato de malordo kaj falo. ... Tamen tio ĉi estis nur unu el la "Sanktaj militoj."*

*Religiaj militoj estis tre multaj. Oni kalkulis naŭcent mil martirojn de la protestantismo kiuj estis viktimoj de la konflikto kaj diferenco inter tiu kristana sekto kaj la katolikoj. ... Kiom multaj forvelkis en malliberejoj! Kiel kruele oni traktis la malliberigitajn! Ĉio ĉi en la nomo de religio!*

*Kristanoj kaj islamanoj konsideris judojn kiel satanojn kaj malamikojn de Dio. Tial ili malbenis kaj persekutis ilin. Oni mortigis amasojn da judoj, bruligis kaj rabis iliajn domojn, sklavigis iliajn infanojn. La judoj siaflanke konsideris la kristanojn kiel senkredulojn, kaj la islamanojn kiel malamikojn kaj detruantojn de la leĝoj de Moseo; tial ili postulis venĝon kontraŭ ili kaj malbenas ilin eĉ ĝis hodiaŭ.*

*Kiam la lumo de Bahá'u'lláh tagiĝis en la Oriento, Li proklamis la promeson pri unueco de la homaro. Li turnis sin al ĉiuj homoj dirante: "Vi ĉiuj estas fruktoj de unu arbo. Ne estas du arboj, unu arbo de la dia favoro, kaj la alia arbo de Satano." ... Tial ni devas havi plej grandan amon unu al la alia. Ni ne devas konsideri iun popolon kiel popolon de Satano, sed koni kaj trakti ĉiujn kiel servantojn de unu Dio. Pleje estas tiel: kelkaj ne scias - oni devas ilin gvidi kaj eduki. ... Kelkaj estas malkleraj, oni devas ilin informi. Kelkaj estas kiel infanoj, oni devas helpi ilin maturiĝi. Kelkaj estas malsanaj, ilia moraleco estas en malbona stato, oni devas ilin kuraci ĝis ilia moraleco puriĝos. Sed oni ne devas malami malsanulon pro tio ke li estas malsana; oni ne devas eviti infanon pro tio ke ĝi estas infano; oni ne devas malestimi nescianton pro lia nescio. Oni devas kuraci, eduki, klerigi kaj helpi ilin en amo. Oni devas ĉion fari por ke la homaro vivu en la ombro de Dio en plej granda trankvileco, en plej alta feliĉeco.*

## Rasaj kaj Naciaj Antaŭjuĝoj

La bahaa doktrino pri la unueco de la homaro trafas la kernon de alia militkaŭzo, nome, rasaj antaŭjuĝoj. Iuj rasoj atribuas al si superecon kompare kun la aliaj, kaj laŭ la principo de "supervivo de la plej fortaj", ili akceptas kiel sian privilegion la rajton ekspluati je sia profito, kaj eĉ ekstermi, la malpli fortajn rasojn. Multaj el la plej nigraj paĝoj de la historio prezentas ekzemplojn de senkompata aplikado de tiu ĉi principo. Laŭ la bahaa vidpunkto popoloj de ĉiuj rasoj estas egalaj antaŭ Dio. Ĉiuj havas mirindajn ennaskitajn kapablojn kiuj bezonas nur konforman ekzercadon por disvolviĝi, kaj ĉiuj povas siaflanke efektiviĝi tion, kio, anstataŭ malriĉiĝi, riĉiĝos kaj kompletigos la vivon de ĉiuj aliaj membroj de la homara familio. 'Abdu'l-Bahá diras:

*Koncerne la rasajn antaŭjuĝojn tio estas iluzio, tute nura superstiĉo, ĉar Dio kreis nin ĉiujn unugente. ... En la komenco estis ankaŭ neniam limoj kaj dividoj inter diversaj landoj, neniu parto de la tero apartenis pli al unu gento ol al alia. Antaŭ Dio ekzistas nenia diferenco inter diversaj rasoj. Pro kio homo elpensu tian antaŭjuĝon? Kiel oni povas subteni militojn kaŭzitajn per tia iluzio? Dio ne kreis la homojn por ke ili ekstermadu sin reciproke. Ĉiuj rasoj, gentoj, sektoj kaj klasoj egale partoprenas en la malavaraĵoj de sia Ĉiela Patro.*

*La solan efektivan diferencon prezentas la grado de fideleco, de oboe al la leĝoj de Dio. Estas kelkaj kiuj similas lumigitajn torĉojn; estas aliaj kiuj brilas kiel steloj en la ĉielo de la homaro.*

*Amantoj de la homaro, de kia ajn nacio, kredo aŭ koloro, tiuj ĉi estas la superaj homoj.*

Tiel same malutila kiel la rasa antaŭjuĝo estas antaŭjuĝo politika aŭ patriota. Venis nun la tempo kiam la malvasta nacia patriotismo kuniĝu en la pli vasta patriotismo kies patrujo estas la mondo. Bahá'u'lláh diras:

*En la malnovaj tempoj estis dirite: "Amo al sia patrolando estas elemento de la kredo de Dio." La Lango de la Majesto ... en la tagoj de tiu ĉi revelacio proklamis: "Gloro estas ne al tiu kiu amas sian landon, sed gloro estas al tiu kiu amas la homaron." Per la potenco de tiuj ĉi altaj vortoj Li difinis freŝan impulson al la birdoj de homaj koroj, kaj forviŝis el la Sankta Libro de Dio ĉiujn apartigojn kaj limojn. – Tablet of the World (Tabuleto de la Mondo)*

### Teritoriaj Ambicioj

Multaj estis la militoj kondukitaĵoj pro peco da teritono kies posedon avidis du aŭ pli multaj konkurantaj nacioj. La posedavido estis tiel forta kaŭzo de malpacoj inter nacioj kiel inter individuoj. Laŭ la bahaa vidpunkto, tero rajte apartenas ne al individuaj homoj aŭ individuaj nacioj sed al la tuta homaro; pliĝustadire, ĝi ja apartenas sole al Dio, kaj ĉiuj homoj estas nur tenantoj.

Okaze de la batalo apud Benghazi<sup>1</sup>, 'Abdu'l-Bahá diris:

*La novaĵo pri la batalo apud Banghazi dolorigis mian koron. Mi miras je la homa sovaĝeco kiu ankoraŭ ekzistas en la mondo. Kiel estas eble al homoj batali de mateno ĝis vespero, mortigante unu la alian, verŝante la sangon de siaj proksimuloj? Kaj pro kio? Por gajni la posedon de peceto da tero! Eĉ bestoj batalante havas ian senperan kaj pli racian kaŭzon por ataki. Kiel terure estas ke homo kiu apartenas al la pli supera regno povas malsupreniĝi ĝis mortigado kaj malfeliĉigo de siaj proksimuloj pro posedo de ter-regiono - la plej altaj el la kreaĵoj batalas por akiri la plej malaltan formon de la mateno, la teron.*

*La Tero apartenas ne al unu popolo sed al ĉiuj. La tero por homo ne estas hejmo sed tombo.*

*Kiel ajn granda estas la konkerinto, kiom ajn da landoj li sklavigus, li ne povas reteni por si el tiuj dezertigitaj landoj pli multe ol etan terpecon - sian tombon.*

*Se oni bezonas pli da tero por plibonigi la kondiĉojn de la popolo, por disvastigi civilizacion ... certe estus eble pace akiri la necesan etendiĝon da teritorio. Sed milito estas kreita por kontentigi homajn ambiciojn. Por monduma gajno de kelkaj personoj terura mizero estas portata en multegajn hejmojn, rompante la korojn de centoj da viroj kaj virinoj. ...*

*Mi admonas vin ke ĉiu el vi koncentrigu ĉiujn pensojn de sia koro sur amo kaj unueco. Kiam aperas penso pri milito, kontraŭstaru ĝin per pli forta penso pri paco. Penso de malamo devas esti neniigita per pli potenca penso de amo. Kiam la soldatoj de la mondo nudigas la sabrojn por mortigi, la soldatoj de Dio prenu al si reciproke la manojn. Ke la tuta sovaĝeco de homoj malaperu per la favoro de Dio, influante pere de la puraj koroj kaj sinceraj animoj. Ne pensu ke la mondpaco estas neatingebla idealo. Nenio estas neebla por la dieca bonvolemo de Dio. Se vi deziras per la tuta koro amikecon inter ĉiuj gentoj de la tero, via penso, spirita kaj pozitiva, disvastiĝos; ĝi fariĝos deziro de aliaj, kreskante kaj plifortiĝante ĝis ĝi atingos la mensojn de ĉiuj homoj.*

### Universala Lingvo

Trarigardinte la ĉefajn kaŭzojn de la militoj kaj la manierojn per kiuj oni povas ilin eviti, ni trapasu nun al esplorado de kelkaj pozitivaj proponoj de Bahá'u'lláh kiuj celas atingon de la Plej Sankta Paco.

La unua koncernas akcepton de universala helplingvo. Bahá'u'lláh pritraktas tion ĉi aferon en la Libro Aqdas kaj en multaj Siaj Tabuletoj. Ekzemple en la *Tablet of Ishráqát* (Tabuleto *Ishráqát*) Li diras:

*La Sesa Ishráq (Brilego) estas Konkordo kaj Unueco inter la homoj. Per la radioj de Unueco la regionoj de la mondo estas lumigitaj en ĉiuj tempoj, kaj la plej granda el ĉiuj porunuecaj rimedoj estas interkompreniĝo en skribo kaj parolo. Pro tio, en Niaj Epistoloj, Ni ordonis al la Membroj de la Domo de Justeco, aŭ elekti unu el*

<sup>1</sup> Batalo en la Itala-Turka Milito kiu eksplodis la 29an de septembro 1911.

*la ekzistantaj lingvoj, aŭ elpensi novan, kaj simile akcepti komunan skribmanieron, instruante ilin al infanoj en ĉiuj lernejoj de la mondo, por ke la mondo fariĝu kiel unu lando kaj unu hejmo.*

Ĉirkaŭ la tempo kiam tiu ĉi propono de Bahá'u'lláh estis unue donita al la mondo, naskiĝis en Polujo knabo nomita Ludoviko Zamenhof, kiu estis destinita kiel ĉefrolulo en la efektiviĝo de tiu ĉi propono. La idealo de universala lingvo estis plejsupera motivo en la vivo de Zamenhof, preskaŭ de lia infaneco, kaj la rezulto de lia sindonema laboro estis elpenso kaj disvastigo de la lingvo konata sub la nomo Esperanto, kiu estas nun elteninta la provon de multaj jaroj kaj montriĝis tre bona rimedo de internaciaj interrilatoj. Kompare kun tiaj lingvoj kiaj la angla, franca aŭ germana, Esperanto prezentas la grandan avantaĝon ke oni povas ĝin ellerni en multe malpli da tempo necesa por ellerni tiujn ĉi lingvojn. Dum esperantista festeno okazinta en Parizo en februaro 1913, 'Abdu'l-Bahá diris:

*Hodiaŭ unu el la ĉefaj kaŭzoj de diferencoj en Eŭropo estas la diverseco de la lingvoj. Ni diras ke tiu ĉi homo estas germano, kaj tiu ĉi italo, jen ni renkontas anglon kaj poste francon. Kvankam ili ĉiuj apartenas al la sama raso, tamen la lingvo estas plej granda barilo inter ili. Se oni uzus universalan helplingvon ĉiuj estus konsiderataj kiel unu.*

*Lia Sankteco Bahá'u'lláh skribis pri tiu ĉi internacia lingvo antaŭ pli ol kvardek jaroj. Li diras ke tiel longe kiel internacia lingvo ne estos akceptita, kompleta unueco inter diversaj grupoj de la mondo estos neefektivebla, ĉar ni vidas ke miskomprenoj detenas la popolojn disde reciproka kuniĝo, kaj tiujn ĉi miskomprenojn oni povas dispeli nur per internacia helplingvo.*

*Parolante ĝenerale, la tuta loĝantaro de la Oriento ne estas plene informita pri la okazoj en la Okcidento; nek ankaŭ la okcidentanoj povas starigi simpatian kontakton inter si kaj la orientanoj. Iliaj pensoj estas fermitaj en kesto - la lingvo internacia estos ŝlosilo malfermanta la keston. Se ni havus universalan lingvon, la okcidentaj libroj povus esti facile tradukataj en tiun lingvon, kaj la orientanoj sciigus pri ilia enhavo. Sammaniere la libroj de la Oriento povus esti tradukitaj en tiun lingvon por la utilo de la loĝantoj de la Okcidento. La plej granda rimedo akcelante unuiĝon de la Oriento kaj la Okcidento estos komuna lingvo. Ĝi faros el la tuta mondo unu hejmon, kaj ĝi fariĝos la plej forta impulso por la homa antaŭeniĝo. Ĝi levos la standardon de la unueco de la homaro. Ĝi faros el la tero unu universalan komunajon. Ĝi estos kaŭzo de amo inter la homidoj. Ĝi kaŭzos bonan kunvivadon de diversaj rasoj.*

*Dankon al Dio, ke d-ro Zamenhof<sup>1</sup> elpensis la lingvon Esperanto. Ĝi posedas ĉiujn eblajn kvalitojn por fariĝi rimedo de internacia interkomunikiĝo. Ĉiuj el ni devas esti kontentaj kaj dankemaj al li por lia nobla penado, ĉar tiamaniere li faris bonan servon al siaj proksimuloj. Per senlaca penado kaj sinoferemo flanke de ĝiaj pioniroj Esperanto fariĝos universala. Tial ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo por ke ĝi estu tagon post tago pli vaste konata, por ke ĝi estu akceptita de ĉiuj nacioj kaj registaroj de la mondo, kaj fariĝu parto de la programo en ĉiuj publikaj lernejoj. Mi esperas ke Esperanto estos akceptita kiel lingvo de ĉiuj estontaj internaciaj konferencoj kaj kongresoj, por ke ĉiuj homoj bezonos lerni nur du lingvojn; unue sian patrollingvon kaj due la lingvon internacian. Tiam perfekta harmonio estos starigita inter ĉiuj popoloj de la mondo. Konsideru kiel malfacile estas hodiaŭ interkomunikiĝi kun diversaj nacioj. Se oni studas eĉ kvindek lingvojn oni ankoraŭ tamen povas vojaĝi tra lando kaj ne koni ĝian lingvon. Tial mi esperas ke ĉiu el vi streĉos ĉiujn siajn fortojn, por ke la lingvo Esperanto larĝe disvastiĝu.*

Kvankam ĉi tiuj aludoj al Esperanto estas specifaj kaj kuraĝigaj, tamen estas vere ke ĝis kiam la Universala Domo de Justeco traktos la aferon laŭ la instruoj de Bahá'u'lláh, la Bahaa Kredo ne deklaras sin oficiale por Esperanto nek iu ajn alia vivanta aŭ artefarita lingvo 'Abdu'l-Bahá diris: "La amo kaj penado metitaj en Esperanton ne estos perditaj, sed neniu unuopa persono povas konstrui Universalan Lingvon." – 'Abdu'l-Bahá in London, p. 95 ('Abdu'l-Bahá en Londono).

Kiun lingvon adopti, kaj ĉu ĝi estu natura aŭ konstruita, estas decido kiun devos fari la popoloj de la mondo.

## Universala Ligo de Nacioj

Alia propono multfoje kaj forte starigita de Bahá'u'lláh estis ke oni devas formi Universalan Ligon de Nacioj por gardado de internacia paco. En letero al la reĝino Viktoria, skribita dum Li estis ankoraŭ malliberulo en la kazerno de Akreo<sup>2</sup>, Li diris:

*Ho Geregantoj de la tero! Pacigu la diferencojn inter vi, kaj tiam vi ne bezonos plu armilaron krom tiom kiom necesas por defendi viajn regnojn kaj popolojn. ...*

<sup>1</sup> Estas interese ke la filino de Zamenhof, Lidia, fariĝis agema bahaanino.

<sup>2</sup> 1868 ĝis 1870.

*Unuiĝu, ho Geregnestroj de la tero, ĉar per tio la ventoj de malkonsento inter vi kvietiĝos, kaj viaj popoloj trovos ripozon. ... Se unu el vi ek militus kontraŭ alia, ek militu vi ĉiuj kontraŭ li, ĉar tio ĉi estos nur ago de klara justeco.*

En 1875, 'Abdul-Bahá antaŭdiris fondon de Universala Ligo de Nacioj, kio estas speciale interesa en la hodiaŭa tempo<sup>1</sup> pro la fervoraj penoj nune dediĉataj al la fondo de tia ligo. Li skribas:

*La vera civilizacio levos sian standardon en la kormezo de la mondo tiam kiam kelkaj el la elstaraj kaj noblaj regantoj - brilantaj ekzempligantoj de sindediĉo kaj persisto - elpaŝos, por la bono de la tuta homa gento, kun firma decido kaj klara antaŭvido, por starigi la Movadon por Universala Paco. Ili devas fari el la Movado por Paco celon de ĝenerala konsiliĝo, kaj strebi per ĉiuj siaj fortoj starigi Unuiĝon de la nacioj de la mondo. Ili devos sekvigi definitivan traktaton kaj fortan interligon, kies kondiĉoj estos saĝaj, nerompeblaj kaj devigaj. Ili devos proklami ĝin al la tuta mondo kaj akiri por ĝi sankcion de la tuta homaro. Tiu supera kaj nobla entrepreno - la vera fonto de paco kaj bonstato de la tuta mondo - estu konsiderata kiel sankta de ĉiuj sur la tero. Ĉiuj fortoj de la homaro devos esti mobilizitaj por certigi la stabilecon kaj daŭrecon de ĉi tiu Plej Sankta Interligo. En tia universala Traktato devas esti fiksitaj ekstremoj kaj limoj de ĉiu nacio, la principoj de la rilatoj inter registaroj difinitaj, kaj ĉiuj internaciaj akordiĝoj kaj ŝuldoj certigitaj. Tiel same, devas esti interkonsentita la grandeco de armostato por ĉiu registaro, ĉar se en iu nacio vidiĝus kresko de militpreparoj, tio estus kaŭzo de alarmo por aliaj. La baza principo de tiu ĉi potenca Interligo devas esti tiel fiksita ke se poste iu registaro rompus ian ĝian kondiĉon, la ceteraj registaroj de la mondo leviĝu kaj reobeigu ĝin. Ja la tuta homa gento devas tiam kunigi ĉiujn siajn fortojn por detruu tiun registaron. Se tiel granda kuracilo estos aplikita al la malsana korpo de la mondo, ĝi certe resanigos kaj restos eterne sekura. - The Secret of Divine Civilization, pp. 64-65 (La Sekreto de Dia Civilizacio)*

La bahaanoj vidas gravajn mankojn en la strukturo de la Ligo de Nacioj<sup>2</sup>, kiu ne atingos tian tipon de institucio kian Bahá'u'lláh difinis kiel esenca al starigo de mondpaco. La 17an de decembro 1919, 'Abdu'l-Bahá deklaris:

*Nuntempe Universala Paco estas gravega afero, sed unuiĝo de konscienco estas esenca, por ke la bazo de tiu afero estu sekura, ĝia fondo firma kaj ĝia konstruo forta. ... Kvankam la Ligo de Nacioj estas kreita, tamen ĝi ne kapablos starigi Universalan Pacon. Sed la Supera Tribunalo priskribita de Lia Sankteco Bahá'u'lláh plenumos tiun sanktan taskon per la plej grandaj fortoj de la potenco.*

### Internacia Arbitracio

Bahá'u'lláh ankaŭ rekomendis starigon de internacia tribunalo de arbitracio, por ke malkonsentojn okazantajn inter nacioj oni solvu konforme al justeco kaj racio, anstataŭ konfidi la decidon al armiloj.

En letero al la sekretario de la Konferenco de Mohonk pri Internacia Arbitracio, en aŭgusto 1911, 'Abdu'l-Bahá diris:

*Antaŭ ĉirkaŭ kvindek jaroj en la Libro Aqdas, Bahá'u'lláh ordonis al popoloj estiĝi universalan pacon kaj alvokis ĉiujn naciojn al la dia festeno de internacia arbitracio, ke la problemoj de landlimoj, de naciaj honoro kaj posedado, kaj problemoj de grandega signifo estu solvataj de arbitra tribunalo, kaj ke neniu nacio kuraĝu rifuzi obeon al tiamaniere akceptitaj decidoj. Se malkonsento ekestus inter du nacioj ĝi devas esti prezentita al la internacia tribunalo kiu solvos kaj decidus ĝin simile kiel Juĝisto juĝanta aferon inter du individuoj. Se iam iu nacio kuraĝus rompi tian decidon, ĉiuj aliaj nacioj devas leviĝi, por neniigi tiun ĉi ribelon.*

Alifoje, en unu el Siaj Parizaj paroloj en 1911, Li diris:

*La popoloj kaj registaroj de ĉiuj nacioj devas starigi Superan Tribunalon, formitan el membroj elektitaj el ĉiu lando kaj registaro. La membroj de tiu granda konsilantaro devas kunsidi en harmonio. Ĉiuj disputoj havantaj internacian karakteron devas esti submetitaj al juĝo de tiu ĉi tribunalo, kies tasko estos decidi per arbitrado pri ĉio kio alio kaze povas esti kaŭzo de milito. La misio de tiu ĉi tribunalo estos antaŭgardado kontraŭ milito.*

Dum la lasta kvaronjarcento antaŭ la fondo de la Ligo de Nacioj estis fondita en Hago (1900) konstanta Arbitracia Tribunalo, kaj multaj arbitraciaj traktatoj estis subskribitaj, sed plejmulto el ili tute ne atingis la grandajn proponojn Bahá'u'lláh. Neniam inter du potencaj Ŝtatoj estis farita arbitracia traktato entenanta konfliktigajn aferojn. Malkonsentoj koncernantaj "grandsignifajn problemojn", "honoron" kaj "sendependecon" estis specife esceptataj. Ne nur tiel, sed mankis ankaŭ konkretaj garantioj ke la nacioj estos fidelaj al la kondiĉoj akceptitaj en la traktatoj. Laŭ la bahaaj proponoj, kontraŭe, la problemoj de landlimoj, de nacia honoro kaj de grandsignifaj aferoj estas klare entenataj en la traktatoj, kaj la interkonsentoj

<sup>1</sup> La aŭtoro skribis tiun ĉi paragrafon en 1919-1920.

<sup>2</sup> 5. La samaj konsideraĵoj aplikigas al la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj.

posedos la plejsuperan sankcion de la Mond-Ligo de Nacioj. Nur kiam tiuj ĉi proponoj estos komplete plenumitaj la internacia arbitracio ricevos vastan kampon por realigi siajn bonfarajn eblecojn kaj la malbeno de milito estos fine elpelita el la mondo.

### Limigo de Armilaro

'Abdu'l-Bahá diras:

*Per ĝenerala interkonsento ĉiuj registaroj de la mondo devas samtempe senarmiĝi. La afero ne estas farebla se unu formetos la armilojn kaj aliaj rifuzos tion fari. La nacioj de la mondo devas interkonsenti en tiu ekstreme grava afero, por ke ĉiuj kune forlasu la mortigajn armilojn de hom-buĉado. Tiel longe kiel unu nacio pligrandigados sian militan kaj ŝiparan buĝeton la aliaj nacioj ankaŭ estos devigitaj al tiu freneza konkurado pro sia natura kaj supozita profito. – Diary of Mírzá Ahmad Sohrab, 11-14 majo 1914 (Taglibro de Mírzá Ahmad Sohrab)*

### Nerezistado

Kiel religia komunumo, la bahaanoj, laŭ klara ordono de Bahá'u'lláh, entute forlasis uzadon de arm-forto en siaj propraj aferoj, eĉ en okazoj de nura memdefendo. En Persujo multaj, multaj miloj de babanoj kaj bahaanoj suferis teruran sorton pro sia kredo. En la fruaj tagoj de la Kredo la babanoj diversokaze defendis sin mem kaj siajn familiojn per glavo, kun grandaj kuraĝo kaj braveco. Bahá'u'lláh, tamen, malpermesis tion ĉi. 'Abdu'l-Bahá skribas:

*Kiam Bahá'u'lláh aperis, Li deklaris ke proklamado de la vero per tiaj manieroj estas nenial permesebla, eĉ por celoj de memdefendo. Li neniigis la leĝon de la glavo kaj nuligis la ordonon pri "Sankta Milito". "Esti mortigitaj", Li diris, "estas por vi pli bone ol mortigi. La Religio de Dio devas esti disvastigata per firmeco kaj fido de la kredantoj. Kiam la kredantoj, kuraĝaj kaj netimigeblaj, levos sin kun absoluta sinoferemo por glorigi la Vorton de Dio, kaj, kun okuloj forturnitaj de la mondaj aferoj, dediĉos sin al servado pro Dio kaj per Lia povo, tiam la Vorto de la Vero triumfos. Tiuj ĉi benitoj atestas per sia propra sango la verecon de la Religio kaj konfirmis ĝin per la sincereco de sia kredo, sia sindonemo kaj sia firmeco. La Eternulo povas disvastigi Sian Religion kaj venki obstinulojn. Ni deziras neniun defendanton krom Li, kaj kun niaj vivoj en la manoj ni atendas la malamikojn kaj bonvenigas martirecon." (verkita de 'Abdul-Bahá por tiu ĉi libro)*

Bahá'u'lláh skribis al unu el la persekutantoj de Sia kredo:

*Bonkora Dio! Tiu ĉi popolo ne bezonas detruigajn armilojn, ĉar ĉiuj iliaj penoj celas renovigon de la mondo. Ilia armeo estas bonaj agoj, kaj iliaj bataliloj bona konduto, kaj ilia komandanto timo al Dio. Feliĉa estas tiu, kiu tenas sin senpartia. Je la justeco de Dio! Tiu ĉi popolo per sia pacienco, trankvileco, rezignacio kaj kontenteco fariĝis elmontrantoj de justeco. Ilia sindeteno atingis tian punkton, ke ili preferas lasi sin esti mortigitaj ol mortigi aliajn, kaj ĉio tio en la tempo kiam tiuj persekutatoj suferis tion kio neniam estis priskribita en la historio de la mondo, kaj kion neniam vidis la okuloj de la nacioj. Kiel ili povus suferi tiajn terurajn malfeliĉojn, eĉ ne etendante la manon por defendi sin? Kio estis la kaŭzo de ilia rezignemo, de ilia trankvileco? La vera kaŭzo troviĝas en la firma malpermeso kiun la Plumo de Gloro, tage kaj nokte, ordonis, kaj de Nia preno de la direktiloj de aŭtoritateco, pere de la forto kaj potenco de la Reganto de la homaro. – Epistle to the Son of the Wolf, pp. 74-75 (Epistolo al Filo de Lupo).*

La taŭgecon de la nerezista politiko de Bahá'u'lláh jam pruvis abundaj rezultoj. Por ĉiu kredanto martirigita en Persujo, la bahaa kredo ricevis en sian komunumon cent novajn kredantojn, kaj la feliĉplena kaj sentima maniero en kiu la martiroj ĵetadis la kronojn de siaj vivoj al la piedoj de la Eternulo havigis al la mondo la plej klaran pruvon ke ili trovis novan vivon por kiu morto ne estas teruro, vivon de neesprimeblaj pleneco kaj ĝojo, kompare kun kiu la plezuroj de la tero estas nur polvo, kaj la plej kruelaj korpaj torturoj nur etaĵoj sur facila vento.

### Justaj Militoj

Kvankam Bahá'u'lláh, kiel Kristo, konsilas al Siaj sekvantoj tiel al individuoj kiel al la religia komunumo akcepti la kondukmanieron de nerezistado kaj pardonemo al siaj malmikoj, Li instruas ke estas la devo de la socio gardi kontraŭ maljusteco kaj tiraneco. Se individuoj estas persekutataj kaj suferigataj estas postulinde ke ili pardonu kaj detenu sin de venĝo, sed estas malbone se la socio toleras rabadon kaj mortigadon senĝene inter siaj limoj. Estas la devo de bona registaro gardi kontraŭ malbonfaroj kaj puni malbonfarantojn.<sup>1</sup> Tiel same estas kun la socio de la nacioj. Se unu nacio premas aŭ suferigas

<sup>1</sup> Rigardu ankaŭ la sekcion pri Traktado de Krimuloj, pp. 154-155.

alian, estas devige al ĉiuj aliaj nacioj unuiĝi por malpermesi tian premadon. 'Abdu'l-Bahá skribas: "Povas okazi, ke iam militamaj kaj sovaĝaj gentoj atakus socion intencante komplete forbuĉi ĝiajn membrojn; en tiaj cirkonstancoj defendo estas necesa."

Ĝis nun la ordinara praktiko de la homaro estis tio ke kiam unu nacio atakis alian, ĉiuj ceteraj nacioj de la mondo restis neŭtralaj, kaj akceptis nenian respondecon por la afero ĝis kiam iliaj propraj aferoj estis rekte tuŝitaj aŭ minacitaj. La tuta pezo de la defendo estis lasita al la atakita nacio, kiel ajn malforta kaj senhelpa ĝi estus. La instruoj de Bahá'u'lláh inversigas tiun ĉi principon kaj per la devo de defendo ŝarĝas ne speciale la atakitan nacion, sed ĉiujn aliajn, unuope kaj kolektive. Ĉar la tuta homaro estas unu socio, atako kontraŭ unu nacio estas atako kontraŭ la tuta socio, kaj devas esti traktita de la tuta socio. Se tiu ĉi doktrino estus ĝenerale akceptita kaj praktikata, nacio pripensanta atencon kontraŭ alia sciis jam antaŭe ke ĝi devas konsideri kontraŭbatalon ne nur flanke de tiu ĉi nacio, sed de la tuta cetero de la mondo. Tiu ĉi konscio sola sufiĉas por fortimigi eĉ plej kuraĝajn kaj militemajn naciojn. Kiam estos fondita sufiĉe forta ligo de pacamaj nacioj, milito fariĝos por tio afero de pasinteco. Dum la periodo de transŝanĝo el la malnova stato de internacia anarkio en la novan staton de internacia solidareco atakaj militoj estos ankoraŭ eblaj, kaj en tiaj cirkonstancoj, milita aŭ alia forta agado en la afero de internacia justeco, unueco kaj paco povas esti nepra devo. 'Abdu'l-Bahá skribas ke en tia okazo:

*Konflikto povas esti laŭdinda afero, kaj milito estas kelkfoje granda fundamento de paco, kaj detruo estas kaŭzo de rekonstruo. Se, ekzemple, altruista suvereno ordonas al sia soldataro malebligi atakon de ribelantoj, aŭ, se li ekbatalas kaj fariĝas elstara en lukto por unuigi disigitajn ŝtaton kaj popolon, alivorte, se li militas justacele, tiam vere tiu furiozo estos favoreco mem, tiu ŝajna premado estos la esenco de justeco kaj tiu evidenta tiraneco la fonto de repaciĝo. Hodiaŭ, la efektiva devo de potencaj regantoj estas akceli universalan pacon, ĉar vere ĝi signifas la liberecon de ĉiuj popoloj. – The Secret of Divine Civilization, pp. 70-71 (La Sekreto de Dia Civilizacio)*

### **Unueco de Oriento kaj Okcidento.**

Alia faktoro kiu kunhelpas la efektivigon de universala paco estas kunligiĝo de la Oriento kaj la Okcidento. La Plej Sankta Paco estas ne nur ĉeso de malamikecoj, sed ankaŭ vivodona unueco kaj sincera kunlaborado de la ĝis nun disigitaj popoloj de la tero kio donos multe da altvaloraj fruktoj. En unu el Siaj paroloj en Parizo, 'Abdu'l-Bahá diris:

*En la tempoj pasintaj, kiel en la nunaj, la Spirita Suno de la Vero ĉiam brilis el la horizonto de la Oriento. En la Oriento leviĝis Moseo por gvidi kaj instrui la popolon. Sur la Orienta horizonto aperis la Sinjoro Kristo. Mahometo estis sendita al Orienta nacio. Báb aperis en la Orienta lando Persujo. Bahá'u'lláh vivis kaj instruis en la Oriento. Ĉiuj grandaj spiritaĵoj instrumentoj aperis en la Orienta mondo.*

*Sed kvankam la Suno de Kristo supreniris en la Oriento, la lumo de ĝiaj radioj brilis speciale en la Okcidento, kie la brilego de ĝia gloro estis perceptata pli klare. La dia lumo de Lia instruado brilis kun pli granda forto en la Okcidenta mondo, kie ĝia progreso estis pli rapida ol en la lando de ĝia naskiĝo.*

*En la hodiaŭaj tagoj la Oriento bezonas materialan progreson kaj en la Okcidento oni sentas mankon de spiritaĵoj idealoj. Por la Okcidento estus bone turni sin al la Oriento por ricevi la lumigon, kaj doni al ĝi repagosian sciencan saĝon. Devas okazi tiu interŝanĝo de donacoj - La Oriento kaj la Okcidento devas interligi sin por doni unu al la alia tion kio mankas al ĉiu el ili. Tiu kuniĝo rezultos veran civilizacion en kiu la spirita flanko esprimos sin kaj efektivigos en la materiala. Kiam unu tiel ricevos de la alia, ekregos la plej granda harmonio, ĉiuj popoloj unuiĝos, estos atingita la stato de perfekteco, okazos firma interkuniĝo, kaj la mondo fariĝos brilanta spegulo reflektanta la atribuojn de Dio.*

*Ni ĉiuj, nacioj orientaj kaj okcidentaj, devas tage kaj nokte, per la tuta koro kaj animo, penadi atingi tiun ĉi altan idealon, firmkonstrui la unuecon inter ĉiuj nacioj de la tero. Ĉiu koro estos tiam refreŝigita, ĉiuj okuloj estos malfermitaj, donita estos plej mirinda povo, la feliĉo de la homaro estos certigita. ... Tio estos la Paradizo kiu venos sur la teron, kiam la tuta homaro estos kuniĝinta sub la Tendo de Unueco en la Regno de Gloro.*

## ĈAPITRO XI: DIVERSAJ ORDONOJ KAJ INSTRUOJ

*Sciu ke en ĉiu periodo kaj epoko ĉiuj diaj estas ŝanĝataj kaj aliformataj konforme al la bezono de la tempo, escepte de la leĝo de amo, kiu, kiel fonto, ĉiam ŝprucas kaj neniam ŝangiĝas. – Bahá'u'lláh*

### Monaĥa Vivo

Bahá'u'lláh, kiel Mahometo, malpermesas ali Siaj sekvantoj konduki la vivon en monaĥa apartiĝo. En tabuleto al Napoleono III-a ni legas:

*Ho anaro de monaĥoj! Ne apartigu vin en preĝejoj kaj klostroj. Forlasu ilin per Mia permeso, kaj okupiĝu per tio kio utilos al viaj animoj kaj al la animoj de la homaro. ... Eniru en la edziĝan staton, por ke aliaj poste prenu viajn lokojn. Ni malpermesis al vi perfidaĵojn, kaj ne tion kio montros fidelecon. Ĉu vi sekvis viajn proprajn vojojn, kaj fortunadis vin de la vojo de la Sinjoro? Timu Dion, kaj ne apartenu al la malsaĝularo. Sen la homo, kiu menciis Min sur Mia tero, kaj kiel Miaj atribuoj kaj Mia nomo estus malkaŝitaj? Pripensu tion, kaj ne estu kiel tiuj kiuj estas vualitaj kaj dormas. Tiu Kiu ne edziĝis (Jesuo) trovis neniun rifuĝejon por meti la kapon, kaŭze de tio kion faris la manoj de la perfiduloj. Lia sankteco ne konsistas el tio kion vi supozas aŭ imagas, sed el tio kion Ni posedas. Preĝu, ke vi povu ekkoni Lian staton kiu altigas la imagpovon de ĉiuj loĝantoj de la tero. Benitaj estas tiuj kiuj scias!*

Ĉu ne ŝajnas strange ke kristanaj sektoj starigis monaĥan vivon kaj senedzinecon por la pastraro, malgraŭ la fakto ke Kristo elektis edziĝintojn kiel Siajn disĉiplojn, kaj tiel Li Mem kiel Liaj apostoloj vivis en aktiva bonfarado, en proksima kunvivado kaj intimaj rilatoj kun homoj?

En la Korano ni legas:

*Kaj Ni igis Jesuon la filon de Maria, sekvi, kaj Ni donis al Li la Evangelion, kaj Ni estigis en la koroj de tiuj, kiuj sekvis Lin, dolĉecon kaj kompaton. La vivon monaĥan ili nur fondis – Ni ne ordonis ĝin al ili – por strebi al la plezuro de Allah; ili tamen ne sekvis ĝin laŭvere. – Korano, ĉapitro 57:28*

Kia ajn pravigo povis esti por la monaĥa vivo en la antikvaj tempoj kaj pasintecaj kondiĉoj, Bahá'u'lláh deklaras ke tiuj ĉi pravigoj jam ne plu ekzistas; kaj ja ŝajnas evidente, ke la deturniĝo de granda nombro de la plej piaj kaj diotimaj el la loĝantaro for de rilatoj kun siaj fratuloj, kaj de la devoj kaj respondecoj de patreco, devas rezulti en la spirita malriĉiĝo de la homa gento.

### Edziĝo

La bahaaj instruoj rekomendas monogamion, kaj Bahá'u'lláh dekretas ke la edziĝo devas dependi de la konsento de ambaŭpartoprenantoj kaj de iliaj gepatroj. Li diras en la Libro Aqdas:

*Vere en la Libro Bayán (la Revelacio de Báb) tiu ĉi problemo estas limigita al la konsento de ambaŭ (fianĉino kaj fianĉo). Ĉar Ni deziris florigi amon kaj amikecon kaj unuecon inter la homoj, Ni pro tio postulis ke ĝi ankaŭ dependas de la konsento de la gepatroj, por eviti kontraŭsenton kaj malamon. – Kitáb-i-Aqdas*

Pri tiu ĉi punkto 'Abdu'l-Bahá skribis al unu demandinto: "Koncerne la demandon pri edziĝo, konforme al la leĝo de Dio: Unue vi devas elekti la personon, kaj poste la afero dependas de la konsento de la gepatroj. Antaŭ via elekto ili ne rajtas enmiksi sin en la afero."

'Abdu'l-Bahá diras ke rezulte de tiu ĉi antaŭzorgo de Bahá'u'lláh la streĉitaj rilatoj inter boparencoj jam proverbaj en la kristanaj kaj mahometanaj landoj estas preskaŭ nekonataj inter la bahaanoj, kaj eksedziĝo estas ankaŭ tre malofta afero. Li skribis pri geedzeco:

*Bahaa edziĝo estas unuiĝo kaj tutkora amo inter ambaŭ. Ili devas, tamen, evidentigi al si reciproke plej grandan zorgemon kaj ĉiu el ili devas koni la karakteron de la alia. Ĉi tiu eterna ligilo estu certigita per firma interligo, kaj la intenco estu por okazigi harmonion, kunecon kaj unuecon kaj por atingi eternan vivon. ...*

*En vera bahaa edziĝo ambaŭ personoj devas unuiĝi spirite kaj korpe, por ke ili atingu eternan unuecon tra ĉiuj el la diaj mondoj, kaj plibonigu reciproke siajn spiritajn vivojn. Tio ĉi estas bahaa geedzeco.*

La bahaa edziĝo-ceremonio estas tre simpla, la sola postulo estas ke la geedziĝantoj, en ĉeesto de almenaŭ du atestantoj, diru siavice: "Ni ĉiuj, vere, obeos la ordonon de Dio".

### Eksedziĝo

Koncerne la problemon de eksedziĝo, la instruoj de la Profetoj simile kiel la instruoj pri edziĝo, ŝanĝadis sin konforme al la bezonoj de la tempoj. 'Abdu'l-Bahá tiel prezentas la bahaajn instruojn pri eksedziĝo:

*La amikoj (bahaanoj) devas severe eviti eksedziĝon escepte en okazoj kiuj devigas ilin disiĝi kaŭze de reciproka malŝato; en tiaj okazoj, ili povas, kun scio de la Spirita Asembleo, decidi disiĝi. Tiam ili devas esti paciencaj kaj atendi unu plenan jaron. Se dum tiu ĉi jaro ne estos restarigita harmonio inter ili, la eksedziĝo povas esti plenumita. ... La fundamento de la Regno de Dio bazas Sin sur harmonio kaj amo, unueco, interrilateco kaj unuiĝo, ne sur diferencoj, speciale inter edzo kaj edzino. Se unu el ili fariĝis kaŭzo de eksedziĝo, tiu ĉi sendube falos en grandajn malfacilaĵojn, iĝos viktimo de teruraj sortobatoj kaj travivos profundan memriproĉon. (Tabuleto al la usonaj bahaanoj)*

En la afero de eksedziĝo, kiel en ĉiuj aliaj aferoj, la bahaanoj, kompreneble, sekvas ne nur la bahaajn instruojn, sed ankaŭ la leĝojn de la lando en kiu ili vivas.

### Bahaa Kalendaro

Inter diversaj popoloj kaj en diversaj tempoj estis akceptitaj diversaj metodoj de tempokalkulo, kaj kelkaj diversaj kalendaroj ankoraŭ nun estas en ĉiutaga uzado, ekz. la gregoria en la Okcidenta Eŭropo, la julia en multaj landoj de la Orienta Eŭropo, la hebrea inter la judoj, kaj la islama inter la muzulmanaj komunumoj.

Báb akcentis la signifon de la heroldata de Si epoko per enkonduko de nova kalendaro. En ĝi, kiel en la Gregoria Kalendaro, la luna monato estas forlasita kaj akceptita estas la sunajaro.

La bahaa jaro konsistas el 19 monatoj ĉiu po 19 tagoj (t.e. 361 tagoj), kun aldono de difinitaj "Intermetitaj Tagoj" (kvar en ordinara jaro kaj kvin en superjaro) inter la dekoka kaj dekaŭa monatoj por alkonformigi la kalendaron al la suna jaro. Báb nomis la monatojn laŭ la atribuoj de Dio. La Bahaa Nova Jaro, kiel la antikva Persa Nova Jaro, estas astronomie difinita, komenciĝante je la marta ekvinokso (kutime 21 marto), kaj la bahaa epoko komencas sin per la jaro de la deklaraĉlo de Báb (te. 1844 p. K., 1260 p.H.)

Sekvas la monatoj de la bahaa kalendaro:

	<b>Araba Nomo</b>	<b>Eldirmaniero</b>	<b>Traduko</b>	<b>Komencaj Tagoj</b>
1-a	Bahá	Bahá	Splendoro	21 Marto
2-a	Jalál	Ĵalal'	Gloro	09 Aprilo
3-a	Jamál	Ĵamal'	Beleco	28 Aprilo
4-a	'Azamat	Azamat'	Grandiozeco	17 Majo
5-a	Nùr	Nur'	Lumo	05 Junio
6-a	Rah̄mat	Rahmat'	Indulgo	24 Junio
7-a	Kalimát	Kalemat'	Vortoj	13 Julio
8-a	Kamál	Kamal'	Perfekteco	01 Aŭgusto
9-a	Asmá'	Asma'	Nomoj	20 Aŭgusto
10-a	'Izzat	Ezzat'	Potenco	08 Septembro
11-a	Mash̄iyyat	Maŝijjat'	Volo	27 Septembro
12-a	'Ilm	Elm'	Scio	16 Oktobro
13-a	Qudrat	Godrat'	Povo	04 Novembro
14-a	Qawl	Goŭl'	Parolo	23 Novembro
15-a	Masá'il	Masael'	Demandoj	12 Decembro
16-a	Sharaf	Ŝaraf'	Honoro	31 Decembro
17-a	Sultán	Soltan'	Suvereneco	19 Januaro
18-a	Mulk	Molk'	Regado	07 Februaro
	Ayyám-í-Há	Aj-jam-eh-ha	Tagoj de H' (intermetitaj tagoj)	26 Februaro ĝis 01 Marto inkluzive
19-a	'Alá'	Ala'	Alteco	02 Marto

En malproksima estonteco estos necese ke ĉiuj popoloj de la mondo akceptu komunan kalendaron.



Ŝajnas, do, konvene ke la nova epoko de unueco havu novan kalendaron liberan de kontraŭaĵoj kaj sugestaĵoj kiuj faras ĉiun el la malnovaj kalendaroj neakceptebla por vastaj partoj de la mondoĝantaro, kaj malfacile estus elpensi sistemon kiu laŭ simpleco kaj ĝusteco superus tiun proponitan de Báb.

### Spiritaj Asembleoj

Antaŭ ol plenumi Sian surteran mision, 'Abdu'l-Bahá starigis bazon por la evoluo de la administra sistemo establita per la Skriboj de Bahá'u'lláh. Por montri la altan gravecon atribuita al la institucio de la Spiritaj Asembleoj, 'Abdu'l-Bahá en tabuleto deklaris ke iu traduko devas esti aprobita de la Spiritaj Asembleoj de Kairo antaŭ eldoni ĝin, kvankam Li Mem recenzis kaj plibonigis la tekston.

La Spiritaj Asembleoj estas administraro de naŭ personoj, elektitaj ĉiujare de ĉiu loka baha komunumo, al kiu estas donita la aŭtoritato por decidi pri ĉiuj aferoj de kunagado flanke de la komunumo. Tiu ĉi titolo estas provizora, ĉar estonte la Spiritaj Asembleoj estos nomitaj Domoj de Justeco.

Malsimile al la organizado de preĝejoj, ĉi tiuj bahaaj anaroj estas sociaj anstataŭ ekleziaj institucioj. Tio signifas, ke ili aplikas la leĝon pri interkonsiliĝo al ĉiuj aferoj kaj malfacilaĵoj kiuj okazas inter bahaanoj, kiuj estas petitaj ne prezenti tiujn aferojn al civila juĝejo, kaj penas antaŭenigi unuecon kiel ankaŭ justecon tra la tuta komunumo. La Spiritaj Asembleoj tute ne egalas al pastro aŭ klerikaro, sed respondecas por subteni la instruojn, instigi ageman servadon, konduki kunvenojn, konservi unuecon, teni bahaajn proprajn en kuratoreco por la komunumo, kaj reprezenti ĝin en ĝiaj rilatoj kun la publiko kaj kun aliaj bahaaj komunumoj.

La naturo de la Spiritaj Asembleoj, loka kaj nacia, estas prezentita en la sekcio pri la Testamento de 'Abdu'l-Bahá en la fina ĉapitro, sed ĝiaj ĝeneralaj devoj estas difinitaj de Shoghi Effendi jene:

*La afero pri Instruado, ĝia direkto, ĝiaj rimedoj, ĝia amplekso, ĝia firmigo, kiel ajn esencaj ili estas al la Religio, tute ne estas la sola agado por ricevi la plenan atenton de la Asembleoj. Atentiga studo de la Tabuletoj de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá malkaŝos ke aliaj devoj, ne malpli necesaj al la interesoj de la Religio, apartenas al la elektitaj reprezentantoj de la geamiko en ĉiu loko.*

*Ili devas esti viglaj kaj prudentaj, diskretaj kaj gardemaj, kaj protekti senĉese la Templon de la Religio kontraŭ la sagoj de la malpacigantoj kaj la atakoj de la malamikoj.*

*Ili penadu antaŭenigi amikecon kaj akordon inter la geamikoj, forigi ĉiun restantan ŝpuron de malfido, malproksimeco kaj malamikeco el ĉiu koro, kaj sekuri anstataŭe ageman kaj tutkoran kunlaboron per servado al la Religio.*

*Ili klopodu plej kapable helpi ĉiuokaze al malriĉuloj, malsanuloj, kripluloj, orfoj, vidvinoj, senkonsidere de haŭtkoloro, kasto, kaj kredo.*

*Ili antaŭenigu per ĉiu klopodo en sia povo la materian kiel ankaŭ la spiritan klarecon de la junularo, rimedojn por la edukado de infanoj, starigu, kiam ajn eble, bahaajn edukadajn instituciojn, organizu kaj direktu ilian laboron por provizi la plej bonajn rimedojn por iliaj progreso kaj evoluigo.*

*Ili entreprenu la aranĝojn por la regulaj kunvenoj de la geamikoj, la festojn kaj la datrevenojn, kiel ankaŭ la specialajn kunvenojn por servi kaj antaŭenigi la sociajn, intelektajn kaj spiritajn profitojn de siaj kunhomoj.*

*Ili direktu en tiuj ĉi tagoj kiam la Religio estas ankoraŭ en sia infaneco ĉiujn bahaajn eldonojn kaj tradukojn, kaj arangu ĝenerale dignan kaj veran prezentadon de ĉiu baha literaturo kaj ties distribuo al la ĝenerala publiko.*

La eblecojn troviĝantajn en bahaaj institucioj oni povas nur taksu kiam oni elkomprenas kiel rapide la moderna civilizacio diseriĝas pro manko de tiu spirita potenco kiu sola kapablas provizi la bezonatan sintenon de respondeco kaj humileco al la ĉefuloj kaj bezonan lojalecon al la individuaj membroj de la homaro.

### Bahaaj Festoj, Datrevenoj kaj Fastotagoj

Festo Naw-Rúz (Baha Novjaro), 21 marto.

Festo Ridván (Deklaracio de Bahá'u'lláh), 21 aprilo - 2 majo.

Deklaracio de Báb, 23 majo.<sup>1</sup>  
 Morto de Bahá'u'lláh, 29 majo.  
 Martirigo de Báb, 9 julio.  
 Naskiĝtago de Báb, 20 oktobro.  
 Naskiĝtago de Bahá'u'lláh, 12 novembro.  
 Tago de la Sankta Interligo, 26 novembro.  
 Morto de 'Abdu'l-Bahá, 28 novembro.  
 Fastperiodo, deknaŭ tagoj **komence de 2** marto.

## Festoj

La esenca ĝojeco de la bahaa religio trovas esprimon en multaj festoj kaj sanktotagoj tra la jaro.

En Sia prelego dum la Naw-Rúz-Festo en Aleksandrio, Egiptujo, en 1912, 'Abdu'l-Bahá diris:

*En la sanktaj leĝoj de Dio, en ĉiuj ciklo kaj erao estas benitaj festoj, sanktotagoj kaj senlaboraj tagoj. En tiaj tagoj oni devas interrompi ĉiaspecajn okupojn, komercon, industrion, agrikulturon, k.t.p.*

*Ĉiuj devas kune ĝoji, aranĝi ĝeneralajn kunvenojn, fariĝi kiel unu asocio, por ke la unueco kaj harmonio de la tutlanda bahaanaro evidentiĝu al la tuta mondo.*

*Ĉar ĝi estas benita tago oni ne devas ĝin neglekti, nek senrezultigi per dediĉo al nura ĝuado de plezuroj.*

*En tiaj tagoj devas esti fondataj institucioj de konstanta utilo kaj valoro por ĉiuj. ...*

*Hodiaŭ neniuj rezulto aŭ frukto estas pli grava ol gvidado de homoj. Sendube la amikoj de Dio devas en tia tago, lasi konkretajn filantropiajn aŭ idealajn postsignojn kiuj koncernos la tutan homaron kaj ne apartenos nur al bahaanoj. En tiu ĉi mirinda erao, filantropiaj aferoj estas por la tuta homaro sen esceptoj, ĉar ĝi estas la elmonro de la kompatemo de Dio. Tial, mi esperas ke la amikoj de Dio, ĉiu el ili, fariĝos kiel korfavoro de Dio al la homaro.*

La Festoj Naw-Rúz (Nova Jaro) kaj Ridván, la Datrevenoj de la Naskiĝo de Báb kaj Bahá'u'lláh, kaj de la Deklaracio de Báb (kiu estas ankaŭ naskiĝtago de 'Abdu'l-Bahá), estas por bahaanoj la grandaj ĝojtagoj de la jaro. En Persujo oni solenas ilin per piknikoj aŭ festaj kunvenoj en kiuj ĉeestantoj partoprenas per muziko, kantado de versaroj kaj tabuletoj, kaj per mallongaj prelegoj konformaj al la okazo. La intermetitaj tagoj inter la dekoka kaj deknaŭa monatoj (t.e. 26 februaro ĝis 1 marto inkluzive) estas dediĉitaj speciale al gastigado al amikoj, oferado de donacoj, prizorgado de malriculoj kaj malsanuloj, k.t.p.

La datrevenoj de la martirigo de Báb kaj de la morto de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá estas solene honorataj per taŭgaj kunvenoj kaj paroladoj, per kantado de preĝoj kaj Tabuletoj.

## Fasto

La deknaŭa monato, senpere sekvanta la gastamon de la intermetitaj tagoj, estas monato de fasto. Dum deknaŭ tagoj oni observas faston per sindeteno de manĝo kaj trinko de sunleviĝo ĝis sunsubiro. Ĉar la monato de fasto finiĝas je la marta ekvinokso, la fasto okazas ĉiam en la sama sezono, nome, printempe en la Norda Hemisfero kaj aŭtune en la Suda; neniam dum ekstrema varmego de somero aŭ dum ekstrema malvarmo de vintro, kiam ĝi povus kaŭzi malfacilaĵojn. Je tiu sezono, la tempodaŭro inter sunleviĝo kaj sunsubiro estas pli malpli egala en ĉiuj loĝataj partoj de la tergloblo, nome de la 6-a a.t.m. ĝis la 6-a p.t.m. La fasto ne estas deviga por infanoj kaj malsanuloj, por vojaĝantoj, por personoj tro maljunaj aŭ tro malfortaj (inkluzive virinoj gravedaj kaj kun suĉinfanoj).

Estas tre evidente ke perioda fasto kian ordonas la bahaaj instruoj estas utila kiel rimedo de korpa higieno. Sed kiel la realeco de la bahaaj festoj ne dependas de la konsumado de materia nutraĵo, sed en la rememorado pri Dio, kiu estas nia spirita nutraĵo, tiel la realeco de la bahaa fasto ne konsistas en la sindeteno de materia nutraĵo, kvankam tio povus helpi por purigi la korpon, sed sindeteno de deziroj kaj plezuroj de la korpo, kaj apartiĝo de ĉio krom Dio. 'Abdu'l-Bahá diras:

*Fasto estas simbolo. Fasto signifas abstinadon de voluptaj deziroj. Korpa fasto estas simbolo de tiu abstinado, kaj estas memorigilo. Tio estas, kiel homo sin detenas de korpaj apetitoj, li devas ankaŭ sindeteni*

<sup>1</sup> Ĉi tiu dato koincidas kun la naskiĝtago de 'Abdu'l-Bahá.

de mem-apetitaj kaj mem-deziroj. Sed nura sindeteno de manĝo havas nenian influon je la spirito. Ĝi estas nur simbolo, nur memorigilo. Alie ĝi havas nenian valoron. Tiucela fasto ne signifas kompletan abstinadon de manĝo. La regulo de la vivo koncerne manĝon estas: manĝu nek tro multe nek tro malmulte. Modereco estas necesa. En Hindujo estas sekto kies anoj praktikas ekstreman abstinadon, kaj iom post iom malpliigas sian nutraĵon ĝis fine ili preskaŭ nenion manĝas. Sed ilia intelekto suferas. Homo ne estas kapabla servi al Dio per la cerbo aŭ korpo se li estas malfortigita pro manko de nutraĵo. Li ne povas vidi klare. (citita de f-mo E. S. Stevens en Fortnightly Review, junio 1911)

## Kunvenoj

'Abdu'l-Bahá atribuas plej grandan signifon al regulaj kunvenoj de kredantoj por komuna preĝado, klarigado kaj studado de la instruoj kaj interkonsiliĝo pri progreso de la Kredoj. En unu el Siaj Tabuletoj Li diras:

*Estas decidite laŭ la Deziro de Dio ke unueco kaj harmonio povus pliiĝi tagon post tago inter la amikoj de Dio kaj la servantinoj de la Kompatema. Ĝis tio ĉi estos plenumita la aferoj neniel ajn iros antaŭen! Kaj la plej granda rimedo por atingi unuecon kaj harmonion inter ĉiuj estas Spiritaj Kunvenoj. Tiu ĉi afero estas tre grava kaj ĝi estas kvazaŭmagneto por altiri Dian konfirmon.*

Dum la spiritaj kunvenoj bahaanoj devas eviti malpacan argumentadon kaj diskutojn pri politikaj aŭ mondumaj aferoj; la sola celo de la kredantoj devas esti instrui kaj lerni la Dian Veron, plenigi siajn korojn per Diamo, atingi pli perfektan obeon al la Dia Volo, kaj akceli la venon de la Regno de Dio. En prelego farita en Nov-Jorko en 1912, 'Abdu'l-Bahá diris:

*Bahaa kunveno devas esti kunveno de la Ĉielanaro. Ĝi devas esti lumigita per la lumo de la Ĉielanaro. La koroj devas esti kvazaŭ speguloj en kiuj sin malkaŝas la Suno de Vero. Ĉiu brusto devas esti kvazaŭ telegrafa stacio: unu fino de la sendilo estu en la fundo de la animo, la dua ĉe la Ĉielanaro, por ke komunikoj povu esti interŝanĝataj inter ili. Tiamaniere el la Regno Abhá fluos inspiro kaj harmonio regos en ĉiuj diskutoj. ... Ju pli da interkonsento, unueco kaj amo regos inter vi, des pli la konfirmoj de Dio estos kun vi, kaj helpo kaj apogo de la Benita Belo, Bahá'u'lláh, subtenos vin.*

En unu el Siaj Tabuletoj Li diras:

*En tiuj ĉi kunvenoj oni devas zorge eviti interparolon pri eksteraj temoj, kaj la kunsido devas esti limigita al kantado de versaroj kaj legado de la vortoj, kaj al aferoj koncernantaj la Kredon de Dio, kiel klarigo de pruvoj, elmontrado de klaraj kaj malkaŝaj evidentiĝoj, kaj sekvado de la postsignoj de la Amato de la estaĵoj. Tiuj kiuj partoprenas en la kunveno devas, antaŭ la eniro, vesti sin per plej granda pureco kaj sinturni al la Regno Abhá, kaj tiam eniri la kunvenon en plena humileco kaj malfiereco; kiam oni legas la tabuletojn, ĉiuj devas esti silentaj kaj trankvilaj; se iu deziras paroli li devas tion fari en plej ĝentila maniero, kun konsento kaj permeso de la ĉeestantoj, kaj li devas paroli elokvente kaj flue. ...*

## La Festo de la Dek-Naŭa Tago

Pro la evoluiĝo de la bahaa administra sistemo de post la morto de 'Abdu'l-Bahá, la Festo de la Dek-Naŭa Tago, kiun oni solenas en la unua tago de ĉiu bahaa monato, akiris al si ege specialan gravecon, ĉar ĝi aranĝas ne nur komunuman preĝadon kaj legadon el la Sanktaj Libroj, sed ankaŭ la ĝeneralan konsiliĝon pri ĉiuj nuntempaj bahaaj aferoj kaj por la kunigo de la geamikoj. Ĉi tiu Festo estas la okazo kiam la Spirita Asembleo faras siajn raportojn al la komunumo kaj petas kaj diskutas planojn kaj sugestojn por novaj kaj pli bonaj servometodoj.

## Mashriq'u'l-Adhkár<sup>1</sup>

Bahá'u'lláh postlasis instrukciojn ke en ĉiu lando kaj urbo Liaj sekvantoj konstruu templojn. Al tiuj ĉi temploj Li donis la nomon "Mashriq'u'l-Adhkár", kio signifas "Tagiĝ-loko de la Glorado al Dio". Ĉiu Mashriq'u'l-Adhkár devas esti naŭflanka konstruaĵo kun kupolo supre, kaj devas esti kiel eble plej bela en desegno kaj labordetaloj. Ĝi devas stari en vasta ĝardeno ornamita per fontanoj, arboj kaj floroj, ĉirkaŭita per diversaj akcesoraj konstruaĵoj deditaj al edukaj, bonfaraj kaj sociaj celoj, por ke la

<sup>1</sup> Eldiru Mašrekol-Azkar.

adorado al Dio en la templo estu ĉiam proksime kunligita kun respektplena ĝuado de belaĵoj de la naturo kaj arto, kaj kun praktikaj laboroj plenumataj por plibonigo de la sociaj kondiĉoj.<sup>1</sup>

En Persujo, ĝis la nuna tempo, al bahaanoj estas malpermesite konstruadi templojn por publika diservado. Kaj sekve la unua granda *Mashriq'u'l-Adhkār* estis konstruita en Iskabado, Rusujo.<sup>2</sup>

'Abdu'l-Baha' dediĉis la lokon de la dua bahaa Adorejo, ĉe bordo de la Miĉigan-lago kelkajn mejlojn norde de Ĉikago, dum Sia vizito al Ameriko en 1912.<sup>3</sup>

En tabuletoj koncernantaj tiun ĉi "Patrin-Templo" de la Okcidento, 'Abdu'l-Bahá skribas jene:

*Gloro estu al Dio, ke en la nuna momento, el ĉiuj landoj de la mondo, konforme al ilia eblo, estas konstante sendataj oferoj por la fondkapitalo de la Mashriq'u'l-Adhkār en Ameriko. ... De la tago de Adamo ĝis nun, la homaro neniam vidis tian aferon, ke el plej malproksimaj landoj de Azio oni sendas kontribuadojn en Amerikon. Vere tio ĉi estas kaŭzo de mirego por la perceptuloj. Mi esperas ke la amikoj de Dio elmontrus grandanimecon kaj kolektos grandan sumon por la konstruo. ... Mi deziras, ke ĉiu estu libera agi, kiel li volas. Se iu volas meti sian monon alimaniere, li faru tion. Neniel miksu vin en liajn aferojn, sed estu certa, ke la plej grava afero en tiu ĉi tempo estas la konstruo de la Mashriq'u'l-Adhkār.*

*... La mistero de la konstruaĵo estas granda, kaj ne povas esti nun senvualigita, sed ĝia starigo estas la plej grava entrepreno en tiu ĉi tago. La Mashriq'u'l-Adhkār havas gravajn akcesoraĵojn, konsideratajn samvaloraj kiel la ĉef-konstruaĵo. Ili estas: lernejo por orfoj, dispensario kaj malsanulejo por malriĉuloj, hejmo por kripluloj, kolegio por supera scienca edukado, kaj gastejo. En ĉiu urbo devas esti fondita granda Mashriq'u'l-Adhkār laŭ tiu ĉi vicoserio. En Mashriq'u'l-Adhkār Diservoj okazos ĉiumatene. En la Templo estos neniam orgenoj. En la apudaj konstruaĵoj, estos aranĝitaj festoj, Diservoj, kunvenoj, publikaj konferencoj kaj spiritalaj renkontoj, sed en la Templo preĝado kaj kantado estos senakompanaj. Malfermu la pordegojn de la Templo al la tuta homaro.*

*Kiam estos konstruitaj tiuj ĉi institucioj-kolegio, malsanulejo, gastejo, stablo por nekuraĉeblatoj, universitato por studado de superaj sciencoj, donanta postdiplomajn kursojn, kaj aliaj filantropiaj konstruaĵoj - la pordoj estos malfermitaj por ĉiuj nacioj kaj religioj. Estas absolute neniam limoj. La bonfaroj estas disdonataj senkonsidere al koloro aŭ raso. Ĝiaj pordegoj estos large malfermitaj por la tuta homa gento; antaŭjuĝoj kontraŭ neniuj, amo al ĉiuj. La centra konstruaĵo estos dediĉita al preĝado kaj Diadorado. Tiel ... la religio harmoniigos kun la scienco, la scienco fariĝos servantino de la religio, kaj ili ambaŭverŝos siajn materiajn kaj spiritalajn donacojn sur la tutan homaron.*

## Vivo post Morto

Bahá'u'lláh diras ke la enkorpita vivo estas nur embria stato de nia ekzisto, kaj ke forlaso de la korpo estas kvazaŭ nova naskiĝo, por kiu la homa spirito enpaŝas en pli plenan, pli liberan vivon. Li skribas:

*Sciu vere ke animo, post sia elkorpigo, daŭre progresos ĝis ĝi atingos la ĉeeston de Dio, en stato kaj kondiĉo kiuj nek la evoluiĝo de epokoj kaj jarcentoj, nek la ŝanĝoj kaj okazintaĵoj de ĉi tiu mondo, povos alligi. Ĝi daŭros tiel longe, kiel daŭros la Regno de Dio, Lia suvereneco, Lia povo kaj Lia potenco. Ĝi aperigados la signojn de Dio kaj Liajn atribuojn, kaj revelacios Liajn indulgemon kaj favoron. Mia Plumo haltas kiam ĝi provas taŭge priskribi la altecon kaj gloron de tiel ekzaltita rango. La Mano de la Dia Korfavoro plenhonore igos la spiriton eniri en staton kiun oni ne povas esprimi per vortoj, kaj kiun klarigi povas neniuj el ekzistantaj kreitaĵoj. Benita estu tiu animo, kiu elkorpigas purigita de la duboj kaj la superstiĉoj de la mondo. Vere ĝi sin movas en la atmosfero de la Sankta Volo de sia Kreinto, kaj eniras la Superegan Paradizon. Ĉiuj anĝeloj de la plej altaj loĝejoj bonvenigos kaj ĉirkaŭos ĝin, kaj tiu spirito amike rilatos kun ĉiuj Profetoj de Dio kaj Liaj sanktuloj. Ĝi parolos kun ili, kaj rakontos tion kio okazis al ĝi en la vojo de Dio, la Eternulo de ĉiuj mondoj. Se iu povus bildigi al si tion kio estas dekretita en la mondoj de Dio, la Eternulo de la ĉiela trono kaj de la tero, lia tuta estaĵo eksopirus kun granda malpacieneco al tiu altega, sankta kaj glora stato. ... Koncerne la naturon de la animo postmorte oni ne povas ĝin priskribi, nek estas taŭge kaj permeseble malkaŝi ĝian tutan karakteron*

<sup>1</sup> Rilate al *Mashriq'u'l-Adhkār*, estas interese rememorigi la versojn de Tennyson: "Mi sonĝis, ke ŝton-post-ŝton' mi konstruis sanktan adorejon, Templon, nek pagodon, moskeon nek pregej-similan, sed pli altan, pli simplan, ĉiam malfermitan al ĉia spiro ĉiela, kaj ke Vero kaj Paco kaj Amo kaj Justeco venis kaj eklog is tie." *Sonĝo de Akbar*, 1892.

<sup>2</sup> Tiu unua Adorejo estis multe difektita dum tertremo en 1948 kaj devis esti malkonstruita kelkajn jarojn poste.

<sup>3</sup> Ĉi tiu Templo estis finkonstruita en 1953. Pliaj bahaaj Temploj staras nun en Kampala, Uganda; Sidnejo, Aŭstralio; Frankfurt, Germanujo; kaj la plej nova finkonstruiĝis proksime al la urbo Panamo en 1972. En 1969 terpecoj por kvindek aliaj estas aĉetitaj. (Vidu Epilogon).

al la homaro. Diosenditoj venas nur por gvidi la kreitojn sur la rektan Vojon de la Vero. La celo de ilia revelacio estis ke la homoj estu edukitaj, por ke, en la mortohoro, ili leviĝu, en plejaj pureco kaj sankteco kaj kun absoluta sinofero, al la trono de la Plejaltulo. La lumo kiun ĉi tiuj animoj radias respondas por la progreso de la mondo kaj la antaŭenigo de ĝiaj popoloj. Ili estas kiel fermentaĵo kiu influas la mondon de ekzisto, kaj formas la vivoforton per kiu la artoj kaj mirindaĵoj de la mondo malkaŝiĝos. Pere de ili la nuboj superŝutas la homaron per bonfaremo, kaj la tero produktas siajn fruktojn. Ĉiuj aferoj devas havi kaŭzon, movan forton, vivigan principon. Ĉi tiuj animoj kaj simboloj de sinpartigo provizis, kaj daŭros provizi, la superan movimpulson en la homa mondo. La pretera mondo estas tiel malsimila al ĉi tiu mondo kiel ĉi tiu mondo malsimilas al tiu de la infano ankoraŭ en la utero de la patrino. – Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh, pp. 155-157 (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh)

Simile 'Abdu'l-Bahá skribas:

*La misterojn kiujn homo malatentas en la tera mondo, li malkovros en la ĉiela mondo, kaj tie estos konigitaj al li la sekretoj de la vero; des pli certe li retrovos kaj rekonos personojn kun kiuj li rilatis. Sendube la sanktaj animoj kiuj trovas puran okulon kaj estas favoritaj per la interna vido iĝos, en la regno de lumo, konantoj de ĉiuj misteroj, kaj serĉos la benon por vidi la realecon de ĉiu granda animo. Ili eĉ klare vidos la Belon de Dio en tiu mondo. Simile ili trovos ĉiujn amikojn de Dio, tiujn de la antaŭa kaj lasta tempo, kune en la ĉiela asocio.*

*La distingiĝo inter la homoj kompreneble daŭros post ilia foriro el tiu ĉi mortema mondo. Sed tiu distingiĝo ne koncernas lokon, sed koncernas la animon kaj konsciencon. Ĉar la Regno de Dio estas sanktigita (liberigita) disde tempo kaj loko; tio estas alia mondo kaj alia universo. Kaj sciu kun certeco ke en la diaj mondoj la spiritaĵoj amatoj rekonos unu la alian, kaj serĉos reciprokajn unuiĝojn, sed spiritan unuiĝon. Tiel same amo kiun unu havis al alia, ne estos forgesita en la mondo de la Regno, nek vi forgesos tie la vivon kiun vi havis en la materia mondo.*

## Ĉielo kaj Infero

Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá konsideras la priskribojn Ĉielo kaj Infero prezentitajn en kelkaj pli malnovaj religiaj libroj kiel simbolajn, simile al la biblia historio pri la Kreo de la mondo, kaj ne kiel absolute veran. La Ĉielo estas, laŭ Ili, stato de perfekteco, kaj la Infero - de malperfekteco. La Ĉielo estas harmonio kun la Volo de Dio kaj kun niaj proksimumoj, kaj la Infero estas manko de tiu harmonio. La Ĉielo estas stato de spirita vivo, kaj la Infero - de spirita morto. Homo povas esti aŭ en la Ĉielo aŭ en la Infero ankoraŭ dum sia enkorpita vivo. La ĝojoj de la Ĉielo estas spiritaĵoj, kaj la suferoj de la Infero estas senigo de tiuj ĝojoj.

'Abdu'l-Bahá diras:

*Kiam homoj estas savitaj per la lumo de kredo el la mallumo de malvirtoj, lumigitaj per la radiado de la suno de la vero, kaj nobligitaj per ĉiuj virtoj, ili konsideras tion la plej granda rekompenco, kaj scias ke tio estas la vera paradizo. Sammaniere ili konsideras ke la spirita puno ... estu submetiĝo al la mondo de naturo, estu forvaliĝo de Dio, estu kruela kaj nescia, dronu en korpaj ĝuoj, estu absorbita per bestaj malfortecoj, karakterizu sin per mallumaj kvalitoj. ... Tio estas la plej grandaj punoj kaj turmentecoj. ...*

*... La rekompencoj de la alia mondo estas la perfektecoj kaj paco ricevataj en la spiritaĵoj post forlaso de tiu ĉi mondo ... spiritaĵoj favoroj, diversaj spiritaĵoj donacoj en la Regno de Dio, akiro de la deziroj de la koro kaj animo, kaj renkonto de Dio en la mondo de eterneco. Sammaniere la punoj de la alia mondo. ... konsistas el senigo de la specialaj diaj benoj kaj de la absolutaj malavaraĵoj, kaj ekfalo en la plej malaltajn gradojn de la ekzisto. Tiu kiu estas senigita de tiuj ĉi diaj favoroj, kvankam li daŭras post la morto, estas tamen konsiderata morta de la popolo de la vero.*

*La ricaĵo de la alia mondo estas proksimeco al Dio. Sekve de tio estas certe ke al tiuj kiuj estas proksimaj al la Dia Kortego estas permesite propeti, kaj tiu propetado estas benita de Dio.*

*Estas eĉ eble ke la kondiĉoj de tiuj kiuj mortis en peko kaj nekredo ŝanĝiĝos, t.e., ili povas esti objekto de pardono per la malavareco de Dio, ne per Lia justeco; ĉar malavareco estas donado senmerita, kaj justeco estas donado de tio kion oni meritis. Kiel ni havas la povon preĝi por tiuj animoj tie ĉi, ni tiel same posedos tiun povon en la alia mondo, kiu estas la Regno de Dio. ... Sekve en tiu mondo ili ankaŭ povas progresi. Kiel tie ĉi ili povas ricevi la lumon per siaj propraj preĝoj, ankaŭ tie ili povas petegi pardonon, kaj ricevi la lumon per petegoj kaj preĝoj.*

*Tiel antaŭe kiel post la formeto de tiu ĉi materiala formo, ekzistas progreso en perfekteco sed ne en stadio. ... Estas neniu kreaĵo pli alta ol perfekta homo. Atinginte tiun ĉi staton homo povas ankoraŭ progresi en la*

*perfekteco sed ne en la stadio, ĉar ne ekzistas la stadio pli alta ol tiu de perfekta homo en kiun li povus sin transigi. Li progresas nur en la stato de homeco, ĉar la homaj perfektecoj estas senfinaj. Tiel ekzemple, kiel ajn instruita homo povus esti, ni povas imagi homon pli instruitan.*

*Pro tio, ĉar la perfektecoj de homaro estas senlimaj, oni povas ankaŭ progresi en la perfektecoj post la forlaso de tiu ĉi mondo. – Some Answered Questions, pp. 260, 261, 268, 269, 274 (Demandoj kaj Respondoj)*

### Unueco de la Ambaŭ Mondo

La unueco de la homa gento kiun instruas Bahá'u'lláh koncernas ne nur personojn ankoraŭ en la korpoj, sed ĉiujn homojn, ĉu enkorpaĵojn ĉu elkorpiĝintajn. Ne nur ĉiuj homoj nun vivantaj sur la tero sed ankaŭ ĉiuj en la spirita mondo, estas partoj de la sama organismo kaj tiuj du partoj intime dependas de si reciproke. Spirita kuneco inter ili, kiu nepre ne estas neebla aŭ nenatura, estas konstanta kaj neevitebla. Tiuj kies spiritaĵoj estas ankoraŭ neevoluintaj ne konscias pri tiu ĉi vivoplena kontakto, sed kiam la kapabloj de homo evoluas, la kontakto kun tiuj preter la vualo fariĝas iom post iom pli konscia kaj pli difinita. Por Profetoj kaj sanktuloj tiu ĉi spirita kontakto estas tiel simpla kaj tiel reala kiel ordinaraĵoj kaj interparoloj por aliaj homoj.

'Abdu'l-Bahá diras:

*La vizioj de Profetoj ne estas sonĝoj; ili estas spiritaĵoj kaj malkovroj kaj koncernas realecon. Ili diras, ekzemple: "Mi vidis personon en difinita formo, kaj mi diris tion, kaj li donis al mi tian respondon." Tia vizio estas en la sfero de maldormo, ne en la sfero de dormo. Ja, ĝi estas spirita malkovro. ...*

*... Inter spiritaĵoj ekzistas spiritaĵoj kaj malkovroj, interrilato kiu estas purigita de fantazio kaj imagoj, interkontakto kiu estas sanktigita de tempo kaj loko. Estas do skribite en la Evangelio ke sur la monto Tabor, Moseo kaj Elija venis al Kristo, kaj estas evidente ke tio ĉi ne estis materia renkontiĝo. Ĝi estis spirita kondiĉo. ...*

*... (Renkontiĝoj similaj) al ĉi tiuj estas realaj, kaŭzas mirindan efikon je homaj mensoj kaj pensoj, kaj allogas iliajn korojn. – Some Answered Questions, pp. 290-292 (Demandoj kaj Respondoj)*

Kvankam konfesante la realecon de la "supernormalaj" psikaj povoj Li tamen malaprobis la penojn celantajn devigi ilian antaŭmaturan disvolviĝon. Tiuj ĉi povoj disvolvos sin en natura maniero, kiam venos la ĝusta tempo, se ni nur sekvos la vojon de spirita progreso kiun la Profetoj preparis al ni. Li diras:

*Enmiksiĝo en psikaj fortoj en tiu ĉi mondo malhelpas la kondiĉojn de la animo en la venonta mondo. Tiuj ĉi fortoj estas realaj, sed normale, ili ne estas aktivaj en tiu ĉi sfero. Ido en la utero havas okulojn, orelojn, manojn, piedojn, k.t.p., sed ili ne estas en aktiveco. La tuta celo de la vivo en la materia mondo estas eniri la mondon de Realeco, kie tiuj fortoj fariĝos aktivaj. Ili apartenas al tiu mondo. (el notoj de f-ino Buckton, reviziitaj de 'Abdu'l-Bahá)*

Oni ne serĉu rilaton kun spiritoj de foririntoj nur pro tio, nek por kontentigi vanan scivolon. Estas, tamen, samtempe privilegio kaj devo de tiuj ĉe unu flanko de la vualo ami, helpi kaj preĝi por tiuj je la alia. Preĝoj por mortintoj estas ordonitaj al bahaanoj. 'Abdu'l-Bahá diris al f-ino E. J. Rosenberg en 1904: "La favoro de efika propetado estas unu el la perfektecoj apartenantaj al progresintaj animoj, kiel ankaŭ al la Malkaŝantoj de Dio. Jesuo Kristo havis la potencon por preĝi pardonon por Siaj malamikoj estante sur la tero, kaj tiun ĉi povon Li certe havas nun. 'Abdu'l-Bahá neniam mencias nomon de mortinto sen la vortoj: 'Dio pardonu al li! aŭ similsencaĵoj vortoj. Sekvantoj de la profetoj ankaŭ havas la povon por preĝi pardonon al animoj. Tial ni ne pensu ke iu animo estas kondamnita al senŝanĝa stato de suferado aŭ pereado pro absoluta nescio pri Dio. La povo de efika propetado por ili ĉiam ekzistas." ...

"Riĉulo en la alia mondo povas helpi malriĉulon, kiel riĉulo povas helpi malriĉulon tie ĉi. En ĉiu mondo ĉiuj estas kreaĵoj de Dio. Ili ĉiam dependas de Li. Ili ne estas kaj nenial povas esti sendependaj. Ĉar ili bezonas Dion, ju pli ili preĝas, des pli riĉaj ili fariĝas. Kio estas ilia posedaĵo, ilia riĉaĵo? Kio estas ilia helpo kaj subteno en la alia mondo? Ĝi estas propetado. Nedisvolviĝintaj animoj devas akiri progreson unue pere de petado de spiritaĵoj; poste ili povas progresadi per sia propra petado."

Alifoje Li diras: "Tiuj kiuj suprenleviĝis havas atribuojn diferencajn de tiuj kiuj estas ankoraŭ sur la tero, sed la unuaj ne estas efektive apartiĝintaj de la duaj."

"En preĝo okazas kuniĝo de la statoj, kuniĝo de la kondiĉoj. Preĝu por ili kiel ili preĝas por vi". – 'Abdu'l-Bahá in London, p. 97 ('Abdu'l-Bahá en Londono).

Demandite ĉu estas eble por kredo kaj amo alporti scion de la Nova Revelacio al tiuj kiuj foriris el tiu ĉi vivo ne aŭdinte pri ĝi, 'Abdu'l-Bahá respondis: "Jes, certe! Ĉar sincera preĝo estas ĉiam efika, kaj havas grandan influon en la alia mondo. Ni neniam estas apartigitaj de tiuj kiuj estas tie. La efektiva kaj vera influo estas ne en tiu ĉi mondo sed en la alia." – *Notes of Mary Hanford Ford*, Parizo, 1911 (Notoj de Mary Hanford Ford).

Aliflanke Bahá'u'lláh skribas:

*Se iu vivas konforme al tio kio estas decidita por li, la Ĉielanaro, kaj la loĝantoj de la Superega Paradizo, kaj tiuj kiuj loĝas sub la Kupolo de Grandeco preĝos por li, laŭ Ordono de Dio, la Plej Kara kaj la glora. (Tabuleto tradukita de 'Alí Kulí Khán)*

Kiam oni demandis al 'Abdu'l-Bahá kial la koro ofte turnas sin kun instinkta alvoko al amiko kiu trapasis en la postan vivon, Li respondis: "Tio estas leĝo de la Dia kreado ke malfortulo serĉu apogon ĉe fortulo. Tiuj al kiuj vi vin turnas povas esti perantoj de la Dia Povo al vi, eĉ kiam ili estas surtere. Sed estas la Sankta Spirito kiu fortigas ĉiujn homojn." – *'Abdu'l-Bahá in London*, p. 97 ('Abdu'l-Bahá en Londono)

### Neekzisto de Malbono

Laŭ la bahaa filozofio el la doktrino pri unueco de Dio sekvas ke povas ekzisti nenia pozitiva malbono. Povas esti nur la Senlimeco. Se en la universo ekzistus aliaj povoj eksteraj aŭ kontraŭaj al tiu ĉi Unu, tiam tiu ĉi Unu ne estus senlima. Kiel mallumo estas nur manko aŭ malforta grado de lumo, tiel malbono estas nur manko aŭ malforta grado de bono, la nedisvolvita stato. Homo malbona estas homo kies pli alta naturo estas ankoraŭ nedisvolvita. Se li estas egoisma, la malbono ne estas lia amo de si mem-ĉia amo, eĉ memamo, estas dia.

La malbono estas tio ke li havas tiel mizeran, neĝustan, malbone direktitan amon al si mem kaj tian mankon de amo al aliaj kaj al Dio. Li konsideras sin mem kiel nur superan specon de besto, kaj malsaĝe dorlotas sian malpli altan naturon kiel li dorlotus ŝatatan hundon - kun rezulto pli malbona rilate al si mem ol tio de la hundo.

En unu el Siaj leteroj 'Abdu'l-Bahá diras:

*Koncerne vian rimarkon, ke 'Abdu'l-Bahá diris al kelkaj kredantoj ke malbono neniel ekzistas, ke ĝi estas, ĝuste dirante, objekto neekzistanta, tio estas ja vero, konsiderante ke la plej granda malbono estas se homo devojiĝas kaj vualiĝas for de la vero. Eraro estas manko de gvido; mallumo estas foresto de lumo; nescio estas manko de scio; mensogo estas manko de vero; blindeco estas manko de vido; kaj surdeco estas manko de aŭdado. Tiel do, eraro, blindeco, surdeco kaj nescio estas objektoj neekzistantaj.*

Refoje Li diris:

*En la kreaĵo ne ekzistas malbono; ĉio estas bona. Kelkaj kvalitoj kaj denaskaj karakter-trajtoj de tiuj homoj ŝajne tre riproĉindaj ne estas tiaj en realeco. Ekzemple, vi povas rimarki en suĉinfano de la komenco de ĝia vivo signojn de deziro, kolero, kaj malbona humoro. Oni povas tiam diri, ke bono kaj malbono estas denaskaj en la realeco de homo, kaj tio ĉi estas kontraŭa al la boneco de la naturo kaj kreaĵo. La respondo estas ke deziro, kiu celas ion pli, estas laŭdinda kvalito se ĝi estas ĝuste uzata. Se homo deziras akiri sciencan kaj instruitecon, aŭ fariĝi kompatema, malavara, kaj justa, tio estas plej laŭdinda. Tiel same, se li ekscitas siajn koleron kaj indignon kontraŭ sangamaj tiranoj kiuj similas sovaĝajn bestojn, tio estas tre laŭdinda; sed se li ne uzas tiujn ĉi kvalitojn en ĝusta maniero, tio estas mallaŭdinda. ...*

*... Tiel same okazas kun ĉiuj naturaj kvalitoj de homo, kiuj formas la bonecon de la vivo; se ili estas uzataj kaj elmontrataj en kontraŭleĝa maniero, ili fariĝas riproĉindaj. Tial estas klare ke la kreaĵo estas pure bona. – Some Answered Questions, pp. 250, 351 (Demandoj kaj Respondoj)*

Malbono estas ĉiam manko de vivo. Se la malpli bona flanko de la homa naturo estas neproporcie disvolvita, la kuracilo ne estas malpli da vivo por tiu flanko, sed pli da vivo por la pli bona flanko, por ke ekvilibro estu reatingita. "Mi venis", diris Kristo, "por ke vi havu vivon, kaj por ke vi havu pli multe da vivo." Jen tio kion ni ĉiuj bezonas: vivon, pli da vivo, vivon kiu estas vera vivo! La mesaĝo de Bahá'u'lláh estas la sama kiel de Kristo. "Hodiaŭ", Li diras, "tiu ĉi servanto venis ja por revivigi la mondon". (*Tablet to Ra'ís*, Tabuleto al Ra'ís), kaj al Siaj sekvantoj Li diras: "Venu por ke mi faru vin vivigantoj de la homaro". (*Tablet to the Pope*, Tabuleto al la Papo).

## ĈAPITRO XII: RELIGIO KAJ SCIENCO

*'Alí, la bofilo de Mahometo, diris: "Tio kio harmonias kun scienco harmonias ankaŭ kun religio." Kion homa intelekto ne povas kompreni, tion religio ne akceptu. Religio kaj scienco pasas man-en-mane, kaj tia religio, kia kontraŭas al scienco ne estas vera. – 'Abdu'l-Bahá, Wisdom of 'Abdu'l-Bahá (Saĝeco de 'Abdu'l-Bahá)*

### Eraro kiel Kaŭzo de Konflikto

Unu el la fundamenta instruoj de Bahá'u'lláh estas ke vera scienco kaj vera religio ĉiam devas esti harmonia. Vero estas nur unu, kaj kiam ajn okazas konflikto, ĝia kaŭzo estas ne la vero, sed malvero. Inter la tielnomata religio kaj tielnomata scienco en ĉiuj epokoj okazis akraj konfliktoj, sed ririgardante tiujn ĉi konfliktojn en la lumo de pli pura vero ni povas atribui ilin ĉefe al nescio, antaŭjuĝo, vanteco, avido, bigoteco, netoleremo, obstino aŭ io simila - io egale fremda al la vera spirito de la scienco kaj de la religio, ĉar la spirito de ambaŭ estas nur unu. Huxley diras: "Granda elfaroj de filozofoj ne tiom estas fruktoj de ilia intelekto kiom de la direkto de tiu intelekto per altgrada religia mensostato. La vero cedis ne tiom al ilia logika penetremo kiom al ilia pacienco, amo, korpureco kaj memforgeso." Boole, la matematikisto, certigas ke "geometria indukcio esence estas maniero de preĝo - alvoko de limita menso al la Senlima por lumo en la limhavaj aferoj". La granda profetoj de religio kaj de scienco neniam akuzis unu la alian. Ne ili, la granda mondinstruistoj, sed iliaj neindaj sekvantoj - la adorantoj de la litero sed ne de la spirito de iliaj instruoj - estis ĉiam persekutantoj de novaj profetoj kaj plej akraj malamikoj de progreso. Ili studis la lumon de la speciala revelacio kiun ili akceptis kiel sanktan, kaj kun plej granda zorgemo kaj precizeco difinis ĝiajn ecojn kaj kvalitojn, laŭ la kapablo de sia limigita vidpovo. Tio ĉi estas por ili la sola vera lumo. Se Dio en Sia senlima malavareco aperigas pli plenan lumon el alia regiono, kaj la torĉo de inspiro brilas en la mano de nova torĉportanto pli hele ol antaŭe, anstataŭ ĝoje akcepti la novan lumon kaj kun ripetita dankemo adori la Patron de ĉiuj lumoj ili koleras kaj maltrankvilas. Tiu ĉi nova lumo ne konformas al ilia difino. Ĝi ne havas ortodoksan econ, kaj ne brilas el ortodoksa loko, tial oni devas estingi ĝin je ĉia kosto por ke ĝi ne devojigu la homojn en vojon de herezo! Multaj malamikoj de la Profetoj apartenas al tiu ĉi tipo - ili estas blindaj kondukantoj de blinduloj, kaj kontraŭas la novan kaj pli puran veron por defendi supozitan bonon de tio kion ili kredas esti vero. Aliaj apartenas al pli malaltaj kategorioj; pro egoistaj konsideroj ili batalas kontraŭ la vero aŭ baras la vojon de progreso per spirita senviveco kaj inerteco.

### Persekutado de Profetoj

La grandaj religiaj Profetoj ĉiam estis malrespektataj kaj malakceptataj, en la tempo de Sia veno. Batoj de malamikoj faladis sur iliajn dorsojn kaj sur la dorsojn de iliaj fruaj sekvantoj kaj ili oferis siajn posedaĵojn kaj vivojn laŭ la vojo de Dio. Eĉ en nia tempo tio ĉi okazis. De la jaro 1844 multaj miloj da babanoj kaj bahaanoj en Persujo estis kruele mortigitaj pro sia kredo, kaj multaj aliaj suferis malliberigon, ekzilon, malriĉecon kaj malnobligon. La plej nova el la grandaj religioj estis "baptita per sango" pli abunde ol la antaŭaj, kaj martirado de la kredantoj daŭras ĝis la nuna tempo. Tian saman sorton havis la profetoj de scienco. Giordano Bruno estis bruligita kiel herezulo en la jaro 1600 pro tio, ke li interalie instruis, ke la tero sinmovas ĉirkaŭ la suno. Kelkan tempon poste la maljuna filozofo Galilejo devis sur la genuoj forĵuri tiun saman doktrinon por eviti similan sorton. Je pli malfrua tempo, oni furioze atakadis Darvinon kaj la pionirojn de la moderna geologio ĉar ili kuraĝis kontraŭi la instruon de la Sankta Skribo ke la mondo estis farita en ses tagoj kaj antaŭ malpli ol ses mil jaroj! Kontraŭstaro al nova scienca vero devenas, tamen, ne nur flanke de la Eklezio. Sciencaj ortodoksuloj estis ĉiam tiel same malamikaj al progreso kiel religiaj ortodoksuloj. Samtempaj tielnomataj scienculoj ridis kaj mokis Kolumbon, argumentante je sia propra kontenteco ke se eĉ la ŝipoj ja sukcesus malsupreniri ĝis la Antipodoj sur la kontraŭan flankon de la globo, estus por ili neeble reveni supren! Galvani, la pioniro de la elektra scienco, estis mokata de siaj kleraj kolegoj, kiuj nomis lin "dancmajstro de ranoj". Harvey, kiu malkovris la cirkuladon de sango, suferis pro tio ĉi herezo ridon kaj persekutadon de siaj samprofesiuloj kaj estis eksigita de sia katedro. Kiam Stephenson elpensis sian lokomotivon, tiutempaj eŭropaj matematikistoj, anstataŭ malfermi la okulojn kaj studi la faktojn, argumentis je sia propra kontenteco ke maŝino sur glataj reloj neniam povos tiri ŝarĝojn, ĉar la radoj nur rondglitos sur la loko kaj la vagonaro ne povus ekmoviĝi. Oni povas citi senfinajn similajn ekzemplojn, tiel el la malnova kiel el la nova histono, kaj eĉ el la nuntempo. D-ro Zamenhof, la elpensinto de Esperanto, devis batali por sia mirinda lingvo internacia kontraŭ tiuj samaj mokado, malestimo kaj malsaga kontraŭsento kiuj trafis al Kolumbo, Galvani, kaj Stephenson. Eĉ Esperanto, donita al la mondo antaŭ tiel mallonga tempo en la jaro 1887, havas siajn martirojn.



## Komenco de Interpaciĝo

En la daŭro de proksimume la lasta duonjarcento, tamen, la spirito de la tempo sanĝis, Nova Lumo de Vero ekbrilis kaj ŝajnis jam la disputadojn de la lasta jarcento strange nmodernaj. Kie nun estas la fanfaronaj materialistoj kaj la dogmanaj ateistoj kiuj, nur antaŭ nelonga tempo, minacis elpeli religion el la mondo? Kaj kie estas la predikistoj kiuj kun tia certeco elsendis tiujn kiuj ne akceptis iliajn dogmojn en la flamojn de infero kaj en la torturojn de kondamnitaj? Oni povas aŭdi ankoraŭ eĥon de ilia bruado, sed ilia tago rapide proksimiĝas al la fino kaj iliaj doktrinoj senkreditiĝas. Ni povas nun vidi ke la doktrinoj kiuj polemikis plej amare apartenis nek al la vera scienco nek al la vera religio. Kiu scienculo povus ankoraŭ aserti en la lumo de la modernaj psikaj esploroj ke "cerbo sekrecias penson kiel hepato sekrecias galon?" Aŭ ke kadukiĝo de korpo nepre devas okazigi kadukiĝon de la animo? Ni vidas nun ke por ke penso estu vere libera ĝi devas flugi en la regionojn de psikaj kaj spiritaĵaj fenomenoj kaj ne esti alligita nur al materiaĵaj aferoj. Ni konscias nun ke tio kion ni scias pri la naturo estas kvazaŭ guto en oceano kompare kun tio kio restas ankoraŭ por esti eltrovita. Pro tio ni facile konsentas eblecon de mirakloj, tamen ne kiel rompon de la naturleĝoj, sed kiel aperigon de funkciado de subtilaj fortoj kiuj estas ai ni ankoraŭ nekonataj, kiel elektro kaj X-radioj estis al niaj antaŭuloj. Aliflanke, kiu el niaj ĉefaj religiaj Instruistoj deklaras ankoraŭ ke por esti savita estas necese kredi ke la mondo estis kreita en ses tagoj, aŭ ke la priskribo de la plagoj kontraŭ la egiptoj laŭ la Libro Eliro estas laŭ litere vera, aŭ ke la suno senmoviĝis sur la ĉielo (t.e., ke la tero ĉesis turniĝi) por lasi Josuon postkuri la malamikon, aŭ ke se iu homo ne akceptas la kredon de Sankta Atanasio, "li sendube pereos por eterne?" Oni povas ankoraŭ formale ripeti tiajn kredojn, sed kiu akceptas ilin senkondiĉe en la litera senco? Ilia influo je homaj koroj kaj mensoj forpasis aŭ rapide forpasas. La religia mondo ŝuldas dankon al la scienculoj kiuj helpis disŝiri en ĉifonojn tiajn eluzitajn kredojn kaj dogmojn kaj lasis la veron libera por paŝi antaŭen. Sed la mondo de scienculoj ŝuldas ankoraŭ pli grandan dankon al la veraj sanktuloj kaj mistikuloj kiuj, dum bonaj ĉu malbonaj cirkonstancoj, restis fidelaj al la vivantaj veroj de la spirita sperto kaj montris al la nekredema mondo ke vivo estas io pli ol karno kaj la mondo nevidebla pli granda ol la videbla. Tiuj ĉi scienculoj kaj sanktuloj estas kvazaŭ montpintoj kiuj ricevis la unuajn radiojn de la leviĝanta suno kaj rebriligis ilin al la malpli supra mondo; sed nun la suno estas leviĝinta kaj ĝiaj radioj lumigas la mondon. En la instruoj de Bahá'u'lláh ni havas grandiozan revelacion de vero kiu kontentigas kaj korojn kaj mensojn, kaj en kiu la religio kaj la scienco estas en unueco.

## Serĉado Por la Vero

Kompleta harmonio kun la scienco estas videbla en la bahaaj instruoj koncerne la manierojn laŭ kiuj ni devas serĉi la veron. Serĉanto devas liberigi sin de ĉiaj antaŭjuĝoj por ke li povu sen malhelpoj serĉi la veron.

'Abdu'l-Bahá diras:

*Por serĉi la veron ni devas forlasi niajn antaŭjuĝojn, niajn proprajn malvastajn ideojn; la ĉefa afero estas akceptema kaj malferma menso. Se nia kaliko estas plena de memo, ne estas en ĝi loko por la akvo de vivo. La fakto ke ni imagas nin pravaj kaj ĉiujn aliajn malpravaj estas la plej granda barilo sur la vojo al unueco, kaj unueco estas esenca, se ni deziras atingi la Veron, ĉar la Vero mem estas unueco.*

*Neniu vero povas kontraŭi alian veron. Lumo estas bona el kia ajn lampo ĝi brilas! Rozo estas bela en kia ajn ĝardeno ĝi floras! Stelo havas tiun saman brilon ĉu ĝi brilas de la Oriento ĉu de la Okcidento! Estu liberaj de antaŭjuĝoj, kaj tiel vi amos la sunon de Vero en kiu ajn punkto de la horizonto ĝi leviĝus. Vi komprenos ke se la Dia Lumo de Vero brilis en Jesuo Kristo, ĝi brilis ankaŭ en Moseo kaj en Budho. Jen la signifo de la serĉado por vero.*

*Tio ankaŭ signifas ke ni devas esti pretaj forĵeti ĉion kion ni lernis antaŭe, ĉion kio povus malhelpi niajn paŝojn sur la vojo al la Vero; ni ne devas heziti, se estas necese, rekomenci nian tutan edukon. Ni ne devas permesi ke amo al iu religio aŭ al iu persono tiel blindigu niajn okulojn ke ni estus katenitaj per superstiĉoj. Kiam ni estos liberaj de ĉiuj tiuj ligoj, serĉantaj per liberigitaj mensoj, tiam ni kapablos atingi la celon.*

## Vera Agnostikismo

La bahaaj instruoj konsentas kun la scienco kaj filozofio en sia deklaro ke la esenca naturo de Dio estas entute ekster homa kompreneblo. Tiel same emfaze kiel Huxley kaj Spencer instruas ke la Granda Unua Kaŭzo estas neekkonebla, Bahá'u'lláh instruas ke "Dio ĉion komprenas; Li Mem ne povas esti komprenebla". Al la scio pri la Dia esenco "la vojo estas barita kaj la irejo estas netrapasebla", ĉar kiamaniere limita povas kompreni la Senliman; kiamaniere guto povas enteni oceanon aŭ polvo flirtanta en sunradio universon? Tamen la tuta universo estas elokventa atesto pri Dio. En ĉiu akvoguto estas kaŝitaj oceanoj de sencenhavo, ĉiu polvo entenas tutan universon da signifoj, etendante multe preter la kono de la plej kleraj scienculoj. Kemiistoj kaj fizikistoj esplorante la naturon de materio pasis de masoj al molekuloj, de molekuloj al atomoj, de atomoj al elektronoj kaj etero, sed ĉiupaŝe malfacileco de la esploroj pligrandiĝas ĝis fine eĉ la plej profunda intelekto ne

povas penetri pluen, kaj povas nur en silenta timo klini sin antaŭ la nekonata Senlimeco Kiu restas ĉiam ĉirkaŭvualita per neesplorable mistero.

*Floro en fendita muro,  
Mi ŝiras vin el la fendo,  
Tenas vin, tutan kun la radikoj, en mano,  
Floreto – sed se mi komprenus  
Kio vi estas, viaj radikoj kaj ĉio, kaj ĉio en ĉio,  
Mi scius kio estas homo kaj Dio.*

– Tennyson

Se floro en fendita muro, se eĉ unu atomo de materio prezentas misterojn kiujn plej profunda intelekto ne povas solvi, kiel do estus eble por homo kompreni la universon? Kiel li kuraĝus pretendi difini aŭ priskribi la Senfinan Kaŭzon de ĉio? Tiel do ĉiujn teologiajn konjektadojn pri la naturo de la esenco de Dio oni devas forĵeti kiel sensecajn kaj senenhavajn.

### Kono pri Dio

Sed kvankam la esenco ne estas konebla, elmontroj de ĝia malavereco estas ĉie videblaj. Kvankam la unua kaŭzo ne povas esti imagita, ĝiaj rezultoj frapas ĉiujn niajn perceptopovojn. Same kiel kono pri bildoj de pentristo donas al kompetentulo veran konon pri la artisto, ankaŭ kono pri la universo en ĉiuj ĝiaj rilatoj - kono de la naturo aŭ de la homa naturo, de aferoj videblaj kaj nevideblaj - estas kono de la verko de Dio, kaj donas al serĉantoj de la Dia Vero efektivan konon de Lia Gloro. "La ĉielo rakontas la gloron de Dio, kaj la farojn de Liaj manoj raportas la ĉiela firmaĵo. Tago al tago transdonas diron, kaj nokto al nokto faras sciigon." – Psalmaro XIX, 1-2.

### La Diaj Malkaŝantoj

Ĉio elmontras la malaverecon de Dio kun pli aŭ malpli granda klareco, kiel ĉiuj materialaj objektoj elmetitaj al la suno reflektas ĝian lumon en pli aŭ malpli forta grado. Amaso da fulgo reflektas malmulte, ŝtono reflektas pli multe, peco de kreto ankoraŭ pli multe, sed en neniu el tiuj ĉi reflektaj ni povas trovi la formon kaj koloron de la glora astro. Perfekta spegulo, tamen, reflektas precize la formon kaj koloron de la suno, tiel ke rigardante la spegulon ni kvazaŭ rigardas la sunon mem. En similaj manieroj ĉiuj aferoj rakontas al ni pri Dio. Ŝtono povas diri al ni iomete pri la Diaj atribuoj, floro povas diri pli multe, besto kun siaj mirindaj sentoj, instinktoj kaj movkapablo, ankoraŭ pli multe. En la plej malfortaj el niaj kunfratoj ni povas malkovri mirindajn ecojn kiuj rakontas pri la mirinda Kreinto. En poeto, sanktulo, geniulo, ni trovas ankoraŭ pli altan atenton, sed la grandaj profetoj kaj religifondintoj estas la perfektaj speguloj pere de kiuj la amo kaj saĝo de Dio estas reflektitaj al la cetero de la homaro. La speguloj de aliaj homoj estas malklarigitaj per makuloj kaj polvo de egoismo kaj antaŭjuĝoj, sed tiuj ĉi estas puraj kaj senmakulaj - entute sindonintaj al la Volo de Dio. Tiel Ili fariĝas la plej grandaj edukistoj de la homa gento. La Diaj instruoj kaj la Povo de la Sankta Spirito radiantaj pere de ili estis kaj estas kaŭzo de progreso de la homaro, ĉar Dio helpas homojn per aliaj homoj. Ĉiu homo kiu trovas sin pli alte en la vojo supren estas helpimedo por tiuj, kiuj estas pli malalte, kaj tiuj kiuj estas plej alte estas helpantoj de la tuta homaro. Estas kvazaŭ ĉiuj homoj estus kunligitaj per elastaj ŝnuroj. Se iu homo sin levas iomete super la ĝenerala nivelo de siaj kunuloj, la ŝnuro pli streĉiĝas. Liaj antaŭaj kamaradoj penas retiri lin, sed kun egala forto li tiras ilin supren. Ju pli alten li pasas, des pli li sentas la pezon de la tuta mondo kiu tiras lin returnen, kaj des pli li dependas de dia subteno, kiu atingas lin pere de tiuj kelkaj kiuj estas ankoraŭ pli alte super li. La plej altaj el ĉiuj estas la grandaj Profetoj kaj Savantoj, la Diaj "Malkaŝantoj" - tiuj homoj perfektaj, Kiuj estis, ĉiu en Sia tago, sen egalulo aŭ kamarado, kaj portis la ŝarĝon de la tuta mondo, estante subtenataj sole de Dio. "La ŝarĝo de niaj pekoj estis sur Li" - tio ĉi estis vera koncerne ĉiun el Ili. Ĉiu estis la "Vojo, la Vero kaj la Vivo" por Siaj sekvantoj. Ĉiu estis fluejo de la Dia malavereco fluanta al ĉiu koro kiu volas ĝin ricevi. Ĉiu havis Sian rolon en la granda dia piano pri altigo de la homaro.

### Kreado

Bahá'u'lláh instruas ke la universo estas sen komenco rilate al tempo. Ĝi estas konstanta emanaĵo el la Granda Unua Kaŭzo. La Kreinto ĉiam kreadis kaj ĉiam kreados. Mondo kaj sistemoj povas aperi kaj malaperi, sed la universo ĉiam ekzistas. Ĉiuj objektoj kiuj travivas kombiniĝon, devas en sia tempo fariĝi malkombiniĝo, sed la elementoj restas. Kreo de mondo, de lekanteto aŭ de homa korpo ne estas "elfari ion el nenio"; sed ĝi estas kunigo de elementoj kiuj antaŭe estis disigitaj, farante videbla ion kio antaŭe estis kaŝita. Iom post iom la elementoj ree disiĝas, la formo malaperos, sed efektive nenio estos perdita aŭ neniigita; ĉiam novaj kombinaĵoj kaj formoj aperados el la ruinoj de la malnovaj. Bahá'u'lláh konfirmas la opinion de scienculoj kiuj pretendas, ne ses milojn, sed milionojn kaj bilionojn da jaroj por la historio de la terkreo. La evolucia teorio ne neas la kreaĵon potencon. Ĝi nur penas priskribi la metodojn de ĝia manifestado; kaj la mirinda historio de la materiala

universo kiun astronomo, geologo, fizikisto kaj biologiisto grade malkovras antaŭ niaj okuloj estas, se oni ĝin ĝuste konsideras, multe pli kapabla elvoki plej profundajn respekton kaj adoron ol la kruda kaj neinteresa rakonto pri la kreo donita en la Hebrea Sankta Skribo. Tamen, la merito de la malnova rakonto en la Libro Genezo estis ke per kelkaj kuraĝaj simbolaj strekoj ĝi montris la esencan spiritan signifon de la historio, kiel majstra pentristo, per kelkaj movoj de peniko, esprimas ideojn kiujn tute malsukcesus alia pentristo plej penige atentiganta detalojn. Se la materiaj detaloj blindigas nin al la spirita signifo, estus por ni pli bone ne havi ilin; sed se ni unu fojon bone ekkomprenis la esencan signifon de la tuta skemo, tiam kono de la detaloj mirinde riĉigos kaj briligos nian koncepton kaj faros ĝin grandioza bildo anstataŭ nura skizo.

'Abdu'l-Bahá diras:

*Sciu ke unu el la plej profundaj spiritaĵoj estas ke la mondo de ekzisto, t.e. tiu ĉi senlima universo, havas nenan komencon. ...*

*... Sciu, ke ... neblas kreanto sen kreitaĵo, ke oni ne povas pripensi provizanton sen provizatoj ĉar ĉiuj diaj nomoj kaj atribuoj postulas la ekzistadon de estaĵoj. Se ni povas imagi tempon en kiu ekzistis neniam estaĵoj, tiu imagaĵo estus neado de la Dieco de Dio. Plie, absoluta neekzisto ne povus fariĝi ekzisto. Se la estaĵoj estus absolute neekzistantaj, la ekzisto ne povus ekesti. Tial, ĉar la esenco de Unueco, tio estas la ekzisto de Dio, estas ĉiama kaj eterna - kaj havas nek komencon nek finon estas certe, ke tiu ĉi mondo de la ekzisto. ... ankaŭ havas nek komencon nek finon ... povas okazi ke iu parto de la universo, iu el la globoj, ekzemple, ekekestas, aŭ estas dispartigita, sed la aliaj senfinaj globoj ankoraŭ ekzistas. ... Ĉar ĉiu globo havas komencon, ĝi devas nepre havi finon, ĉar ĉiu kombinaĵo, kolektiva aŭ unuopa, devas nepre esti malkombinita. La sola diferenco estas ke kelkaj estas malkombinataj rapide, kaj aliaj malpli rapide, sed estas neeble ke objekto kombinita estu neniam malkombinita. – Some Answered Questions, pp. 209-210 (Demandoj kaj Respondoj)*

## Deveno de Homo

Bahá'u'lláh konfirmas ankaŭ la aserton de biologoj laŭ kiuj la historio de la korpo de homo atingas en la evoluado de la speco daŭron de milionoj da jaroj. La homa korpo, komenciĝanta per tre simpla, laŭvide sensignifa formo, evoluis gradon post grado, en daŭro de nekalkuleblaj generacioj, fariĝante ĉiam pli kaj pli komplikita, ĉiam pli kaj pli bone organizita ĝis fariĝis la homo de la hodiaŭa tago. Ĉiu individua homa korpo evoluas per tia serio de stadioj, de eta ronda gelaten-simila formaĵo al plene evoluita homo. Se tio estas vera koncerne individuojn, kion neniu neas, kial do ni konsiderus ofendon kontraŭ la homa digno konfesi pri simila evoluado de la speco? Tio estas tute alia afero ol aserti ke homo devenas de simio. La homa embrio povus similigi iatempe fiŝon kun blankoj kaj vosto, sed ĝi ne estas fiŝo. Ĝi estas embrio de homo. Tiel same la homa speco<sup>1</sup> povus en diversaj stadioj de sia longa evoluado similigi eksternice diversajn specojn de pli malaltaj bestoj, tamen ĝi jam estis homa speco, posedanta en si la misteran povon evolui en la homon kiam ni konas hodiaŭ, eĉ plie, la povon evolui, espereble, en ion ankoraŭ pli altan estontece.

'Abdu'l-Bahá diras:

*... estas klare ke nia terglobo ne ekzistis subite en sia nuna formo, sed ... pasadis grade tra diversaj fazoj ĝis ĝi estis ornamita per ĉiuj siaj nunaj perfektecoj. ...*

*... la homo, en la komenco de sia ekzisto kaj en la utero de la tero, kiel embrio en la utero de la patrino, grade kreskis kaj evoluis, kaj pasadis de unu formo al alia ... ĝis li aperis kun tiuj ĉi beleco kaj perfekteco, kun tiuj ĉi fortoj kaj povo. Estas certe ke en la komenco li ne havis tiujn ĉi carmon, graciecon kaj belan aspekton, kaj ke li nur laŭgrade atingis tiun ĉi nunan modelon, tiun ĉi formon, tiun ĉi belecon, kaj tiun ĉi graciecon. ...*

*... la ekzisto de la homo sur la tero, de la komenco ĝis kiam li atingis tiujn ĉi staton, formon, kaj kondiĉon, daŭras kompreneble longan tempon. ... Sed de la komenco de sia ekzisto la homo estis aparta speco ... la fakto ke postsignoj de malaperintaj organoj ekzistas ankoraŭ (en la homa korpo), ne estas pruvo de senŝanĝeco kaj neaparteco de la speco. Eventuale ĝi pruvas ke la konstruo, kaj formo, kaj organoj de la homo progresis. La homo ĉiam estis aparta speco, homo, ne besto. – Some Answered Questions, pp. 211, 212, 213, 214 (Demandoj kaj Respondoj)*

Pri la rakonto pri Adam kaj Eva Li diras:

<sup>1</sup> La vorto "speco" estas uzita ĉi tie por klarigi la distingon kiu ĉiam ekzistis inter homoj kaj bestoj, malgraŭ eksteraj aspektoj. Oni ne donu al tiu vorto la nuntempan specialan biologian sencon.

*Se ni akceptas tiun ĉi rakonton en ĝia evidenta signifo, konforme al la interpretmaniero de popoloj, ĝi estas vere eksterordinara. La prudento ne povas ĝin akcepti, konfirmi, nek imagi; ĉar tiaj cirkonstancoj, tiaj detaloj, tiaj paroloj kaj riproĉoj montras multan mankon de inteligenteco de normala homo, kiom malpli de la Dia Estaĵo, de tiu Diaĵo kiu kreis tiun ĉi senfinan universon en plej perfekta formo, kaj ĝiajn sennombrajn loĝantojn kun absolutaj sistemo, forto, kaj perfekteco. ...*

*Tial la rakonto pri Adam kaj Eva kiuj manĝis frukton de la arbo, kaj pri ilia ekzilo el la Paradizo, devas esti akceptita simple kiel simbolo. Ĝi enhavas diajn misterojn kaj universalajn signifojn, kaj povas esti klarigita en mirindaj manieroj. - Some Answered Questions, p. 140 (Demandoj kaj Respondoj).*

## Korpo kaj Animo

La bahaaj instruoj koncerne korpon kaj animon, kaj la vivon post morto, plene harmonias kun la rezultoj de psikaj esploroj. Ili instruas, kiel ni vidis, ke morto estas nur nova naskiĝo - nur eliĝo el la malliberejo de la korpo en pli vastan vivon, kaj ke progresado en tiu transa vivo estas senlima.

Oni grade akiris grandan nombron da sciencaj pruvoj kiuj laŭ opinio de senpartiaj sed severe kritikaj esplorantoj plene sufiĉas por starigi ekster ĉia dubo la fakton de la postmorta vivo - de daŭra vivo kaj aktiveco de koscia "animo" post la morto de la materia korpo, kiel F. W. Myers diras en Human Personality (Homa Personeco), verko kiu resumas multajn studojn de la Societo de Psika Esplorado:

*Observado, eksperimentoj, kaj deduktoj, alkondukis multajn esplorantojn, el kiuj mi estas unu, al la kredo je senpera aŭ telepatia interkomunikiĝado, ne nur inter mensoj de homoj estantaj ankoraŭ sur la tero, sed ankaŭ inter mensoj aŭ spiritoj estantaj ankoraŭ sur la tero kaj spiritoj elkorpiĝintaj. Tia malkovro malfermas ankaŭ la pordon al revelacio. ...*

*Ni montris ke meze de multaj trompoj kaj memtrompoj, mistifikoj kaj iluzioj, veraj manifestadoj atingas nin preter la tombo. ...*

*Pere de malkovroj kaj malkaŝoj estas dume konstatitaj iuj tezoj koncerne tiujn elkorpiĝintajn spiritojn kiujn ni havis la eblon renkonti. Unue kaj cefe, almenaŭ mi vidas bazon por kredi ke ilia stato estas stato de senfina evolado en saĝeco kaj amo. Iliaj surteraj amoj persistas, kaj antaŭ ĉio, persistas tiuj plej altaj amoj kiuj trovas sian esprimon en adorado kaj preĝado. ... Malbono ŝajnas al ili ne tiom terura kiom sklava afero. Ĝi ne estas enkorpiĝita en iu forta Potenculo; ĝi formas pli ĝuste ian izolitan frenezon de kiu pli altaj spiritoj penas liberigi la persekutatajn animojn. Oni bezonas tie nenian fajropunon; puno de homo kaj lia rekompenco estas memkonscio; memkonscio kaj proksimeco aŭ aparteco de animoj-kunuloj. Ĉar en tiu mondo amo estas vere mem-konservo; rilatoj inter Sanktuloj ne nur ornamas sed konstruas la Ĉiamdaŭran Vivon. Kaj el la leĝoj de telepatio sekvas ankaŭ ke tiu rilatado efikas je ni ĝuste nun. Eĉ nun amo de elkorpiĝintaj animoj donas respondon al niaj alvokoj. Eĉ nun nia ama memoro – amo mem estas preĝo – subtenas kaj fortigas tiujn liberiĝintajn spiritojn en ilia vojo supren.*

La grado de harmonio inter tiu ĉi opinio, bazita sur zorgema scienca esplorado, kaj la ideo de la bahaaj instruoj, estas vere rimarkindaj.

## Unueco de la Homaro

"Vi ĉiuj estas fruktoj de unu arbo, folioj de unu branĉo, folioj de unu ĝardeno." Tio estas unu el la plej karakterizaj diroj de Bahá'u'lláh, kaj ĝin similas alia: "Gloro estas ne al tiu kiu amas sian landon, sed gloro estas al tiu kiu amas la homaron." Unueco – unueco de la homaro, kaj de ĉiuj kreitaĵoj en Dio – tio estas la ĉefa ideo de Liaj instruoj. Tio ĉi denove vidigas harmonie inter la vera religio kaj la vera scienco. Kun ĉiu antaŭenpaŝo de la scienco la unueco de la universo kaj reciproka dependeco de ĝiaj partoj fariĝas pli kaj pli evidenta. La kampo de astronomo estas nedisigeble ligita kun tiu de fizikisto, la kampo de fizikisto kun tiu de kemiisto, la kampo de kemiisto kun tiu de biologo, de biologo kun tiu de psikologo, k.t.p. Ĉiu nova malkovro en unu esplorkampo ĵetas novan lumon sur la aliajn kampojn. Kiel la fizika scienco elmontris ke ĉiu ero de la materio en la universo altiras kaj influas ĉiujn aliajn erojn, kiel ajn malgrandajn kaj malproksimajn, tiel same la psika scienco trovas ke ĉiu animo en la universo efikas kaj influas ĉiujn aliajn animojn. Princo Kropotkin, en sia libro pri Mutual Aid (Reciproka Helpe), klare montras ke eĉ inter la malsuperaj bestoj, reciproka helpe estas nepre necesa por certigi daŭrecon de la vivo, kaj ke koncerne la homojn, progreso de la civilizacio dependas de pluganta anstataŭo de reciproka helpe kontraŭ reciproka malamikeco. "Iu por ĉiuj kaj ĉiuj por iu", jen estas la sola principo per kiu socio povas vere prosperi.

## La Epoko de Unueco

Ĉiuj signoj de la tempo indikas ke ni trovas nin en la mateniĝo de nova epoko en la historio de la homaro. Ĝis non la juna aglo de la homaro alkroĉiĝis al la malnova nesto sur solida roko de egoismo kaj materialismo. La penoj por uzi la flugilojn estis timemaj kaj necertaj. Ĝi sopiris senripoze ion ankoraŭ neatingitan. Pli kaj pli ĝi malpaciencis en la limigo de la malnovaj dogmoj kaj ortodoksecoj. Sed nun la epoko de limigo jam finiĝas, kaj ĝi povas ekŝvebi per la flugiloj de kredo kaj intelekto en la superajn regionojn de spirita amo kaj vero. Ĝi ne estos plu ligita al la tero kiel ĝi estis antaŭ ol la flugiloj fortikiĝis, sed ĝi flugos laŭvole en la regionojn de vasta horizonto kaj de glora libereco. Unu afero, tamen, estas necesa, por ke ĝia flugo esto certa kaj firma. La flugiloj devas esti ne nur fortaj, sed ili devas funkci en perfekta harmonio kaj kunordo. 'Abdu'l-Bahá diras: "Ĝi ne povas flugi nur per unu flugilo. Se ĝi penus flugi nur per la flugilo de religio ĝi falus en marĉon de superstiĉoj, kaj se ĝi penus flugi nur per la flugilo de scienco ĝi pereus en malserena dronejo de materialismo."

Perfekta harmonio inter la religio kaj la scienco estas kondiĉo esenca de la pli alta vivo de la homaro. Kiam tio estas atingita, kaj infanoj estos instruataj ne sole en sciencaj objektoj kaj artoj, sed egale same en amo al la tuta homa gento kaj en radianta akceptemo al la Volo de Dio kiel ĝi estas malkaŝita en la evolua progreso kaj en la instruoj de la Profetoj, tiam kaj nur tiam, venos la Regno de Dio kaj Lia Volo plenumiĝu kiel en la Ĉielo tiel ankaŭsur la tero; tiam kaj nur tiam la Plej Sankta Paco elverŝos siajn benojn tra la mondo.

"Kiam religio", diras 'Abdu'l-Bahá, "senigita de siaj superstiĉoj, tradicioj kaj sensencaj dogmoj, konformiĝos kun scienco, tiam en la mondo ekzistos granda, unuiganta kaj puriganta forto, kiu forviŝos ĉiujn militojn, malpacojn, malkonsentojn kaj konfliktojn, kaj tiam la homaro estos unuigita en la potenco de la amo de Dio."

## ĈAPITRO XIII: PROFETAĴOJ PLENUMITAJ DE LA BAHAA RELIGIO

*Koncerne la Malkaŝanton de la Plej Sankta Nomo (Bahá'u'lláh): Li estas Tiu, Kiun Dio promesis en ĉiuj Siaj Libro kaj Skriboj, kiel la Biblio, la Evangelio kaj la Korano. – 'Abdu'l-Bahá*

### Interpretado de Profetaĵoj

Interpretado de profetaĵoj estas treege malfacila, kaj pri neniu alia temo opinioj de instruituloj diferencas pli ekstreme. Tio ĉi ne estu surprize, ĉar, laŭ la malkaŝitaj skribaĵoj mem, multaj profetaĵoj estas donitaj en tia formo ke ili ne povas esti plene komprenitaj antaŭ sia plenumiĝo, kaj eĉ tiam, nur de tiuj kiuj havas purajn korojn kaj estas liberaj de antaŭjuĝoj. Tiel en la fino de la vizio de Daniel estis dirite al la profeto:

*Kaj vi, ho Daniel, kaŝu la vortojn kaj sigelu la libron ĝis la fina tempo; multaj ĝin tralegos kaj multiĝos la scio. ... Mi aŭdis, sed mi ne komprenis; kaj mi diris: Ho mia sinjoro, kio estos post tio? Kaj li respondis: Iru, Daniel, ĉar tio estas kaŝita kaj sigelita ĝis la fina tempo. - Daniel XII: 4-9.*

Se Dio sigelis la profetaĵojn ĝis la difinita tempo, kaj ne malkaŝis ilian signifon eĉ al la profetoj kiuj ilin anoncis, ni devas atendi ke nur elektita Disendito povos rompi la sigelojn kaj malkovri la signifojn kaŝitajn en la skatolo de la profetaj paraboloj. Rememoro pri la historio de profetaĵoj kaj pri dia misinterpretado en la antaŭaj eraoj, kunigita kun solenaj avertoj de la profetoj mem, devas fari nin tre singardemaj por akcepti la konjekton de teologoj pri la vera signifo de tiuj ĉi paroloj kaj pri la maniero de ilia plenumiĝo. Aliflanke, kiam aperas iu kiu pretendas esti plenumanto de la profetaĵoj, estas grave ke ni esploru lian pretendon per malfermita, senantaŭjuĝa menso. Se li estas malhonestulo, la trompo baldaŭ evidentiĝos kaj nenia malbono estos kaŭzita, sed ve al tiuj kiuj senatente forpuŝas Disenditon de sia pordo ĉar Li venas en neatendita formo aŭ tempo.

La vivo kaj diraĵoj de Bahá'u'lláh pruvas ke Li estas Tiu Kiun Dio promesis ĉiuj sanktaj libroj, Kiu havas la povon rompi la sigelon de la profetaĵoj kaj verŝi el ili la "Sigelitan plejbonan vinon" de la diaj misteroj. Ni do rapidu aŭskulti Liajn klarigojn kaj reesplori en dia lumo la konatajn sed ofte misterajn vortojn eldiritajn de la malnovtempaj Profetoj.

### La Venio de la Sinjoro

La "Venio de la Sinjoro" en la "lastaj tagoj" estas la "malproksima dia okazo" al kiu ĉiuj Profetoj direktas Siajn rigardojn, pri kiu ili kantas siajn plej glorajn kantojn. Kion do signifas la "Venio de la Sinjoro"? Sendube Dio estas en ĉiuj tempoj kun Siaj kreitaĵoj, en ĉiuj, tra ĉiuj kaj super ĉiuj. "Li estas pli senpera ol spiro, pli proksima ol manoj kaj piedoj." Jes, sed homoj ne povas vidi aŭ aŭdi Dion memekzistan kaj transcendan, ne povas konsciigi al si Lian Apudeston, ĝis kiam Li malkaŝas Sin Mem en videbla formo kaj parolas al ili en homa lingvo. Por malkaŝi Siajn pli altajn atribuojn, Dio ĉiam uzas peranton. Ĉiu el la Profetoj estis peranto pere de kiu Dio vizitis kaj parolis al Sia popolo. Jesuo estis tia peranto, kaj kristanoj prave konsideris Lian aperon kiel venon de Dio. En Li ili vidis la Vizaĝon de Dio kaj per Liaj lipoj ili aŭdis la Voĉon de Dio. Bahá'u'lláh diras ke la "Venio" de la Sinjoro de Homamasoj, de la Eterna Patro, Kreinto kaj Reaĉetanto de la mondo, kiu, laŭ ĉiuj Profetoj, okazos "en la fina tempo", signifas Lian aperon en homa templo, kiel Li aperigis Sin en la templo de Jesuo el Nazaret, sed ĉi-foje kun pli plena kaj pli glora revelacio, por kiu prepari homajn korojn kaj mensojn venis Jesuo kaj ĉiuj antaŭaj profetoj.

### Profetaĵoj pri Kristo

La judoj malakceptis Kriston, ĉar ili malsukcesis kompreni la signifon de la profetaĵoj pri la regado de Mesio. 'Abdu'l-Bahá diras:

*La judoj ankoraŭ atendas aperon de Mesio, kaj tage kaj nokte preĝas al Dio ke Li rapidigu Lian alvenon. Kiam Jesuo venis ili akuzis kaj mortigis Lin, dirante: "Li ne estas Tiu Kiun ni atendas. Ja, kiam Mesio venos, signoj kaj mirakloj atestos ke Li vere estas Kristo. Mesio aperos el nekonata urbo. Li sidos sur la trono de David, Li venos kun ŝtala glavo, kaj regos per fera sceptro. Li plenumos la Leĝojn de la Profetoj. Li konkeros la Orienton kaj la Okcidenton, kaj glorigos Sian elektitan popolon, la judojn. Li starigos regadon de paco dum kiu eĉ bestoj ĉesos malamiki kun homoj. Ĉar ja, lupoj kaj ŝafido trinkos el la sama fonto ... kaj ĉiuj Diaj kreaĵoj estos en paco ..."*

*Tiel la judoj pensis kaj parolis, ĉar ili ne komprenis la Skribaĵojn nek la glorindan veron, kiun ili entenas. La literan tekston ili konis parkere, sed el la vivodona Spirito ili ne komprenis eĉ unu vorton.*

*Aŭskultu, kaj mi montras al vi la signifon de tio ĉi: Kvankam Kristo venis el Nazaret, kiu estis loko konata, Li venis ankaŭ el la Ĉielo. Lia korpo estis naskita de Maria, sed Lia Spirito venis el la Ĉielo. La glavo kiun Li kunportis estis la glavo de Lia lango, per kiu Li dividis bonon de malbono, veran de malvera, fidelan de malfidela, kaj lumon de mallumo. Lia vorto estis vere akra glavo! La trono sur kiu Li sidis estas la Eterna Trono de kiu Kristo regas por ĉiam - trono ĉiela, ne tera, ĉar teraj aferoj forpasas sed la ĉielaj aferoj ne forpasas. Li reinterpretis kaj klarigis la Leĝojn de Moseo kaj plenumis la Leĝojn de la Profetoj. Lia Vorto konkeris la Orienton kaj la Okcidenton. Lia Regno estas eterna. Li glorigis tiujn judojn kiuj konis Lin. Ili estis viroj kaj virinoj de malalta deveno, sed kontakto kun Li faris ilin grandaj kaj donis al ili ĉiamdaŭran dignon. La kune vivantaj bestoj figuris diversajn sektajn kaj naciajn, kiuj, antaŭe militinte, nun vivas en amo kaj amikeco, kune trinkante la Akvon de Vivo el la Eterna Fonto de Kristo.*

Plejmulte da kristanoj akceptas tiun ĉi interpreton de la mesiaj profetaĵoj koncerne Kriston; sed rilate al similaj profetaĵoj pri la Mesio de la lasta tago, multaj el ili akceptas la sintenon de la judoj, atendante miraklan aperaĵon en la materiala medio kiu precize plenumos la ĝustan literon de la profetaĵoj.

### Profetaĵoj pri Báb kaj Bahá'u'lláh

Laŭ la bahaa interpretado, la profetaĵoj kiuj parolas pri la "fina tempo", pri "lastaj tagoj", pri la veno de la "Sinjoro de la homamasoj", pri la "eterna Patro", koncernas speciale, ne la alvenon de Jesuo Kristo, sed tiun de Bahá'u'lláh. Ni prenu, ekzemple, la fame konatan profetaĵon en la Libro de Jesaja:

*Popolo, kiu iris en mallumo, ekvidis grandan lumon; super homoj, sidantaj en lando de morta ombro, ekbrilis lumo. ... Ĉar la jugon de ilia ŝarĝo, la kanon de ilia ŝultro, kaj la bastonon de ilia premanto Vi rompīs, kiel en la tempo de Midjan. Ĉar ĉiu armaĵo de tiuj, kiuj sin brue armis, kaj la vestoj, kiuj ruliĝis en sango, estos forbruligitaj, ekstermitaj per fajro. Ĉar infano naskiĝis al ni, filo estas donita al ni, kaj la regado estos sur lia ŝultro, kaj lia nomo estos: Mirinda, Konsilisto, Potenculo, Patro de Eterneco, Princo de Paco; por pligrandigi la regadon kaj por paco senfina sur la trono de David kaj en lia regno, por fortikigi ĝin kaj fortigi ĝin per justeco kaj vero de nun ĝis eterne. La fervoro de la Eternulo Cebaot tion faros." – Jesaja IX: 2-7*

Tio ĉi estas unu el la profetaĵoj kiun oni ofte konsideris kiel rilatantan al Kristo, kaj grandparte ĝi tute prave povus esti prezentita en tia senco, sed iom da esploro montras kiom pli plene kaj pli ĝuste ĝi rilatas al Bahá'u'lláh. Kristo estis, efektive, Lumportanto kaj Savanto, sed dum preskaŭ du mil jaroj post Lia alveno plimulto de la popoloj de la tero daŭrigis sian vojon en mallumo, kaj la infanoj de Izraelo kaj multaj aliaj infanoj de Dio ĝemadis plu sub vergoj de tiranoj. Aliflanke, dum kelkaj unuaj jardekoj de la bahaa epoko, la lumo de vero lumigis la Orienton kaj la Okcidenton, la evangelio de patreco de Dio kaj de frateco de la homoj estis portita en ĉiujn landojn de la mondo, la grandaj militamaj aŭtokracioj estis renversitaj, kaj naskiĝis konscio pri mondunueco kiu donas esperon de rapida helpo al ĉiuj persekutataj kaj premataj nacioj de la mondo. La granda milito kiu de 1914 ĝis 1918 konvulsigis la mondon, kun sia senprecedenta uzado de pafiloj, likva fajro, bruigaj bomboj kaj brulaĵo por maŝinoj, estis vere "bruligo kaj ekstermo per fajro"<sup>1</sup>. Bahá'u'lláh, vaste pritraktanta en Siaj Skribaĵoj la problemojn de regado kaj administrado, kaj montrante kiel oni povas solvi ilin plej bone, "prenis la regadon sur Sian ŝultron" tiel kiel Kristo neniam faris. Koncerne la titolojn "Patro de Eterneco", "Princo de Paco", Bahá'u'lláh ofte parolas pri Si Mem kiel la malkaŝanto de la Patro, pri Kiu parolis Kristo kaj Jesaja, dum Kristo ĉiam parolis pri Si Mem kiel la Filo. Bahá'u'lláh deklaras ke Lia misio estas starigi pacon sur tero, dum Kristo diris: "Mi ne venis, por alporti pacon, sed glavon", kaj fakte dum la tuta kristana epoko okazadis multegaj militoj kaj sektaj malpacoj.

### La Gloro de Dio

La titolo "Bahá'u'lláh" signifas arabe "Gloro de Dio" kaj tiu ĉi titolo estas ofte uzata de la hebreaĵ profetoj por la Promesito Kiu aperos en la lastaj tagoj. Tiel en la 40a ĉapitro de Jesaja ni legas:

*Konsolu, konsolu Mian popolon, diras via Dio. Parolu al la koro de Jerusalemo, kaj voku al ĝi, ke finiĝis la tempo de ĝia batalado, ke pardonita estas ĝia kulpo, ke ĝi ricevis el la mano de la Eternulo duoble pro ĉiuj siaj pekoj. Sonas voĉo de kianto: Pretiĝu en la dezerto la vojon de la Eternulo, rektigu en la stepo irejon por nia Dio. Ĉiu valo leviĝu, kaj ĉiu monto kaj monteto malaltiĝu, kaj la malebenaĵo farigu ebenaĵo, kaj la montaro*

<sup>1</sup> La Dua Mondmilito plie pruvis la plenumon de tiu ĉi profetaĵo, kiu finiĝis per uzo de la atoma bombo.

*fariĝu valo. Kaj aperos la Majesto (Gloro) de Dio, kaj ĉiu karno kune vidos, ke la buŝo de la Eternulo parolis.*  
– Jesaja XI: 1-5

Kiel la antaŭa profetaĵo, ankaŭ tiu ĉi estis parte plenumita per la alveno de Kristo kaj de Lia antaŭinto, Johano la Baptisto; sed nur parte, ĉar en la tagoj de Kristo la tempo de batalado ne finiĝis ankoraŭ por Jerusalemo; multaj jarcentoj de maldolĉaj provoj kaj humiligoj estis ankoraŭ antaŭ ĝi. Sed en la aperotempo de Báb kaj Bahá'u'lláh, komencas aperi pli kompleta plenumo, ĉar jam nun pli lumaj tagoj ekbrilis por Jerusalemo, kaj espero pri ĝia paca kaj glora estonteco nun ŝajnas esti firme bazita.

Aliaj profetaĵoj parolas pri la Elaĉetonto de Izrael, la Gloro de la Eternulo, kiel pri Tiu Kiu venas en la Sanktan Landon el la Oriento, de la sunleviĝo. Bahá'u'lláh aperis en Persujo, kiu estas oriente de Palestino, al la sunleviĝo, kaj Li venis en la Sanktan Landon, kie Li pasigis la lastajn dudek kvar jarojn de Sia vivo. Se Li venus tien kiel homo libera, oni povus diri ke tio ĉi estas ruzo de trompisto celanta alkonformiĝi al la profetaĵoj; sed Li venis kiel ekzilito kaj malliberulo. Li estis sendita tien de la ŝaho de Persujo kaj de la turka sultano, kiujn oni ja ne povis suspekti ke ili intencis liveri argumentojn por aprobi la pretendon de Bahá'u'lláh ke Li estas la "Gloro de Dio" Kies alvenon antaŭdiris la Profetoj.

## La Branĉo

En la profetaĵoj de Jesaja, Jeremia, Jeĥezkel kaj Zeĥarja estas pluraj aludoj pri homo nomata la Branĉo. Tiuj ĉi estis ofte akceptitaj de kristanoj koncerne Kriston, sed bahaanoj konsideras ilin rilatantaj speciale al Bahá'u'lláh.

La plej longa biblia profetaĵo pri la Branco troviĝas en la 11a ĉapitro de Jesaja:

*Eliros markoto el la trunko de Jiŝaj, kaj branĉo elkreskos el ĝiaj radikoj. Kaj estos sur li spirito de la Eternulo, spirito de saĝo kaj prudento, spirito de konsilo kaj forto, spirito de sciado kaj de timo antaŭ la Eternulo. ... Vero estos la zono de lia lumo, kaj fideleco la zono de liaj koksoj. Kaj loĝos lupoj kun safido, kaj leopardo kun kaprido; kaj bovido kaj leonido kaj grasigita bruto estos kune kaj malgranda knabo ilin kondukos. ... Oni ne malbonagos kaj ne difektos sur Mia tuta sankta monto, ĉar la tero estos tiel plena de konado de la Eternulo, kiel la akvo plenigas la maron. ... En tiu tempo la Sinjoro denove etendos Sian manon, por akiri la restaĵojn de Sia popolo, kiu restis de Asirio kaj de Egiptujo kaj de Patros kaj de Etiopujo kaj de Elam kaj de Sinar kaj de Ĥamat kaj de la insuloj de la maro. Kaj Li levos standardon inter la nacioj kaj kolektos la dispelitojn de Izrael, kaj la disjetitojn de Jehuda Li kolektos de la kvar finoj de la tero. – Jesaja XI: 1-12*

'Abdu'l-Bahá rimarkas pri tiu ĉi kaj aliaj profetaĵoj pri la Branĉo:

*Unu el la grandaj eventoj kiu okazos en la tago de aperigo de tiu senkompara Branĉo, estos la hisado de la Standardo de Dio inter ĉiuj nacioj; kio signifas ke ĉiuj nacioj kaj gentoj kunvenos en la ombro de la Dia Flago, kiu estos ĝuste la Grandioza Branĉo mem, kaj ili fariĝos unu nacio. La antagonismoj de kredoj kaj religioj, la malamikeco de rasoj kaj nacioj, kaj la patriotaj diferencoj, estos elradikigitaj el inter ili. Ĉiuj fariĝos unu en la religio, unu en la kredo, unu en la raso, ili fariĝos unu popolo, kaj loĝos en unu patrujo, kiu estas la terglobo. Universala paco kaj akordo estiĝos inter ĉiuj nacioj, kaj tiu senkompara Branĉo kunigos la tutan Izraeleon: tio signifas ke en tiu ĉi ciklo la juda popolo disjetita en la Oriento kaj Okcidento, Sudo kaj Nordo, estos rekunigita en la Sankta Lando.*

*Nun rigardu: tiuj ĉi aferoj ne okazis en la kristana ciklo, ĉar la nacioj ne kunvenis sub Tiu Standardo kiu estas la Dia Branĉo. Sed en tiu ĉi ciklo de la Sinjoro de Homamasoj ĉiuj nacioj kaj popoloj venos en la ombron de tiu ĉi Flago. Simile, Izraelo, disjetita tra la tuta mondo, ne estis rekunigita en la Sankta Lando en la kristana ciklo; sed en la komenco de la ciklo de Bahá'u'lláh tiu ĉi dia promeso, klare donita en ĉiuj Libroj de la Profetoj, komencis realiĝi. Vi povas vidi ke el ĉiuj partoj de la mondo aroj de judoj venas nun en la Sanktan Landon; ili ekloĝas en vilaĝoj kaj kamparoj kiujn ili faras siaj propraj, kaj tagon post tago ilia nombro tiel pligrandiĝas, ke la tuta Palestino fariĝas ilia hejmo. – Some Answered Questions, pp. 75-76 (Demandoj kaj Respondoj)*

## La Tago de Dio

La vorto "Tago" en tiaj esprimoj kiaj "Tago de Dio" kaj "Lasta Tago" estis interpretata kiel signifanta "Disistemo". Ĉiu el la grandaj religifondintoj havas Sian "Tagon". Ĉiu estas kvazaŭ suno. Lia instruado havas sian mateniĝon, poste Ĝia vero ĉiam pli kaj pli lumigas homajn korojn kaj mensojn ĝis Ĝi atingas la zeniton de sia influo. Post tiam Ĝi farigas nekonata, misprezentata kaj ŝanĝata, kaj mallumo ekregas la teron, ĝis kiam leviĝos la suno de nova tago. La tago de la Plejalta Malkaŝanto de Dio estas la Lasta Tago, ĉar tio ĉi estas tago kiu neniam finiĝos, kaj neniam estos anstataŭita per nokto. Lia suno neniam subiros, sed lumigos la animojn de homoj kaj en tiu ĉi kaj en la venonta mondo. Efektive neniu el la spiritalaj



sunoj iam subiras. La sunoj de Moseo, de Kristo, de Mahometo, kaj de ĉiuj aliaj Profetoj daŭre lumas sur la ĉielo kun sendifekta brilego. Sed terdevenaj nuboj kaŝis ilian lumon de la popoloj de la tero. La Plejalta Suno de Bahá'u'lláh dispelos fine tiujn mallumajn nubojn, tiel ke la popoloj de ĉiuj religioj ĝuos la lumon de ĉiuj Profetoj, kaj laŭkonforme adoras unu solan Dion Kies lumon ĉiuj Profetoj spegulis.

### La Tago de Juĝo

Kristo multe parolis en paraboloj pri granda Tago de Jugo, kiam "la Filo de Homo venos en la gloro de sia Patro ... kaj ... redonos al ĉiu laŭ liaj faroj." (Mat. XIV: 27). Li komparas tiun Tagon kun tempo de rikolto, kiam lolo estos bruligita kaj tritiko kolektita en grenejo:

*... tiel estos ĉe la fino de la mondaĝo (la elplenumo de la epoko). La Filo de Homo elsendos siajn angelojn, kaj ili kolektos el lia regno ĉiun falpuŝilon kaj ĉiujn, kiuj faras maljustecon, kaj ĵetos ilin en la fornoro de fajro; tie estos plorado kaj grincado de dentoj. Tiam la justuloj brilos kiel suno en la regno de sia Patro. – Mat. XIII: 40-43*

La esprimo "fino de la mondo" uzita en la Aŭtoritata Traduko de la Biblio<sup>1</sup> en tiu ĉi kaj en similaj lokoj igis multajn supozoj ke kiam la Tago de Juĝo venos, la tero estos subite detruita, sed tio ĉi estas evidenta eraro. La ĝusta traduko de tiu ĉi esprimo ŝajnas esti "plenumiĝo aŭ fino de la mondaĝo." Kristo instruas ke la Regno de la Patro estos starigita sur la tero, kiel en la ĉielo. Li instruas nin preĝi: "Venu Via Regno, plenumiĝu Via Volo, kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero."

En la parabolo pri Vinberejo, kiam la Patro, la Sinjoro de la Vinberejo, venas por neniigi la malbonajn vinberistojn, Li ne neniigas ankaŭ la vinberejon (la mondon), sed lasas ĝin al la aliaj vinberistoj, kiuj havigos al Li la fruktojn en la ĝusta tempo. La tero ne estas neniigota, sed renovigota kaj renaskota. Aliaj fojonoj Kristo parolis pri tiu tago kiel "renaskiĝo kiam la Filo de homo sidos en la trono de sia gloro." S-ta Petro parolas pri ĝi kiel pri "tempo de refresiĝo", "tempo de restarigo de ĉio pri kio Dio parolis per la buŝoj de ĉiuj siaj sanktaj profetoj de la komenco de la mondo." La Tago de Juĝo pri kiu Kristo parolas, estas evidente identa kun la veno de la Sinjoro de Homamasoj, de la Patro, kiu estis profetita de Jesaja kaj de aliaj Malnovtestamentaj profetoj; ĝi estas tempo de terura puno kontraŭ maljustuloj, sed ankaŭ tempo en kiu estos starigita justeco, kaj vere regos tiel sur tero kiel en la ĉielo.

Laŭ la bahaa interpreto, la alveno de ĉiu Malkaŝanto de Dio estas Tago de Juĝo, sed la alveno de la plejalta Malkaŝanto, Bahá'u'lláh, estas la granda Tago de Juĝo por la mondciklo en kiu ni vivas. La trumpet-blovego pri kiu parolis Kristo, Mahometo kaj multaj aliaj profetoj estas la voko de la Malkaŝanto, kiu sonas al ĉiuj estantaj en la ĉielo kaj sur la tero - al enkorpiĝitaj kaj elkorpiĝitaj. La renkontiĝo kun Dio, pere de Lia Malkaŝanto, estas, por tiuj kiuj deziras Lin renkonti, pordego al Paradizo de amo kaj kono de Li, kaj de enama vivado kun ĉiuj el Liaj kreitaĵoj. Tiuj, aliflanke, kiuj preferas sian propran vojon ol la vojon de Dio, montritan de la Malkaŝanto, kondamnas sin per tio al la infero de memamo, eraro kaj malamikeco.

### La Granda Reviviĝo

La Tago de Juĝo estas ankaŭ Tago de Reviviĝo, de leviĝo el mortintoj. S-ta Paŭlo en sia Unua Epistolo al la Korintanoj diras:

*Jen mi sciigas al vi misteron: ni ne ĉiuj dormos, sed ni ĉiuj ŝanĝiĝos, en momento, en okula ekmovado, ĉe la lasta trumpetsono: ĉar la trumpetono sonos kaj la mortintoj leviĝos senputraj, kaj ni ŝanĝiĝos. Ĉar estas necese, ke ĉi tiu putrema surmetu senputrecon, kaj ke ĉi tiu mortema surmetu senmortecon. – 1 Kor. XIV: 51-53*

Pri la signifo de tiuj vortoj pri la leviĝo de la mortintoj, Bahá'u'lláh skribas en la Libro Íqán:

*La vortoj "vivo" kaj "morto", en la skriboj, signifas vivon per kredo kaj morton per nekredo. Ĝuste pro nekomprene de tiu ĉi signifo, plimulto da homoj ne volis kredi la personon de la Malkaŝanto, ne estis direktata de la Suno de Gvidado, kaj ne sekvis la Eternan Belon. ...*

*... kaj kiel Jesuo diris: "Vi devas esti denove naskitaj" (Johano III: 7). Kaj en alia loko Li diris: "Se homo estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri la Regnon de Dio. Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno, kaj tio, kio naskiĝas de la Spirito, estas spirito." (Johano III: 5-6). La signifo de tiuj ĉi vortoj estas tio ke kiu ajn en ĉiu diepoko naskiĝas de la Spirito kaj vigliĝas per la spiro de la Malkaŝanto de Sankteco, tiu vere apartenas al tiuj kiuj atingis al "vivo" kaj "reviviĝo" kaj eniris en "paradizon" de la amo de Dio. Kaj kiu ajn ne apartenas al ili, estas kondamnita al "morto" kaj "senigo," al la "fajro" de nekredo, kaj al la "kolero" de Dio. ...*

<sup>1</sup> Koncernas la anglan tekston (rim. de trad.).

*En ĉiu epoko, la celo de la Diaj Profetoj kaj iliaj elektitoj estis certigi la spiritan signifon de la vortoj "vivo", "reviviĝo", kaj "juĝo" ... Se vi gustumus nur kelkajn gutojn de la klara akvo de dia kono, vi scius ke la reala vivo estas la vivo de la spirito, ne la vivo de la korpo; ĉar korpan vivon posedas kaj homoj kaj bestoj, sed la spirita vivo estas posedata de puraj animoj kiuj trinkas el la oceano de kredo kaj manĝas de la frukto de certeco. Tiu ĉi vivo ne konas morton, kaj tiu ĉi vivado estas kronita de la senmorteco, kiel estas dirite: "Vera kredanto vivas en tiu ĉi mondo kaj en la estonta mondo." Se per "vivo" ni signifas la teran vivon, estas evidente ke morto postiras ĝin. – Kitáb-i-Íqán, pp. 114, 118, 120*

Laŭ la bahaaj instruoj la Reviviĝo neniel koncernas la materian korpon. Tiu korpo, unu fojon mortinte, estas pasinta. Ĝi malkombiniĝas kaj ĝiaj atomoj neniam rekombinos sin en tiun saman korpon.

Reviviĝo estas naskiĝo de la individuo al spirita vivo, dank'al la favoro de la Sankta Spirito transdonita pere de la Malkaŝanto de Dio. La tombo el kiu li leviĝas estas la tombo de malatento kaj nescio pri Dio. La dormo el kiu li estas vekita estas la dorma spirita stato en kiu multaj atendas la mateniĝon de la Tago de Dio. Tiu ĉi tagiĝo lumigas ĉiujn kiuj vivis sur la supraĵo de la tero, ĉu ili estas ankoraŭ en korpoj ĉu elkorpiĝintaj, sed tiuj kiuj estas spirite blindaj ne povas ĝin ekvidi. La Tago de Reviviĝo ne estas dudekkvarhora tago, sed epoko kiu nun komenciĝis kaj daŭros tiel longe kiel daŭros la nuna mondciklo. Ĝi daŭros kiam ĉiuj postsignoj de la nuna civilizacio estos forbalaitaj de la supraĵo de la tero.

### Reveno de Kristo

En multaj el Siaj diroj Kristo parolis pri la venonta Malkaŝanto de Dio en la tria persono, sed en aliaj Li uzas la unuan personon. Li diras: "Mi iras por pretigi por vi lokon. Kaj se mi iros kaj pretigos por vi lokon, mi revenos kaj ricevos vin al mi mem" (Johano XIV: 2-3). En la unua ĉapitro de la Agoj ni legas ke al la disĉiploj estis dirite, ĉe la ĉieleniro de Kristo: "Ĉi tiu Jesuo, kiu estas prenita supren for de vi en la ĉielon, tiel same revenos, kiel vi vidis lin iranta en la ĉielon." Pro tiuj kaj similaj diroj, multaj kristanoj kredas, ke kiam la Filo de Homo venos "en nuboj de la ĉielo kaj kun granda gloro" ili vidos en korpa formo tiun saman Jesuon kiu antaŭ du mil jaroj paŝadis sur la stratoj de Jerusalemo, kaj sangis kaj suferis sur la kruco. Ili kredas ke ili povos meti siajn fingrojn en la najlotruojn de Liaj manoj kaj piedoj, kaj siajn manojn en la lancvundon de Lia flanko. Sed iom da konsidero pri la propraj vortoj de Kristo sendube dispelos tiun ideon. La judoj en la tempo de Kristo havis tiajn samajn ideojn pri la reveno de Elija, sed Jesuo klarigis al ili ilian eraron, montrante ke la profetaĵo ke "Elija devas veni unue" estis plenumita, ne per reveno de la persono kaj korpo de la iama Elija, sed en la persono de Johano la Baptisto, kiu venis "en la spirito kaj povo de Elija." "Kaj se vi volas tion ricevi", diris Kristo, "tiu estas Elija, kiu estis venonta. Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu." La "reveno" de Elija signifas, do, aperon de alia persono, naskita de aliaj gepatroj, sed inspirita de Dio per tiu sama spirito kaj povo. Tiuj ĉi vortoj de Jesuo enhavas, kiel oni certe povas kompreni, ankaŭ la signifon ke la reveno de Kristo estos en simila maniero plenumita per apero de alia persono, naskita de alia patrino, sed elmontranta la Spiriton kaj Povon de Dio kiel Kristo. Bahá'u'lláh klarigas ke la "reveno" de Kristo estas plenumita per la alveno de Báb kaj per Lia propra. Li diras:

*Pripensu la sunon. Se ĝi dirus hodiaŭ, "Mi estas la suno de la hieraŭa tago", tio estus vera. Se tamen, konforme al la taga sekvado, ĝi pretendus esti alia suno, ol la hieraŭa suno, tio ankaŭ estus vera. Konsideru tiel same la tagojn: se estus dirite ke ĉiu el la tagoj estas sama, tio estus prava kaj vera; kaj se estus dirite, ke depende de sia nomo kaj difino, ĉiu tago diferencas de la aliaj, tio ĉi ankaŭ estus vera. Ĉar kvankam ili estas samaj, tamen ĉiu el ili havas nomon, kvaliton, kaj difinon, per kiu ĝi diferencas de la aliaj. Laŭ tiu sama metodo kaj klarigo komprenu la statojn de aparteco, diferenco kaj unueco karakterizaj de la sanktaj Malkaŝantoj, por ke vi komprenu la interpreton de la vortoj de la kreinto de ĉiuj nomoj kaj atribuoj koncerne la apartecon kaj unuecon, kaj por ke vi trovu la respondon al via demando kial tiu eterna Belo, je diversaj tempoj, nomis Sin per malsamaj nomoj kaj titoloj. – Kitáb-i-Íqán, pp. 21-22*

'Abdu'l-Bahá diras:

*Sciu ke la duafoja veno de Kristo ne signifas tion kion oni kredas, sed ĝi signifas la Promesiton kiu venos post Li. Li venos kun la Regno de Dio kaj Lia Povo kiu ekregis la mondon. Tiu ĉi regado estas en la mondo de koroj kaj spiritoj, ne en tiu de materio; ĉar la materia mondo ne estas komparebla kun unu flugileto de muŝo, en la okuloj de la Eternulo, se vi estus el tiuj kiuj scias! Vere Kristo venis kun Sia Regno de la komenco kiu ne havas komencon, kaj venos kun Sia Regno ĝis la eterneco de eternecoj, ĉar en tiu ĉi senco "Kristo" estas esprimo de la Dia Realeco, la Esenco mem kaj ĉiela Estaĵo, kiu havas nek komencon nek finon. Ĝi havas sian aperon, tagiĝon, manifestadon kaj subiĝon en ĉiu ciklo.*

## La Tempo de la Fino

Kristo kaj Liaj apostoloj menciis multajn signojn kiuj distingos la tempon de la "Reveno" de la Filo de Homo en la gloro de la Patro. Kristo diris:

*Sed kiam vi vidos Jerusalemon ĉirkaŭitan de armeoj, tiam sciui, ke ĝia ruiniĝo alproksimiĝis. ... Ĉar tiuj estas tagoj de punado, por ke plenumiĝu ĉio, kio estas skribita ... ĉar estos granda manko sur la tero kaj kolero kontraŭ tiu ĉi popolo. Kaj ili falos per tranĉado de glavo, kaj forkaptiĝos en ĉiujn naciojn; kaj Jerusalemon estos piedpremata de la nacioj, ĝis plenumiĝos la tempoj de la nacioj. – Luko XXI: 20-24*

Alifoj Li diris:

*Gardu vin, ke neniu vin forlogu. Ĉar multaj venos en mia nomo, dirante: Mi estas la Kristo; kaj ili forlogos multajn. Kaj vi aŭdos pri militoj kaj famoj de militoj. Zorgu, ke vi ne maltrankviliĝu; ĉar tio devas okazi; sed ankoraŭ ne estas la fino. Ĉar leviĝos nacio kontraŭ nacio, kaj regno kontraŭ regno; kaj estos malŝatoj kaj tertremoj en diversaj lokoj. Sed ĉi tio estas komenco de suferoj. Tiam oni transdonos vin al afliktado, kaj mortigos vin; kaj vi estos malamataj de ĉiuj nacioj pro mia nomo. Tiam multaj ofendiĝos, kaj perfidos unu la alian, kaj malamos unu la alian. Kaj multaj falsaj profetoj leviĝos, kaj forlogos multajn. Kaj pro la multobligo de maljusteco, la amo de la plimulto malvarmiĝos. Sed kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita. Kaj ĉi tiu evangelio de la regno estos predikita tra la tuta mondo, kiel atesto al ĉiuj nacioj; kaj tiam venos la fino. – Mat. XXIV: 4-14*

En ĉi tiuj du versaroj Kristo antaŭdiris per sendubaj vortoj, nevalitaj aŭ nekaŝitaj, la aferojn kiuj devos okazi antaŭ la alveno de la Filo de Homo. Dum la jarcentoj de post Kristo parolis, ĉiuj ĉi signoj plenumiĝis. En la fina parto de ĉiu versaro Li mencias okazontaĵojn kiu signos la tempon de la alveno - unuafoje la fino de la hebrea ekzilo kaj la revivigo de Jerusalemon, kaj alifoj la predikado de la Evangelio en la tuta mondo. Estas mirige vidi ke ambaŭ tiuj signoj laŭvorte plenumiĝas en nia tempo. Se ĉi tiuj partoj de la profetaĵo estas tiel veraj kiel la cetero, sekvas ke ni ja vivas nun en "la tempo de la fino" pri kio Kristo parolis.

Mahometo ankaŭ mencias difinitajn signojn kiuj daŭros ĝis la Tago de Reviviĝo. En la Korano ni legas:

*Kiam Allah diris: "Ho Jesuo, Mi igos vin morti kaj levos vin al Mi kaj purigos vin je la ruzoj de la miskredantoj kaj metos viajn disĉiplojn (t.e. Kristanoj) super la miskredantojn (Judoj kaj aliaj) ĝis la tago de la reviviĝo. Tiam estos via reveno al Mi kaj Mi juĝos super vi ĉiuj pri tio, pri kio vi malkonsentis." – Ĉap. III: 56*

*La Judoj diras: "La mano de Allah estas ligita." Iliaj manoj estu ligitaj kaj ili estu malbenitaj pro iliaj diroj. Ne! Liaj manoj estas ambaŭ tute malfermitaj. Li disdonas, kiel Li volas; tio, kio estis sendita al vi de via Sinjoro, vere nur pliiĝos por multaj el ili la malpiegecon kaj la miskredon. Ni semis inter ili malamikecon kaj malamon ĝis la tago de la reviviĝo. Ĉiam, kiam ili ekbruligos fajron por la milito, Allah estingos ĝin. – Ĉap. V: 65*

*Ankaŭ kun tiuj, kiuj diras: "Ni estas Kristanoj", Ni faris aliancon, sed ili forgesis el tio, pri kio ili estis admonitaj. Pro tio Ni estigis malamikecon kaj malamon inter ili ĝis la tago de la reviviĝo. Baldaŭ Allah sciigos al ili, kion ili faris. – Ĉap. V: 15*

Tiuj ĉi vortoj ankaŭ estis laŭlitere plenumitaj per la subigo de judoj flanke de la kristanaj (kaj islamaj) popoloj, kaj per sektiĝoj kaj malpacoj kiuj ekde la tempo kiam Mahometo tion diris dum ĉiuj jarcentoj dividadis interne kaj judojn kaj kristanojn. Nur en la komenco de la bahaa epoko (la Tago de Reviviĝo) ekaperis la signoj anoncantaj finon de tiu ĉi stato.

## Signoj sur la Ĉielo kaj Tero

En la hebrea, kristana, mahometana kaj multaj aliaj Skriboj, ekzistas rimarkinda simileco en priskribo de la signoj kiuj akompanas la alvenon de la Promesito.

En la Libro de Joel ni legas:

*Kaj mi donos miraklajn signojn en la ĉielo kaj sur la tero; sangon, fajron kaj kolonojn de fumo. La suno fariĝos malluma, kaj la luno fariĝos sanga, antaŭ ol alvenos la granda kaj timinda tago de la Eternulo. ... Ĉar jen en tiuj tagoj kaj en tiu tempo, kiam Mi revenigos la forkaptitojn de Judujo kaj de Jerusalemon, Mi kolektos ĉiujn naciojn kaj venigos ilin en la valon de Jehoŝafat (Jehova jugas); kaj tie Mi faros super ili juĝon. ... Amasoj post amasoj kolektiĝas en la valo de la juĝo, ĉar alproksimiĝas la tago de la Eternulo en la valo de la juĝo. La suno kaj la luno senlumiĝos, kaj la steloj perdos sian brilon. Kaj la Eternulo ektondros el Cion kaj aŭdigos Sian voĉon el Jerusalemon; ekstremos la ĉielo kaj la tero; sed la Eternulo estos rifuĝejo por Sia popolo. – Joel II: 30-31; III: 1-2, 14-16*

Kristo diras:

*Sed tuj post la aflikto de tiuj tagoj la suno mallumiĝos, kaj la luno ne donos sian lumon, kaj la steloj falos el la ĉielo, kaj la potencoj de la ĉielo ŝanceliĝos; kaj tiam aperos sur la ĉielo la signo de la Filo de Homo, kaj tiam ploros ĉiuj gentoj de la tero, kaj oni vidos la Filon de Homo, venantan en la nuboj de la ĉielo kun potenco kaj granda gloro. – Mat. XXIV: 29-30*

En la Korano ni legas:

*Kiam la suno estos envolvita per mallumo, kaj kiam la steloj malheliĝos, kaj kiam la montoj estos forpelitaj ... Kiam la libroj de la homaj agoj estos malvolvitaj, kiam la ĉielo malfermiĝos, kiam la fajro de l'Infero estos incitita. – Ĉap. LXXXI*

En la Libro *Íqán* Bahá'u'lláh klarigas ke tiuj ĉi profetaĵoj pri la suno, luno kaj steloj, pri la ĉielo kaj tero, estas simbolaj kaj oni ne devas kompreni ilin en la nure litera senco.

La Profetoj interesis Sin antaŭ ĉio pri spiritaĵoj, ne pri materiaĵoj, aferoj: pri spirita, ne pri fizika lumo. Kiam Ili parolas pri la suno, temante pri la Tago de Juĝo, Ili pensas pri la Suno de Justeco. La suno estas la plej granda fonto de lumo, tiel Moseo estis suno por hebreoj, Kristo por kristanoj, kaj Mahometo por islamanoj. Kiam la Profetoj parolas pri senbriliĝo de la suno, tio signifas ke la puraj instruoj de tiuj spiritaĵoj estos mallumigitaj per misprezentado, miskompreno kaj antaŭjuĝo, tiel ke la homoj trovas sin en spirita mallumo. La luno kaj la steloj, la malpli fortaj lumfontoj, estas religiaj gvidistoj kaj instruistoj, kiuj devus direkti kaj inspiri homojn. Kiam estas dirite ke la luno ne donos plu la lumon aŭ fariĝos sango, kaj ke la steloj falos el la ĉielo, la senco de tio ĉi estas ke ekleziaj gvidantoj malaltiĝos, profundiĝos en batalojn kaj malpacojn, kaj ke pastroj fariĝos mondumaj, absorbitaj per teraj aferoj anstataŭ per la ĉielaj.

La signifon de tiuj ĉi profetaĵoj ne elĉerpas, tamen, unu klarigo, kaj ekzistas aliaj interpretmanieroj de tiuj simboloj. Bahá'u'lláh diras ke en alia senco la vortoj "suno", "luno", kaj "steloj" rilatas al la ordonoj kaj instruoj donitaj de ĉiu religio. Ĉar en ĉiu sekvanta revelacio la ceremonioj, formoj, kutimoj kaj ordonoj de la antaŭa revelacio estas ŝanĝitaj konforme al bezonoj de la tempo, tiel, en tiu ĉi senco la suno kaj la luno estas ŝanĝitaj kaj la steloj disĵetitaj.

En multaj rilatoj laŭlitera plenumiĝo de tiuj profetaĵoj en la ekstera senco estus absurda aŭ neebla; ekzemple, sango-fariĝo de la luno aŭ terenfalo de la steloj. La plej malgranda el la videblaj steloj estas milfoje pli granda ol la tero, kaj se unu el ili falus sur la teron restus nenio tero kien la aliaj povus fali! En aliaj rilatoj, tamen, estas materiala kiel ankaŭ spirita plenumiĝo. Ekzemple, la Sankta Lando fakte fariĝis dezerta kaj forlasita dum multaj jarcentoj, kiel estis antaŭ dirite de la profetoj, sed en la Tago de Reviviĝo, ĝi jam komencas "ĝoji kaj flori kiel rozo", kiel Jesaja antaŭdiris. Oni fondas tie prosperajn koloniojn, oni akvumas kaj kulturadas la teron, kaj vinberejoj, olivarbaroj kaj ĝardenoj prosperas tie kie antaŭ duono da jarcento estis nur sablaj areoj. Sendube kiam homoj aliforiĝos glavojn en plugilojn kaj lancojn en hoktranĉilojn, tiam sovaĝejoj kaj dezertoj en ĉiuj partoj de la mondo estos regajnitaj; la brulventoj kaj sabloventegoj kiuj blovas el tiuj dezertoj, kaj preskaŭ tute neebbligas vivon en iliaj

ĉirkaŭaĵoj, estos aferoj de pasinteco; la klimato de la tuta tero estos pli milda kaj pli egala; urboj ne plu malpurigos la aeron per fumo kaj haladzoj, kaj eĉ en la ekstera, materia senco ni havos "novan ĉielon kaj novan teron."

## La Maniero de la Alveno

Koncerne la manieron de Sia alveno ĉe la fino de la mondaĝo, Kristo diris:

*Kaj oni vidos la Filon de Homo, venantan en la nuboj de la ĉielo kun potenco kaj granda gloro. Kaj li elsendos siajn anĝelojn kun granda sono de trumpeto ... tiam li sidos sur la trono de sia gloro; kaj antaŭ li kolektiĝos ĉiuj nacioj, kaj li apartigos ilin unu de alia, kiel paŝtisto apartigas la ŝafojn for de la kaproj. – Mat. XXIV: 30-31; XXXV: 31-32*

Pri tiuj ĉi kaj similaj versoj Bahá'u'lláh skribas en la Libro *Íqán*:

*... La vorto "ĉielo" celas esprimi nenion alian ol la spiritfervoron kaj ekstazon, ĉar ĝi estas la fonto de la revelacio de tiuj Matenlumo de Sankteco kaj Tagiĝlokoj de antaŭtempa gloro. Kvankam ĉi tiuj Pratempej Estajoj naskiĝis el la uteroj de la patrinoj, tamen en realeco ili malsuprenvenis el la ĉielo de la volo de Dio. Kvankam ili loĝas sur la tero, tamen ilia vera loĝejo estas la loko de gloro en la supraj regnoj. Pasante eĉ sur la tero, ili svebas en la ĉielo de la dia ĉeesto. Sen piedoj ili paŝas laŭ la vojo de la spirito, kaj sen flugiloj ili suprenflugas al la ekzalteco de dia unueco. Kun ĉiu spireto ili trairas la vastegecon de spaco, kaj ĉiunmomente transiras la regnojn videblan kaj nevideblan. ...*

... La "nuboj" signifas tion kio kontraŭas al la egoismo kaj deziro de homoj, kiel estas dirite en la verso: "Ĉu vi volas esti ribelemaj, ĉiufoje kiam venas al vi senditoj? Ĉu vi volas rifuzi iujn el ili kaj mortigi aliajn?" (Korano 2:88). Tiuj ĉi "nuboj" signifas, unusence, la forigon de leĝoj kaj nuligon de antaŭaj Disistemoj, la neniigon de ritoj kaj nunaj kutimoj inter homoj, la ekzaltecon de la analfabetaj fideluloj super la kleraj kontraŭuloj de la Kredo. Alisence, ili signifas la aperon de tiu eterna Beleco en la figuro de mortema homo, kun tiaj limigoj kiel manĝado kaj trinkado, malriĉeco kaj riĉeco, gloro kaj humiliĝo, dormado kaj vekigo, kaj similaj aferoj kiuj kaŭzas dubon de homoj, kaj igas ilin sin forturni. Ĉiuj tiaj vualoj estas simbolo "nuboj."

Ili estas la "nuboj" kiuj disfendas la ĉielon de scio kaj kompreno de ĉiuj kiuj loĝas sur la tero. Kiel Li revelaciis: "En la tago, en kiu la ĉielo fendigos kun la nuboj." (Korano 25:26). Kiel la nuboj malebligas al homaj okuloj rigardi la sunon, same ĉi tiuj aferoj malebligas al la homaj animoj rekoni la lumon de la Dia Lumiganto. Al tio atestas tio kion eldiris la nekredantoj kiel revelaciite en la sankta Libro: "Ili diras: 'Kio estas pri tiu sendito, kiu manĝas manĝaĵojn kaj iras sur la stratoj? Kial ne estis sendita al li anĝelo, por ke li estu apud li kiel admonanto?' " (Korano 25:8). Aliaj Profetoj estis ankaŭ subigitaj al malriĉeco kaj malbonsorto, kaj ankaŭ al malsato, kaj hazardaj okazoj. Ĉar tiuj ĉi sanktaj Personoj estis subigitaj al tiaj bezonoj kaj mankoj, la homoj, sekve, estis perditaj en la dezertoj de duboj kaj suspektoj, kaj suferis per iluzioj kaj perplekseco. Kiel, ili demandis, oni povas esti sendita de Dio, pretendi regadon super ĉiuj el la popoloj kaj parencaro de la mondo, atribui al si la celon de la tuta kreitaĵaro, - kiel Li diris: "Se ne pro Vi, Mi ne estus kreinta la ĉielon kaj la teron" - kaj tamen esti afliktata per tiaj bagatelaĵoj? Sendube vi scias kiel ĉiu Profeto de Dio kaj Liaj kunuloj suferis malbonsorton kiel malriĉeco, malsano, malrespekto. Certe vi aŭdis kiel la kapoj de iliaj sekvantoj estis donace sendataj en la urbojn, kiel oni malhelpis al ili en tio kio estis al ili ordonita, kaj kiel ĉiu el ili fariĝis viktimo de malamikoj de Lia Kredo, kaj devis suferi kion ajn ili dekretis. ... La Ĉiel-Glora dekretis ĉiujn tiujn kondiĉojn, kiuj estas kontraŭaj al la deziroj de malvirtuloj, por esti la provŝtono kaj standardo per kiuj Li provas Siajn servantojn, kaj distingas justulon de maljustulo, kredanton de malkredulo.

Koncerne Lian diron: "Kaj Li sendos Siajn anĝelojn ..." tiuj "anĝeloj" estas personoj, kiuj per spirita potenco, konsumis interne de si homajn kvalitojn per la fajro de Dia Amo, kaj karakterizas sin per atribuoj de Superuloj kaj Keruboj. ...

Ĉar la popolo de Jesuo ne komprenis tiun ĉi signifon, kaj la signoj ne plenumiĝis kiel ĝiaj pastroj tion atendis, ili ne kredis je la Manifestoj de Sankteco de post la tago de Jesuo ĝis la nuna tempo; tial ili estis senigitaj de la sanktaj favoroj kaj de la mirindaĵoj de Liaj diaj vortoj. Tiel estas la kondiĉoj de la servantoj en tiu ĉi Tago de Reviviĝo! Ili eĉ ne perceptis ke se en ĉiu epoko la signoj de Manifestado de Dio aperus en la videbla mondo laŭ la teksto de konstatitaj tradicioj, neniu kuraĝus nei aŭ kontraŭi ilin, nek povus esti distingita piulo de malpiulo, kaj pekulo de justulo. Juĝu honeste: Se tiuj aferoj priskribitaj en la Evangelio estus laŭlitere plenumitaj; se anĝeloj malsuprenvenus kun Jesuo, la Filo de Maria, el la videbla ĉielo en nubo; kiu kuraĝus nei, kiu povus malakcepti la veron, kaj fariĝi malestima? Ja certe, tia ekscito ekregus la popolojn de la mondo ke ili ne kapablu diri eĉ unu vorton, des malpli nei aŭ malakcepti. – Kitáb-i-Íqán, pp. 67, 71, 73, 76, 78-79, 80-81

Laŭ la supre citita klarigo la alveno de la Filo de Homo, en modesta homa formo, naskita de virino, malriĉa, needukita, persekutata kaj konsiderata nenio de potenculoj de la tero - tiu ĉi maniero de la alveno estas ĝuste la provŝtono per kiu Li juĝas la homojn kaj apartigas ilin unu de aliaj, kiel paŝtisto apartigas siajn ŝafojn de kaproj. Tiuj kies spiritaj okuloj estas malfermitaj povas vidi tra tiuj nuboj kaj ĝoji en "potenco kaj granda gloro" - ja la gloro de Dio kiun Li estas malkaŝonta; la aliaj, kies okuloj estas ankoraŭ vualitaj per antaŭjuĝo kaj eraro, povas vidi nenion krom nigraj nuboj kaj daŭros palpi en mallumo, senigitaj de la benita sunbrilo.

Jen Mi sendas Mian anĝelon, kaj li preparos antaŭ Mi la vojonojn; kaj subite venos en sian templon la Sinjoro, kiun vi serĉas; kaj la anĝelo de la interligo, kiun vi deziras. ... Sed kiu eltenos la tagon de Lia veno? kaj kiu povos stari, kiam Li aperos? Ĉar Li estas kiel la fajro de fandisto, kaj kiel la sapo de la fulistoj. ... Ĉar jen venos tago, ardanta kiel forno; tiam ĉiuj malhumiluloj kaj malbonaguloj estos kiel pajlo. ... Sed por vi, kiuj respektas Mian nomon, leviĝos suno de justeco, kaj sanigo estos en ĝiaj radioj. – Mal. III: 1-2; IV: 1-2

RIMARKO: Plenumado de profetaĵoj estas tiel ampleksa afero ke estus necesa multaj volumoj por tion ĝuste klarigi. Ĉio kion oni povas fari en la limoj de unu ĉapitro estas montri la ĉefajn konturojn de la bahaa interpretado. La detalaj Apokalipsoj malkaŝitaj de Daniel kaj S-ta Johano restis netuŝitaj. Legantoj trovos priparolon de iuj el la ĉapitroj en *Some Answered Questions* (Demandoj kaj Respondoj). Oni povas ankaŭ trovi plurajn klarigojn en la Libro *Íqán*, de Bahá'u'lláh, *Bahá'í Proofs* (Bahaa Pruvoj), de Mirzá Abu'l-Fadl, kaj en multaj Tabuletoj de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá.

## ĈAPITRO XIV: PROFETAĴOJ DE BAHÁ'U'LLÁH KAJ 'ABDU'L-BAHÁ

*Kaj se vi diros en via koro, kiel ni ekkonos la vorton kiun ne diris la Eternulo? Kion la profeto diros en la nomo de la Eternulo kaj la afero ne fariĝos kaj ne plenumiĝos - tio estas la vortoj, kiujn la Eternulo ne diris; pro aroganteco diris tion la profeto; ne timu lin. – Readmono XVIII: 21-22*

### Krea Povo de la Dia Vorto

Dio, kaj nur Dio, havas la potencon fari ĉion kion Li deziras, kaj la plej granda pruvo de Malkaŝanto de Dio estas la krea potenco de Lia Vorto - ĝia efikeco por ŝanĝi kaj aliigi ĉiujn homajn aferojn kaj por triumfi super ĉiaj kontraŭstaroj. Per vorto de Profetoj Dio sciigas Sian volon, kaj la senpera aŭ sekvanta plenumiĝo de tiu vorto estas la plej evidenta pruvo pri la pretendo de la Profeto kaj pri la vereco de Lia inspiro.

*Ĉar kiel la pluvo kaj la neĝo falas de la ĉielo kaj ne revenas tien, sed malsoifigas la teron kaj naskigas kaj produktigas ĝin kaj donas semon al la semanto kaj panon al la manĝanto: tiel estos Mia vorto, kiu eliras el Mia buŝo; ĝi ne revenos al Mi vane, sed plenumos Mian volon, kaj sukcesos en tio, por kio Mi ĝin sendis. – Jes. IV: 10-11*

Kiam la disĉiploj de Johano la Baptisto venis al Jesuo kun la demando: "Ĉu vi estas la venonto, aŭ ĉu ni atendu alian?" Jesuo en Sia respondo simple montris la efikon de Siaj vortoj:

*Iru kaj sciigu al Johano tion, kion vi aŭdas kaj vidas: blinduloj ricevas vidpovon kaj lamuloj marŝas, lepruloj estas purigitaj kaj surduloj aŭdas, kaj mortintoj leviĝas, kaj al malriĉuloj evangelio estas predikata. Kaj feliĉa estas ĉiu, kiu ne falpuŝiĝas pro mi. – Mat. XXI: 4-6*

Ni esploru nun per kiaj pruvoj oni povas evidenti ĉu la vortoj de Bahá'u'lláh posedas tiun ĉi krea potencon kiu distingas la vorton de Dio.

Bahá'u'lláh ordonis al la regantoj starigi universalan pacon, kaj ilia plidaŭrigo de militosistemo de post 1869-1870 detruis multajn antikvajn dinastiojn, dum ĉiu sinsekva milito alportis malpli de la fruktoj de venko, ĝis kiam la Eŭropa milito en 1914-1918 malkaŝis la historie mirigan fakton ke milito fariĝas katastrofo al venkanto kiel ankaŭ al venkito.<sup>1</sup>

Bahá'u'lláh ankaŭ ordonis ke la regantoj funkcii kiel kuratoroj de siaj regatoj, por fari politikan aŭtoritatecon kiel rimedon al vera ĝenerala bonfarto. La progreso al sociaj leĝoj fariĝis senprecedenta.

Li ordonis limigon de ekstretoj de riĉeco kaj malriĉeco, kaj de tiu tempo, leĝ-donado por la starigo de minimuma nivelo de ekzisto kaj gradigataj impostoj de riĉaĵoj pere de enspezaj kaj heredaj impostoj fariĝis konstanta respondeco. Li ordonis neniigon de korpa kaj industria sklaveco, kaj de tiu tempo, la progreso al emancipado fermentas en ĉiuj partoj de la mondo.

Bahá'u'lláh ordonis egalecon inter gevoj, pere de egalaj respondecoj kaj egalaj rajtoj kaj privilegioj, kaj de tiu tempo, la ligoj per kiuj virinoj estis de jarcentoj ligitaj rompitis, kaj virino rapide akiras sian rajtan lokon kiel egalulino kaj kunulino de viro.

Li deklaris la fundamentan unuecon de religioj, kaj de tiam montriĝis plej persistaj penoj de sinceraj homoj en ĉiuj partoj de la mondo atingi novan gradon de toleremo, de reciproka komprenemo kaj de kunlaboro por universalaj celoj. Ĉie detruigis la sekta mieno, kaj ĝia historia rango fariĝas pli kaj pli neeltenebla. La bazo de ekskluziveco en religio detruigis per la samaj fortoj kiuj igas al memsufiĉa naciismo senkapabla por daŭri.

Li ordonis universalan edukadon, kaj faris sendependan esploradon de vero por esti pruvo de spirita vivoforto. La moderna civilizacio estas profunde tuŝita per tiu ĉi nova fermentilo. Deviga edukado por infanoj, kaj plivastigo de edukadaj facilecoj por plenkreskuloj, fariĝis ĉefa agadplano de registaroj. Tiuj nacioj kiuj celas limigi la sendependecon de mensoj kaj spiritoj inter siaj civitanoj per tiu agadplano ekscitis revolucion inter siaj bordoj kaj suspekton kaj timon ekstere.

Bahá'u'lláh ordonis akcepton de universala helplingvo, kaj d-ro Zamenhof kaj aliaj obeis al Li per dediĉo de siaj vivoj kaj talentoj al tiuj ĉi grandaj taskoj kaj okazo.

Super ĉio, Bahá'u'lláh inspiris al la homaro per nova spirito, vekis novajn sopirojn en mensoj kaj koroj kaj novajn idealojn por la socio. Nenio en la tuta historio estas tiel drama kaj impona kiel la fluado de okazaĵoj de post la komenco de la bahaa epoko en 1844. Jaron post jaro, la potenco de morta pasinteco, daŭrigita pere de eluzitaj ideoj, kutimoj, sintenoj kaj institucioj malfortiĝis, ĝis nuntempe kiam ĉiu inteligenta viro kaj virino surtere elkomprenas ke la homaro travivas sian plej teruran

<sup>1</sup> Tiun ĉi plu atestas la dua mondmilito.

krizon. Unuflanke oni vidas la novan kreadon leviĝantan dum la lumo de la instruado de Bahá'u'lláh revelaciis la veran vojon de evoluado. Aliflanke oni vidas nur katastrofojn kaj malsukcesojn en ĉiuj regnoj kie tiun lumon oni rezistas aŭ ignoras.

Al fidela bahaano, tamen, tiuj ĉi kaj sennombraj aliaj pruvoj, kiel ajn imponaj ili estu, ne povas montri la plenan mezuron de la spirita majesteco de Bahá'u'lláh. Lia vivo surtere, kaj la nerezistebla forto de Liaj inspiraj vortoj, estas la unusola kriterio de la volo de Dio.

Pristudo de pli detalaj profetaĵoj de Bahá'u'lláh kaj de ilia plenumiĝo prezentos al ni potencajn konfirmajn pruvojn. Ni donos nun kelkajn ekzemplojn de tiuj profetaĵoj, kies aŭtentikeco estas ekster ĉiaj disputoj. Ili estis vaste publikigitaj kaj konataj antaŭ ol okazis ilia plenumiĝo. La leteroj kiujn Li sendis al la kronitoj de la mondo, en kiuj troviĝis multaj el tiuj profetaĵoj, estis kompilitaj en libron kiu estis unue publikigita en Bombajo en la lasta parto de la deknaŭa jarcento. De tiu tempo reaparis kelkaj eldonoj. Ni prezentos ankaŭ kelkajn ekzemplojn de rimarkindaj profetaĵoj de 'Abdu'l-Bahá.

### Napoleono III

En la jaro 1869 Bahá'u'lláh skribis al Napoleono III, riproĉante al li lian militamon kaj malrespekton laŭ kiu li traktis antaŭan leteron de Bahá'u'lláh. La Epistolo enhavis la sekvantan severan averton:

*Viaj faroj kaŭzos haoson en via regno, la regado eliĝos el viaj manoj pune por tio, kion vi faris. Tiam vi ja scios kiam vi eraris. Ekscitiĝo ekregos la popolon en tiu lando, se vi ne ekstaros por helpi tiun ĉi religion, kaj sekvi Tiun Kiu estas la Spirito de Dio (Jesuo Kristo) sur tiu ĉi Rekta Vojo. Ĉu via pompo faris vin gloravida? Je Mia Vivo! Ĝi ne daŭros; sed ĝi pasos for, se ne vi ekkaptos je tiu forta ŝnuro. Ni vidas humiligon rapide paŝantan al vi, sed vi tamen estas el tiuj kiuj malatentas.*

Necesas diri, ke Napoleono, kiu estis tiam ĉe la zenito de sia potenco, restis tute senatenta al tiu ĉi averto. En la sekvinta jaro li ek militis kontraŭ Prusujo, firme konvinkita ke lia armeo facile konkeros Berlinon; sed la tragedio antaŭdirita de Bahá'u'lláh superregis lin. Li estis venkita ĉe Saarbruko, ĉe Weissenburgo, ĉe Metz, kaj fine en la tondrobata katastrofo ĉe Sedano. Li estis tiam malliberigita en Prusujo, kaj ĝisvivis mizeran finon en Anglujo du jarojn poste.

### Germanujo

Bahá'u'lláh avertis poste en tiel same solena maniero la venkintojn de Napoleono, kiuj ankaŭ ŝtopis la orelojn kaj ricevis teruran plenumon. En la Libro Aqdas, komencita en Adrianopolo kaj finita dum la fruaj jaroj de la mallibereco de Bahá'u'lláh en Akreo, Li jene skribis al la imperiestro de Germanujo:

*Ho Reĝo de Berlino! ... Rememoru tiun kies potenco estis pli granda ol la via (Napoleono III), kaj kies pozicio estis pli alta ol la via. Kie li estas? Kaj kie estas liaj posedaĵoj? Atentu, kaj ne estu el tiuj kiuj dormas. Li forĵetis malantaŭen la Tabuleton de Dio, kiam Ni informis lin pri tio kio al Ni okazis fare de la armeo de la tiraneco. Tial, malfavoro ekpemis lin de ĉiuj flankoj, ĝis fine li disfalis al polvo en granda mizero. Ho reĝo, konsideru profunde lian sorton, kaj pensu pri tiuj, kiuj simile al vi, mem konkeris urbojn kaj regis super la homojn. La Ĉionpova elpelis ilin el iliaj palacoj en tombojn. Estu avertita, kaj estu el tiuj kiuj pripensas.*

*Ho bordoj de Rejno-rivero! Ni vidas vin kovritaj de sango, ĉar la punglavoj de venĝo turnis sin kontraŭ vi; kaj ankoraŭ alia vico estos via sorto. Kaj Ni aŭdas la lamentadon de Berlino, kvankam hodiaŭ ĝi estas en plej elstara gloro. – Kitáb-i-Aqdas*

Dum la periodo de la germana sukceso en la granda milito de 1914-1918, kaj speciale dum la granda germana ofensivo en la printempo de 1918, la kontraŭuloj de la Bahaa Religio en Persujo fervore citis tiun ĉi konatan profetaĵon, por senkreditigi al Bahá'u'lláh; sed kiam la konkera antaŭenmarŝo de la venkantaj germanoj subite sin-ŝanĝis en disfrakasan, pereigan malvenkon, la penoj de la malamikoj de la Bahaa Religio turnis kontraŭ sin mem, kaj la famo kiun ili donis al la profetaĵo fariĝis efika rimedo por altigi la reputacion de Bahá'u'lláh.

### Persujo

En la Libro Aqdas revelaciita kiam la tirana ŝaho Násiri'd-Dín estis ĉe la supro de sia potenco, Bahá'u'lláh benas la urbon Teherano, kiu estas ĉefurbo de Persujo, kaj Lia propra naskiĝloko. Li diras pri ĝi:

*Ho Lando Ta (Teherano), nenial malĝoju ĉar Dio faris vin fonto de ĝojo al la tuta homaro. Se Li volos, Li benos vian tronon per tiu kiu regos juste kaj rekolektos la ŝafojn de Dio dispelitajn de lupoj. Tia reganto*

*traktos la popolon de Bahá kun ĝojo kaj kontenteco. Dio ja kalkulas lin kiel juvelo inter homoj. Sur li estu por ĉiam la gloro de Dio, kaj la gloro de ĉiuj kiuj estas en la regno de Lia Revelacio.*

*Ĝojegu, ĉar Dio faris vin "la Tagiĝo de Sia lumo", ĉar en vi estis naskita la Malkaŝanto de Lia Gloro. Ĝoju pri ĉi tiu nomo kiu estas donita al vi - nomo, per kiu la Suno de graco brilas, per kiu la tero kaj la ĉielo estas lumigitaj.*

*Baldaŭ ŝanĝigos en vi la aferstato, kaj la regado transiros al la popoloj. Vere, via Eternulo estas la Ĉionscianta. Lia aŭtoritato ĉionĉirkaŭas. Estu certa pri la providenco de via Eternulo. La rigardo de Lia favoro estos ĉiam direktita al vi. Alproksimiĝas la tago kiam via ĥaoso fariĝos paco kaj kvieta sereneco. Tiel estas dekretita en la mirinda Libro. – Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh, pp. 110-111 (Kolektado el la Skribaĵoj de Bahá'u'lláh)*

Ĝis nun, Persujo estas apenaŭ komencinta eliĝi el la periodo de ĥaoso antaŭdirita de Bahá'u'lláh, sed jam estas starigita konstitucia registaro, kaj ne mankas signoj ke pli brila epoko estas proksima.

## Turkujo

Al la Sultano de Turkujo kaj al lia ĉefministro 'Alí Paŝao, Bahá'u'lláh, malliberigita tiam (1868) en turka malliberejo, direktis kelkajn el Sijaj plej solenaj, plej gravaj avertoj. Al la Sultano Li skribis el la Kazerno ĉe Akreo:

*Ho vi, kiu konsideras vin plej granda el ĉiuj homoj ... baldaŭ via nomo estos forgesita kaj vi trovos vin en granda manko. Laŭ via opinio, tiu ĉi Reviviganto de la mondo kaj Pacportanto estas puninda kaj ribelema. Kian krimon faris la virinoj, infanoj kaj suferantaj idetoj ke ili meritis vian koleron, persekutadon kaj malamon? Vi persekutis multajn kiuj elmontris nenian kontraŭstaron en via lando, kaj kiuj instigis al nenia revolucio kontraŭ la registaro; ja kontraŭe, ili tage kaj nokte estis pace okupitaj per rememorado de Dio. Vi rabis iliajn proprajn, kaj pro viaj tiranaj agoj, ĉio kion ili posedas estas forprenita de ili. ... Antaŭ Dio, plenmano da polvo estas pli granda ol viaj regno, gloro, supereco kaj reĝeco, kaj se Li dezirus, Li povus disjeti vin kiel sablon de dezerto. Baldaŭ atingos vin Lia kolero, revolucioj eksplodos meze de via popolo kaj viaj ŝtatoj estos dividitaj! Tiam vi ploros kaj veos kaj nenie trovos helpon kaj subtenon. ... Estu gardemaj, ĉar la kolero de la Eternulo estas preparita, kaj post nelonge vi ekvidos tion, kio estas skribita de la Plumo de Ordon.*

Kaj al 'Alí Paŝao Li skribis:

*Vi faris, ho Estro, tion pro kio Mahometo, la Profeto de Dio, ĝemsopiras en la Plejsupera Paradizo. La mondo faris vin fiera, tiel ke vi forturnis vin de la Vizaĝo per Kies lumo estas lumigitaj la membroj de la Ĉiela Anaro. Baldaŭ vi troviĝos en granda manko. Vi unuiĝis kun la Reganto de Persujo por fari malbonon al Mi, kvankam Mi estas veninta al vi el la Tagiĝloko de la Ĉionpova, la Granda, kun Kredo kiu refreŝigis la okulojn de la favoratoj de Dio ...*

*Ĉu vi supozis ke vi povos estingi la fajron kiun Dio ekbruligis en la Universo? Ne! Mi deklaras je Lia Vera Animo, se vi nur estus el tiuj kiuj komprenas. Kontraŭe, pro tio kion vi faris ĝiaj brilo kaj flamo pligrandiĝos. Baldaŭ ĝi ĉirkaŭos la mondon kaj ĝian loĝantaron. ... Baldaŭ la Lando de Mistero (Adrianopolo) kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estos ŝanĝitaj, kaj forpaŝos el la manoj de la Reĝo, kaj sekvos ĥaoso, kaj aŭdiĝos veado, kaj malutilo aperos en la regionoj, kaj malordiĝos aferoj pro tio kio okazis al tiuj ĉi malliberigitaj (Bahá'u'lláh kaj Liaj kunuloj) flanke de la armeoj de tiraneco. La direkto de viaj aferoj ŝanĝos sin, kaj la kondiĉoj fariĝos tiel malgajaj, ke eĉ la sablo ĝemados sur dezertigitaj altaĵoj, arboj plorados sur montoj, kaj sango fluos el ĉio, kaj vi vidos la popolon en granda mizero.*

*Tiel la afero estas dekretita de la Dekretanto, la saĝa, kies ordonon armeoj de ĉielo kaj tero ne povas kontraŭstari, nek ĉiuj reĝoj kaj regantoj povas deteni Lin de tio kion Li volas. Katastrofoj estas oleo por tiu ĉi Lampo, kaj per ili la Lumo pligrandiĝas, se vi estus el tiuj kiuj scias! Ĉiuj kontraŭstaraj elmontritaj de la persekutantoj estas vere kiel heroldoj de tiu ĉi Religio, kaj per ili la Apero de Dio kaj Lia Religio estas vaste diskonigitaj inter la popoloj de la mondo.*

Alifoj Li skribis en la Libro Aqdas:

*Ho Terpunkto (Konstantinopolo) kiu kuŝas ĉe la bordoj de la du maroj! La trono de maljusteco estas starigita en vi, kaj en vi estas flamigita la fajro de malamo, en tia maniero ke veas pro tio la Plejsupera Anaro kaj tiuj, kiuj ĉirkaŭas la Altan Tronon. Ni vidas en vi malsaĝulojn kiuj superregas saĝulojn; kaj mallumon kiu fieras super lumo; kaj vere, granda estas via evidenta fiero. Ĉu via ekstera ornamaro faris vin malmodesta? Je Lia*



*Kiu estas la Sinjoro de la homaro! Baldaŭ ĝi pereos, kaj viaj filinoj kaj vidvinoj, kaj tiuj kiuj estas en vi plorveos. Tiel informas vin la Saĝa, la Ĉionscianta. – Kitáb-i-Aqdas*

La sinsekvaj sortobatoj, kiuj trafis la iam potencan imperion de post la publikigo de tiuj ĉi avertoj havigis elokventan komenton pri ilia profeta signifo.

## Ameriko

En la Libro Aqdas revelaciita en Akreo en 1873, Bahá'u'lláh petegis al Ameriko:

*... Ho Regantoj de Ameriko, Prezidentoj kaj Estroj de ĝiaj Respublikoj. ... Aŭdu la vokon el la Tagiĝo de Majesteco: Vere, ne ekzistas alia Dio krom Mi, la Parolanto, la Ĉionscianto. Kunligu la rompitojn per la manoj de justeco, kaj disprenu premantojn per la vergo de la ordono de via Eternulo, la Reganto, la saĝa. – Kitáb-i-Aqdas*

'Abdu'l-Bahá en Siaj paroladoj en Ameriko kaj aliloke multfoje esprimis la esperon, preĝon kaj certigon ke la standardo de internacia paco estos unue levita en Ameriko. En Cincinnati, Ohio, la 5-an de novembro 1912, Li diris:

*Amerikanoj estas nobla nacio, portanta pacstandardon tra la mondo, radiantanta sian lumon al ĉiuj regionoj. Aliaj nacioj ne estas tiel senkatenitaj de intrigoj kiel Usono, kaj ne povas venigi la Universalan Pacon. Sed Ameriko, dank'al Dio, estas en paco kun la tuta mondo, kaj estas inda por levi la standardon de frateco kaj Internacia Paco. Kiam alvoko al internacia paco estos laŭtigita de Ameriko, la cetera mondo ekkrios: "Jes, ni akceptas." La nacioj de ĉiuj mondpartoj unuiĝos en akcepto de la instruoj de Bahá'u'lláh, malkaŝitaj antaŭ pli ol kvindek jaroj. En Siaj Epistoloj Li petis al la parlamentoj de la mondo sendi siajn plej bonajn kaj plej saĝajn homojn al internacia mondparlamento kiu devus decidi ĉiujn demandojn inter la popoloj kaj starigos pacon ... tiam ni havos la Parlamenton de Homo pri kiu revis la profetoj.*

Al la alvokoj de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá jam grandparte respondis Usono, kaj en neniu alia lando de la mondo la bahaaj instruoj renkontis pli pretan akceptemon. La destinita al Ameriko rolo de tiu, kiu alvokos la naciojn al internacia paco, estas tamen ĝis nun nur parte plenumita, kaj bahaanoj atendas kun intereso pluan sekvadon de okazoj kiujn kaŝas en si la estonteco.<sup>1</sup>

## La Granda Milito

Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá en multaj okazoj antaŭdiris kun surpriza precizeco eksplodon de la Granda Milito de 1914-1918. Ĉe Sakramento, en la ŝtato Kalifornio, 'Abdu'l-Bahá diris la 26an de oktobro, 1912: "Hodiaŭ la eŭropa kontinento estas kvazaŭ arsenalo. Ĝi estas provizejo de eksplodaĵoj, atendanta nur unu fajron, kaj unu fajrero povas flami la tutan Eŭropon, speciale en la nuna tempo, kiam la balkana situacio estas antaŭ la mondo."

En multaj el Siaj paroladoj en Ameriko kaj Eŭropo Li prezentis similajn avertojn. En alia parolado en Kalifornio en oktobro 1912 Li diris:

*Ni estas en antaŭtago de la Batalo de Armagedono pri kiu estas parolite en la deksesa ĉapitro de la Apokalipso. La tempo estas du jaroj de nun, kiam unu sola fajrero flavigos la tutan Eŭropon.*

*La socia maltrankvilo en ĉiuj landoj, la kreskanta religia skeptikeco antaŭ la miljaro, kaj jam venintaj, flavigos la tutan Eŭropon kiel estas profetite en la Libro de Daniel kaj en la Libro (Apokalipso) de Johano.*

*Antaŭ la jaro 1917 regnoj falos kaj kataklismoj skuos la teron. (Raportite de s-ino Corinne True en The North Shore Review (Nord-Borda Revuo), 26 septembro 1914, Ĉicago, Usono)*

En la antaŭtago de la granda konflikto Li diris:

*Ĝenerala intermilito de la civilizitaj nacioj estas antaŭ ni. Terurega konflikto alproksimiĝas. La mondo staras ĉe la sojlo de plej tragika batalado. ... Grandaj armeoj-milionoj da homoj - estas mobilizataj kaj postenigataj ĉe landlimoj. Oni sin preparas al terura armiluzo. La plej eta malakordo kaŭzos teruran eksplodon, kaj okazos konfliktego, al kiu similan ne konas la gisnuna historio de la homaro. (en Hajfa, 3 aŭgusto 1914)*

<sup>1</sup> Estas interese ke la ĉarta kunveno de la Unuiĝintaj Nacioj okazis en San-Francisko.

## Sociaj Malfacilaĵoj post la Milito

Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá ambaŭ antaŭdiris periodon de grandaj sociaj malfacilaĵoj, konfliktoj kaj katastrofoj kiel neevitebla rezulto de la nereligieco kaj antaŭjuĝoj, nescio kaj superstiĉoj, kiuj superregas en la mondo. La granda internacia milita konflikto estis nur unu fazo de tiuj malfacilaĵoj. En Tabuleto datumita januaro, 1920, Li skribis:

*Ho vi veramantoj! Ho vi servantoj al la homaro! Pro tio ke la dolĉa parfumo de viaj pensoj kaj altaj celoj elspiris sur min, mi sentas ke mia animo senreziste volas komuniki kun vi.*

*Pripensu en viaj koroj kiel malĝojiga estas la konfuzo en kiu la mondo trempas sin; kiel la nacioj surteraj estas kovritaj per homa sango; ja eĉ ilia grundo fariĝas koaglita sango. La flamo de milito kaŭzis tiel furiozan flagron ke la mondo en siaj fruaj tagoj, en siaj mezaj epokoj, aŭ en la nuntempo neniam vidis ĝian egalon. La muelŝtonoj de milito muelis kaj pistis multajn homajn kapojn, ja eĉ pli severa estis la sorto de ĉi tiuj viktimoj. Prosperantaj landoj dezertiĝis, urboj ebeniĝis, kaj ridetantaj vilaĝoj ruiniĝis. Patroj perdis la filojn, kaj filoj senpatriĝis. Patrinoj verŝis sangolarmojn funebrante la junulojn, infanoj orfiĝis, kaj virinoj fariĝis vagantaj kaj senhejmaj. Unuvorte, la homaro, en ĉiuj siaj fazoj, fariĝis malnobligita. Laŭtiĝas la krioj kaj plorado de orfo, kaj la ĉieloj eĥas la amarajn lamentadojn de patrinoj.*

*La ĉefa kaŭzo de ĉiuj ĉi okazaĵoj estas rasa, nacia, religia, kaj politika antaŭjuĝoj, kaj la radikoj de ĉiuj ĉi antaŭjuĝoj kuŝas en eluzitaj kaj profunde fiksitaj tradicioj, ĉu religiaj, rasaj, naciaj, aŭ politikaj. Tiel longe kiel ĉi tiuj tradicioj restos, la fundamento de homa socio estas nesekura, kaj la homaro mem estas elmetita al daŭra danĝero.*

*Nun en ĉi tiu radiant epoko, kiam la esenco de ĉiuj estaĵoj manifestiĝas, kaj la kaŝita sekreto de ĉiuj kreitaĵoj malkaŝiĝas, kiam la lumo de vero mateniĝas kaj kaŭzas ke la mallumo de la mondo fariĝu lumo, ĉu estas dece kaj taŭge ke okazu tiel terura buĉado kiu portas tiel neripareblan ruinigon sur la mondo? Je Dio! Tio ne povas okazi.*

*Kristo vokis ĉiujn popolojn de la mondo al akordiĝo kaj paco. Li ordonis al Petro remeti la glavon en la ingon. Tio estis Liaj deziro kaj konsilo, kaj tamen la portantoj de Lia nomo elingis la glavon! Kiel granda la diferenco inter iliaj faroj kaj la klara teksto de la Evangelio!*

*Antaŭsesdekjaraj Bahá'u'lláh, ja kiel la brilanta suno, brilis en la ĉielo de Persujo, kaj proklamis ke la mondo estas envolvita en mallumo kaj ke ĉi tiu mallumo estas ŝarĝita per katastrofaj rezultoj, kaj kondukos al terura malpaco. En Sia mallibereja urbo Akreo, Li alparolis per sendubaj esprimoj la Imperiestron de Germanujo, kaj deklaris ke terura milito okazos, kaj ke la popolo de Berlino eklamentos kaj ĝemkrios. Sammaniere, dum Li estis maljuste enkarcerigita de la Sultano de Turkujo en la citadelo de Akreo, Li klare kaj emfaze skribis al li ke Konstantinopolo fariĝos viktimo de grandega malordo, ĝis tia grado ke la virinoj kaj infanoj ĝeme laŭtkrios. Mallongvorte, Li sendis epistolojn al ĉiuj ĉefaj regantoj kaj suverenoj de la mondo, kaj ĉiuj Liaj antaŭdiroj plenumiĝis. El Lia plumo de gloro fluis instruoj por malebligi militon, kaj ĉi tiuj estis vaste dissemiĝitaj.*

*Lia unua instruo estas serĉi la veron. Blinda imitado, Li deklaris, mortigas la homan spiriton, sed la esplorado pri vero liberigas la mondon el la mallumo de antaŭjuĝoj.*

*Lia dua instruo estas la unueco de la homaro. Ĉiuj homoj estas nur unu paŝtataro, kaj Dio estas la amanta Paŝtisto. Li donacas al ili Sian plejan kompaton, kaj konsideras ĉiujn el ili kiel unu. "Vidu neniajn diferencojn inter la kreitoj de Dio." Ĉiuj el ili estas Liaj servantoj, kaj sentas Lian bonfaremon.*

*La tria instruo estas ke religio estas la plej potenca fortikaĵo. Ĝi celu al unueco, prefere ol esti la kaŭzo de malamikeco kaj malamo. Se ĝi kondukos al malamikeco kaj malamo estos pli bone ne havi ĝin. Ĉar religio estas ja simila al medikamento, se ĝi pliiĝas la malsanon, estus prefere forlasi ĝin.*

*Simile, religio, rasa, nacia, kaj politika antaŭjuĝoj, ĉiuj emas renversi la fundamenton de homa socio, ĉiuj kondukas al sangoverŝo, ĉiuj ruiniĝas la homaron. Tiel longe kiel ĉi tiuj antaŭjuĝoj restos, daŭros la timigo pri milito. La sola kuracilo estas universala paco. Kaj tion oni atingos nur per la starigo de supera Tribunalo, reprezenta de ĉiuj registaroj kaj popoloj. Ĉiuj naciaj kaj internaciaj problemoj estu transdonitaj al ĉi tiu tribunalo, kaj kio ajn estu ĝia decido tio estu deviga. Se registaro aŭ popolo malkonsentus, la tuta mondo leviĝu kontraŭ ĝi.*

*Kaj inter Liaj instruoj estas la egaleco de rajtoj inter viroj kaj virinoj, kaj tiel plu pri multaj aliaj similaj instruoj revelaciitaj per Lia plumo.*

*Nuntempe evidentiĝas kaj malkaŝiĝas ke ĉi tiuj principoj estas ja la vivo de la mondo, kaj la enkorpiĝo de ĝia vera spirito. Kaj nun, vi, kiuj estas la servantoj al la homaro, penadu, tutkore kaj tutanime, liberigi la mondon el la mallumo de materiismo kaj homa antaŭjuĝo, por ke ĝi lumiĝu per la lumo de la Urbo de Dio.*

*Laŭdoj estu al Li, ke vi konas la diversajn lernejojn, instituciojn kaj principojn de la mondo; nuntempe nenio krom ĉi tiuj diaj instruoj povas certigi pacon kaj trankvilon al la homaro. Sen ĉi tiuj instruoj, ĉi tiu mallumo neniam malaperos, ĉi tiuj daŭraj malsanoj neniam kuraciĝos; ja ili fariĝos pli teruraj tagon post tago. La Balkanoj restos senripozaj, kaj ilia kondiĉo pligraviĝos. La venkitoj ne silentos, sed kaptos ĉiun rimedon por ekbruligi denove la flamon de milito. Nuntempaj universalaj movadoj faros sian plejon por plenumi siajn celojn kaj planojn. La Movado de la Maldekstro akiros grandegan gravecon, kaj ĝia influo disvastiĝos.*

*Do penadu, por ke, per lumiga koro, ĉiela spirito, kaj dia forto, kaj helpe de Lia graco, vi donacu la malavaran donacon de Dio al la mondo ... la donaco de konsolo kaj trankvileco por la tuta homaro.*

En prelego, kiun Li faris en novembro 1919, Li diris:

*Bahá'u'lláh multfoje antaŭdiris ke venos periodo kiam superregos nereligieco kaj sekve de tio anarkio. La ĥaoso estos ŝuldata al tro granda libereco de popolo kiu ne estas preparita al ĝi; kaŭze de tio devos okazi portempa reveno al perforta registaro, por la bono de la popolo mem kaj por malebligi malordon kaj ĥaoson. Klare estas ke ĉiuj nacioj deziras nun kompletan memregadon kaj liberecon de agado, sed kelkaj el ili ne estas maturaj por tio. La reganta stato en la mondo nun estas nereligieco, kiu nepre devas finrezultiĝi anarkion kaj ĥaoson. Mi ĉiam diras ke la pacaj proponoj sekvantaj la grandan militon estas apenaŭ ekbrilo de mateniĝo, kaj ne sunleviĝo.*

### Veno de la Regno de Dio

Meze de la malfacilaĵoj de tiuj tempoj, la Religio de Dio tamen prosperos. La malfeliĉoj kaŭzigitaj de egoista batalado por individua ekzisto, aŭ por partia, sekta aŭ nacia profito, igos homojn turni sin en malespero al la kuracilo kiun donas la Vorto de Dio. Ju pli abunde venas la malfeliĉoj, des pli la homoj sinturnos al la sola vera kuracilo. Bahá'u'lláh diras en Sia Epistolo al la ŝaho:

*Dio faris afliktojn kvazaŭ matena pluvo por tiu ĉi verda paŝtejo, kaj kvazaŭ meĉo por Sia Lampo, per kiu la tero kaj ĉielo estos lumigitaj. ... Per afliktoj brilis Lia Lumo kaj senĉese brilladia estis Lia Gloro; tio ĉi estis Lia metodo dum la malnovaj jarcentoj kaj pasintaj tempoj.*

Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá ambaŭ antaŭdiris en plej konfidoplenaj esprimoj rapidan triumfon de spiriteco super materialismo kaj sekvantan el tio estiĝon de la Plej Granda Paco. 'Abdu'l-Bahá skribis en la jaro 1904:

*Sciu tion, ke la malfacilaĵoj kaj malfeliĉoj pligrandiĝos tagon post tago, kaj la popoloj estos turmentitaj. La pordoj de ĝojo kaj feliĉo estos ĉiufanke fermitaj. Teruraj militoj okazos. Senreviĝo kaj espartrompo atakos la homojn de ĉiuj direktoj ĝis ili estos devigitaj turni sin al Dio. Tiam la lumo de grandega feliĉo lumigos la horizontojn, tiel ke la krio "Ja Baha'u'l-Abhá!" eksonos sur ĉiuj flankoj. – Tabuleto al L. D. B., citita en Compilations on War and Peace, p. 187 (Kompilado de Milito kaj Paco)*

Demandite en februaro 1914, ĉu iu el la grandaj ŝtatoj fariĝos kredantoj, Li respondis:

*Ĉiuj popoloj de la mondo fariĝos kredantoj. Se vi komparas la komencon tiele de la Religio kun ĝia hodiaŭ stato, vi vidus kiel rapidan influon havas la Vorto de Dio, kaj nun la Religio de Dio estas ĉirkaŭinta la mondon. ... Sendube, ĉiuj venos sub la ombron de la Religio de Dio.*

Li deklaris ke la plenumiĝo de monduneco okazos dum la nuna jarcento. En unu el Siaj Tabuletoj Li skribis:

*... Ĉiuj anoj de la homa familio, ĉu popoloj aŭ registaroj, urboj aŭ vilaĝoj, fariĝos pli kaj pli interdependaj. Memsufiĉeco ne estas plu ebla, ĉar politikaj ligiloj unuigas ĉiujn popolojn kaj naciojn, kaj la interligiloj de komerco kaj industrio, de agrikulturo kaj edukado, estas fortigitaj ĉiutage. Sekve la unueco de la tuta homaro estas atingebla nuntempe. Vere tio ĉi estas nur unu el la mirindaĵoj de ĉi tiu mirinda jarcento. Antaŭaj epokoj estis senigitaj de tio, ĉar ĉi tiu jarcento – la jarcento de lumo – estas dotita per unikaj kaj senprecedentaj gloro, potenco kaj lumado. Sekve la mirakla disvolviĝo de nova mirindaĵo ĉiutage. Poste oni vidos, kiel brile ĝiaj kandeloj brulos inter la homaro.*

En la du lastaj versoj de la Libro de Daniel troviĝas la jenaj misteraj vortoj: "Feliĉa estas tiu, kiu atendas kaj atingos la tempon de mil tricent tridek kvin tagoj. Kaj vi, ho Daniel, foriru ĝis la fino; kaj ripozu, kaj vi stariĝos por via sorto en la fino de la tempoj."

Multaj estis la penoj de saĝuloj por solvi la problemon de la signifo de tiuj ĉi vortoj. En unu ĉetabla interparolo kiun la aŭtoro ĉeestis, 'Abdu'l-Bahá kalkulis la plenumon de la profetaĵo de Daniel de la komenca dato de la islama erao.

La Tabuletoj de 'Abdu'l-Bahá klarigas ke ĉi tiu profetaĵo aludas al la centa datreveno de la Deklaro de Bahá'u'lláh en Bagdado, aŭ la jaron 1963:

*Nun rilate la verson en Daniel, kies interpretaĵon vi petis, nome, "Feliĉa estas tiu, kiu atingos la tempon de la mil tricent tridek kvin tagoj." Ĉi tiuj tagoj estu kalkulitaj laŭ sunaj kaj ne lunaj jaroj. Ĉar laŭ ĉi tiu kalkulo pasos jarcento de la leviĝo de la Suno de Vero, tiam la instruoj de Dio estos firme starigitaj surtere, kaj la Dia Lumo superŝutos la mondon de la Oriento ĝis la Okcidento. En tiu tago, ĝojos la fidelaj!*

### Akreo kaj Hajfa

Mírzá Aĥmad Sohrab priskribas en sia taglibro la sekvantan profetaĵon pri Akreo kaj Hajfa eldiritan de 'Abdu'l-Bahá kiam Li sidis ĉe fenestro de unu el la Bahaaj Pilgrimdomoj en Hajfa, la 14an de februaro, 1914:

*La panoramo el la Pilgrimdomo estas tre ĉarma, speciale pro tio ke ĝi frontas la Benitan Tombon de Bahá'u'lláh. En estonteco la distanco inter Akreo kaj Hajfa estos plenkonstruita, kaj la du urboj kuniĝos kaj unuiĝos per manpremo, iĝante du ekstremoj de unu potenca ĉefurbo. Kiam mi rigardas nun tiun ĉi pejzaĝon, mi vidas tute klare ke ĝi fariĝos unu el la unuaj komercocentroj en la mondo. La granda duoncirkla golfo estos transformita en belegan havenon, en kiu ŝipoj de ĉiuj nacioj serĉos ŝirmejon kaj rifuĝon. Grandaj ŝipoj de ĉiuj popoloj venos en tiun ĉi havenon, portante sur siaj ferdekoj multajn milojn da viroj kaj virinoj el ĉiu parto de la globo. La monto kaj la ebenaĵo estos kovritaj per plej modernaj konstruaĵoj kaj palacoj. Establitaĵoj estos industrioj kaj diversaj institucioj de filantropia karaktero estos fonditaj. La floroj de civilizacia kulturo de ĉiuj nacioj estos portataj ĉi tien por kunmiksi siajn aromojn kaj lumigi la vojon al la homa frateco. Mirindaj ĝardenoj, fruktoĝardenoj, boskoj kaj parkoj estos plantitaj ĉiuflanke. La tuta haveno de Akreo kaj Hajfa estos unu vojo de iluminado. Fortaj lumturoj estos konstruitaj sur ambaŭ flankoj de la monto Karmelo por gvidi vaporŝipojn. La monto Karmelo mem, de la supro ĝis la malsupro, estos trempita en maro da lumoj. Persono staranta sur la pinto de Karmelo, kaj la pasaĝeroj de la ŝipoj venantaj al ĝi, rigardos la plej ravan kaj majestan vidaĵon de la tuta mondo.*

*El ĉiuj flankoj de la monto oni aŭdadas la simfonion de "Ja Bahá'u'l-Abhá!" kaj antaŭ tagiĝo la animsorĉanta muziko akompanata de melodioj sinlevos al la trono de la Ĉionpova.*

*Vere, la vojoj de Dio estas misteraj kaj nepenetreblaj. Kia ekstera rilato ekzistas inter Ŝirazo kaj Teherano, Bagdado kaj Konstantinopolo, Adrianopolo kaj Akreo kaj Hajfa? Dio laboris pacience, paŝon post paŝo, tra ĉi tiuj diversaj urboj, konforme al Sia propra difinita kaj eterna plano, tiel ke la antaŭdiroj kaj profetaĵoj diritaj de la Profetoj estu plenumitaj. La ora fadeno de promeso koncerne la Mesian Miljaron estas plektita tra la Biblio, kaj estis tiel destinita ke Dio en Sia propra tempo kaŭzos ĝian realiĝon. Eĉ ne unu sola vorto estos lasita sensignifa kaj neplenumita.*

## ĈAPITRO XV: RERIGARDO KAJ PERSPEKTIVO

*Mi atestas, ho amikoj! ke la favoro estas kompleta, la argumento certigita, la pruvo elmontrita kaj la atesto plenumita. Ni nun konstata, laŭ la volo de sinofero, kion viaj penemoj malkaŝos. Tiamaniere la dia favoro plenumita estis al vi kaj al ĉiuj en la ĉielo kaj sur la tero. Laŭdata estu Dio, la Eternulo de ĉiuj mondoj. – Bahá'u'lláh, La Kaŝitaj Vortoj*

### Progreso de la Religio

Bedaŭrinde ne estas eble, en tiu ĉi verko, detale priskribi la progresadon de la Bahaa Religio tra la mondo. Multan ĉapitrojn oni povus dediĉi al tiu ĉi interesega temo, kaj multajn kortuŝajn historiojn oni povus rakonti pri la pioniroj kaj martiroj de la Religio, sed ni devas kontentiĝi per tre mallonga skizo.

En Persujo la fruaj konfesantoj de tiu ĉi revelacio renkontis ekstreman kontraŭstaron, persekutadon kaj kruelecon flanke de siaj samlandanoj, sed ili akceptis ĉiujn malfeliĉojn kaj sortoprovojn per altaj heroeco, firmeco kaj pacienco. En sia propra sango ili estis baptitaj, ĉar multaj miloj da ili pereis kiel martiroj; dum miloj da aliaj estis batataj, malliberigitaj, rabitaj de siaj posedaĵoj, elpelitaj el la hejmoj aŭ persekutataj en aliaj manieroj. Dum sesdek jaroj aŭ eĉ pli longe ĉiu en Persujo kiu kuraĝis konfesi lojalecon kun Báb aŭ Bahá'u'lláh faris tion ĉi je la risko de sia propraĵo, sia libereco kaj eĉ sia vivo. Tamen tiu ĉi decida kaj kruela kontraŭstarado ne povas pli sufoki la progreson de la Religio, ol polva nuboj povus deteni la sunleviĝon.

De unu landlimo de Persujo<sup>1</sup> ĝis la alia oni povas nun trovi bahaanojn en preskaŭ ĉiu urbo kaj urbeto, kaj eĉ inter la nomadoj. En kelkaj vilaĝoj la tuta loĝantaro estas bahaa kaj en aliaj lokoj la kredantoj formas grandan parton de la loĝantaro. Rekrutite el multaj kaj diversaj sektoj, kiuj estis pasie malamikaj unu kontraŭ alia, ili nun formas grandan anaron da amikoj kiuj konfesas fratecon, ne nur kun unu la alian, sed kun ĉiuj homoj ĉie, kiuj laboras por unuigi kaj ekzalti la homaron, por forigi ĉiajn antaŭjuĝojn kaj konfliktojn, kaj por fondi la Regnon de Dio en la mondo.

Kia miraklo povus esti pli granda ol tio? Nur unu, kaj tio estas tramonda plenumo de la tasko al kiu sin dediĉis tiuj homoj. Kaj signoj ne mankas ke ankaŭ tiu ĉi pli granda miraklo progresas. La Kredo montras mirindan vivoforton, kaj ĝi disvastiĝas, kiel fermentaĵo, tra la homamaso, transformanta la popolon kaj la socion dum ĝi disvastiĝas.<sup>2</sup>

La relative malmulta nombro da bahaanoj ŝajnus esti ankoraŭ sensignifa kompare al la sekvantoj de la aliaj religioj, sed ili certas, ke dia Forto benas ilin per la granda privilegio servi al nova mondordo en kiu venos la homamasoj de Oriento kaj Okcidento en ne tre malproksima tago.

Sekve, kvankam estas vere, ke la Sankta Spirito respeguliĝas el puraj koroj en ĉiuj landoj ankoraŭ senkonsciaj pri la Fonto, kaj la disvastiĝo de la Kredo videbliĝas en la multaj penoj ekster la bahaa komunumo antaŭenigi iun aŭ alian de la instruoj de Bahá'u'lláh, tamen la manko de daŭra fundamento en la malnova mondordo estas konvinka pruvo ke la idealoj de la Regno povas fariĝi fruktodonaĵoj nur en la kadro de la bahaa komunumo.

### Profeteco de Báb kaj Bahá'u'lláh

Ju pli multe ni studas la vivojn kaj instruojn de Báb kaj Bahá'u'lláh, des pli neeble ŝajnas trovi iun klarigon de Ilia grandeco, krom la Dia Inspiro. Ili estas edukitaj en atmosfero de fanatikeco kaj bigoteco. Ili havis apenaŭ elementan edukadon. Ili havis nenian kontakton kun la okcidenta kulturo. Ili havis nenian politikan aŭ financan subtenan forton. Ili nenion petis de la homoj, kaj ricevis malmulte krom maljusteco kaj persekutado. La potenculoj de la tero ignoris aŭ kontraŭstaris Ilin. Ili estis skurgataj kaj torturataj, malliberigitaj kaj subigataj al plej teruraj malfeliĉoj en la plenumo de Sia misio. Ili estis solaj kontraŭ la mondo, havante neniun helpanton krom Dio, tamen Ilia triumfo jam estis evidenta kaj grandioza.

La grandeco kaj alteco de Iliaj idealoj, la nobleco kaj sinoferemo de Iliaj vivoj, Iliaj netimigeblaj kuraĝoj kaj konvinko, Iliaj mirigaj saĝeco kaj scio, Ilia kompreno de la bezonoj de la orientaj kaj okcidentaj popoloj, la klareco kaj taŭgeco de Iliaj

<sup>1</sup> Lordo Curzon, en sia libro, *Persia and the Persian Question*, (Persujo kaj la Persa Problemo), eldonita en 1892, la jaro de la morto de Bahá'u'lláh, skribas: "La plej malalta takso de la nuntempa nombro da bahaanoj en Persujo estas duona miliono. Mi emas opinii, post konversacio kun kapablaj personoj, ke la nombro estas ĉirkaŭ miliono. Ili troviĝas en ĉiu vivnivelo, de ministroj kaj nobeluloj de la Kortejo al stratpurigistoj aŭ ĉevalservistoj, kaj sufiĉe nombraj inter ili estas la islamaj pastroj mem. ... Se la Bábismo daŭros kreski same rapide kiel nun, povas esti ke venos tempo kiam ĝi elpuŝos la Islamismon el la lando Persujo. Tio, laŭ mia opinio, ne estus ebla, se ĝi estus aperinta sub standardo de malamika religio. Sed pro tio ke ĝiaj membroj venas el inter la plej kapablaj soldatoj de la garnizono kiun ĝi estas atakanta, estas pli kredeble ke ĝi fine sukcesos." (Vol. i, pp. 499-502).

<sup>2</sup> La bahaanaro plimultiĝas ĉiujare kaj en 1969 la nombro de lokoj tra la mondo kie loĝas bahaanoj fariĝis pli ol 33,000. (Vidu la Epilogon.)

instruoj, Ilia povo inspiri en Siaj sekvantoj tutkorajn sindonemon kaj entuziasmon, la penetremo kaj potenco de Ilia influo, la progreso de la fondita de Ili Religio - ĉio tio sendube prezentas tiajn konvinkajn pruvojn de profeteco kiajn nur povas elmontri la historio de religio.

### **Glorplena Perspektivo**

La bahaa ĝoja novaĵo prezentas bildon de la Favoro de Dio kaj de la estonta progreso de la homa gento, kio certe estas la plej granda kaj plej glora Revelacio iam donita al la homaro, la plenevoluo kaj plenumo de ĉiuj antaŭaj Revelacioj. Ĝia celo estas nenio alia ol revivigo de la homaro kaj kreo de "nova ĉielo kaj nova tero". Tio ĉi estas la sama tasko, al kiu Kristo kaj ĉiuj aliaj profetoj dediĉis siajn vivojn, kaj inter tiuj grandaj instruistoj ekzistas nenia rivaleco. La tasko estos plenumita ne per tiu Revelacio aŭ per alia, sed per ĉiuj kune.

Kiel diras `Abdu'l-Bahá:

*Ne estas necese malaltigi Abrahamon por altigi Jesuon. Ne estas necese malaltigi Jesuon por proklami pri Bahá'u'llah. Ni devas bonvenigi la Veron de Dio, kie ajn ni vidas ĝin. La esenco de la demando estas ke ĉiuj tiuj grandaj Disendiĵoj venis por levi la Dian Standardon de Perfektecoj. Ĉiuj ili brilas kiel astroj en tiu sama ĉielo de la Dia Volo. Ĉiu el ili donas Lumon al la mondo.*

Tio ĉi estas la tasko de Dio, kaj Dio alvokas ne nur Profetojn sed ĉiujn homojn ke ili kunagu kun Li en tiu ĉi krea laboro. Se ni malakceptos Lian alvokon, ni ne detenos la aferon de antaŭenmarŝo, ĉar kion Dio volas tio nepre efektiviĝos. Se ni ne plenumos nian rolparton Li povas destini aliajn instrumentojn por ke ili efektivigu Lian intencon; sed ni preterpasos la veran celon kaj taskon de nia propra vivo. Reakordiĝo kun Dio - iĝante Liaj amatoj, Liaj servantoj, volplenaj fluejoj kaj perantoj de Lia Krea Povo, ĝis ni konscios en ni mem nenian vivon krom Lia Dia kaj abunda vivo - jen kio, laŭ la bahaa instruo, estas la nedirebla kaj glorplena plenumiĝo de la homa ekzisto.

La homaro estas tamen esence puranima, ĉar ĝi estas kreita "laŭ la bildo de Dio, simile al Li", kaj kiam ĝi fine ekvidos la veron, ĝi ne daŭriĝos laŭ la vojo de malsaĝeco. Bahá'u'lláh certigas ke baldaŭ la alvoko de Dio estos ĝenerale akceptita, kaj la tuta homaro turnos la vizaĝon al justeco kaj obeemo. "Ĉiu zorgo ŝanĝos sin tiam en ĝojon, kaj ĉiu malsano en sanon", kaj la regnoj de tiu ĉi mondo fariĝos "la regnoj de nia Eternulo kaj de Lia Kristo; kaj Li reĝos por ĉiam kaj eterne." (Apok. XI, 15). Ne nur tiuj kiuj estas sur la tero, sed ĉiuj en la ĉielo kaj sur la tero, unuiĝos en Dio kaj eterne ĝojos en Li.

### **Renovigo de Religio**

La hodiaŭa stato de la mondo prezentas sufiĉan atestaĵon ke, kun malmultaj esceptoj, la popoloj de ĉiuj religioj bezonas esti revekitaj al la vera signifo de siaj religioj. Tiu ĉi reveko estas grava parto de la misio de Bahá'u'lláh. Li venas por fari kristanojn pli bonaj kristanoj, por fari islamanojn pli bonaj islamanoj, por fari ĉiujn homojn fidelaj al la spirito kiu inspiris iliajn Profetojn. Li ankaŭ plenumas la promeson farita de ĉiuj tiuj Profetoj pri la glora Malkaŝanto kiu estos aperonta en la "Pleneco de la Tempo" por kroni kaj finplenumi llian laboron. Li donas pli plenan elvolvon de la spiritaj veroj ol Liaj antaŭintoj, kaj malkaŝas la Volon de Dio rilate al ĉiuj problemoj de individua kaj socia vivo kiuj prezentas sin al ni en la hodiaŭa mondo. Li donas universalan instruon kiu konstruas fortan fundamenton sur kiu povas esti bazita nova kaj pli bona civilizacio, instruon adaptitan al bezonoj de la mondo en la nova nun komenciĝanta epoko.

### **Bezono de Nova Revelacio**

La unuigo de la homaro, kunfandigo de ĉiuj diversaj mondreligioj, reakordigo de Religio kaj Scienco, starigo de Universala Paco, de Internacia Arbitracio, de Universala Domo de Justeco, de Internacia Lingvo, Emancipo de Virinoj, Universala Edukado, nuligo ne nur de la Korpa, sed ankaŭ de la Industria Sklaveco, Organizo de la Homaro kiel sola tutaĵo, kun ĝusta respekto de la rajtoj kaj libereco de ĉiu individuo - ĉio ĉi estas problemoj de giganta grandeco kaj kolosa malfacileco rilate al kiuj kristanoj, islamanoj kaj konfesantoj de aliaj religioj akceptis kaj ankoraŭ persistas en plej diversaj kaj ofte akre kontraŭaj opinioj, sed Bahá'u'lláh klare malkaŝis difinitajn principojn, kies ĝenerala adopto sendube faros la mondon paradizo.

### **Vero Estas por Ĉiuj**

Multaj homoj estas pretaj konfesi ke la bahaaj instruoj estus bonegaj por Persujo kaj por la Oriento, sed ili opinias ke por la okcidentaj popoloj tiuj instruoj estas nenecesaj aŭ nekonvenaj. Al iu, kiu menciis tian opinion, `Abdu'l-Bahá respondis:

*Koncerne la signifon de la Kredo de Bahá'u'lláh, kio ajn rilatas al universala bono estas dia, kaj kio ajn estas dia, estas por la universala bono. Se ĝi estas vero, ĝi estas por ĉiuj; se ne, ĝi estas por neniu; tial dia afero de universala bono ne povas esti limigita al la Oriento aŭ la Okcidento, ĉar la brilego de la Suno de Vero lumigas same orienton kaj okcidenton, kaj sentigas sian varmon en la Sudo kaj en la Nordo nenia diferenco estas inter unu Poluso kaj la alia. En la tempo de la Revelacio de Kristo, la romanoj kaj grekoj supozis ke Lia afero estas speciale por la judoj. Ili supozis ke ili havas perfektan civilizacion kaj bezonas nenion lerni de la instruoj de Kristo, kaj pro tiu ĉi falsa opinio multaj estis senigitaj de Lia Favoro. Sciu simile ke la principoj de kristanismo kaj la Instruoj de Bahá'u'lláh estas identaj kaj samaj estas iliaj vojoj. En ĉiu tago estas progreso. Estis tempo, kiam tiu ĉi dia institucio (de progressa revelacio) estis embrio, tiam ĵus-naskito, tiam infano, tiam intelekta junulo; kaj hodiaŭ ĝi radias belecon kaj lumas kun grandega brileco. Feliĉa estas tiu kiu divenas la misteron kaj okupas lokon en la mondo de lumigitoj.*

### **La Lasta Volo kaj Testamento de `Abdu'l-Bahá**

Kun la morto de sia amata gvidanto, `Abdu'l-Bahá, la Bahaa Kredo eniris novan fazon de sia historio. Ĉi tiu nova fazo reprezentis pli altan staton en la ekzisto de la sama spirita organismo, pli maturan kaj sekve pli respondecan esprimon de la kredo parte de ĝiaj anoj. `Abdu'l-Bahá dediĉis Siajn superhomajn energion kaj unikan kapablecon al la tasko dissemi Sian amon al Bahá'u'lláh tra la Oriento kaj Okcidento. Li lumigis la kandelon de kredo en sennombraj animoj. Li instruis kaj gvidis ilin en la atribuoj de persona spirita vivo. Konsiderante la grandegan signifon de la Lasta Volo kaj Testamento de `Abdu'l-Bahá, la gravecon de la sekvoj rezultantaj el ĝi kaj la profundan saĝecon formantan la fundamenton de ĝiaj decidoj, ni donas kelkajn pluajn elĉerpaĵojn kiuj brile bildigas la spiriton kaj ĉefprincipojn kiuj donis spiron kaj gvidon al `Abdu'l-Bahá kaj estas transdonitaj kiel riĉa heredaĵo al Liaj fidelaj sekvantoj:

*Ho vi amatoj de la Eternulo! En tiu ĉi sankta Epoko konflikto kaj malpaco estas nenial permeseblaj. Ĉiu malpaciganto senigas sin mem de la Dia favoro. Estas devige al ĉiu elmontri plej grandan amon, honestecon de la konduto, sincerecon kaj rektan afablecon al ĉiuj gentoj kaj popoloj de la mondo, ĉu ili estas amikoj ĉu fremduloj. Tiel intensa devas esti la spirito de amo kaj kor-afableco, ke fremdulo eksentu sin kiel amiko, malamiko kiel vera frato, sen ia ajn diferenco inter ili. Ĉar universaleco estas de Dio kaj ĉiaj limigoj estas terdevenaj. ...*

*Tial, ho miaj amataj amikoj! interrilatu kun ĉiuj popoloj, gentoj kaj religioj de ia mondo kun plej granda honesteco, lojaleco, fideleco, afableco, bonvolemo kaj amikeco; tiel ke la tuta mondo de kreaĵoj estu plenigita per la sankta ekstazo de la favoro de Bahá, ke malklereco, malamikeco, malamo kaj malbonvolo malaperu el la mondo kaj la mallumo de fremdeco inter la popoloj kaj gentoj de la mondo cedu lokon al la Lumo de Unueco. Se aliaj popoloj kaj nacioj estus malfidelaj al vi elmontru vian fidelecon al ili; se ili estus maljustaj kontraŭ vi elmontru justecon al ili; se ili tenus sin aparte de vi, allogu ilin al vi; se ili elmontrus malamikecon estu amikaj al ili; se ili venenus vian vivon, dolĉigu iliajn animojn; se ili vundus vin, estu balzamo por iliaj doloroj. Tiaj estas la ecoj de sinceruloj! Tiaj estas la ecoj de fideluloj.*

*Ho vi amatoj de la Eternulo! Estas devige al vi esti cedemaj al ĉiuj monarĥoj kiuj estas justaj kaj elmontri vian fidelecon al ĉiu justa reĝo. Servu la regantojn de la mondo kun plejgranda fideleco kaj lojeleco. Elmontru obeemon al ili kaj estu iliaj bondezirantoj. Sen ilia rajtigo kaj permeso ne miksu vin en politikajn aferojn, ĉar mallojaleco al justa suvereno estas mallojaleco al Dio Mem.*

*Tio ĉi estas mia konsilo kaj la ordono de Dio al vi. Bone estas al ili kiuj laŭe agas.*

*Sinjoro! Vi vidas kiel ĉio ploras pro mi kaj miaj parencoj ĝojas pri mia sufero. Je Via Gloro, ho mia Dio! Eĉ inter miaj malamikoj, kelkaj priploris miajn ĉagrenojn kaj malfeliĉojn, kaj inter enviuloj kelkaj verŝis larmojn pro miaj zorgoj, miaj ekzilo kaj afliktoj. Ili lamentis ĉar ili trovis en mi nenion krom sufero kaj zorgo kaj vidis nenion krom afableco kaj pardonemo. Kiam ili vidis min forviŝitan de torento de malĝojoj kaj mizeroj kaj elmetitan kiel celo al la saĝoj de la sorto, iliaj koroj estis tuŝitaj de kompato, larmoj venis en iliajn okulojn kaj ili atestis deklarante: "La Eternulo estas nia atestanto: ni vidis en li nenion krom fideleco, grandanimeco kaj plejgranda kompatemo". Plifortiĝis, tamen, la malamo de la rompantoj de la Sankta Interligo, la anoncantoj de malbono, ili ĝojis ke mi iĝis viktimo de la plej afliktaj provoj, ili ekmoviĝis kontraŭ mi kaj festis pro la korŝirantaj aferoj okazintaj al mi.*

*Mi vokas al Vi, ho Eternulo mia Dio! per la lango kaj per la tuta koro, ke Vi ne repagu al ili ilian kruelecon kaj malbonajn agojn, iliajn ruzojn kaj malbonfarojn, ĉar ili estas malsaĝaj kaj neindaj kaj ne scias kion ili faras. Ili ne distingas bonon de malbono, nek pravon de malpravo, nek justecon de maljusteco. Ili sekvas siajn proprajn dezirojn kaj sekvas la piedsignojn de la plej malperfektaj kaj malsaĝaj inter si. Ho mia Eternulo! Havu kompaton por ili, ŝirmu ilin de ĉiaj afliktoj en tiu ĉi zorgoplena tempo kaj permesu ke ĉiuj provoj kaj*

*malfacilaĵoj estu la sorto de tiu ĉi Via servanto kiu falis en tiun ĉi malluman kavon. Destinu min por ĉiu sufero kaj faru ke mi estu oferaĵo por ĉiuj Viaj amatoj. Ho Eternulo, Plej Alta! Mia animo, mia vivo, mia estaĵo, mia spirito estu oferitaj por ili! Ho Dio, mia Dio! Humile, petege kaj falinte sur la vizaĝon, mi preĝas al Vi kun la tuta ardo de mia alvoko ke Vi pardonu ĉiun kiu vundis min, senkulpigu ĉiun kiu konspiris kontraŭ mi kaj ofendis min, kaj forlavu la malbonfarojn de tiuj kiuj faris al mi maljustaĵon. Favordonu al ili Viajn havindajn donacojn, donu al ili ĝojon, liberigu ilin de malĝojo, donacu al ili pacon kaj prosperon, donu al ili Vian feliĉegon kaj verŝu sur ilin Vian favoron.*

*Vi estas Ĉionpova, Favora, Helpanto en Danĝero, Mem-Ekzistanta.*

*La disĉiploj de Kristo forgesis sin kaj ĉiujn terajn aferojn, forlasis ĉiujn siajn zorgojn kaj apartenaĵojn, purigis sin de personeco kaj pasio kaj kun absoluta sinoferemo disiris malproksimen alvokante la popolojn de la mondo al la Dia Gvidado, ĝis fine ili faris la mondon alia mondo, lumigis la supraĵon de la tero, kaj eĉ ĝis sia lasta horo elmontris sinoferemon en la vojo de la Amato de Dio. Fine en diversaj landoj ili suferis gloran martiriĝon. Tiuj kiuj estas homoj de ago sekvu iliajn piedsignojn.*

*Ho Dio, mia Dio! Mi alvokas Vin, Viajn Profetojn kaj Senditojn, Viajn Sanktulojn kaj Benitojn, por atesti ke mi findecide deklaris Viajn Pruvojn al Viaj amatoj kaj klare prezentis al ili ĉiujn aferojn, por ke ili ŝirmu Vian Kredon, gardu Vian Rektan Vojon kaj defendu Vian Brilegan Leĝon. Vi estas vere la Ĉionscianta, la Plej Saĝa!*

Post la forpaso de `Abdu'l-Bahá, venis la tempo por starigi la administradon kiun oni nomas modelo kaj nukleo de tiu mondordo kiun starigi estas la speciala misio de la religio de Bahá'u'lláh. La Testamento de `Abdu'l-Bahá sekve signas turnopunkton en baha historia, apartigante la epokon de senmatureco kaj nerespondeco de tiu epoko en kiu la bahaanoj mem estas destinitaj plenumi sian spiritecon per plivastigo de ĝia amplekso el la afero de personaj travivaĵoj al tiu de socialaj unueco kaj kunlaboro. La tri principaj elementoj de la administra plano testamentita de `Abdu'l-Bahá estas:

1. "La Gardanto de la Religio de Dio,"
2. "La Manoj de la Religio de Dio," kaj
3. "La Domoj de Justeco, Lokaj, Naciaj kaj Universala."<sup>1</sup>

### La Gardanto de la Religio de Dio

`Abdu'l-Bahá destinis Sian plej aĝan nepon, Shoghi Effendi, al la respondeca posteno de la "Gardanto de la Religio de Dio" (Valiyy-i-Amru'lláh). Shoghi Effendi estas la plej aĝa filo de Díyá'íyyih Khánum, la plej aĝa filino de `Abdu'l-Bahá. Lia patro, Mírzá Hádí, estas parenco de Báb (kvankam ne en la rekta linio, ĉar la sola ido de Báb mortis en infaneco). Shoghi Effendi havis la aĝon de dudek kvin jaroj kaj studis en la Balliol-Kolegio en Oksfordo, en la tempo de la morto de sia avo. La nomumo estis anoncita en la Testamento per la sekvantaj vortoj:

*Ho miaj amantaj geamikoj! Post la forpaso de tiu ĉi suferigito, estas devige al la Aghsán (Branĉoj), la Afnán (Branĉetoj) de la Sankta Lotusarbo, la Manoj (Kolonoj) de la Religio de Dio kaj la amatoj de la Abhá Belo turni sin al Shoghi Effendi - la juna branĉo elkreskinta el la du benitaj kaj sanktaj Lotusarboj kaj frukto naskita el la unuiĝo de la du elkreskaĵoj de la Arbo de Sankteco - ĉar li estas la signo de Dio, la elektita branĉo, la gardanto de la Religio de Dio, al kiu devas sin turni ĉiuj Aghsánoj, Afnánoj, la Manoj de la Religio de Dio kaj Liaj amatoj. Li estas klariganto de la vortoj de Dio kaj estas sekvota de la unua-naskito el siaj rektliniaj posteuloj.*

*La sankta kaj juna branĉo, la gardanto de la Religio de Dio, kiel ankaŭ la Universala Domo de Justeco, universale elektota kaj fondota, ambaŭ estas en la zorgado kaj protektado de la Abhá Belo, sub la ŝirmo kaj neerara gvidado de Lia Sankteco, la Laŭdegato (mia vivo estu oferita al ili!). Kion ajn ili decidis, estas de Dio.*

...

*Ho vi amatoj de la Eternulo! Estas devige al la gardanto de la Religio de Dio elekti dum sia propra vivotempo tiun kiu estos lia sekvanto, por ke malpacoj ne ekestu post lia morto. La elektito devas elmontri apartecon de ĉiuj mondaj aferoj, li devas esti la esenco de pureco, devas evidentigi en si timon de Dio, scion, saĝon kaj instruitecon. Tiel, se la unuanaskito de la gardanto de la Religio de Dio ne manifestas en si mem la verecon de la vortoj: "Infano estas la esotera esenco de sia patro", t.e. se li ne heredos (de la gardanto de la Religio*

<sup>1</sup> La Lokaj kaj Naciaj Domoj de Justeco nuntempe nomiĝas Lokaj kaj Naciaj Spiritaj Asembleoj, kiel menciite antaŭe.



*de Dio) liajn spiritaĵojn ecojn kaj lia glora deveno ne estos ligita kun bela karaktero, tiam li (la gardanto de la Religio de Dio) devos elekti alian branĉon kiel sian sekvonton.*

*La Manoj de la Religio de Dio devas elekti el sia propra nombro naŭ personojn kiuj ĉiutempe estos okupataj per valora servado al la laboro de la gardanto de la Religio de Dio. La elekto de tiuj naŭ personoj devas esti akceptita aŭ unuanime aŭ per plimulto da voĉoj de la anaro de la Manoj de la Religio de Dio kaj tiuj ĉi, ĉu per unuanima voĉdonado aŭ per plimulto, devas doni sian konsenton al la elekto de tiu kiun la gardanto de la Religio de Dio elektis kiel sian sekvonton. Tiu ĉi konsento devas esti donita tiamaniere ke la konsentaj kaj malkonsentaj voĉoj ne estu distingeblaj (t.e. per sekreta balotado).*

## Manoj de la Religio de Dio

Dum Sia propra vivo Bahá'u'lláh elektis kelkajn provitajn kaj fidelajn amikojn por ke ili helpu Lin direkti kaj disvastigi la aferojn de la Religio, kaj donis al ili la titolon Ayádiyí-Amru'lláh (lit. "Manoj de la Religio de Dio"). `Abdu'l-Bahá en Sia Testamento postlasas regulojn koncerne fondon de konstanta aro da laborantoj kiuj devas servi la Religion kaj helpi la Gardanton de la Religio. Li skribas:

*Ho geamikoj! La Manoj de la Religio de Dio devas esti nomitaj kaj elektitaj de la gardanto de la Religio de Dio. ...*

*La devoj de la Manoj de la Religio de Dio estas diskonigi la Diajn Aromojn, edifi homajn animojn, antaŭenigi edukadon, plibonigi la karakteron de ĉiuj homoj kaj esti, en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj cirkonstancoj, sanktigataj kaj apartigitaj de teraj aferoj. Ili devas manifesti timon al Dio per siaj konduto, manieroj, faroj kaj vortoj.*

*Tiu ĉi anaro la Manoj de la Religio de Dio, estas sub gvidado de la gardanto de la Religio de Dio. Li devas konstante stimuli ilin ke ili penu kaj streĉu ĉiujn siajn fortojn por diskonigi la dolĉajn bonodorojn de Dio, kaj por gvidi ĉiujn popolojn de la mondo, ĉar estas ĝuste la lumo de Dia Gvidado kiu kaŭzas ke la tuta universo estu lumigita.<sup>1</sup>*

## La Administra Sistemo<sup>2</sup>

Estas la ĝenerala karakterizo de religio ke organizado signas interrompon de la vera spirita influo kaj emas malhelpi al la originala impulso por veni en la mondon. Organizado ĉiam fariĝas surrogato de religio pli ĝuste ol metodo aŭ ilo por doni efikecon al religio. La apartiĝo de popoloj en diversajn tradiciojn netuŝitajn de iu ajn paca aŭ konstrua rilato faris tion neevitebla. Fakte, ĝis nun neniu Fondinto de revelaciita religio klare difinis la principojn por gvidi la administradan funkcion de la Kredo, kiun Li starigis.

En la Bahaa Religio, la principojn de mondadministrado esprimis Bahá'u'lláh, kaj tiuj ĉi principoj evoluigis en la skriboj de `Abdu'l-Bahá, precipe en Lia Testamento.

La celo de tiu ĉi organizado estas ebligi veran kaj daŭran unuecon inter popoloj de diversaj rasoj, klasoj, interesoj, karakteroj, kaj hereditaj kredoj. Detala kaj simpatia studado de tiu ĉi aspekto de la Bahaa Kredo montras ke la celo kaj metodo de bahaa administrado tiel perfekte adaptiĝas al la fundamenta spirito de la Revelacio ke ĝi rilatas al ĉi lasta same kiel la korpo rilatas al la animo. Karaktere, la principoj de bahaa administrado prezentas la sciencon de kunlaborado; aplike, ili provizas novan kaj pli altan tipon de moraleco mondvesta en amplekso. ...

Bahaa komunumo malsimilas al aliaj memvolaj kunvenoj en tio ke ĝia fundamento kuŝas tiel profunde kaj etendiĝas tiel vaste ke ĝi kapablas inkluzivi ĉiun sinceran homon. Dum aliaj asocioj estas ekskluzivaj, efike se ne intence, kaj metode se ne ideale la bahaa asocio estas inkluziva, kaj fermas al neniu sincera homo la enirejon al kuneco. En ĉiu kunveno estas latentaj aŭ evoluintaj iu bazo por selekti. En religio ĉi tiu bazo estas kredo limigita per la historia naturo de sia origino; en politiko tio ĉi estas partio aŭ programo; en ekonomio tio ĉi estas komuna malbonŝanco aŭ komuna potenco; en artoj aŭ scienco tio ĉi bazo konsistas el speciala edukado aŭ agado aŭ intereso. En ĉiuj ĉi tiuj aferoj, ju pli ekskluziva estas la bazo de selekto, des pli forta la movado-kondiĉo diametre kontraŭa al tiu kiu ekzistas en la Bahaa Religio. Sekve la Kredo, malgraŭ ĝia spirito de kreskado kaj progreso, evoluas malrapide rilate al la nombroj de siaj agemaj aliĝintoj. Ĉar oni kutimiĝas al ekskluziveco kaj apartiĝo en ĉiuj aferoj. La gravaj sankcioj estas ĉiam rajtigoj kaj pravigoj de apartiĝo. Eniri la

<sup>1</sup> El la Manoj de la Religio elektitaj de Shoghi Effendi dum sia tridek-ses-jara servado, dudek sep estis vivantaj kiam li forpasis. Li ankaŭ starigis, en 1954, Helpkomitatojn nomitajn de la Manoj por esti ĉi ties deputatoj, helpantoj kaj konsilantoj.

<sup>2</sup> Tiu ĉi sekcio pri la Administra Sistemo estas elĉerpita el la artikolo The Present-Day Administration of the Bahá'í Faith (La Hodiaŭa-Taga Administrado de la Bahaa Religio) de Horace Holley, eldonita en 1933 en The Bahá'í World, Volumo V, pp. 191 kaj sekv. (La Bahaa Mondo). Partoj de tiu ĉi artikolo citantaj el bahaa skriboj estas anstataŭigitaj per pli novaj tradukoj kie ili estas haveblaj.

Bahaan Kredon estas postlasi tiujn ĉi sankciojn - travivaĵo kiu unue ĉiam submetas personon al novaj pruvoj kaj suferadoj, dum la homa egoo kontraŭas la superegan sankcion de universala amo. Scienculoj kunestu kun simpluloj kaj needukitoj, riĉuloj kun malriĉuloj, blankuloj kun negruloj, mistikuloj kun la literatoroj, kristanoj kun judoj, islamanoj kun parsioj; kaj je kondiĉoj, kiuj forigas la avantaĝojn de longdaŭraj arogantecoj kaj privilegioj.

Kontraŭe al tiu ĉi malfacilaĵo estas gloraj rekompencoj. Oni memoru ke arto steriliĝas kiam ĝi turnas sin for de la komuna homaro, ke filozofio same perdas sian vidkapablon kiam ĝi evoluas en soleco, kaj ke politiko kaj religio neniam sukcesas aparte de la ĝeneralaj bezonoj de la homaro. La homan naturon oni ankoraŭ ne scias, ĉar ni ĉiuj vivas en stato de mensa, morala, emocia aŭ socia defendo, kaj la psikologio de defendo estas la psikologio de malpermeso. Sed la amo forigas timon; forigo de timo starigas la latentajn potencojn, kaj kunesto kun aliaj en spirita amo portas esencan, pozitivan esprimon al tiuj ĉi potencoj. Bahaa komunumo estas kunveno kie tiu ĉi procedo povas okazi en la nuna epoko, unue malrapide, dum la nova impulso fortikiĝas, pli rapide dum la anoj konsciiĝas pri la potencoj kiuj disvolvas la floron de unueco inter la homoj. ...

La respondeco por kaj direktado de lokaj bahaaj aferoj estas difinitaj al anaro titolita Spirita Asembleo. Tiu ĉi anaro (limigita al naŭ membroj) estas elektita ĉiujare la 21an de aprilo, la unuan tagon de Ridván (la Festo kiu solenas la deklaron de Bahá'u'lláh) parte de la plenaĝaj konfesintaj kredantoj de la komunumo. La eliĝonta Spirita Asembleo kompilas la balotliston. Rilate al la karaktero kaj funkcio de tiu ĉi anaro, 'Abdu'l-Bahá skribis jene:

*Estas devige al ĉiu kredanto nenion fari rilate (al bahaa agado) sen konsiliĝo kun la Spirita Asembleo, kaj ili devas plene obei tutkore kaj tutanime al ties ordonoj, por ke aferoj estu taŭge ordigitaj kaj bone aranĝitaj. Alie ĉiu persono agos sendepende kaj laŭ sia volo, kaj sekvos sian deziron kaj malutilos al la Religio.*

*La ĉefaj necesajoj de tiuj kiuj konsiliĝas kune estas pura motivo, radianta spirito, apartiĝo de ĉio krom Dio, allogiĝo al Liaj Diaj Bonodoroj, humileco inter Liaj amatoj, pacienco dum malfacilaĵoj kaj servado al Lia glora Sojlo. Se kun Lia afabla helpo ili akiros ĉi tiujn atribuojn, estos certigita al ili triumfon el la nevidebla Regno de Bahá. Nuntempe, estas grave kaj treege necese havi asembleojn por konsiliĝo. Obeado al ili estas necesa kaj deviga. Ties anoj devas konsiliĝi kune tiamaniere ke neniam okazu kontraŭsento aŭ malakordiĝo. Tio ĉi estas atingebla kiam ĉiu ano esprimas plenlibere sian propran opinion kaj klarigas sian argumenton. Se iu kontraŭas, li tute ne ĉagrenu ĉar la ĝusta vojo montriĝas nur tiam kiam oni plene diskutas la aferojn. La brila fajrero de vero aperas nur post akordiĝo inter diversaj opinioj. Se post diskutado, estas unuanima decido bonege; sed se, la Eternulo malpermesu, okazos diversaj opinioj, la plimulto de la voĉdonoj regu. ...*

*La unua kondiĉo estas absoluta amo kaj harmonio inter la asembleanoj. Ili estu tute sen fremdeco kaj montru en si la Unuecon de Dio, ĉar ili estas ondoj de unu maro, gutoj de unu rivero, steloj de unu ĉielo, radioj de unu suno, arboj de unu fruktarbaro, floroj de unu ĝardeno. Se harmonio de pensoj kaj plena unueco ne ekzistas, tiu kunveno disiĝu kaj tiu asembleo neniĝu. La dua kondiĉo: Kiam ili kunvenas ili turnu la vizaĝojn al la Ĉiela Regno kaj petu helpon al la Regno de Gloro. ... Ĉiuj diskutoj temu pri spiritaĵoj kiuj rilatas al edukado de homoj, instruado de infanoj, senŝarĝigo de malriĉuloj, helpo de malfortuloj en ĉiuj klasoj en la mondo, bonkoreco al ĉiuj popoloj, dissemado de la bonodoroj de Dio kaj glorado de Lia Sankta Vorto. Se ili penos plenumi tiujn ĉi kondiĉojn la Graco de la Sankta Spirito estos certigita al ili, kaj tiu asembleo fariĝos centro de la Diaj benoj, la anaroj de Dia konfirmado venos por helpi al ili, kaj tagon post tago ili ricevos novan elverŝon spiritan.*

Klarigante tiun ĉi temon, Shoghi Effendi skribis:

*... neniu inter la geamikoj transdonu ion ajn al la publiko, se ne ĝi estas plene konsiderita kaj aprobita de la Spirita Asembleo en ties loko; kaj se tio (kiel sendube estos la kazo) estos afero kiu temas pri la ĝenerala intereso de la Kredoj en tiu lando, tiam la Spirita Asembleo devas liveri ĝin al la konsidero kaj aprobo de la nacia anaro kiu reprezentas ĉiujn diversajn lokajn asembleojn. Ne nur rilate eldonadon, sed ĉiujn aferojn tute senescepte, koncernantaj la interesojn de la Kredoj en tiu loko, ĉu individue ĉu are, estu transdonitaj ekskluzive al la Spirita Asembleo en tiu loko, kiu decidus pri ĝi, se ne ĝi estas afero de nacia intereso, en kiu okazo ĝi estu transdonita al la nacia (bahaa) anaro. Al tiu ĉi nacia anaro apartenas decido ĉu afero havas lokan aŭ nacian intereson. (La termino "naciaj aferoj" ne rilatas al aferoj karaktere politikaj, ĉar la amikoj de Dio tra la mondo estas severe malpermesitaj intermiksiĝi iel ajn kun politikaj aferoj, sed prefere al tiuj aferoj kiuj koncernas la spiritaĵajn agadojn de la amikaro en tiu lando.)*

*Plena harmonio, tamen, kiel ankaŭ kunlaboro inter la diversaj lokaj asembleoj kaj inter la membroj mem, kaj precipe inter ĉiu asembleo kaj la nacia anaro, estas plej grave, ĉar je tio dependas la unueco de la Religio de Dio, la solidareco de la geamikoj, la plena, rapida kaj kompetenta funkciado de la spiritaĵaj agadoj de Liaj amatoj. ...*

*La diversaj Asembleoj, lokaj kaj naciaj, formas nuntempe la fundamenton sur kies forton la Universala Domo (de Justeco) estos firme starigita kaj konstruita. Ĝis tiuj ĉi funkcios energie kaj harmonie ĝis tiam la espero pri fino de tiu ĉi periodo transira ne realiĝos ... memoru ke la ĉefnoto de la Religio de Dio estas ne diktatora aŭtoritateco sed humila kunesto, ne arbitra potenco, sed spirito de sincera kaj amema konsiliĝo. Nenio krom spirito de vera bahaano povas esperi akordigi la principojn de kompato kaj justeco, de libereco kaj obeado, de la sankteco de la rajtoj de individuo kaj de sinofero, de vigleco, diskreteco kaj prudento unuflanke, kaj de kunestado, malkaŝemo, kaj kuraĝo aliflanke.*

La lokaj Spiritaj Asembleoj de lando estas kunligitaj kaj kunordigitaj pere de alia elektita anaro el naŭ membroj, la Nacia Spiritita Asembleo. Tiu ĉi anaro estiĝas pere de ĉiujara balolado parte de la elektitaj delegitoj reprezentantaj la lokajn bahaajn komunumojn. ... La Nacia Kunveno kie la delegitoj kuniĝas konsistas el elektantaro bazita sur la principo de proporcia reprezentado. ... Ĉi tiuj Naciaj Kunvenoj okazas prefere dum la Ridván-sezono, la dekdutagoj komence de 21 aprilo, kiuj solenas la Deklaron de Bahá'u'lláh en la ĝardeno Ridván proksime al Bagdado. La ekŝiĝonta Nacia Spiritita Asembleo havas la aŭtoritaton akcepti la delegitojn.

Nacia Kunveno estas okazo por pliprofundigi la komprenon pri bahaaj agadoj kaj por fari raportojn pri naciaj kaj lokaj agadoj dum la jaro ĵuspasinta. ... La funkcioj de bahaaj delegitoj estas limigitaj al la daŭro de la Nacia Kunveno kaj partopreno en la elekto de la nova Nacia Spiritita Asembleo. Dum ili kunvenas, la delegitoj estas konsilia kaj konsulta anaro kies rekomendojn atente konsideru la membroj de la elektota Nacia Spiritita Asembleo. ...

La rilato de Nacia Spiritita Asembleo al la lokaj Spiritaj Asembleoj kaj al la kredantaro en la lando estas difinita jene en la leteroj de la Gardanto de la Religio:

*Rilate la starigon de "naciaj asembleoj," estas gravege en ĉiu lando kie la kondiĉoj permesas kaj la nombro de la amikoj konsiderinde kreskas ... ke "nacia Spiritita Asembleo" estu tuj starigita, reprezentanta la geamikojn en tiu lando.*

*Ĝia unua celo estas stimuli, unuigi kaj kunordigi per oftaj personaj konsiliĝoj, la multoblajn agadojn de la amikoj kiel ankaŭ de la lokaj Asembleoj; kaj per proksima kaj konstanta rilato kun la Sankta Lando, enkonduki klopodojn, kaj direkti ĝenerale la aferojn de la Religio en tiu lando.*

*Ĝi ankaŭ havas alian celon, ne malpli gravan ol la unua, ĉar dum la daŭro de tempo ĝi evoluos en la Nacian Doman de Justeco (kiun `Abdu'l-Bahá mencias en Sia Testamento kiel la "sekundara Domo de Justeco"), kiu laŭ la klara teksto de la Testamento devas, kune kun la aliaj Naciaj Asembleoj tra la Bahaa Mondo, senpere elekti la membrojn de la Internacia Domo de Justeco, tiu Supera Konsilantaro kiu gvidos, organizos kaj unuigos la aferojn de la Kredo tra la mondo. ...*

*Ĉi tiu Nacia Spiritita Asembleo, kiu, ĝis la starigo de la Universala Domo de Justeco, devos esti reelektita ĉiujare, memevidente akceptas gravajn respondecojn, ĉar ĝi devas administri plenan aŭtoritatecon super ĉiuj lokaj Asembleoj en sia areo, kaj ĝi devos direkti la agadojn de la geamikoj, gardi vigle la Religion de Dio kaj estri ĝenerale la aferojn de la Kredo.*

*Gravaj aferoj, kiuj efikos la interesojn de la Religio en tiu lando, kiel tradukado kaj eldonado, la Mashriqu'l-Adhkár, instruado, kaj aliaj similaj aferoj kiuj estas apartaj de nur lokaj aferoj, devas esti sub plena aŭtoritato de la Nacia Asembleo.*

*Ĝi devas, simile al la lokaj Asembleoj, transdoni ĉiun el tiuj ĉi aferoj al speciala Komitato, elektota de la membroj de la Nacia Spiritita Asembleo, el la geamikoj en tiu lando, kiu rilatos al ĝi same kiel la lokaj komitatoj rilatas al siaj respektivaj lokaj Asembleoj.*

*Ĉe tio, ankaŭ, restas decido ĉu iu afero estas nur loka en sia naturo, kaj estu transdonita al la konsiderado kaj decido de la loka Asembleo, aŭ ĉu tio restu en sia areo kiel afero kiu devas ricevi ĝian specialan atenton.*

...

*... je la intereso de la Kredo, kiun ni ĉiuj amas kaj servas, estas devige al la membroj de la nova Nacia Asembleo, elektita de la delegitoj dum la Kunveno, peti kaj havi la plejan respekton, individue kiel ankaŭ kune, al la konsiloj, la konsideritaj opinioj kaj la veraj sentoj de la kuniĝintaj delegitoj. Forigante el si ĉiun postsignon de sekreteco, de troa silentemo, de diktatora apartiĝemo, ili radiante kaj plene anoncu al la delegitoj, kiuj ilin elektis, siajn planojn, siajn esperojn, kaj siajn zorgojn. Ili informu al la delegitoj la diversajn aferojn konsiderotajn dum la kuranta jaro, kaj serene kaj konscie studu kaj pripensu la opiniojn kaj rekomendojn de la delegitoj. Dum la kelkaj tagoj de la Kunveno kaj post la foriro de la delegitoj, la nove elektita Nacia Asembleo devas serĉi rimedojn por antaŭenigi interkomprenon, faciligi kaj daŭrigi interŝanĝon*

*de vidpunktoj, pliprofundigi konfidon, kaj pravigi per ĉiu ebla perilo sian solan deziron servi kaj antaŭenigi la komunan bonon. ...*

*Pro la neeviteblaj limigoj rilate al oftaj kaj longaj kunsidoj de la Kunveno, la Nacia Spiritita Asembleo devos tamen teni al si la finan decidon pri ĉiuj aferoj kiuj efikas la interesojn de la Kredo ... kiel ekzemple la rajto decidi ĉu iu loka Asembleo funkcias laŭ la principoj difinitaj por la antaŭenigo de la Kredo. ...*

Rilate al kompilado de la balotlisto uzota ĉe ĉiuj lokaj bahaaj balotadoj, la respondeco pri tio apartenas al ĉiu loka Spiritita Asembleo, kaj por gvidi en tiu afero la Gardanto skribis jene:

*... por diri tre mallonge kaj tiel adekvate kiel la nunaj cirkonstancoj permesas jen la ĉefaj detaloj kiujn oni devas konsideri antaŭ ol decidi ĉu persono estas vera kredanto aŭ ne: Plena akcepto de la rangoj de la Heroldo, la Aŭtoro, kaj la Vera Ekzemplo de la Bahaa Religio, kiel difinitaj en la Testamento de `Abdu'l-Bahá; senkondiĉa akcepto de, kaj obeado al, kio ajn estas revelaciita per ilia Plumo; lojala kaj konstanta aliĝo al ĉiu frazo en la sankta Testamento de nia Amato; kaj proksima kunesto kun la spirito kiel ankaŭ la formo de la nuntempa bahaa administrado tra la mondo - tiujn ĉi mi opinias esti la fundamentaj kaj ĉefaj konsideroj pri kiuj oni devas juste, diskrete kaj penseme certigi antaŭ ol fari tiel gravan decidon.*

La instruoj de `Abdu'l-Bahá prizorgas plian evoluon de bahaa organizado. ...

*Kaj nun, rilate al la Domo de Justeco kiun Dio ordonis kiel fonton de ĉiu bono kaj libera de ĉiu eraro, ĝi devas esti universale elektita, tio estas, de la kredantoj. Ĝiaj membroj estu signoj de timo al Dio kaj mateniĝoj de scio kaj kompreno, konstantaj en la kredo de Dio kaj bondezirantoj al la tuta homaro. Tiu Domo estas la Universala Domo de Justeco, tio estas, en ĉiuj landoj sekundara Domo de Justeco estu starigita, kaj tiuj ĉi sekundaraj Domoj de Justeco elektu la membrojn de la Universala Domo.<sup>1</sup> Oni transdonu ĉiujn aferojn al tiu anaro. Ĝi dekretas ĉiujn leĝojn kaj regulojn kiuj ne troviĝas en la eksplicita Sankta Teksto. Tiu ĉi anaro solvu ĉiujn problemojn kaj la gardanto de la Religio de Dio estas ĝia benita ĉefo kaj elstara membro dumviva de tiu anaro. Se li ne ĉeestos persone ĝiajn kunsidojn, li nomu iun por reprezenti lin. ... Ĉi tiu Domo de Justeco dekretas la leĝojn kaj la registaro administras ilin. La parlamento devas plifortigi la administradon, la administrado devas helpi al la parlamento por ke pere de proksima unueco kaj harmonio de tiuj ĉi du fortoj, la fundamento de justeco fariĝu firma kaj forta, por ke ĉiuj regionoj de la mondo fariĝu ja kiel Paradizo mem. ...*

*... Al la Plej Sankta Libro ĉiu devas sin turni kaj ĉion kio ne estas klare skribita tie oni devas transdoni al la Universala Domo de Justeco. Kion ajn tiu ĉi anaro decidas ĉu unuanime aŭ plimulte, tio estas ja la Vero kaj la Celo de Dio Mem. Kiu ajn deturnas sin de tio estas vere el tiuj kiuj emas al malakordo, montras malicon kaj sin turnas for de la Eternulo de la Sankta Interligo.*

Eĉ nuntempe bahaanoj en ĉiuj partoj de la mondo intime kaj elkore kunestas pere de regula korespondado kaj personaj vizitoj. Tiu ĉi kontakto inter anoj de diversaj raso, naciecoj kaj religiaj tradicioj estas plena pruvo ke la ŝarĝo de antaŭjuĝo kaj la historiaj detaloj de apartiĝo povas esti tute venkitaj per la spirito de unueco starigita de Bahá'u'lláh.

### La Mondordo de Bahá'u'lláh

La pli grandaj implikadoj de tiu ĉi ordo estas klarigitaj de Shoghi Effendi en sinsekvaj komunikaĵoj al la bahaa komunumo de post februaro 1929:

*Mi ne povas ne apelacii al tiuj kiuj identiĝas kun la Kredo ke ili malatentu la ĝeneralajn ideojn kaj la nedaŭrajn fantaziojn de la tempo, kaj elkomprene kiel neniam antaŭe ke la eksploditaj teorioj kaj la ŝanceliĝantaj institucioj de la nuntempa civilizacio devas aperi en akra kontrasto kun tiuj Didonitaj institucioj kiuj estas destinitaj stari sur ties ruinoj. ...*

*Ĉar Bahá'u'lláh ... ne nur inspiris al la homaro novan kaj regeneradan Spiriton. Li ne nur eldiris kelkajn universalajn principojn, aŭ proponis specialan filozofion, kiel ajn potencaj, raciaj kaj universalaj tiuj ĉi estu. Krom ĉi tiuj Li, kiel ankaŭ `Abdu'l-Bahá post Li, malsimile al la antaŭaj Mondsistemoj, klare kaj specife difinis Leĝaron, starigis difinitajn instituciojn, kaj provizis la esencojn de Divina Ekonomio. Ĉi tiuj estas destinitaj fariĝi modelo por estonta socio, plej supera instrumento por starigo de la Plej Sankta Paco, kaj la sola perilo por unuigo de la mondo, kaj la proklamo de la regno de justeco sur la tero. ...*

*Malsimile al la Disistemo de Kristo, malsimile al la Disistemo de Mahometo, malsimile al ĉiuj estintaj Disistemoj, la apostoloj de Bahá'u'lláh en ĉiu lando, kie ajn ili laboras, havas antaŭ si en klara, en senduba*

<sup>1</sup> La Universala Domo de Justeco estis unue elektita en aprilo 1963 de la membroj de kvindek ses Naciaj Spiritaj Asembleoj.

*kaj emfaza lingvo, ĉiujn leĝojn, regulojn, principojn, instituciojn, gvidadon, kiujn ili bezonas por kompletigi kaj elplenumi sian taskon. ... En tio kuŝas la elstara trajto de la Bahaa Revelacio. En tio kuŝas la forto de la unueco de la Kredo, de la valideco de Revelacio kiu pretendas ne detrui aŭ malgrandigi antaŭajn Revelaciojn, sed kunligi, unuigi kaj plenumi ilin.*

*Kvankam nia Kredo nun aperas malforta antaŭ homoj, kiuj aŭ denuncas ĝin kiel branĉo de Islamo, aŭ malestime ignoras ĝin kiel nur alian el tiuj malhelaj sektoj kiuj abundas en la Okcidento, tamen ĉi tiu multvalora juvelo de Dia Revelacio, nun ankoraŭ en sia embria stato, evoluos en la ŝelo de Lia leĝaro, kaj antaŭeniĝos, nedividita kaj nedifektita, ĝis ĝi ĉirkaŭprenos la tutan homaron. Nur tiuj kiuj jam rekonis la superegan rangon de Bahá'u'lláh, nur tiuj kies koroj estas tuŝitaj per Lia amo, kaj ekkonis la potencon de Lia spirito, povas adekvate estimi la valoron de tiu ĉi Divina Ekonomio - Lia netaksebla donaco al la homaro. - 21 marto 1930.*

*Estas al ĉi tiu celo - la celo de nova Mondordo, Dia en origino, ĉion inkluziva en amplekso, justa en principo, provoka en siaj trajtoj - ke la turmentita homaro devas strebi. ...*

*Kiel kortuŝaj estas vere la fortostreĉoj de tiuj gvidantoj de homaj institucioj kiuj, sen ia konsidero pri la spirito de la tempo, penegas alĝustigi la naciajn procedojn, konvenajn por la malnovaj tagoj de la memfidaj nacioj, al la tempo kiu devas aŭ atingi la unuecon de la mondo, antaŭmontritan de Bahá'u'lláh, aŭ pere. En tiel kritika horo de la historio de la civilizacio decas al la gvidantoj de ĉiuj nacioj de la mondo, grandaj kaj malgrandaj, ĉu en la Oriento aŭ en la Okcidento, ĉu venkintoj aŭ venkitoj, turni sian atentigon al la trumpetvoko de Bahá'u'lláh kaj, plene trapenetritaj de la sento de mondsolidareco, la kondiĉo esenca de fideleco al Lia Kredo, brave leviĝi por efektiviĝi en la tuta pleneco la solan kuracan skemon kiun Li, la Dia Kuracisto, receiptis por la malsana homaro. Ili forĵetu, unu fojon por ĉiam, ĉian antaŭkonceptitan ideon, ĉian nacian antaŭjuĝon, kaj atentigu la noblan konsilon de 'Abdu'l-Bahá, la aŭtoritata Klariganto de Liaj instruoj. "Vi povas plej bone servi al via lando," estis respondo donita de 'Abdu'l-Bahá<sup>1</sup> al alta oficiulo de la federala registaro de Usono, kiu demandis Lin pri la plej bona maniero en kiu li povus progresigi la aferojn de sia registaro kaj popolo, "se vi penas, kiel mondcivitano, subteni la finan aplikon de la principo de federalismo kiu estas la fundamento de la registaro de via propra lando al la rilatoj nun ekzistantaj inter la popoloj kaj nacioj de la mondo." ...*

*Devas esti nepre evoluita ia formo de monda Superŝtato, je kies favoro ĉiuj nacioj de la mondo propravole cedos ĉian pretendon por militi, certajn rajtojn starigi impostojn kaj ĉiajn rajtojn teni armadon, krom tio por sekurigi internan ordon en siaj posedaĵoj. Tia ŝtato devos enteni en siaj kadroj Internacian Ekzekutivon adekvatan por trudi plejsuperan kaj nerezistebian aŭtoritatecon al ĉiu kontraŭstarema membro de la komunumo. Ĝi devas havi ankaŭ Mondparlamenton kies membroj estos elektitaj de la popoloj en ties landoj kaj kies elekto estos konfirmata de la koncernaj registaroj; kaj Plejsuperan Tribunalon kies juĝo havos devigan signifon eĉ en tiuj kazoj kiam la koncernataj partioj ne konsentas propravole submeti sian kazon al ĝiaj konsideroj. Monda komunumo en kiu ĉiuj ekonomiaj bariloj estos por ĉiam detruitaj kaj la interdependeco de Kapitalo kaj Laboro definitive rekonita; en kiu la brukriado de religia fanatikeco kaj disputado estos por ĉiam silentigita; en kiu la flamo de rasa malamikeco estos fine estingita; en kiu unu sola kodo de internaciaj leĝoj - produktaĵo de pripensita juĝado de la federaciaj reprezentantoj de la mondo - havos kiel sankcion tujan kaj devigan intervenon de kunigitaj fortoj de la federaciaj unuoj; kaj fine mondkomunumo, en kiu la furiozo de kaprica kaj militema naciismo estos ŝanĝita en daŭran konscion pri mondcivitaneco - ja prezentiĝas, en siaj ĉefaj linioj, la Ordo antaŭvidita de Bahá'u'lláh, la Ordo kiu estos konsiderata kiel la plej bela frukto de la malrapide maturiĝanta epoko. ...*

*Ne estu ia dubo rilate al la intenco inspiranta la mondampleksan Leĝon de Bahá'u'lláh. Tute ne celante al la renverso de la ekzistanta fundamento de la socio, ĝi klopodas larĝigi ĝian bazon, rekonstrui ĝiajn instituciojn en maniero konforma kun la bezonoj de la ĉiam ŝanĝiĝanta mondo. Ĝi povas konflikti kun neniam laŭleĝaj apartenaĵoj, nek ĝi povas subfosii iujn esencajn lojalecojn. Ĝia celo estas nek sufoki la flamon de sana kaj inteligenta patrioteco en la homaj koroj, nek forigi la sistemon de nacia aŭtonomio tiel esenca se oni volas eviti la malbonojn de la troa centralizado. Ĝi ne ignoras, nek ĝi penas subpremi, la diversecon de etnikaj originoj, de klimato, de historio, de lingvo kaj tradicio, de penso kaj kutimo, kiuj diferencigas la popolojn de la mondo. Ĝi vokas pri pli vasta lojaleco, pri pli granda aspiro ol tiuj kiuj inspiris la homan genton. ...*

*La voko de Bahá'u'lláh estas antaŭ ĉio direktita kontraŭ ĉiaj formoj de provincaĵoj, kontraŭ ĉiaj izolmanieroj kaj antaŭjuĝoj. ... Ĉar leĝaj normoj, politikaj kaj ekonomiaj teorioj estas sole destinitaj por sekurigi la*

<sup>1</sup> En la jaro 1912.

*interesojn de la tuto de la homaro, por ke la homaro ne estu krucumata por savi la esencon de iu speciala leĝo aŭ doktrino. ...*

*La principo de la Unueco de la Homaro - la akso ĉirkaŭ kiu turniĝas ĉiuj instruoj de Bahá'u'lláh - ne estas nura eksplodo de senklara emocio aŭ esprimo de nedifinita kaj pia espero. ... Ĝia enhavo estas pli profunda, ĝiaj aspiroj estas pli grandaj ol ĉiaj kiujn la Profetoj de la pasinteco estis permesitaj antaŭenigi. La mesaĝo estas aplikebla ne nur al individuoj, sed koncernas antaŭ ĉio la naturon de tiuj esencaj rilatoj kiuj devas ligi ĉiujn ŝtatojn kaj naciojn kiel membrojn de unu homa familio. ...*

*Ĝi prezentas la fincelon de la homa evoluado. ...*

*Ke sole la fortoj de mondkatastrofo povas akceli tiun novan fazon de la homa penso, tio bedaŭrinde fariĝas pli kaj pli evidenta. ...*

*Nenio krom fajra aflikto, el kiu la homaro leviĝos, punita kaj preta, povas sukcesi enplanti tiun senton de respondeco kiun la gvidantoj de la novnaskita tempo devas akcepti sur siajn ŝultrojn. ...*

*Ĉu `Abdu'l-Bahá Mem ne asertis per paroloj preterdubaj ke "alia milito pli terura ol la lasta, nepre eksplodos" 28 novembro, 1931*

*Tiu ĉi Administra Ordo ... kiam ĝiaj elementaj eroj, ĝiaj organikaj institucioj, ekfunkcios kompetente kaj energie, asertos sian pretendon kaj elmontros sian kapablon esti ne nur la nukleo sed ja la modelo de la Nova Mondordo destinita enteni je difinita tempo la tutan homaron. ...*

*Sole el ĉiuj Revelacioj antaŭaj ĉi tiu Kredo ... sukcesis starigi strukturon, al kiu la konfuzitaj sekvantoj de bankrotaj kaj rompitaĵaj kredoj devus alproksimiĝi kaj plene esplori, kaj provi, antaŭ estos tro malfrue, la nevundeblan sekurecon de ĝia monĉirkaŭanta ŝirmejo...*

*Al kio alia se ne al la potenco kaj majesto, kiujn tiu ĉi Administra Ordo - la elementoj de la estonta ĉirkaŭvolvanta Bahaa Komunumo - estas destinita manifesti, povas aludi la jenaj eldiroj de Bahá'u'lláh: "La ekvilibro de la mondo estas renversita per la vibra influo de tiu ĉi plej sankta, plej nova Mondordo. La orda vivo de la homaro estas revoluciigita pere de tiu ĉi unika, tiu ĉi mirinda Sistemo, kies similon homaj okuloj neniam vidis."...*

*La bahaa komunumo estonta, de kiu tiu ĉi vasta Administra Ordo estas la sola kadro, estas, teorie kaj praktike, ne nur unika en la tuta historio de politikaj institucioj, sed havas nenian paralelon en la kronikoj de iuj el la akceptitaj religisistemoj de la mondo. Nenia formo de demokrata registaro; nenia sistemo de aŭtokrateco aŭ diktatoreco, ĉu monarkia aŭ respublika, nenia peranta plano de pure aristokrata sistemo; eĉ ne iuj el la akceptitaj tipoj de teokratio, ĉu la Hebrea Komunumo, aŭ la diversaj Kristanaj Ekleziaj organizaĵoj, aŭ la Imameco aŭ la Kalifeco en Islamo - neniu el tiuj ĉi povas identiĝi aŭ konformiĝi al la Administra Ordo kiun kreis la mastromano de ĝia perfekta Arkitekto. ...*

*Dum tiu ĉi Sistemo estas ankoraŭ en sia infaneco, neniuj miskomprenu ĝian karakteron, malgrandigu ĝian signifon aŭ misprezentu ĝian celon. La fundamento sur kiu ĉi tiu Administra Ordo staras estas la neŝanĝebla Celo de Dio por la homaro en la nuna tempo. La Fonto el kiu ĝi ricevas sian inspiron estas neniuj alia ol Bahá'u'lláh Mem. ... La centra, la subtena celo kiu vivigas ĝin estas la starigo de la Nova Mondordo antaŭmontrita de Bahá'u'lláh. La metodoj kiujn ĝi uzas, la normo kiun ĝi enplantas, kliniĝas nek Orienten nek Okcidenten, nek al Judoj nek al Nejudoj, nek al riĉuloj nek al malriĉuloj, nek al blankhaŭtuloj nek al negruuloj. Ĝia signovorto estas la unuiĝo de la homa gento; ĝia standardo la "Plej Sankta Paco." ... - 8 februaro, 1934*

*La kontrasto inter la amasiĝantaj atestaĵoj pri persista centralizo kiu akompanas la leviĝadon de la Administra Ordo de la Kredo de Dio, kaj la fortoj de la diseriĝado kiuj atakas la konstruaĵon de la dolorpremita socio, estas same klaraj kiel atentigaj. Kaj interne kaj ekstere de la bahaa mondo la signoj kaj pruvoj kiuj, en mistera maniero, heroldas la naskiĝon de tiu Mondordo, kies starigo devas marki la Oran Epokon de la Religio de Dio, kreskas kaj multiĝas de tago al tago. ...*

*"Baldaŭ," proklamas la propraj vortoj de Bahá'u'lláh, "la nuna Ordo estos envolvita, kaj nova anstataŭigos ĝin." ...*

*La Revelacio de Bahá'u'lláh ... devas ... esti rigardata kiel markanta per sia alveno la maturiĝon de la tuta homa gento. Ĝi devas esti konsiderata ne nur kiel ankoraŭ alia spirita reviviĝo en la vico de la progresaj Revelacioj, nek eĉ kiel kulmino de unu el la serio de la ripetiĝantaj profetaj cikloj, sed pli ĝuste kiel markanta la lastan kaj la plej altan ŝtupon en la grandega evoluado de la kolektiva homa vivo sur ĉi tiu planedo. La apero de la mond-komunumo, la konscio de la mondcivitaneco, la fondo de la mondcivilizacio kaj*

mondkulturo ... devas ... esti konsiderataj koncerne la vivon sur tiu ĉi planedo kiel la plej ekstremaj limoj de la organizado de la homa socio, kvankam la homo, kiel individuo, povas, eĉ devas rezulte de tiu kompletigo, sendifine antaŭeniri en sia progreso kaj evoluado. ...

La unueco de la homa gento, kiel ĝi estas antaŭvidita de Bahá'u'lláh, signifas starigon de tutmonda komunumo en kiu ĉiuj nacioj, rasoj, kredoj kaj klasoj estas intime kaj daŭre unuigitaj, kaj en kiu la aŭtonomio de ĝiaj membroŝtatoj kaj la persona libereco kaj iniciativo de la individuoj el kiuj ĝi konsistas estas definitive kaj komplete protektitaj. Tiu ĉi komunumo devas, kiel ni povas ĝin koncepti, konsisti el monda leĝodonistaro, kies membroj, estante kuratoroj de la tuta homaro, fine kontrolos la tutan natur-rimedon de ĉiuj kunfarantaj nacioj, kaj dekretos tiajn leĝojn kiaj estos postulataj por reguligi la vivon, kontentigi la bezonojn kaj alĝustigi la rilatojn de ĉiuj rasoj kaj popoloj. Monda ekzekutivo, subtenata de internacia Armeo, plenumos decidojn akceptitajn, kaj aplikos leĝojn dekretitajn de tiu monda leĝodonistaro. Monda tribunalo prijuĝos kaj transdonos devigajn kaj finajn verdiktojn en ĉiuj disputoj kiuj povus okazi inter la diversaj elementoj formantaj tiun universalan sistemon. Elpensita estos meĥanismo de mondaj komunikiloj, ĉirkaŭliganta la tutan planedon, libera de naciaj ĝenoj kaj limigoj, kaj funkcia kun mirinda rapideco kaj perfekta reguleco. Mondmetropolo agos kiel nervocentro de la mondcivilizacio, kiel fokuso al kiu centriĝados la unuigaj fortoj de la vivo kaj el kiuj radios ĝiaj energidonaj influoj. Mondlingvo estos aŭ elpensita aŭ elektita el la ekzistantaj lingvoj kaj estos instruata en la lernejoj de ĉiuj federaciaj nacioj kiel helplingvo krom ilia gepatra lingvo. Mondskribo, mondliteraturo, unuforma kaj universala sistemo de mono, de pesiloj kaj mezuriloj, simpligos kaj faciligos la interrilatojn kaj la interkomprenon meze de la nacioj de la homaro. En tiu mondsocio, la scienco kaj la religio, la du plej potencaj fortoj en la nova vivo, interpacigos, kunlaboros, kaj harmonie disvolviĝados. La gazetaro, en tiu sistemo, donante plenan kampon al esprimado de diversaj vidpunktoj kaj konvinkoj de la homoj, ĉesos esti instrumento por malica agado de establitaj interesoj, ĉu privataj ĉu publikaj, kaj iĝos libera de la influo de interdisputantaj registaroj kaj popoloj. La ekonomiaj riĉaĵoj de la mondo estos organizitaj, ĝiaj fontoj de krudaĵoj estos ekspluatitaj kaj plene utiligitaj, ĝiaj merkatoj estos kunordigitaj kaj disvolvitaj, kaj la distribuado de ĝiaj produktaĵoj estos juste reguligata.

La naciaj rivalecoj, malamoj, kaj intrigoj ĉesos, kaj la rasan malamikecon kaj antaŭjuĝon anstataŭigos rasa amikeco, kompreno kaj kunlaboro. La kaŭzoj de la religiaj malkonsentoj estos daŭre forigitaj, la ekonomiaj bariloj kaj limigoj estos komplete neniigitaj, kaj la ekscesaj distingo inter la klasoj estos forĵetitaj. Mizero unuflanke, kaj granda amasigado de havaĵoj aliflanke, malaperos. La grandega energio malŝparata kaj perdata por milito, ĉu ekonomia ĉu politika, estos dediĉita al celoj kiuj plivastigos la kampon de la homaj inventaĵoj kaj de la teknika progreso, al pligrandigo de la tuthoma produktado, al ekstermo de malsanoj, al plivastigo de sciencaj esploroj, al plialtigo de la standardo de la korpa sano, al perfektigo kaj subtiligo de la homa menso, al ekspluato de neuzitaj ĝis nun kaj nesupozitaj rimedoj de la planedo, al plibonigo de la homa vivo, kaj al subtenado de ĉiuj aliaj faktoroj kiuj povas stimuli la intelektan, moralan, kaj spiritan vivon de la tuta homa gento.

Federala mondsistemo, reganta la tutan teron kaj posedanta nedisputeblan aŭtoritaton super ĝiaj neimageble vastaj rimedoj, kuniganta kaj enkorpiganta la idealojn kaj de la Oriento kaj de la Okcidento, libera de la malbeno de la milito kaj de ĝiaj mizeroj, kaj inklinita al ekspluato de ĉiuj haveblaj fontoj de energio sur la surfaco de la planedo, sistemo en kiu Forto estas farita la servanto de Justeco, kies vivo estas subtenata per ĝia universala rekonno de unu Dio kaj per ĝia subiĝo al unu komuna Revelacio jen estas la celo al kiu paŝas la homaro, pelata de la unuigaj fortoj de la vivo. ...

La tuta homaro ĝemas, sopiregas en sia deziro por esti kondukita al la unueco, kaj finigi sian multjaran martirecon. Kaj tamen ĝi obstine rifuzas akcepti la lumon kaj rekoni la suverenan aŭtoritaton de la sola Potenco Kiu povas elkonduki ĝin el ĝia implikiteco, kaj forturni la dolorigan sortobaton, kiu minacas pereigi ĝin. ...

La unuigo de la tuta homaro estas marko de la stadio al kiu la homa socio nun alproksimiĝas. La unueco de familio, de gento, de urbocivito, kaj de nacio estis provataj unu post la alia kaj estis sukcese fonditaj. La unueco de la mondo estas nun la celo kiun la turmentita homaro penas atingi. La naciokonstruado finiĝis. La anarkio esenca en la ŝtatsuvereneco alproksimiĝas al klimakso. La mondo, kreskanta al matureco, devas forlasi tiun ĉi fetiĉon, rekoni la unuecon kaj tutecon de la homaj rilatoj, kaj establi unu fojon por ĉiam la meĥanismon kiu povas plej bone enkorpigi tiun ĉi fundamentan principon de ĝia vivo. – 11 marto 1936

[La ĉi-supraj leteroj eldoniĝis en unu volumo titolita The World Order of Bahá'u'lláh (La Mondordo de Bahá'u'lláh).]

## EPILOGO

Sub la inspirita gvidado de Shoghi Effendi, la Bahaa Kredo kreskis konstante laŭ nombro kaj laŭ starigo de sia Administra Ordo, sekve en 1951 estis dek unu funkciantaj Naciaj Spiritaj Asembleoj. Ĉe tiu punkto la Gardanto turnis sin al evoluo de la institucioj de la Kredo je ĝia internacia nivelo, kaj difinis la Internacian Bahaan Konsilantaron, la antaŭirono de la Universala Domo de Justeco, kaj, baldaŭ poste, la unuan grupon de Manoj de la Kredo de Dio. Ĝis tiu tempo Shoghi Effendi altigis kelkajn eminentajn bahaanojn al la rango de Manoj de la Kredo post ilia morto, inter ili d-ro Johano E. Esslemont, sed estis nur en 1951 ke li decidis ke estas ĝusta tempo por komenci la plenan evoluon de tiu ĉi grava institucio. En sinsekva serio inter 1951 kaj 1957 li difinis tridek du Manojn kaj etendis la amplekson de iliaj agadoj, per starigo en ĉiu kontinento de Helpdirektaroj konsistantaj el kredantoj difinitaj de la Manoj por esti al ili deputitoj, helpantoj kaj konsilantoj. Dudek sep el tiuj ĉi Manoj estis vivantaj kiam li mortis.

Per serio da leteroj, kelkaj skribitaj al bahaanoj tra la mondo, kaj aliaj al tiuj en specifaj landoj, la Gardanto pliprofundigis ilian komprenon pri la instruoj, grade fortikigis la administrajn instituciojn de la Kredo, instruis la kredantojn kiel bone kaj efike uzi ilin kaj en 1937 lanĉis la Usonan Bahaan Komunumon en la efektivigon de la Dia Plano por la disvastigo de la Mesaĝo de Bahá'u'lláh. Tiu ĉi Dia Plano estis revelaciita de `Abdu'l-Bahá en aro da Tabuletoj skribitaj dum la jaroj de la Unua Mondmilito kaj ĝi estas la ĉarto por la propagando de la Kredo.

En la kadro de tiu ĉi ĉarto pluraj instruplanoj estis plenumitaj, unue en la Okcidenta Duonsfero, poste ankaŭ en Eŭropo, Azio, Aŭstralazio kaj Afriko ĝis en 1953 la Gardanto difinis "dekjarlongan, mondĉirkaŭantan, spiritan armeon" por porti la Kredon al ĉiuj restantaj sendependaj ŝtatoj kaj ĉefaj kolonioj de la mondo.

En 1957, meze de la entrepreno, la Gardanto, ellacigita de tridek ses jaroj de konstanta laboro, mortis dum vizito en Londono.

Pro tio ke Shoghi Effendi ne havis filon, la laboro de la Kredo post novembro 1957 estis kunordigita kaj direktita de la dudek sep Manoj de la Religio ĝis la triumfa plenumo de la entrepreno en aprilo 1963, kiam la unua Universala Domo de Justeco estis elektita de la membroj de la kvindek ses Naciaj Spiritaj Asembleoj kunvenigitaj ĉe la Bahaa Mondsidejo en Hajfa de la Manoj de la Religio.

Tuj post tiu ĉi historia elekto, bahaanoj el ĉiuj partoj de la ter globo kunvenis en Londono ĉe la unua Mondkongreso de la Kredo por soleni la centjaran datrevenon de la Deklaro de Bahá'u'lláh kaj por ĝoji pri la tutmonda disvastiĝo de Lia Kredo.

La superega institucio nuntempe estas la Universala Domo de Justeco, kreita de Bahá'u'lláh en Sia Plej Sankta Libro, rajtigita aŭtoritate leĝofari pri ĉiuj aferoj ne traktitaj en la Bahaaj Skriboj, kaj certigita pri dia gvidado en la Sankta Teksto mem. `Abdu'l-Bahá, en Sia Testamento, precizigas la elektometodon de la Universala Domo de Justeco, difinas ĝiajn rangojn kaj devojn pli klare, kaj asertas ke ĝi estas sub rekta gvidado de Báb kaj Bahá'u'lláh kaj ke ĝi estas la anaro al kiu ĉiuj sin turnu.

La unika kaj elstara trajto de la Bahaa Kredo estas la Sankta Interligo de Bahá'u'lláh, la fundamento sur kiu la Kredo starigas ĉiujn siajn strukturojn kaj bazigas sian evoluon. Ĝia unikeco kuŝas en tio ke por la unua fojo en religia historio la Malkaŝanto de Dio, en klara kaj senduba lingvo, provizas la rajtigitan interpretadon de Sia Vorto kaj certigas la kontinuecon de la divine difinita aŭtoritateco kiu fluas el la Fonto de Kredo.

Interpretado de Skriboj estis ĉiam en pasintaj religioj plej fekunda fonto de skismo. Bahá'u'lláh, en la Libro de Sia Sankta Interligo, rajtigis al Sia plej aĝa filo, `Abdu'l-Bahá, plenan aŭtoritatecon por la interpretado de Liaj Skriboj kaj por la direkto de Lia Kredo. `Abdu'l-Bahá, en Sia Testamento, difinis Sian plej aĝan nepon, Shoghi Effendi, Gardanton de la Kredo kaj solan interpretanton de la Skriboj. Ne estas pastroj en la Kredo kaj neniu persono pretendu specialan rangon aŭ gvidadon; aŭtoritateco estas rajtigita al institucioj kreitaj pere de la Bahaaj Skriboj.

Per tiuj ĉi unikaj provizoj, la kredo de Bahá'u'lláh estas ŝirmita kontraŭ skismo, kontraŭ rabadoj de nerajtigita ĉefeco, kaj super ĉio kontraŭ infiltrado de homfaritaj doktrinoj kaj teorioj, kiuj en la pasinteco frakasis la unuecon de religioj. Pura kaj senmakula, la revelaciita Vorto de Bahá'u'lláh, kun ĝia rajtigita interpretado, restas tute tra la Disistemo senkorupta kaj sankta fonto de la spirita vivo al la homaro.

En 1968 la Universala Domo de Justeco klopodis provizi la estontan plenumon de la specifaj funkcioj de protektado kaj disvastigado rajtigitaj al la Manoj de la Religio, per starigo de Kontinentaj Konsilantaroj. Ĉiu aro konsistas el kelkaj Konsilantoj difinitaj de la Universala Domo de Justeco, kaj ili daŭre kunlaboras kun la Manoj de la Religio de Dio. La difino kaj direktado de Helpdirektaroj estas nun devo de la Konsilantaroj, kaj la agadoj de la Manoj, el kiuj dek naŭ ankoraŭ vivas, fariĝis tutmonda.



---

La Gardanto skribis pri estontaj terglobaj instruplanoj plenumotaj sub la direktado de la Universala Domo de Justeco, kaj la unua el ili, Naŭjara Plano, estis lanĉita en 1964. Nuntempe, en 1969, la Bahaa Kredo estas starigita en 139 sendependaj ŝtatoj. Bahaanoj loĝas en pli ol 33000 lokoj tra la mondo; bahaa literaturo estas tradukita en 421 lingvojn; la kvina Bahaa Templo konstruiĝas en la urbo Panamo; terpecoj por 5<sup>o</sup> aliaj Temploj estas akiritaj; estas 83 Naciaj Spiritaj Asembleoj kaj pli ol 6800 Lokaj Spiritaj Asembleoj.

Plej kuraĝige el ĉio estas la reago de la homoj en lokoj tiaj kiaj Afriko, Hindujo, Sudorienta Azio kaj Latinameriko, kie grandaj nombroj de la indiĝenaj popoloj komencas akcepti la Kredon, estigantaj novan stadion en la evoluo de la administraj kaj sociaj agadoj de la tutmonda Bahaa Komunumo.

## RIMARKOJ PRI LA PERSAJ KAJ ARABAJ VORTOJ EN TIU ĈI LIBRO

Transliterado signifas meti literojn de unu alfabeto en alian alfabeton. Estas sonoj en la araba kaj persa lingvoj, kiuj ne havas Esperantajn ekvivalentojn. Pro tio oni devas kunmeti literojn por reprezenti tiujn sonojn: gh, kh, k.t.p. Krome, la persa lingvo havas kvar zo-ojn, tri so-ojn, du to-ojn kaj du ko-ojn, kiuj devas esti montritaj per pretekstaj literoj, jene: d, th, t.

La eldirmaniero persa kaj araba ŝanĝiĝas tra la Meza Oriento; personoj en Kairo, Teherano kaj Kaŝano respektive eldiras la samajn vortojn laŭ tri diversaj manieroj. Tiuj ĉi diversecoj okazas pro tio, ke "mallongajn" vokalojn oni ne skribas; ekzemple, "kelo" estus "klo". Perso kiu vidas por la unua fojo liston de nekonataj persaj urbetoj, ne scias kiel ilin eldiri. (Por helpi al persaj kaj arabaj legantoj eldiri nekonatajn vortojn oni uzas "diakritajn" signojn.) La persa lingvo en Teherano estas konsiderita la plej bona.

En la fruaj tagoj, Orientalistoj pliigis la konfuzon per transliterado de la persa kaj araba lingvoj laŭdezire. Germano literumus ŝaho "Schah" kaj Franco literumus ĝin "Chah." La 12an de marto 1923, la Gardanto de la Kredo petis al la bahaanoj "eviti konfuzon estonte" per fidela sekvo de uniforma literumado (kiu estis adoptita ĉe unu el la Internaciaj Orientaj Kongresoj). La 26an de novembro la Gardanto skribis:

*"Mi esperas, ke la geomikoj ne sentos siajn energiojn kaj paciencon tro streĉitaj per daŭra sekvo al tio kio estas aŭtoritata kaj universala, kvankam ĝi estas arbitra kodo por literumi Orientajn esprimojn."* Tiuj ĉi komunikaĵoj de Shoghi Effendi aperas en Bahá'í Administration, p. 5, ((Bahaa Administrado).

La rezulto estas, ke ordo anstataŭigis la antaŭan individualistan kaj kapriceman literumadon de fruaj tekstoj. Hodiaŭ kiam oni vidas persan aŭ araban vorton transliterumitan laŭ tiu ĉi sistemo, oni povas tuj reskribi la vorton en la originalan, dum antaŭe oni ofte devis diveni, kio estas la originalo.

Multaj personoj, kiuj ne estas poliglotoj, malŝatas fonetikajn simbolojn kaj aliajn komplikajn helpilojn konataj al lingvistoj. Precizan eldirmanieron oni povas akiri nur per aŭskultado kaj imiti personojn kiuj precize parolas la tematan lingvon. Plej bone la nuntempa teksto povas provizi nur similon al la originaj persaj sonoj.

Se persa aŭ araba nomo estas atente rigardata, elementon post elemento, estos pli facile trakti ĝin. Ŝejko Aĥmad-i-Aĥsá'í signifas religian ĉefon nomita Aĥmad el la urbeto Aĥsá. Haĝulo Mírzá Sejjed `Alí signifas tiun, kiu plenumis la pilgrimadon al Mekko, apartenas al la klerula klaso kaj devenas de la Profeto Mahometo kaj nomita `Alí. La lasta elemento, se ĝi ne aludas al urbeto, ofte signifas onies okupiĝon. Bazzáz estas vendisto de teksaĵoj, Rikáb-Sáz estas fabrikisto de stirupoj. Mírzá antaŭ nomo signifas edukisto kaj klerulo; post nomo ĝi signifas Princo.

## GVIDILO AL ELDIRADO DE LA PERSAJ LITEROJ

**a:** ne estas ekvivalento en Esperanto. Ĝi estas eĉ pli mallonga ol la angla vorto "cat", preskaŭ "e."

**á:** Armeo

**i:** bEsto

**u:** lOnga

**aw:** OU

**í:** mIto

**ŭ:** lUna

La jenaj kvar literoj havas la z-sonon: **dh, d, z, z**

La jenaj tri literoj havas la s-sonon: **th, s, s**

La jenaj du literoj havas la t-sonon: **t, t**

La jenaj du literoj havas la h-sonon: **h, h**

**kh:** ĥ

**zh:** ĵ

**q** kaj **gh** ne havas ekvivalentojn en Esperanto. La sono estas profunde gorĝsona, simile al gargaro ĉe la bazo de la gorĝo; anstataŭigu per "g", per "k", per pariza "r".

**áh** similas al A.

**ch** similas al Ĉ.

**j** similas al Ĝ.

La aliaj literoj kaj kunmetitaĵoj similas al la Esperantaj. Rimarku ke ` kaj ´ reprezentas paŭzon, fakte glotajn haltojn. La vorto Aĥsá'í inkluzivu la paŭzon, aŭ glotan halton, antaŭ la fina í.

Ĉiu silabo havas egalan emfazon.

Ne glutu la ho-ojn, spiru ilin: Alláh-u-Abhá = Alláh-ho-Abhá

## GLOSARO

**`Abdu'l-Bahá** (Abdol-Bahá): La Servanto de la Gloro

La Centro de la Interligo de Bahá'u'lláh; Ekzempliganto kaj Interpretanto de la Bahaa Kredo. "La Plej Sankta Branĉo" "Tiu Kiun Dio sendis". "La amata Filo de Bahá'u'lláh. ... Lia anstataŭanto surtere, la Administranto de Lia aŭtoritato, la Pivoto de Lia Interligo, la Paŝtisto de Lia grego, la Ekzempliganto de Lia religio, la Figuro de Liaj perfektecoj, la Mistero de Lia Revelacio, la Interpretanto de Lia menso, la Arkitekto de Lia Mondordo, la Standardo de Lia Plej Sankta Paco, la Fokuso de Lia senerara gvidado ... okupanto de posteno senegala kaj nekomparebla en la tuta kampo de religia historio (1844-1921). God Passes By, p. 239, 245 (Dio Preteriras).

**Abraham:** "Patro de Popolamaso"

Loĝanto de Ur en Ĥaldeo, kiu fondis la hebrean nacion. Prapatro de Bahá'u'lláh pere de Ketura. Tiu ĉi Malkaŝanto de Dio estas titolita ankaŭ la Amiko de Dio kaj la Patro de la Fideluloj.

**Adam:**

Malkaŝanto de Dio kiu inaŭguris 6000-jaran ciklon, kiu finiĝis per la Disistemo de Báb. "*La Kredo de Bahá'u'lláh devas esti ja konsiderita, se ni deziras esti fidelaj al la grandegaj implikoj de ĝia mesaĝo, kiel la kulmino de ciklo, la fina etapo en serio de intersekvaj, de antaŭaj kaj progresaj revelacioj. Tiuj ĉi, komenciĝante per Adam kaj finiĝante per Báb, pretigis la vojon kaj anticipis kun ĉiam-kreskanta emfazo la alvenon de tiu Tago de Tagoj en kiu Tiu Kiu estas la Promesito de ĉiuj Epokoj estos malkaŝita*". World Order of Bahá'u'lláh, de Shoghi Effendi, p. 103 (Mondordo de Bahá'u'lláh). La Gardanto plie skribas pri "*la leviĝo de la Astro de la plej nobla Revelacio de Bahá'u'lláh signanta la kompletigon de la sesmiljara ciklo enkondukita de Adam, glorigita de ĉiuj antaŭaj profetoj kaj sigelita per la sango de la Aŭtoro de la Bába Disistemo*". (Bahá'í News, enmetitaĵo datumita oktobro 1952.) Adam perslingve signifas homo. La Korano uzas la saman frazon por la kreo de Adam kiel por tiu de Jesuo Kristo, vidu 15:30, 66:13, k.t.p.: "blvinta en Lin Mian spiriton."

**Adrianopolo:** Lando de Mistero

**Akreo:**

Mallibereja urbo norde de la Monto Karmelo, Israelo; praa Ptolemais kaj la "Forta Urbo" de la Psalmoj. Loko de la Plej Sankta Malliberejo kie Bahá'u'lláh estis enkarcerigita. Tabuleto de 'Abdu'l-Bahá al s-ino Ella G. Cooper deklaras: "Estas skribite en la Biblio: 'Aĥor estas pordo de espero al ili.' Tiu Aĥor estas la Urbo Akreo. Kiu ajn interpretas tion ĉi alie estas malklera." Daily Lessons, de H. S. Goodall kaj E. G. Cooper; la citita Tabuleto komenciĝas sur p 92; specifa aludo estas al Hoŝea 2:15; transliterumo estas modernigita. God Passes By, pp. 184, 185 (Dio Preteriras). La S-ta Johano de Akreo de la Krucmilitistoj.

**`Alí (A-li):**

La unua Imamo, la laŭrajta posteulo de Mahometo laŭ kredo de la ŝjalstoj, ankaŭ la kvara Kalifo. Kuzo de Mahometo kaj edzo de Fátimih, li estas konata laŭ la titoloj Komandanto de la Fideluloj, Leono de Dio, kaj Sinjoro de Sankteco. Sanktulo kaj batalanto, brila verkisto kaj administranto, lin mortigis ĉe Kufa Ibn-i-Muljam (p. Kr. 661). Amír-'Alí deklaras: "'Alí estis la belo ideala (de kavaliroco) ... personiĝo de braveco, de kuraĝo, de malavareco; pura, milda, kaj klera, `sentima kaj senriproĉa,' li montris al la mondo la plej noblan ekzemplon de brava majesteco de karaktero." The Spirit of Islam, p. 254 (La Spirito de Islamo).

**Ameriko:**

Usono, kiun 'Abdu'l-Bahá vizitis en 1912. La Lulilo de la Bahaa Administra Ordo. God Passes By, pp. 329, 269 (Dio Preteriras).

**Ayyám-i-Há** (Aj-jam-eh-ha): "Tagoj de H"

La Intermetitaj Tagoj.

**Báb:** La Enirejo

La Profeto-Heroldo de Bahá'u'lláh, "La Malkaŝanto de la Unueco de Dio kaj la Antaŭinto de la Pratempa Belo" *Bahá'í Administration*, p. 11 (Bahaa Administrado); la reveno de la Profeto Elija, de Johano la Baptisto kaj de la Dekdua Imamo; "Mia Unua Nomo", "Kiun la posteularo agnoskos ke Li staras ĉe la konfluo de du universalaj cikloj, la Adama ... kaj la Bahaa ...", "La sendependa aŭtoro de die revelaciita Disistemo ... ankaŭ ... la Heroldo de nova Epoko kaj la Inaŭgurinto de granda universala profeta ciklo". God Passes By, pp. 276, 58, 54, 57 (Dio Preteriras). Naskiĝis en Ŝirazo 20 oktobro 1819, martiriĝis en Tabrizo 9 julio 1850.

**Badí (Ba-di):** "Mirinda"

Dekseparulo kiu portis la Tabuleton de Bahá'u'lláh al la ŝaho de Persujo kaj sekve estis torturita kaj mortigita. Lia persona nomo estis Áqá Buzurg de Ĥorasano; li estis konvertita de la historiisto Nabil kaj gajnis la titolon "Fiero de Martiro".

**Bagdado:**

Urbo kie Bahá'u'lláh deklaris Sian Mision al Sijaj kunuloj en 1863. Titolita de Li la Urbo de Dio kaj (profete) en la Korano la "Domo de Paco" (10:26, 6:127). God Passes By, p. 110 (Dio Preteriras).

**Bahá'u'lláh** (Ba-ha-ol-lah): La Gloro de Dio ...

"nomo specife menciita en la Persa Bayán, kiu signifas samtempe la gloron, la lumon kaj la splendoron de Dio ..." God Passes By, pp. 93-94 (Dio Preteriras). "La Supera Malkaŝanto de Dio kaj la Fonto de Lia Plej Dia Esenco." Bahá'í Administration p. 11 (Bahaa Administrado). "... neniam estu identigita kun tiu nevidebla Realeco, la Esenco de Dieco mem", Li estas "la plena enkorpiĝo de la nomoj kaj atribuoj de Dio." World Order of Bahá'u'lláh, pp. 114, 112 (Mondordo de Bahá'u'lláh). La Promesito de ĉiuj epokoj. Naskiĝis en Teherano, Persujo, 12 novembro 1817, ĉieleniris ĉe Bahjí, Palestino, nun Israelo, 29 majo 1892.

**Bahjí** (Ba-h-ĝi): Ĝojego

Signifas tiun parton de la ebenaĵo de Akreo kie la Sanktejo kaj Domego de Bahá'u'lláh troviĝas.

**Bayán** (Araba) (Baj-an):

Verko de Báb. Pli malgranda, malpli grava ol la Persa Bayán. God Passes By, p. 25 (Dio Preteriras).

**Bayán** (Baj-an): Klarigo

"La tenejo de la leĝoj ordonitaj de Báb". "Senegala inter la doktrinaj verkoj de Báb." "Cele severa ... drasta ..." Plena de "sennombraj frazoj ... en kiuj Li difinas la daton de la promesita Revelacio ..." Titolo donita de Báb al Sia Revelacio, precipe al Sijaj Verkoj. God Passes By, pp. 17, 25, 28 (Dio Preteriras).

**Baytu'l-'Adl-i-A'zam** (bejt-ol-adl-eh-a-zam)

La Universala Domo de Justeco, kies ĉiama ĉefo estas la Gardanto, kaj kies membroj estas elektitaj de la Naciaj Domoj de Justeco. Tiu ĉi anaro faras kaj rajtas nuligi siajn proprajn leĝojn, ĝi leĝigas pri "tio kio ne estas klare kaj plene registrita en Lia (de Bahá'u'lláh) sankta Skribo." ... la du kolonoj kiuj apogas tiun ĉi potencon Administran Strukturon - la institucioj de la Gardanteco kaj de la Universala Domo de Justeco". Estas ankaŭ Lokaj Domoj de Justeco, nuntempe nomitaj Lokaj Spiritaj Asembleoj, en urboj, urbetoj, k.t.p. kie loĝas naŭ aŭ pli da bahaanoj. Tiuj ĉi, elektitaj de bahaanoj en sia aŭtoritatsfero kiuj aĝas 21 jarojn aŭ pli, direktas la aferojn de la Kredo; Naciaj Spiritaj Asembleoj (estontaj Domoj de Justeco) estas elektitaj de delegitoj kiuj siavice estas elektitaj de plenaĝaj bahaanoj de ĉiu ŝtato, teritorio, provinco, k.t.p. en difinita lando, kaj havas aŭtoritaton super ĉiuj bahaaj aferoj en la tuta lando.

**Husayn** (ho-sejn):

Virnomo. Al ŝijaisma Islamo, Bahá'u'lláh estas la reveno de la Imamo Husayn. God Passes By, p. 94 (Dio Preteriras).

**Imamo Mihdi** (Meh-di):

Gvidato. Titolo de la 12a Imamo.

**Irano:**

La persa nomo por Persujo "Iran, Eran, Airon, la Airiyana de la Avesto, estas la lando de la arjanoj (Ariya, Airiya de la Avesto, Sanskrite Arya (bonega, honorinda)." Browne, E. G., L. Hist., 1, 4n.

**Islam** (ess-lam):

Submetiĝo al la volo de Dio. Nomo de la religio fondita de la Profeto Mahometo

**Junaj Turkoj:**

Turka partio organizita por efektivigi radikale politikajn kaj sociajn reformojn. La revolucio de la "Junaj Turkoj", 1908, devigis al la sultano proklami la konstitucion kaj liberigi, inter aliaj, ĉiujn religiajn malliberulojn, inkluzive de `Abdu'l-Bahá. God Passes By, p. 272 (Dio Preteriras).

**Konstantinopolo:**

"La Urbo" "La Granda Urbo", titolita de la islamanoj "La Kupolo de Islamo." La tradicia sidejo kaj de la sultaneco kaj de la kalifeco.

**Korano:** La Legoj; Legendajo

La Libro revelaciita de Mahometo, kaj nomita de Bahá'u'lláh la "senerara Libro". Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh, p. 221 (Kolektado el la Skriboj de Bahá'u'lláh). Ĝi havas laŭdire 55 specialajn titolojn, inkluzive de la Fortika Tenilo, La Ŝnurego, kaj La Bayán.

**"Literoj de Vivo":**

La unuaj 18 disĉiploj de Báb; la 19a estis Báb, la 20a Bahá'u'lláh.

**Mahometo** (Mo-ham-mad) (arabe):

570-632 p. Kr. Profeto de Dio, Revelacianto de la Korano. Fondinto de Islamo. Lia nomo signifas valde laudatus aŭ laudandus - laŭdegata aŭ laŭdegenda, antaŭdirita de Jesuo kiel Parakleto. Nomita de Bahá'u'lláh la "Amegato" de Dio. Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh, p. 221 (Kolektado el la Skriboj de Bahá'u'lláh). Aludita en la Korano 33:41 kiel la Sigelo de la Profetoj. Parolante pri la nova Tago, Bahá'u'lláh deklaras: "La titolo 'Sigelo de la Profetoj' plene malkaŝas ĝian (de tiu ĉi Tago) altan rangon. La Profeta Ciklo ja finiĝis. La Eterna Vero jam venis." World Order of Bahá'u'lláh, p. 167 (Mondordo de Bahá'u'lláh).

**Mashriqu'l-Adhkár** (maŝ-rek-ol-as-kar): Tagiĝejo de la Laŭdoj al Dio

Bahaa Adorejo. "Simbolo kaj antaŭaĵo de estonta mondcivilizacio." God Passes By, p. 350 (Dio Preteriras). Estas nun kvin: en Wilmette, Illinois, Usono; Frankfurto, Germanujo; Sidnejo, Aŭstralio; Kampala, Uganda, Afriko; Panamo-Urbo, Panamo.

**Mazra'ih** (Mazz-ra-eh): Prisemita kampo; farmo

Terpeco ĉirkaŭ 7 kilometrojn norde de Akreo, kie la palaco de Muĥammad Paŝao Safwat estis luita flanke de la Mastro por Bahá'u'lláh, post naŭ jaroj de enkarceriĝo en Akreo, dum kiuj Li "ne vidis verdajojn."

**Mírzá Husayn-`Alí** (mir-za-ho-sejn-a-li):

Persa nobelulo kun la titolo Bahá'u'lláh. Fondinto de la Bahaa Religio.

**Mírzá Yahya** (mir-za-ja-h-ja):

Perfida duonfrato de Bahá'u'lláh kaj "Ĉefrompanto de la Interligo de Báb". Báb neniam elektis posteulon, anstataŭanton aŭ interpretanton; Li nomis Mírzá Yahya (Subh-i-Azal) simple "kiel simbolulon ĝis la okazonta manifestiĝo de la Promesito." Mírzá Yahya malhonore signita kiel "Tiu ĉi vanta kaj nefirma persono," "trompita kaj uzita" de Sejjed Muĥammad. God Passes By, pp. 28, 233, 112 (Dio Preteriras).

**Mulao Husayn Bushrú'í** (ho-sejn-boŝ-ru-i):

La unua kredanto je Báb. Nomita de Shoghi Effendi "la leonkora." God Passes By, p. 90 (Dio Preteriras).

**Násiri'd-Dín Šaho** (Na-ser-ed-din):

"La helpanto al la Kredo" Malbonfama reganto de Persujo p. Kr. 1848-1896 (naskiĝis en 1831). Plej grava potenculo de ŝijaisma Islamo. Malhonore signita de Bahá'u'lláh kiel "Princo de Subpremantoj." God Passes By, p. 197 (Dio Preteriras).

**La Navváb** (Nav-ab):

Sanktulina edzino de Bahá'u'lláh, kies infanoj inkluzivis la Majstron, la Plej Sanktan Folion kaj la Plej Puran Branĉon. Si estis titolita de Li la "Plej Ekzaltita Folio" kaj Lia "ĉiama kunulino en ĉiuj la mondoj de Dio." God Passes By, p. 108 (Dio Preteriras).

**Naw-Rúz** (No-ruz): Nova Tago

Bahaa Novjartago, kiu okazas la 21an de marto nur se la printempa ekvinokso antaŭas la sunsubiron en tiu tago. Se la printempa ekvinokso okazas post la sunsubiro, Naw-Rúz estas solenita en la proksima tago. Irana tradicio atribuas la Naw-Rúzon al Jamŝíd, Antaŭdiluva reganto en ora epoko, kiu starigis la sunan jaron. Kvankam la persoj adoptis la lunan kalendaron de Islamo, ili neniam preterlasis la solenon de Naw-Rúz.

**Parsí** (par-si):

"Fársi" aŭ perso. Zoroastraj persoj kiuj elmigris al Hindujo post la araba konkero.

**Qurratu'l-'Ayn** (kor-ra-tol-ajn):

Konsolo de la Okuloj. Titolo donita al Tahirih de ŝia instruisto, Sejjed Kázim. La esprimon oni uzas por amata trezoro.

**Ridván** (Rezz-van):

1. Nomo donita de bahaanoj al la ĝardeno Najíbiyyih ĉe Bagdado. 2. La ĝardeno de Na'mayn. 3. La "plej sankta kaj plej signifa el ĉiuj bahaaj festenoj", solenanta la Deklaron de Bahá'u'lláh de Sia Misio al Sijaj kunuloj, en 1863. Dekdutaga periodo komenciĝante 21 aprilo kaj solenante ĉiujare.

**Sádiq** (Sa-dek):

Virnomo. La sesa Imamo de ŝijaisma Islamo (p. Kr. 699-783). Ja'far-i-Sádiq (t.e. la Veremulo) klerulo, beletristo kaj jurkonsilisto.

**Shoghi Effendi** (ŝogi' efendi):

La Gardanto de la Bahaa Kredo; la plej aĝa nepo de `Abdu'l-Bahá, la Elektita Branĉo difinita en Lia Volo kaj Testamento kiel "Gardanto de la Kredo de Dio", aŭtoritata interpretanto de la Instruoj kaj ĉiama ĉefo de la Universala Domo de Justeco. "Li estas la klariganto de la vortoj de Dio kaj post li sekvos la unuenaskito inter liaj idoj." La vorto shawq signifas "sopiro", effendi

estas turka honortitolo, kiu signifas "sinjoro, mastro", kaj aplikiĝas al altranguloj kaj kleruloj, k.t.p. en kelkaj partoj de la Mez-Oriento. La Gardanto, kiu mortis en Londono en 1957, estas enterigita en la Nord-Londona Tombejo.

**Subĥ-i-Azal** (sob-he-az-al):

Mateno de Eterneco (Mírzá Yaḥyá). Bahá'u'lláh citas el Amos 4:12-13, "Tiu, ... kiu faris malluma la mateniĝon", rilate al li. Epistle to the Son of the Wolf, p. 146 (Epistolo al Filo de Lupo). Vidu God Passes By, pp. 90, 113, 114, 115 (Dio Preteriras).

**Sultano `Abdu'l-Azíz** (Abd-ol-az-iz):

Sultano de Turkujo kiu "kune kun Násiri'd-Dín ŝaho estis la instiganto de la malfacilaĵoj, kiuj okazis al Bahá'u'lláh ..." kaj enkorpigis la koncentritan potencon rajtigitan en la sultaneco kaj la kalifeco. God Passes By, p. 225 (Dio Preteriras). 1830-1876; regis 1861-1876.

**Sultano `Abdu'l-Hamíd II** (Ab-dol-ham-id):

"La Granda Murdinto." Nevo kaj posteulo de `Abdu'l-`Azíz kaj kune kun li respondeca por la kvardekjara enkarceriĝo de 'Abdu'l-Bahá. The Promised Day is Come, p. 61 (La Promesita Tago Venis). 1842-1918; Sultano de Turkujo 1876 ĝis li estis senoficigita en 1909.

**Ŝaho:**

Reĝo, precipe de Persujo.

**Ŝirazo:**

Urbo en suda Persujo kie Báb deklaris Sian Mision 22 majo 1844.

**Tabrizo:**

Urbo en nordokcidenta Persujo kie Báb martiriĝis 9 julio 1850.

**Teherano:**

Naskiĝloko de Bahá'u'lláh; ĉefurbo de Persujo ekde 1788. La urbo estis fondita antaŭ ĉirkaŭ 700 jaroj, norde de la situo de pratempa Rhages (Rajj).

**Zoroastro:**

Profeto de Pratempa Irano kaj prapatro de Bahá'u'lláh. Mortis ĉirkaŭ a. Kr. 583. `Abdu'l-Bahá deklaras ke Zoroastro estis unu el la Profetoj kiuj aperis post Moseo. Persian Tablets, pp. 11, 76 (Persaj Tabuletoj); ke la "popolo de la Puto" en la Korano 25:39 kaj 50:13 aludas al la homoj de la rivero Arakso, kaj ke multaj Profetoj altrangaj estis inter ili, inkluzive de Mah-Abíd kaj Zoroastro.